





Š
•
K
•



PARDONU, NATAŠA!



D
A
K
O
V



PARDONU, NATAŜA!

Sergej K. Dakov

Intereseĝa okazaĵo, kiun sovietia ekssoldato kaj policano Sergej K. Dakov rakontas laŭ sia propra vivo, estas laŭvorte impresiga. Leganto ĝin „englutos“ unuŝpire. Sed poste li povas enpenŝiĝi. Kiam li legas pri tio, kiel homoj dum la tempoj de subpremo kaj mallibero en Sovetunio ŝatis sian kredon kaj kion ili pretis pro ĝi suferi, ni povas demandi: „Kaj kiel tiun riĉaĵon aprezas mi?“

Tradukita laŭ la ĉeflingva teksto de la libro „Odpust, Nataŝo“, eldonita en la jaro 2006 fare de la societo FATYM. Ilustraĵo sur la titolpaĝo laŭ Tomáš Hevera.

Esperantlingven tradukis decembre 2018 Miloslav Šváček.
La kontrollegon faris februare 2019 Miroslav Malovec

La tradukinto de ĉi tiu verko, Miloslav Šváček, disponebligas sian tradukon laŭ la permesilo *Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda (CC BY-SA 4.0)*. Ĉi tiu proklamo tamen neniel influas la aŭtorrajtojn de la origina kreinto de la verko.)

I

Jam kelkajn tagnoktojn sulkis nia ŝipo vojon tra ondantaj akvoj de Pacifiko. Eksplosis forta ŝtormo. Nia ŝipo Blagin troviĝis antaŭ kanada marbordo. Malgraŭ tio, ke la ŝipo estis granda kaj sufiĉe stabila por rezisti eĉ tiujn plej fortajn ŝtormojn, dum lastaj sesdek horoj ĝi senpove balanciĝis sur grandegaj ondoj kvazaŭ kaduka fiŝista boato.

Multaj niaj plej spertaj, „per ĉiuj akvoj lavitaj“ maristoj, ekmalsanis per marmalsano. La ondoj finbategis marbordon kaj kun grandega forto ili revenis. La ŝipo kaj ankaŭ ŝipano estis lacegaj. Ankaŭ en la rufo de la radiotelegrafisto, malgraŭ tio, ke ĝi estis ekipita per speciala izolajo kontraŭ bruo, mi klare sentis meĥanikan pulsadon de la ŝipo. Kvazaŭ ĉiu ŝipero rezistus kontraŭ fortego de la ŝtormo.

Dum lastaj tagoj mi tre malmulte dormis. Kiel radiotelegrafisto mi devis sendi regulajn raportojn al nia bazloko en Sovetunio. Eksterordinare malbona vetero kaŭzis, ke mi devis servi preskaŭ senhalte. Sed – la surmara ŝtormo tute ne egalas al la ŝtormo en mia interno. Post monatoj de mia planado kaj preparoj mi aperis antaŭ forkuro en liberon.

Ni ricevis permeson restadi en la marbordaj akvoj de Kanado. Mi do troviĝis proksime de la celo. Kun malpacienco kaj timo mi atendis, ĝis okazos por mi konvena momento por forkuro.

La unua parto de la ŝipo alterne malaperadis en grandegaj ondoj, alterne ĝi denove elmergiĝis. La maristoj mem rakontadas pri tiaj noktoj travivitaj kun timo. Estis vespero la 3-an de septembro 1971. Krom nia ŝipo postulis permeson atendi pli bonan veteron en la suverenaj akvoj de Kanado antaŭ Queen Charlotte Island ankaŭ pluaj dek sovetaj ŝipoj. Mallonge duonhoron antaŭ la naŭa vespere mi forlasis mian kajuton. Mi havis deĵoron. Nur kun granda peno mi moviĝis sur gliteca ferdeko. La ventego strebis ĵeti min en la ŝtormantan maron. Fine mi atingis pruan kastelon, malferminte la pordon mi zigzage eniris.

„Kiel malproksima estas la marbordo?“ mi demandis amikon Boris, kiu servis ĉe ŝipdirektileto. Li rigardis aparaton kaj ankaŭ mapon.

„Proksimume duonmejlon.“

„Kaj kiel malproksima povas esti tiu loko?“ mi montris al lumoj en malproksimo, kiuj estis apenaŭ videblaj pro pluvego kaj ventego.

„Eble tri kaj duono da mejloj.“

„Dankon,“ mi ekurmuris kaj mi revenis en kajuton de radiotelegrafisto estanta tuj post prua kastelo. Ekde la momento, kiam ni enfosis kanadajn suverenajn akvojn, ni ne devis anoncadi nian situon. Mia tasko estis konservadi kontakton kun ceteraj sovetaj ŝipoj kaj tio bonŝance ne postulis multan tempon.

Mi ekrigardis horloĝeton. Estis precize la oka kaj duono. „Sergej,“ – mi diris al mi, post kelkaj horoj vi estos aŭ libera aŭ morta. Aŭ ankoraŭ io pli malbona – se ili vin ekvidos kaj eliros el la akvo, ili vin sendos kiel dizertulon al laborlagero en Siberio kaj pli poste ili vin pafmortigos.“ Multajn en tiu ĉi momento ekregus duboj.

Estis ĉi tie do mi, Sergej Dakov, frekventinto de marakademio, eminentiĝinta en ĉiuj lernejoj, kiujn mi ekde la oka vivjaro vizitadis, prezidanto de Komsomolo, komisiita instrui ateismon al 1 200 kunlernantoj de la akademio.

Post kvin tagoj mi estas devinta reveni al nia bazloko, kie mi devas fariĝi plenrajta ano de la Komunista Partio kaj kie min atendas avantaĝa posteno ĉe polico. El praktika vidpunkto mi havis ĉiujn motivojn por reveni en Sovetunio. Sed tiuj ne sufiĉis al mi. Estu

kio ajn, kion mi instinkte serĉis, mi sciis, ke en la komunisma sistemo, kiun mi tiel bone ekkonis, mi tion ne trovos.

Tri kaj duono da mejloj, mi ekpensis kaj mi pripensis miajn eblojn. En sekuro mi estos nur ĝis atingo de tiu ĉi vilaĝo. Se mi atingus nur marbordon, malproksiman duonmejlon, gardantoj povus min kapti. Nur la vilaĝo kaj homoj loĝantaj tie povas min helpi. Sed tio signifas, ke por naĝatingi ĝin mi bezonus almenaŭ unu horon. Temperaturo de la akvo mi jam kontrolis. Kvin gradojn de Celsio. En teritorioj de la norda latitudo estas la tempo pasigita en la akvo demando de la vivo kaj la morto. Mi supozis, ke mi povas transvivi maksimume kvar horojn. Mi havis bonegan fizikan korpstaton. Regule mi hardiĝis kaj gimnastikis kun manhaltero. „Nun aŭ neniam,“ mi diris al mi. En profundo de la koro mi sciis, ke kajuto de la radiotelegrafisto estis lokigita en la antaŭa parto, inter la ŝipdirektilo kaj naŭtika kajuto de kapitano. Ĉar ni flosis en tuŝproksimeco de la marbordo, la kapitano senĉese observis situon de la ŝipo, por ke ni dumŝtorme ne kunpuŝiĝu kun iu el multaj ĉirkaŭaj rifoj.

Mi alĝustigis tri radarojn, unu por armea kaj du por naŭtikaj celoj kun espero, ke okazos nenio neantaŭvidebla. Tiumomente elrigardis el kajuto kapitano vokante: „Hoj, Sergej, ĉu ni nun ŝakludu?“ Dum ŝipveturo ni ofte ŝakludis. Neniukaze mi volis per rifuzo veki atenton, sed duaflanke mi ne povis al mi permesi perdi ankoraŭ pli multan tempon. Ĉar nur malhela nokto al mi donis certecon. Mi devis atingi marbordon pli frue, ol okazos tagiĝo. Krom tio mi timis, ke mi per longa hezitado ne maltrafu la plej konvenan momenton kaj mi mem poste ne rezignu pri mia decido. Tial mi respondis: „Kamarado kapitano, la sendormaj noktoj tute min laciĝis. Ne koleru, sed mi volus hodiaŭ laŭeble plej baldaŭ enlitiĝi. Mi estas ege laciĝita.“ La kapitano tion turnis je ŝerco: „Kiu tion iam aŭdis! Nur aŭskultu, kion diras tiu ĉi juna foko!“ li ridis. „Tri tagoj de ŝtormo kaj li estas laciĝita!“

Mi respiris kaj komencis finajn preparojn. Unue mi malŝaltis sendostacion kaj lasis funkciaanta nur ricevilon en krizokaza frekvenco, se en la kazo de danĝero iu ŝipo volus kontakti nin. Mi alĝustigis amplifilon sur la prua kastelo, por ke Boris ekaŭdu raporton.

Ankoraŭfoje mi kontrolis, ĉu ĉio estas en ordo. Poste mi foriris en mian kajuton. Denove mi devis trairi kajuton de rudristo, nun tute mallumigitan. Nur la ruĝaj, flavaj kaj bluaj kontrollampetoj lumigis aparataran panelon. La pluvo vipis la fenestrojn kaj malebligis kian ajn elvidon. Boris staris tute koncentriĝinta en malintensa lumo de la kontrollampetoj kun rigardo koncentrita al la aparatara panelo, por ke li povu laŭeble tuj difini eventualan difekton tenante ĝin sub kontrolo. Dum lastaj du semajnoj mi kun li pasigis multajn komunajn deĵorajn horojn. Por kelkaj sekundoj mi haltis ĉe li elparolante kelkajn negravajn vortojn. Mi klopodis esti tute natureca kiel ĉiam. Fine mi pardonpetis, ke mi estas mortlaciĝita kaj mi do foriras por enlitiĝi. „Boris, se iu nin vokos, ne vekigu min, mi vin petas. Nur en okazo de krizokaza situacio. Ĉu jes?“

„Kompreneble, Sergej,“ li kun rido respondis.

„Rememoru min en via varmigita, varma lito!“

„Bone,“ mi promesis kaj mi eliris sur ferdekon – en ŝtormon. Mi devis per tuta forto teni min al ŝnurego. Fortega vento kaj pluvego denove strebis forĵeti min el la ferdeko. Finfine mi eniris mian kajuton. Mi ŝlosis la pordon, ĉar neatendita vizito povus kaŭzi katastrofajn sekvojn. Ĝi kaŭzus ĉesigon de mia forkuro.

Maltrankvileme mi denove rigardis horloĝon. 21:45. Por lastaj preparoj jam restis maksimume dek kvin minutoj. La okaza interparolo sur la prua kastelo kostis kelkajn valoregajn se-

kundojn. Mi devis rapidi por eluzi restantan tempon, kiam la ferdeko ankoraŭ restos senhoma. Nur kiam la ŝtormo iom malfortiĝos, ĉiuj eliros eksteren por kontroli eventualajn difektojn.

Ĉar ni flosis altnorde, mi havis sub la vintra uniformo trikveŝton, sur ĝi pli dikan svetron, kaj sur ĝi ĵerzon, kaj sur la piedoj pezajn soldatbotojn. Pezo kaj malkomforto de tiu ĉi vestaro certe al mi tre komplikigis naĝon. Mi firme enkapigis al mi, ke mi devas atingi vilaĝon komplete vestita, eĉ kun botoj. Bedaŭrinde nun mi ne plu havis tempon pripensi tiun ĉi gravan problemon. Mian menson okupis aliaj aferoj, kiuj ŝajnis al mi esti pli gravaj.

De sub matraco mi elprenis longan, akvorezistan zonan, similantan mansakon, kiun mi mem pretigis. Surface ĝi estis farita el firma gumo, interne el akvorezista plasta materio. El ŝranko mi elprenis kelkajn objektojn, kiuj estis por mi la plej karaj: kelkajn fotojn de amikoj kaj intime konataj lokoj en Rusio: neniun el ili kaj nenion mi plu en la vivo vidis. Kaj tio estis ĉio, kion mi volis kunpreni en mian novan vivon. Rememoroj kaj vundoj – korpaj kaj animaj – al tio ankaŭ apartenis. Jes, tio estas ĉio, kio al mi restis, mi ekpensis kaj mi ekrigardis amaseton da paperoj. Nek la patrino, nek la patro. Tiu ĉi amaseto estas mia tuta vivo.

Iuj objektoj iĝos neaktualaj – komsomola legitimilo, maristaj dokumentoj. Sen aliaj, ekzemple sen naskiĝatesto mi ne povas esti. Se mi transvivos tiun ĉi nokton, certe mi ĝin bezonas por atesti mian personidentecon. Kaj se mi ĝin ne transvivos, oni sur la tomban ŝtonon almenaŭ elĉizos mian nomon – kompreneble en la kazo, se mia kadavro estos trovita.

Rapide mi paperojn kaj fotojn enŝtopis en la guman zonan, firme ĝin premligis, por ke en ĝian internon ne enpenetru akvo, kaj mi ĝin ligis al mia korptalio. Poste mi el la ŝranko elprenis alian objekton, kiun mi tutcerte ankaŭ bezonas: sportan subakvigistan tranĉilon. Mi ĝin kontrabandis sur la ŝipon kaj zorge kaŝadis. Mi firmigis ĝin solide al manartiko kaj kaŝis per sveltra maniko. Se mi sur la ferdeko iun renkontus, mi devus eviti ĉiujn senbezonaĵajn demandojn. La tranĉilon en la maniko mi nur tre malfacile kialigus. Sed en la akvo ĝi povas esti por mia vivo tre bezona.

Tio do eble estas ĉio, mi ekpensis. La tranĉilon mi havas kaŝitan, la zonrimeno estas firme tenanta. Estis 21:55, do la tempo ekiri. La ŝtormo dume ankoraŭ plifortiĝis. Almenaŭ min neniu facile ekvidos. Singarde mi malfermis pordon. Bonvenigis min duŝeto da malvarma akvoŝaŭmo. Eĉ ĉi tie, en parte tegmentita koridoro, la ŝtormo forte furiozis. Kiam mi ekiris la ĉefan ferdekon, ankoraŭfoje mi retrorigardis, ĉu iu min ekvidis. Per la tuta forto mi rezistis kontraŭ la vento. Mi komencis descendi la ŝtuparon, fortege mi min tenis por ne fali. Nenie estis iu vivulo. La tuta ŝipanaro sin kaŝis en holdon. Malrapide mi trapasigis min al ŝipmezo, al la loko, kiun mi antaŭ kelkaj tagoj elektis por desalto. Ĝi estis mallarĝa spaco sub grandega fumtubo, la ununura loko sur la ŝipo, kiu estis preskaŭ de nenie videbla. Antaŭ ol mi ĝin aliris, pasis kelkaj minutoj. Jam ĉe flugrigardo al la ŝtormaj ondoj atakis min teruro. Estos pli bone, se mi tien ne rigardos, mi ekpensis, aŭ mi fine ankoraŭ pri ĉio rezignos.

Subite iu tuŝapude antaŭ mi malfermis pordon. Priradiis min lumo. Fulmrapide mi kaŭriĝis, rigida pro timego. Koncerna persono ekrigardis eksteren, momenton li staris sursojle kaj la pordo denove fermiĝis.

Nun mi jam devis agi vere rapide. La granda ondo suprenlevis la ŝipon. Tio min por momento maproksimigis de la akvonivelo je distanco de duetaĝa domo. Mi decidis atendi, kiam ni revenos al normala nivelo. Kiam la ŝipon falpuŝigis lasta ondo, mi transpaŝis ferdekan ŝnuregon. Momenton mi balancis por ne perdi ekvilibron. Poste mi preparis min por salto en la ŝtormantan maron.

II.

Profunde mi enspiris kaj saltis. Mi subakviĝis laŭeble plej profunden kiel mi povis. Kaj poste fariĝis infero. Por tiel malvarmega akvo mi ne estis preparita, tio estis por mi ŝoko. Kiam mi mezuris varmon dumtage, ŝajnis al mi, ke ĝi estas same varma kiel en aliaj maroj. Nun min provis trafi vertiĝo. Kun superhoma streĉiĝo mi naĝis sub la akvo, por ke mi elmerĝu laŭeble plej malproksime de la ŝipo, por ke ne ekvidu min iu el maristoj. Kiam mi eksentis, ke disŝiriĝos miaj pulmoj, mi komencis trapasigi min al akvonivelo por enspiri. Mi retrorigardis. Ankoraŭ mi troviĝis danĝere proksime de la ŝipo. Denove mi forte enspiris, subakviĝis kaj naĝis laŭeble malproksimen. Mi malmergiĝis nur, kiam mi devis denove enspiri. La senpera danĝero ne plu minacis, sed la ŝipo estis ankoraŭ proksime. Denove mi subakviĝis kaj naĝis tiel longe, ĝis min pulmoj denove elpelis super la akvonivelon. Nun mia situacio estis multe pli bona.

Mian konduton mastris ununura ideo – mi devas troviĝi laŭeble plej malproksime de la ŝipo. Se iu min ekvidus, tuj komencus la akvonivelon lumigi reflektoroj. Facile ili min trovus eĉ en tia malbona vetero. Mi sciis, ke sur la ŝipo ekzistas bonega teleskopa armilo, per kiu oni trovus min kiel fiŝeton en akvopokalo. Eĉ se mi provus min senkulpiĝi per tio, ke mi falis el ferdeko en la maron, tio tute ne helpus min. La dokumentoj en la zono atestus kontraŭ mi.

Kaj tial mi denove profunde enspiris, subakviĝis en ondojn kaj laŭeble plej rapide naĝis. Baldaŭ mi estis tiel malproksime for de la ŝipo, ke mi jam povis sentime resti super la akvonivelo. Sed tiam min jam tremigis pereiga malvarmo. Botoj kaj peza vestaro sorbiĝis de akvo. Precipe botoj, pezaj kiel ŝtonegoj, min tiris malsupren. Nur teni min super la akvonivelo estis por mi neeltenebla penego. Tiumomente min absorbis grandega akvoondo. Mi ne sukcesos, fulme aperis en mia menso. Sed tamen mi sukcesis denove elmerĝi sur la akvonivelon. Mi tuis, sufokiĝis kaj subite enspiradis. Malbenitaj botoj! Mi faris grandan eraron, ke mi ne senbotigis min! Tiu ĉi unuarigarde malzorgita eraro eble kostos mian vivon.

„Sergej, estas fino,“ mi diris al mi en menso. Mi devis laŭeble rapide forigi tiujn botojn aŭ la venonta akvoondo min definitive entombigos. Mi elprenis tranĉilon kaj fortranĉis suban parton de la pantalono. Poste mi disŝiris pezan svetron. Profunde mi enspiris, subakvigis kapon kaj komencis tranĉaĉi la maldekstran boton. Mi tranĉis kaj malkudris, sed per la akvo sorbigita ledο ne volis malfiksiĝi. Ankoraŭfoje mi profunde enspiris, subakvigis la kapon kaj malkudris la boton per la tuta forto. Se tio ne sukcesos, do jam neniam. Tutforte mi enpremis kaj la ledο finfine malfiksiĝis. Mi eksentis malpeziĝon kaj ĝojon. Post la tria subakvigo mi liberigis mian maldekstran piedon. Sed la dekstra boto plu rezistis. Mi skermis per tranĉilo kvazaŭ obsedita. Finfine mi sukcesis meti tranĉilon sur la ĝustan lokon. Plenforte mi ektiris. Mi sentis kiel la ledο cedis. Finfine mi liberigis de tiu sentaŭga pezaĵo! Mi estis tute malfortigita. En la akvo mi jam estis tutan horon.

Baldaŭ aperis plua problemο – nebulo. La densaj, nepenetreblaj nebulvualoj kovris ne nur min, sed ankaŭ la ŝipon. Danke al pluvego kaj akvoondegoj mi perdis el vido malproksimajn lumojn de Blagin, de mia ununura orientiga punkto. En nebulo kaj pluvego mi facile povis perdi orientiĝon. En kiu direkto troviĝas marbordo? Kien mi devas naĝi? Ĉiam mi estis pli kaj pli konfuzita kaj maltrankviligita. Pezaj akvogutoj vipis mian vizaĝon. Nenion mi sukcesis! Sen kompasο en tia situacio ekzistis nenia espero por trovi direkton al la marbordo kaj al sekuro. Mi vidis apenaŭ du metrojn. Mi jam estis en la akvo du longajn mal-

fortigajn horojn. Forigo de la botoj kostis multan mian valoran forton. Dum tio mi trinkis multe da marakvo. Frido kaj malvarmo komencis efiki. Mi supozis, ke en la akvo mi eltenos ankoraŭ maksimume du horojn. kaj se mi dum tiu tempo ne sukcesos atingi teron, do neniam mi tion sukcesos. Mi naĝis blinde tutforte direkten, kie mi supozis, ke estos firma tero. Mi ja eĉ sukcesis utiligi ondmovojn kaj tio multe helpis al mi. Ho se nur la akvo ne estus tiel malvarmega! Ĝi kaŭzis al mi gravan tremfebron konsumante miajn valorajn fortrezervojn. Sed mi progresis antaŭen. Mi naĝis kaj naĝis. Mi rigardis al fosforeska horloĝa ciferplateto. Ekde la momento, kiam mi ensaltis akvon, pasis preskaŭ tri horoj. La marbordo devus esti jam proksime.

Tiumomente la forta ventopuŝo disŝiris nebulon. Kun streĉo de lastaj fortoj mi ĉirkaŭrigardis esperante ekvidi marbordon, almenaŭ iom da tero! Kaj subite mi ekvidis, eĉ se senbrile, ĉar malhelo, nebulo kaj pluvo estis fortaj. Tero! Roko! Mi sukcesis tion! La koro ekbatis pro ekscitiĝo. Mi tion sukcesis! Mirinda! Simple nekredbla! Neniam en la vivo mi vidis ion pli belan, ol tiun ĉi abruptan rokon. „Sergej, vi tion sukcesis! Vi sukcesis tion!“ Mi mem gratulis al mi. Mi naĝis al la roko kaj dume mi eluzis lastajn fortojn, lastajn rezervojn. Mi ne plu bezonis ilin.

La nebulo por kelkaj momentoj denove retiriĝis. Kaj tiumomente mi ekvidis ion nekredblan. Pro teruro mi ekokulegis. „Sinjoro Dio, ne!“ mi ekkriis malesperige. „Tio ja ne povas esti vero!“

Sed la vero tio estis. Anstataŭ roko mi ekvidis – Blagin, nian ŝipon! Post trihora sufero en malvarmega akvo, tute elĉerpita, mi troviĝis sur la loko, de kiu mi eknaĝis!

Tio elpuŝis mian spiron. Ion tian mi eĉ en songo ne supozis. Kio nun? Klara lumo, kiu faladis la akvonivelon el ŝipaj fenestretoj, varmis kaj logis. Ĉu mi tamen ne devus forĵeti zonon kaj diri, ke mi falis el ferdeko? La ŝipo timeme dancis sur la ondoj; tiu ĉi ekspliko estus tute kredinda. Ili min eltirus el la akvo, eventualus per kovriloj kaj donus al mi varman manĝon. Kaj estus fino de tiu ĉi hororo.

Sed estis tio vere tiel facila? La netolereblaj faktoj, antaŭ kiuj mi nun kuris, amarigus tutan reston de mia vivo. Kion fari? Ĉu ankoraŭ foje provi naĝi al la bordo? Tio estas tute nebla! Mi estis nerve tute en fino kaj tute elĉerpita. Kiel longe mi povus ankoraŭ elteni esti en la malvarmega akvo? Mi supozis maksimume kvar horojn – kaj tri horoj el tio jam pasis.

Trafrostiĝinta ĝisoste mi pripensis mian situacion. Mi decidis, ke mi pli volonte mortu ĉe provo trovi veran vivon, ol mi daŭrigu tiun antaŭan. Mi ne revenos, mi ne povas reveni! Eĉ se mi dronus, nenio surmonde min devigos reveni al la malnova vivmaniero!

Kun espereto mi denove malproksimiĝadis de Blagin. Mi pensis pri la dokumentoj en la zono. Ĉu ilin iu trovos? Ĉu ekkonos iu mian nomon? Mian okazaĵon? La pensoj sovaĝe kirlis en mia kapo. La tutan vivon – ekde la sesa jaraĝo – mi estis sola, sen la patrino, sen la patro. Ĉu ankaŭ sola mi devas morti en la grandega oceano?

Mi strebis konservi direkton. Kie povas esti bordregiono? Ĉu tiudirekte aŭ alidirekte? Kiel mi tion povis diveni, se mi vidis nur kelkajn metrojn antaŭen? Mi naĝis en rondo kaj mi malesperige decidadis pri ia direkto. Tiumomente mi konsciiĝis, ke mi estas perdita, senespere kaj definitive perdita.

„Sergej,“ mi parolis al mi mem, „tio estas via fino. Vi mortos. Neniu pri vi scias. Neniu pri vi interesiĝas, neniu pri vi zorgas, neniu viva animo.“ Mi estis edukita en spirito de

Marx, Engels kaj Lenin. Ili estis miaj dioj. Trifoje mi genuiĝis antaŭ senviva korpo de Lenin kaj mi al li preĝis. Li estis mia dio kaj instruisto. Nun, dum lastaj minutoj de mia vivo, mia spirito sin turnis al Dio, kiun mi ne konis. Tute instinkte mi preĝis: „Dio, neniam mi sur ĉi tiu mondo estis feliĉa. Se mi nun mortos, mi Vin tre petas, akceptu mian animon al Vi. Eble tie oni trovos iom da feliĉo kaj paco por mi, Dio. Mi ne petas Vin, ke vi savu mian korpon. Sed kiam ĝi nun alfundiĝos, prenu al Vi en la ĉielon mian animon. Mi petas Vin, Dio! Ege mi Vin petegas!“

Mi fermis okulojn konvinkita, ke okazis fino. „Ĉio estas finita,“ mi diris al mi, „nun mi jam povas dormi.“ Mi malstreĉis min kaj mi ĉesis naĝi. La batalo finiĝis.

Subite mi eksentis, ke io eksterordinara okazas al mi. Malgraŭ tio, ke mi estis tute elĉerpita, mi eksentis, kvazaŭ en lacigitaj ŝultroj komencus vekigi fortoj. Mi eksentis potencajn kaj amantajn brakojn de la vivanta Dio kiel ĉielan naĝsignon. Mi ne estis kredanto! Neniam antaŭe mi preĝis! Sed tiumomente mi en mia febla, trafrostiĝinta kaj malseka korpo klare sentis novan forton. Denove mi povis naĝi! Brakoj ankoraŭ antaŭ momento pezaj kiel plumbo, min portis al bordo! Mi estis kvar kaj duono da horoj en la akvo.

Sed la plej mirinda en tiu ĉi tuta afero estis, ke mi subite precize sciis, kiudirekten mi naĝu! Eĉ se ondoj ĵetis min ien tien, mi precize sciis, kie estas firma tero.

Tute mi ne komprenis, kio al mi okazis. Sed unu certon mi konis: mia fino ankoraŭ ne okazis! Subite mi antaŭ mi ekaŭdis sovaĝan muĝon. Obsedis min malespero. Ĉu tio denove estas ŝipo? Ĉu mi denove rondnaĝis? Per ĉiuj fortoj mi naĝis al la muĝado. Kiam la nebulo kaj la pluvo por momento ĉesis, tute klare mi ekvidis krudan rokon, elstarantan el la akvo. Vera roko! La muĝo, kiun mi aŭdis, kaŭzadis ondoj puŝantaj kontraŭ la roko. Ĝi estis roko – malmola, solida, fortika roko! Mi atingis firman teron! Mi sukcesis tion! Vere mi sukcesis! Mi tre ekĝojegis.

Sed mia entuziasmo finiĝis tiel rapide, kiel ĝi aperis. Kun teruro mi observis, kun kia grandega forto la ondoj puŝas kontraŭ la roko. Se iu el ili min deprenus kaj ĵetus kontraŭ la roko, tion mi ne transvivus. „Ankoraŭ vi ne tute venkis,“ mi diris al mi. Refoje mi vokis al Dio kaj denove mi klare sentis, ke Li estis ĉe mi. Tio estis vere mirinda kaj nekredibla! Malgraŭ tio, ke mi pasigis en la malvarmega akvo jam kvin horojn, anime mi estis tute vigla. Atenteme mi observis, kiel la ondoj puŝas kontraŭ la roko. Poste mi atendis konvenan momenton inter du ondofrapoj kaj rapide mi naĝis al la firma tero. Mi sukcesis. Forte mi alfiksiĝis al la roko. Unuan fojon post kvin horoj mi havis sub la piedoj firman teron. Rapide mi grimpis supren, por ke plua ondo min ne repuŝu en la maron. Mi grimpis ĉiam pli kaj pli supren. Tiumomente alpeliiĝis grandega ondo kaj ĝi frakasiiĝis kontraŭ klifo – tuj sub mi. Firme mi tenis min je akraj rokeĝoj. Post momento mi jam estis tiel alte, ke mi povis sekure observi furiozantan maron sub mi.

Nur nun, kiam la treega streĉo malfortiĝis, mi eksentis, kiel terure mi estas senfortigita. Subite min trafis plua atako de tremfebzo, la dentoj sovaĝe grincis. Mi ne kapablis superi tiun ĉi tremfebron. Ĝi skuegis la tutan korpon. Dum naĝado mi multe entrinkis la salan marakvon. Suferigis min soifego kaj terura malvarmo. Mi sciis, ke tie ĉi resti mi ne povas. Estis la kvina horo matene kaj en la akvon mi saltis je la deka horo vespere. Mian forkuron el Blagin ili certe jam rimarkis. Kaj mi ankoraŭ sidis sur la roko kaj krom tio ankoraŭ direkte al la maro! Kiam la ŝtormo trankviliĝos, facile ili min ekvidos per lorno. Komenciĝis mateniĝi. Mi sentis, kvazaŭ ĉiumomente devus elnebuliĝi boato kun armitaj gardaj deĵo-

rantoj. Tio estus mia fino. Ili min ekhavis aŭ vivan aŭ mortan. Neniu kaze mi povis resti sur tiu ĉi flanko de la roko. Mi devas atingi sendanĝerejon, la vilaĝon, kie vivas homoj. Mi grimpis ĉiam pli alten. Ĝi estis kruta roko, alta ĉirkaŭ 65 metrojn. Tamen mi sukcesis atingi ĝian supron.

Sed ankoraŭ mi ne troviĝis en sendanĝerejo. Subite haltis bati mia koro. Disinjoro! La vilaĝo situis sur la kontraŭa flanko de la golfo, proksimume tri kilometrojn de mi. Tio signifis denove naĝi! Ekatakis min kapturigo kaj mi ne estis kapabla pripensi mian situacion! Mia ununura penso estis laŭeble plej rapide atingi vilaĝon: pli frue, ol iu venos por min kapti. Tio ŝajnis al mi tute neebla. Mi troviĝis tute antaŭ kolapso, duone frostiĝinta, la malvarmo senĉese skuigis min. Mi peniris ĝis la fino de la roka kornico kaj mi komencis malsupreniri sur la duan flankon. Subite ekglitis miaj piedoj kaj mi glitfalis kelkajn metrojn malsupren sur la roka tereno. Mi trenis min pluen, senĉese mi faladis. Mi ne kapablis pluen iri. La sangantaj vundoj bruldoloris. Finfine mi altreniĝis al fundo de ia abismo, sanganta, tute vundita. Duan fojon mi estis konvinkita, ke mia forkuro ne sukcesos. Dum grizlumo kaj pluvego mi elgrimpis foren. Se mi ne estus aktivanta montgrimpano, mi ne sukcesus, mi tie mortus.

Kiam mi denove estis sur la rokpinto, mi vidis lumojn de la vilaĝo, allogantaj, kaj tamen tiel malproksimaj. Baldaŭ tute tagiĝos. Mi perdis multan tempon, mi devas venigi min tien! Mi ensaltis akvon. Tuj mi ekkriegis pro doloro, kiam la salakvo lavis miajn multajn vundojn. La tuta korpo min bruldoloris. Tute svenigita per doloro mi ekpensis: Dio, vi donas al mi eksenti iom el la doloroj, kiujn mi kaŭzadis al viaj junuloj. Sur kruroj fluis mia sango. Subite mi ekvidis – aŭ tio nur ŝajnis al mi? Mi teruriĝis: la malgranda boato proksimiĝis rekte al mi. Certe ili konstatis, ke mi mankas kaj do ili serĉas min, mi ekpensis.

Ĝis nun mi ne scias, ĉu tio estis vera boato aŭ nura halucinacio. Ununura ekpenso ekregis min: naĝi for, for, malproksimen! Ĉiu movo kaŭzis al mi grandan doloron. Malgraŭ tio mi progresis antaŭen. Iompostioe mi sentis, ke mi perdas konscion. Komencis ataki min svenoj. Mi perdis multan sangan. Ne! Nun ne, se la libero estas tiel proksime! En la lumo de la vekiga tago mi ekvidis malgrandan fiŝvilaĝon. Jam kelkajn cent-metrojn! Dio, ne permesu, ke mi mortu post ĉio tio, kion mi suferis, mallonge antaŭ la celo! Mi petas Vin, lasu min vivi!

Tiumomente min ĉirkaŭis mallumo. La vilaĝeto, al kiu mi proksimiĝis, malrapide malaperadis antaŭ la okuloj. Lasta, kion mi rememoras, estis penso: mi devas pluen naĝi! Mi devas naĝi pluen! kaj poste – tuta mallumo. Kio plu okazis, mi ne scias.

Sed kion mi do serĉis en tiu ĉi malvarma oktobra mateno, tiel proksima al la morto kaj tiel malproksima de la hejmo? Kio alkondukis min al tio, ke mi rezignu vivon de la navigacia oficiro kaj komsomola funkciulo veninte ĝis ĉi tien, sur la rokbordon de Kanado kaj nur per eta hareto mi eskapis la certan morton? Mia historieto komencis okazadi antaŭ multaj jaroj en Rusio.

III.

Pri miaj gepatroj mi memoras nur svage. Mi estis kvar-jaraĝa, kiam estis murdita mia patro. La patrino mortis nelonge post li. Multon el tio, kion mi pri ili eksciis, diris al mi estinta bona amiko de la patro.

La patro naskiĝis en Volgio. Kiam mia avo estis sendita al ekzilo, mia patro devis foriri

kun li. Li vivis en ŝtata junularhejmo kaj vizitis proksiman lernejon. Jam en junaĝo li iĝis entuziasma komunisto. Ĉar la patron li havis en laborlagero, li devis unuavice „rebonigisian reputacion, liberigi sin de la malbona infekto de la familiaj ligiloj“.

Kaj tial li la propran patron neis.

Bone mi memoras, ke mi tre amis mian patron. Vespere – tiam mi havis tri aŭ kvar jarojn – ĉiam li venadis en mian ĉambron kaj kisis min je bona nokto. Ĝis nun mi antaŭ mi vidas liajn penetremajn nigrajn okulojn kaj sur la vango mi sentas lian longan tordan barbon, kiu min ĉiam tiklis. Ankaŭ mi memoras, ke li ŝatis drinki. Kiam li revenis hejmen, li sidiĝis al la tablo kun botelo da akvo. Ĉar li deĵoris en armeo, li ofte tre longe restadis ekster la hejmo. Sed kiam li estis hejme, ni kune ofte petolis. Neniam mi forgesis, kiel li instruis min danci. Se mi bone sukcesis, kiel premion mi ricevis pokalon da vodko. Mi fortrinkis ĝin plu dancante. Baldaŭ la patro tute ebriiĝis kaj faligis sin sur la liton. Kaj tiam mi malfermis lian ŝrankon, surmetis mantelon de lia uniformo kaj marŝis en la ĉambro. Meritordenoj sonoris ĉe ĉiu movo. Aliokaze mi la patron memoras nur svage.

Kun la patrino mi estis en pli proksima kontakto. Ŝi nomiĝis Anisja. Ŝi devenis el tre malriĉa familio, iuj ŝiaj parencoj estis kredantoj. Ŝi tre prizorgis ilin. Sed ion alian mi ne tro multe memoras.

Mi havis du fratojn. La fraton Vladimir mi bone memoras. Li estis kelkajn jarojn pli aĝa ol mi. Ĉar ni loĝis sur armea bazloko en Novosibirsko, la frato Vladimir vizitadis lernejon en la urbo. Dumferie, kiam li estadis hejme, ni kune travivis multajn aventurojn. Vladimir estis forta kaj mi tre admiris lin. Lastan fojon mi lin vidis, kiam li iun vesperon venis al mi. Mi jam kuŝis en la lito. Li diris al mi, ke iam ankaŭ mi estos granda kaj forta knabo. Poste li brakumis min dirante „ĝis revido“ kaj foriris – de mi kaj ankaŭ el mia vivo. Ekde tiu tempo mi neniam plu lin vidis. Li malaperis senpostsigne.

Jam kiel deksepjara frekventanto de leningrada Mararmea Akademio mi vizitis Novosibirsko. Unu mia pli aĝa amiko min demandis: „Sergej, ĉu vi volus ion pli ekscii pri via patro, patrino kaj fratoj?“

„Kompreneble!“

„Iru do al la armea bazo kaj trovu tie subkolonelon Dobrinskij. Li konis vian patron kaj certe li multon diros al vi, kio vin interesas.“ Mi sciis nur tion, ke la patro estis mortpafita kaj la patrino mortis kelkajn monatojn pli poste. Sed neniujn pli proksimajn detalaĵojn mi konis. Mi sopiregis ekscii ion pli. Kiam mi estis dektri-jaraĝa, mi aŭdis, ke mia frato Vladimir estas en la laborlagero en Kazahlando. Mi sendis tien leteron kun peto helpi min en lia serĉo. Post ia tempo mi ricevis respondon, ke lia nomo estas nenie registrita kaj ke mian fraton neniu konas.

Pli poste mi tion provis ankoraŭfoje. Pere de altranga komunista oficiro mi min skribe turnis kun la sama peto al la Supera Soveto de USSR en Moskvo. Sed eĉ ne de tie mi ion eksciis. Li malaperis sen postsigno. Aŭ lin renkontis la sama sorto kiel mian patron, aŭ li vivas forgesita en iu laborlagero. Sed neniam mi perdis esperon lin iam ekvidi.

Ekde mia kvara jaraĝo mi vivis en la familio de niaj amikoj kaj kiel sesjara mi estis loĝigita en la ŝtata junularhejmo. Ekde la infanaĝo al mi tute mankis zorgo kaj amo de la gepatroj. Matene neniu diris al mi: „Bone vi matenmanĝu kaj en la lernejo bone atentu!“ Por ĉiu infano tiuj ĉi plej simplaj frazoj multon signifas. En mi restadis senvivo kaj malpleno, neniam mi ion tian ekkonis kaj travivis. Kaj eble tiu ĉi paŭzo estis por mia plua vivo

decidiga. Kiam mi do eksciis pri subkolonelo Dobrinskij, kiu povus diri al mi ion pri miaj gepatroj, mi eĉ momenton ne hezitis kaj tuj mi lin serĉis. Malpacience mi frapis la pordon de lia loĝejo, kaj tuj, kiam ĝi malfermiĝis, mi prezentis min: „Mi estas filo de Ivanoviĉ Dakov.“

Unue li surprizite min rigardis. Poste li amikece ekridis kaj diris: „Jes, mi konas vin. Kaj vian patron mi bone memoras. Eniru!“

Li prezentis min al sia edzino, kiu min reĝe gastigis. Poste ni sidiĝis kaj rakontis. Vodka ĉe tio ne mankis. Dobrinskij multe trinkis, ĉiam li estis pli parolema kaj fine li ne plu kapablis teni la langon briditan. Kaj tiel okazis, ke mi eksciis pri la patro iujn aferojn, kiujn mi tute ne antaŭsentis.

„Kompreneble, ke mi lin memoras. Via patro estis tre interesa kaj kapabla homo. Li volis satisfakcii erarojn de via avo, kaj tial li iĝis soldato de la komunista armeo. Malgraŭ tio, ke li havis preskaŭ nenan klerigon, li estis tiel kapabla, ke li atingis altan rangon. Li ĉeestis multajn armeajn ekspediciojn kaj senĉese li riskis vivon pro komunista partio, precipe en Turkeŝtano. Tie li komandis brigadon, kiu subpremis pliajn ribelojn. Kiam eksplodis finna milito, libervole kiel la unua li anonciĝis al fronto. Li komandis brigadon kaj heroece li batalis.“

Mi sidis senspire aŭskultante. Kun ni estis ankaŭ la edzino de la subkolonelo. Konstante ŝi verŝis vodkon en la pokalon de la edzo.

„Kiam eksplodis dua mondmilito, via patro ne povis manki en la armeo. Li komandis tankbrigadon sub komandado de la generalo Rosovskij. Li deĵoris tre sindoneme kaj ofere me kaj li ricevis multajn ordenojn. Post la milito ni estis bonaj amikoj. Ni ambaŭ estis senditaj ĉi tien, sur tiun ĉi armean bazon. Kiam mi ĉi tien kun via patro venis, tute nenio estis ĉi tie. Ni ricevis ordonon konstrui la armean bazon kaj tankan kaj artilerian ekzerckampon. Mi havis je unu grado pli malaltan rangon ol havis via patro kaj mi estis lia asistanto. Fakte li laboris tre forte kaj ĉio, kion vi ĉi tie vidas, estas lia laboro. Eĉ se mi al li helpadis per konsiloj laborante kun li, estas tio antaŭ ĉio lia merito. Via patro estis ne nur bona soldato, sed ankaŭ bona organizanto kaj politika aktivulo. Centprocente li subtenis Stalin.“

„Kaj kio okazis poste, kiam la potencon ricevis Ĥruŝĉov?“ mi demandis. „Nu jes, poste okazis malfacilaĵoj. Ifoje nokte, kiam mi deĵoris, haltis ekstere aŭtomobilo kaj eliĝis el ĝi kelkaj viroj. Ili demandis pri via patro. Mi diris al ili, ke li estas hejme. Matene li devus anstataŭi min, sed li tute ne aperis. Mi do sendis en lian loĝejon kolegon, ke li trovu informon, kio kun li okazis, sed li hejme ne estis. Nokte li estis forveturigita. Certe vi volonte eksciis la kaŭzon. Tiel do Sergej: Ĥruŝĉov transprenis potencon post Stalin kaj en la komunista partio okazis grandaj bataloj. Ĉion oni ne povis tuj ŝanĝi, sed malrapide, paŝon post paŝo. Por ke Ĥruŝĉov firmigu sian propran potencon, li ordonis forigi ĉiujn gravajn oficirojn, pri kiuj li sciis, ke ili subtenis Stalin-on. Tio kompreneble devis okazadi sekrete kaj sinsekve, por ke tio ne eksplodigu ribelon. Kaj tial via patro estis forveturigita nokte. Mi konis nur malmultajn homojn, kiuj tiel sindoneme servis al komunismo kiel li. Sed li estis forigita – kiel multaj aliaj. Post du tagoj aperis en nia armea bazo nekonata viro, kiu sin prezentis kiel nia nova komandisto.“

„Dakov estis kanajlo,“ li diris. „Li estis arestita.“ Tio estis la lastaj vortoj, kiujn mi pri via patro aŭdis. Li malaperis sen spuro. Ĉu vi komprenas, Sergej?“

Mi komprenis, sed ĉu mi vere komprenis? La subkolonelo ankoraŭ diris, ke se mia patro

ne estus mortigita, certe hodiaŭ li jam estus generalo. Por Ĥruŝčov li simple estis tro forta persono; kaj tial li devis morti. Por ke li firmigu sian propran potencon, li forigis homon, kiu dum la tuta vivo kaj per ĉiuj fortoj servis al komunismo.

Dobrinskij daŭrigis: „Kiam la patro malaperis, ruiniĝis al via patrino ŝia tuta vivo. Mia opinio ŝi mortis kvar monatojn pli poste. Pro ĉagreniĝo fendiĝis ŝia koro. Ŝi ne plu volis vivi. Kiam ŝi mortis, perdiĝis al ni ankaŭ vi. Mi ne scias, kio ekde tiu tempo pri vi okazis. Se mi vin trovus, mi helpus vin. Sergej, kion vi do faris post la morto de viaj gepatroj?“

IV.

Pri la okazaĵoj, kiuj okazis kelkajn monatojn post la morto de la gepatroj, mi rememoras kun granda doloro. Mi estis nur kvar-jaraĝa, kiam mi eksciis, ke la patro hejmen neniam revenos.

„Panjo,“ mi demandis, „kie estas la patro? Kial li ne venos? Kial li ne kisos min por la bona nokto?“

La patrino aŭ sin turnis aŭ ekploris, sed nenion ŝi respondis al mi. Kaj mi, malgraŭ mi estis etulo, ekkomprenis, ke devis okazi io terura, se la patrino estas konstante malĝoja. Ŝia sanstato ĉiam pli kaj pli malboniĝis. Fine ŝi devis enlitiĝi kaj nek pri si nek pri mi ŝi kapablis zorgi. Kiam mi ŝin lastfoje vidis, ŝi jam estis tre malsana. Kaj foje iu konata sinjorino diris al mi: „Sergej, vi ne plu havas patrinon. Iru kun mi en mian hejmon.“

Komence mi nenion komprenis. Mi estis konvinkita, ke mi nur pacience devas atendi. Ŝi ja ne povis nur tiel senkaŭze foriri, sen adiaŭo, porĉiame kaj lasi min solan! Mi estis konvinkita, ke ŝi baldaŭ revenos kaj denove ĉio estos en ordo.

La sinjorino, kiu forkondukis min, nomiĝis Kolmakovova. Ŝia edzo estis profesoro, scienculo kaj pedagogo kaj en Rusio li plenguis estimon kaj rekonon. Ili ambaŭ estis agrablaj kaj mi amis ilin. Ili havis du filojn. Unu el ili nomiĝis Andrej. La sinjorino Kolmakovova volis, ke mi komencu vivi tute alie. Ŝi kaj ŝia edzo estis tre kleraj kaj ŝi komence min instigadis, ke mi multe lernu kaj ŝi mem helpadis al mi pri legado kaj matematiko.

La sinjoro profesoro estis ankaŭ tre bonkora kaj mirinde saĝa homo. Li iĝis membro de Akademio de Sovetaj Sciencoj. Malgraŭ tio, ke li estis okupita kaj havis du siajn proprajn filojn, li ĉiam sukcesis trovi iom da tempo ankaŭ por mi. Mi ekfavoris lin kiel propran patron.

La sinjorino Kolmakovova estis etstatura, plena de patrineca zorgemo kaj ŝi estis decidita adopti min. Du jarojn ili vivis bele kaj kontente krom unu escepto. Tiu estis Andreo.

Jam tiam mi sciis, ke kun li ne estas io en ordo. Pli poste mi eksciis, ke li malsanis pro iuj psikaj difektoj. Li estis pli aĝa ol mi kaj en sia aĝo neadekvate forta kaj matura. Lia konduto rilate al mi vekis en mi timegon kaj teruron.

Iun tagon – kiam mi estis en bankuvo, Andrej eniris banĉambron. „Iru for!“, mi diris al li. „Nun vi ĉi tie havas nenion por fari. Kiam mi finbanos min, do venu!“ Sed Andrej pene-treme ekrigardis min kaj strange li ridetis. Mi eksentis danĝeron kaj ekokupis min timego. Kaj subite li alsaltis kaj perforte li mergis mian vizaĝon sub la akvon. Mi defendis min. Mi sovaĝe baraktis la brakojn ĉirkaŭ mi kaj kaptis spiron. Subite mi ekkomprenis, ke li volas dronigi min. Mi volis voki por helpo, sed la buŝon mi havis plenan da akvo. Mi defendis min tutforte, sed Andrej estis multe pli forta ol mi. En la plej granda malespero finfine mi sukcesis min liberigi kaj elsalti el la bankuvo. Kun krio kaj ploro mi elkuris el la banĉambro

kaj mi serĉis sinjorinon Kolmakovova aŭ ŝian edzon. Sed neniu estis hejme. Andrej, timigita pro krio, forkuris pro timo antaŭ la gepatroj en la ĝardenon. Tio ne estis ununura ĉikano flanke de Andrej, kaj tiel mi ekkomprenis, malgraŭ tio, ke mi estis nur ses-jaraĝa, ke estas por mi tre danĝere vivi kun li sub unu tegmento. Mi decidis forkuri. Mi enkuris denove en mian ĉambron, kunprenis kelkajn aĵojn, kiuj ne estis tro pezaj, enmetis ilin en la paperan mansakon kaj el familio de Kolmakov mi forkuris. Andrej tiel hororigis min, ke mi decidis neniam eniri tiun domon.

Mi ekaperis surstrate, tute forlasita senhejma orfo, sen la manĝo. Vestaĉojn, kiujn mi havis surmetitajn, estis mia ununura havaĵo. Mi vagadis surstrate de Novosibirsko, sola, malsatanta, timigita. Mi tute ne sciis, kion plu fari. Mi sciis, ke mi devas trovi du aferojn, manĝon kaj iun lokon por dormo. Mi devas ellerni vivi sola en tiu ĉi grandega urbo, dependanta de si mem. Sed baldaŭ mi konstatis, ke tio estas neniel facila.

Ĝus estis aŭgusto, tial mi ne devis zorgi pri varma vestaĵo. Sed eĉ tiel mia situacio estis tre malĝojega. Kion mi faru? Kien mi iru? Pripensante mi vagadis tra la stratoj. Ĉio ŝajnis al mi grandega kaj fremda. Novosibirsko havas du milionojn da enloĝantoj kaj estas nomata siberia vojkruĉiĝo. Mi eĉ ne sciis, kiel mi aperis antaŭ fervoja ĉefstacio. Homamasoj senĉese direktis tien kaj reen. Ĉiuhore forveturadis trajnoj al Vladivostok, al Malproksima Oriento, al Taŝkent, al suda Azio kaj al okcidento, en eŭropan Rusion. Estis ĉi tie videblaj homoj de diversaj naciecoj kaj parolantaj diversajn fremdajn lingvojn.

Por sesjara knabo, kiu estis unuan fojon for el la hejmo, tio estis ekscita travivaĵo. Tute mirrigidiĝita mi ensorbis en min ĉiujn impresojn. „Tion mi bezonas,“ mi ekpensis kaj mi ĉirkaŭrigardis en la granda fervojstacia konstruaĵo. En atendejo estis multaj benkoj. Certe ĉi tie mi trovos iun malhelan angulon, kie mi povus nerimarkite tranokti. En tiu ĉi kaoso apenaŭ iu rimarkos malgrandan knabeton dormantan sub la benko. Mi sentis min ĉi tie sekura. Ĉi tie min neniu trovos kaj do ne forkondukos min reen al Kolmakov.

Kiam mi solvis problemon de tranokto, mi povis pripensi manĝon. Ne estis tio facila. En la poŝo mi havis nur kelkajn monerojn kaj la malsato estis granda. La glaciaĵbudo min rekte magie altiradis. Mi ne kapablis rezisti. La glaciaĵo estis bonega, sed tiel malgranda, ke mi ĝin tuj formanĝis. Plu mi malsatis. Mi elpoŝigis restantajn monerojn kaj mi aĉetis ankoraŭ unu porcion.

Io min instigis, ke la monon mi lasu por pli malbonaj tempoj. Sed la ses-jaraĝa knabo ne kapablas pensi pri estonto. Mi do aĉetis ankoraŭ lastan glaciaĵon kaj poste mi senzorge vagadis tra la stratoj. En la poŝo restis nur ununura monero, per kiu mi povis aĉeti tute nenion.

Kiam mi preteriris budojn kun kukoj, dolĉaĵoj kaj diversaj manĝaĵoj, amasiĝis salivoj en la buŝo. Plej volonte mi prenis iom el ĉio. Sed mi devis nur rigardi, kaj tio ankoraŭ pli multe incitis mian malplenan stomakon.

Unu vendbudo kun kukoj min tre allogis. Interne vendis terure aspektanta eble cent-kilograma virino kaj kun malsarena rigardo ŝi gardis la varojn. Ŝi memorigis al mi giganton, fajrokraĉantan. Kun tiu mi pli volonte nenion komenciĝos, mi ekpensis.

Post momento mian atenton altiris vendbudo kun fruktoj. La vendisto ankaŭ ne aspektis amikema. „Kion vi volas ĉi tie?“ li kolere ekmurmuris. „Ĉu vi volas ion aĉeti?“ Mi volis vendistojn peti pri iom da manĝo – el ĉiu budo ion. Sed kiel mi nun konstatis, nenio tia estis realigebla. Sed ion mi devis fari. La malsato estis ĉiam pli turmentanta. Mi tion devas iel

provi. Sed kiel? Elpensi iun korŝiran historian? Konstante mi ne kuraĝis. Tiumomente mi rememoris, ke en la poŝo mi havas lastan moneron. Ekposedis min ideo. Mi revenis al la budo kun tritikaj kukoj. Mi ekrimarkis, ke la vendistino staras sur malgranda kvadratforma fera plataĵo. Mi alproksimiĝis kaj kun senkulpa esprimo mi faligis la moneron sur la feran plataĵon. Rumore ĝi tintis kaj ĝi forruliĝis pluen.

La vendistino atentigis. Poste ŝi ekpensis, ke la monero elfalis el ŝia monkesto kaj komencis ĝin surtere serĉi. Tion mi atendis. Mi prenis manplenon da kuketoj kaj rapidis for! Malantaŭ mi nur aŭdis ekscititan krion: „Kaptu lin, ŝteliston! Kaptu lin!“ sed mi kaŝiĝis en homamaso. Mi teren sidiĝis kaj en sekura distanco de la budo mi tion manĝis. Mi manĝegis, ĝis restis al mi nur du kuketoj. Tiujn mi lasis por pli posta tempo. Poste mi kontenta kuŝiĝis sub la benkon en la fervoja stacidomo kaj kontente endormiĝis. Tio estis mia unua tago en la grandurbo.

Tiel mi vagadis dek tagojn. Mi vivis kaj travivadis danke al propra ruzeco kaj ĉiun tagon mi regule komencis per serĉo de matenmanĝo. La dekan tagon mi denove iris „aĉetadi“. En iu budo kun pomoj mi provis konfuzi vendistinon per koncentrita rigardo malantaŭ ŝin. En la momento, kiam mi jam malfermis buŝon por ion diri, neatendite ŝi ekkriis: „Kaj ci estas ĉi tie denove?! Nur atendu, nun vi ne forkuros al mi, pedikulo!“ Kiel malbonŝance mi elektis budon, kie mi antaŭ tri tagoj jam ion ŝtelis. La vendistino ekkonis min. Mi ekkuris. La virino postkuris min, senĉese ŝi kriante insultis. Mi kuris, kuris, ĝis mi kun kontento konstatis, ke la distanco inter ni plilongiĝas.

Tiumomente mi kunpuŝiĝis kun io malmola. „Hej,“ aŭdigis sin la vira voĉo. „Kien vi tiel rapidas?“ Policano! Rekte li! Fino de la vivo en la stacidomo! Sed tiuj dek tagoj ne estis vanaj. Mi multon ellernis pri kapablo transvivi. Pli poste tio estis por mi treege utila.

La policano min alkondukis al proksima policstacio:

„Nu do, knabeto, diru de kie vi estas? Kiel vi nomiĝas?“

Sed ĝuste tion mi ne volis malsekretigi. Certe ili alkondukus min reen al familio de Kolmakov. Mi estis konvinkita, ke Andrej provus min denove forigi. Kaj tial mi silentis kiel tombo.

„Kie vi havas gepatrojn? demandis la policano.

„Ili mortis.“

„Kiel vi nomiĝas?“

Unue mi volis diri al li tute nenion, sed post kiam li bruskis kontraŭ mi, timeme mi respondis: „Sergej.“

„Kaj familinome?“

„Mi nomiĝas Sergej. Mi ne havas gepatrojn. Ambaŭ mortis.“

Mi decidis nenion pli al li diri. La policano rezignis. Li vokis kolegon kaj demandis lin: „Kion ni faru kun li? Li volas nenion diri, senĉese li ripetadas, ke li estas orfo.“

„Tiel do ni sendos lin en orfejon,“ respondis la dua policano.

Post kelkaj horoj haltiĝis antaŭ polica stacio aŭtomobilo kaj forveturigis min en junularhejmon numero unu. Tie nin atendis korpulenta sinjorino kaj tuj krudvoĉe ŝi demandis: „Kiel vi nomiĝas?“

„Sergej.“

Ŝi ne plu insistis. Ŝi tralegis dokumenton, kiun pretigis policanoj kaj diris: „Kiel mi vidas, multe parolema vi ne estas. Sed tiun zorgon jam transprenos ni.“

Pri mi ne kalkulu, mi ekpensis. Neniu min povas revenigi al familio Kolmakov, kie min Andrej mortigus. Mi estis certa, ke eĉ se mi al ili malkaŝus miajn antaŭtimojn, certe tio ne helpus al mi. Certe ili ne kredus min.

„Diru al mi almenaŭ, kiom jaraĝa vi estas,“ ŝi diris.

Mi ne antaŭsentis kaptilon, kaj tial mi trankvile respondis: „Ok.“

Kompreneble mi mensogis. Mi estis je mia aĝo matura, kaj tial mi opiniis, ke ŝi ekkredos min kaj ke por ili estos ankoraŭ pli malfacile konstati mian identecon. „Kie vi vizitis lernejon?“ demandis min la virino. Ho ve! La kaptilo klapfermiĝis.

„Mi ne scias,“ mi diris.

„Bone. Ni ekzamenos vin kaj ni ekvidos, kiajn sciojn vi havas.“

Laŭ rezulto de la testo mi sciis tre malmulte por tio, por ke mi povu iri rekte en la duan klason, sed aliflanke multon, antaŭ ol evidentiĝu, ke mi la lernejon neniam vizitadis. Ili diris al mi, ke mi denove vizitos la unuan klason. Refojigi! Mi en spirito ridis. En Rusio komenciĝas la deviga lerneja vizitado en la aĝo de sep jaroj kaj mi havis nur ses! Tion, kion mi konis, tion lernigis min sinjorino Kolmakovova, kiu kun mi legis, skribis kaj kalkulis. Kaj ŝi tion faris vere bone, mi sciis pli multe ol oni postulis en la unua klaso. Do mi „ankoraŭ foje“ vizitadis la unuan klason. La lernejo estis proksime de la hejmo. Je mia granda miro mi bone prosperis. Baldaŭ mi estis la plej sukcesa el la tuta klaso kaj la lernado kaŭzadis al mi nenium problemon. La vivo ŝajnis al mi esti bela.

Sed la agrabla etoso baldaŭ forvaniĝis. La geedzoj Kolmakov min senĉese serĉis kaj ili ankaŭ sin turnis al polico. Tie ili ricevis rekomendon sin turni al la junularhejmo. Iun tagon la direktorino alvokis min kaj diris al mi:

„Ho, vi sinjoro Ruzulo, ni jam scias, kiu vi estas.“

Mia koro haltis pro ektimo. Mi komencis malĝojege petegi:

„Mi petegas vin, nur min ne resendu! Ne sendu min reen!“ „Nu, ni vidos. Ankoraŭ ni konsultos tion kun aliaj homoj, sed mi opinias, ke vi verŝajne restos ĉi tie. Sed vi havas nur ses jarojn, kaj tial vi ne povas viziti lernejon!“

„Sed ja mi sukcese lernas,“ mi protestis.

„Tio ne gravas. Laŭ direktivoj vi ankoraŭ ne povas vizitadi lernejon kaj fino!“

Sed mi povis resti en junularhejmo. Unuaflanke mi volonte revenus al geedzoj Kolmakov, sed la timo pro Andrej estis pli forta.

La 1-an de marto 1957 mi festis mian sepan jaraĝon. Tio estis mia granda tago. Finfine mi povis vizitadi lernejon! Ĉe la enskribo instruisto diris al ni: „Ĉiuj lernantoj ekde la unua ĝis la tria klaso devas esti fajreroj.“ Tiun vorton mi aŭdis la unuan fojon en mia vivo. La instruistino al ni eksplikis, ke temas pri komunista organizaĵo por junuloj de la unuaj klasoj.

„Nun ni ne plu apartenas al gepatroj, sed al la komunista ŝtato.“

Ĉar mi gepatrojn ne havis, do estis por mi tute egale, al kiu mi apartenos. La instruistino al ni ankoraŭ diris, ke fajreroj estas nepoj de Lenin.

Ĉu Lenin? Kiu li estas? Jam mi tiun nomon ekaŭdis, sed nenion mi pri li sciis. „Lenin estas la plej grava homo, kiu sur nia tero iradis kaj vivis. Kaj ne nur li vivis, sed li vivas kaj vivos konstante!“ ŝi diris. „Kiu el vi volas esti nepo de Lenin, partopreni ekskursojn kaj aliajn multajn tre interesajn aranĝojn?“

Entuziasme mi levis la manon kun la ceteraj. Mi – kaj nepo de Lenin! Grandioza, mi ekpensis.

Ekde mia sesa ĝis la naŭa jaraĝo mi vivis en la junularhejmo n-ro 1 en Novosibirsko. Mi amikiĝis kun multaj lernantoj. Ĉiam mi opiniis, ke nia hejmo estas nur por orfoj, kiel estis mi. Sed foje mi renkontis knabon, kiu ploregis demandante: „Kial mi devas esti ĉi tie? Mi ja havas gepatrojn, kial mi ne povas kun ili esti hejme?“ La unuan fojon mi eksciis, ke ne ĉiuj junuloj en la junularhejmo estas orfoj. Nur pli poste mi eksciis, ke tiuj hejmoj estis antaŭ ĉio por junuloj, kiujn de gepatroj forprenis ŝtato. La gepatroj de tiuj junuloj estis deklaritaj kiel „nekapablaj“ ĝuste edukadi ilin pro ilia religia konvinko.

Mi provis knabon kvietigi, sed mi ne kapablis respondi al lia demando, kial li ne povas loĝi kun siaj gepatroj, kiuj loĝas proksime de ĉi tie. Mi mem tion ne komprenis. Pli poste treege mankis al mi la patrineca amo kaj ankaŭ kisoj de la patro por bona nokto kaj tiomomente mi ĉiam rememoris tiun knabon kaj vane mi demandis min mem, kial li ne povis vivi kun siaj gepatroj. Se mi havus la gepatrojn, simple mi de ĉi tie forkurus. Kial li tion ne faris?

V.

Iun tagon, tiam mi havis naŭ jarojn, venis al mi direktorino dirante: „Kurdakov, kolektu viajn aĵojn, vi devas transloĝiĝi en alian hejmon.“

„Kien?“ mi demandis.

„Estas tio ne malproksime en Verk-Irmen.“

La junularhejmo situis sur periferio. Entute tio estis kvar konstruaĵoj. Proksime estis lernejo, kiu vizitadis junuloj el la junularhejmo kaj ankaŭ el la urbo. Komence la nova medio nervozigis min, sed la junuloj min amikeme akceptis kaj baldaŭ mi tie havis novajn kamaradojn.

Tuj post alveno mi tie aniĝis al la pionira organizaĵo. Kiel fajrero mi estis nepo de Lenin. Sed kio estis pioniroj? Tion mi ne sciis. Ni ricevis ruĝajn tukojn, kiujn ni sur la kolo povis portadi.

En la junularhejmo estis 120 junuloj kaj geedukistojn ni titolis „onklo“ kaj „onklino“. La geedukistoj ĉi tie estis pli severaj, el ili estis sentebla malvarmo kaj koncerne niajn dezirojn ili estis tute indiferentaj. Al io simila mi jam estis al kutimiĝinta el Novosibirsko, sed ĉi tie regis inter la geedukistoj kaj junuloj vera malamo. Kaj neniuj flanko penis siajn sentojn kaŝi. Neniu onklino aŭ onklo tiun profesion elektis pro la amo al junuloj. La partio al ili simple komisiis edukon de „malgrandaj komunistoj“. Kaj ili tiun taskon opiniis kiel la plej duaranga, kiu povis ilin, la membrojn de la partio, trafi. Tio estis profesio sen kia ajn perspektivo, la profesio por homoj, kies kariero definitive finiĝis. Tial ili estis malfeliĉaj, amarsentaj kaj disrevigitaj kaj tutan sian koleron kaj furiozon ili elverŝadis sur junulojn. Eĉ la plej bagatelajn deliktojn kontraŭ la doma regularo ili tre forte kaj brutale punis. Duaflanke ili tute nin ignoris, se iu el ni iam bezonis helpon.

Baldaŭ mi ĉi tie trovis kelkajn amikojn. Unu el ili estis ekzemple Ivan Ĉernega, eble tri jarojn pli aĝa ol mi. Alia amiko estis dek-jaraĝa Paŭlo. Li estis tre malalta, sed li en diversaj aferoj kapablis orientiĝi. Baldaŭ mi konstatis, ke se homo volas ion atingi, li mem devas tion solvi. Ĝuste por tio Paŭlo havis admirindan talenton.

Iufoje vespere ni kuŝis surlite interbabilante. Subite li demandis min: „Sergej, ĉu vi havas monon? Ĉu vi ne bezonas iom da ili?“ Malsaĝa demando, mi ekpensis. Kiu ilin ne bezonas?

„Nu kompreneble, ke jes.“

Paŭlo sin al mi turnis dorsflanke kaj ekmurmuretis: „Kiam vi ilin vere bezonos, do diru al mi.“

Post momento li endormiĝis. Kaj mi longe kuŝis pripensante ĉion. Ĉiuj knaboj sciis, ke tiudirekte Paŭlo estas tre inventema. Sed kiel li tion faris? Ĉu li eble havis monpresilon? Neniu sciis, de kie li ilin prenas. Se li iujn bezonis, li malaperis kaj post ia tempo li revenis kun nova monprovizo. Sekvan tagon ĉe la matenmanĝo mi lin demandis:

„Kiel vi tion hieraŭ koncerne la monon pensis? Homo havas impreson, ke vi la monon presas!“

„Nu, tio estas preskaŭ tiel facila,“ li respondis kun ekrideto.

„Tion mi al vi ne kredas,“ mi diris provokeme al li. „Tio estas por neniu facila, do eĉ ne por vi.“

„Mi pruvos tion al vi. Morgaŭ iru kun mi.“

Sekvan tagon ni renkontiĝis en interkonsentita loko de la urbo.

„Ni veturu al Novosibirsko, Sergej.“

„Ĉu al Novosibirsko?!“ mi ekmiregis. „Tio ja estas sesdek kilometrojn malproksime! Kion oni diros en la hejmo, se oni ne trovos nin?“

„Ili tion tute ne konstatos. Grave estas, ke ni al ili ne kaŭzas malagrablojn. Ni donos kvieton al ili kaj ili ĝin donos al ni. Ne zorgu pri tio kaj iru! Noktomeze ni revenos.“

Ni enaŭtobusiĝis kaj antaŭ la sesa horo vespere ni jam estis en Novosibirsko. „Momen-ton atendu ĉi tie,“ Paŭlo ordonis kaj li malaperis malantaŭ la angulo ankaŭ kun mansaketo. Mi sidiĝis atendante sur proksima benko. Kiel mi tie tiel sidis, subite kaptis mian atenton ĉifonvestita, malpura knabo. Li vekis en mi kompaton. Ŝajnis al mi, ke li malsatas. Sed kiam mi ekrigardis pli atenteme kaj de proksime, mi ekkriis: „Paŭlo, ĉu tiu vi estas?“ Nun mi ekkomprenis, kio en tiu dorssaketo estis – la almozulaj ĉifonaĉoj. Komplete li alrigardis min.

„Nun vi jam konas mian sekreton. Nenian monpresilon. Nur tion ĉi tie.“

Li montris al siaj fiodorantaj, malpuraj, diŝiritaj vestaĉoj kaj li enmanigis al mi kelkajn tiajn vestaĉojn.

„Rapidu! Surmetu tion! Tiu ĉi tempo estas la plej favora por almozpetado: homoj alvenas por manĝi!“

Ion tian mi tute ne atendis, sed mi obeis. En publika necesejo mi surmetis tiujn malpurajn ĉifonaĉojn. Paŭlo dume multe malpurigis sian vangon. Li vekigis veran kompaton. Antaŭ ol mi rekonsciiĝis, li ŝmiris ankaŭ mian vangon.

„Kaj nun ni iru!“

Mi iris post li en la stratoj de Novosibirsko, ĝis ni haltis antaŭ unu el la plej bonaj restoracioj. Bonege ili tie kuiris. Ni sidiĝis proksime de la enirejo.

„Tiamaniere vi devas mieni,“ diris Paŭlo kaj li prezentis laŭeble plej malĝojan vizaĝon. Poste li donis al mi malnovan buŝharmonikon kaj mi klopodis trovi laŭeble plej „malĝojajn“ tonojn. Paŭlo dume malĝojege ekmieniĝis kaj komencis almozpeti la homojn elirantajn el la restoracio.

„Mi estas orfo. Mi havas eĉ ne moneron. Mi malsatas. Mi petas, helpu al la orfo. Mi havas nek patron nek patrino, helpu, mi petas!“

Tiel malĝoje li almozpetis, dum mi aŭdigis incitigajn tonojn, kiujn mi kapablis trovi.

Kelkajn minutojn ni vane penadis. Tio ne funkcias, mi ekpensis. Poste haltis antaŭ ni viro, komplete li rigardis nin kaj ĵetis en la ĉapelon dudek kvin kopekojn! Tamen jes! Tio estas grandioza!

Iuj geedzoj ĵetis en la ĉapelon kvindek kopekojn. Nur nun mi finfine kaptis tiun ĝustan salivon. Paŭlo rakontis unu malĝojan okazaĵon post la alia. Ĉiam pli multaj homoj haltis antaŭ ni ĵetante monerojn en la ĉapelon. Kiam neniu estis proksime, mi demandis:

„Tio estas bonega, sed kial ni estas ĝuste ĉi tie?“

„Ĉu vi ne divenis tion? Nur rigardu tiujn homojn. Ĉu ili aspektas malsateme? Kompreneble ne. Ĵus ili satmanĝis. Kion vi opinias, kiel ili sin sentas, se ekstere ili vidas du malsatantajn orfojn? Ĉu vi ne opinias, ke en ili vekiĝas ilia konscienco? Tiu ĉi estas la plej bona loko!“

Poste ni ŝanĝis rolojn. Paŭlo ekprenis harmonikon, mi malĝojege ekmieniĝis kaj ekparolis la konatan kortuŝan historieton. Tio funkcias konstante egale. Homoj haltiĝadis malfermante monuojn kaj nia monkolektaĵo kreskis.

Kaj poste tio okazis!

El la restoracio eliris iu viro proksimiĝanta rekte al ni. Li estis direktoro de la junularhejmo en Verk-Irmen. Li nin ambaŭ tre bone konis, ĉar ni tre ofte troviĝis en lia laborejo sur „tapiŝeto“. Tio estas nia fino! Mia koro sovaĝe ekbatadis ĝis ie en la kolo. La plej bona, kiun ni tiumomente povus fari, estis rapide forkuri.

„Paŭlo, ni forkuru,“ mi ekflustris. „Certe li ekkonos nin!“

„Jam estas malfrue!“

La direktoro ĝisiris al ni kaj demandis: „Kie vi, knaboj, havas gepatrojn?“ Mi kapablis eldiri nek sonon. Paŭlo savis la situacion. „Ili mortis.“

Ŝajnis, ke la direktoro eĉ ne ekkonis nin laŭ voĉoj. La malpuraĵo, per kiu ni estis ŝmiritaj, nin savis. Kaj transvestaĉoj estis ankaŭ perfektaj. „Nu tio estas tre malĝoja,“ li diris. Li faris kelkajn paŝojn, poste li ŝanceliĝis kaj revenis. Penetreme li ekrigardis min demandante: „Ĉu mi ne vidis vin ie?“

Apenaŭ mi kapablis respondi: „Ne.“ Interne mi ekpensis, ke se mi el tio eliros kun sana haŭto, neniam plu mi ĉi tien venos. Paŭlo mem tion plu praktikadu.

La direktoro tiutage eble havis tre bonan humoron, ĉar li faris ion, kion li normale neniam farus. Li mankaresis mian kapon kaj donis al mi kelkajn monerojn dirante: „Aĉetu ion por manĝi, knaboj.“

Kiam li malaperis malantaŭ la angulo, ni eksaltis, prenis almozitan monon kaj forkuris.

„Tio estis la unuan kaj lastan fojon, Paŭlo. Tio estas nenio por mi. Estas tio tro danĝera, mi diris.“

Malfrue vespere ni revenis al Verk-Irmen kun poŝoj plenaj da mono.

Ĉar la direktoro kaj edukistoj pri ni tute ne zorgis, la pli aĝaj knaboj komenciĝis vagadi tra stratoj de Verk-Irmen. Kaj kiam ili al sia grupo invitis ankaŭ min, mi tre ekĝojegis. La knaboj estis ĉiam pli arogemaj kaj baldaŭ la bando de junaj skandalistoj iĝis teruro por la tuta vilaĝo. Nenio por ni estis sekura. Ĉiu ĝardeno, ĉiu parko, ĉio apartenis al ni. Simple ni venis kaj forŝtelis, kion ni volis.

La direktoro kaj la edukistoj pri tio sciis, sed tio ilin tute ne interesiĝis. Ili ja respondis nur pri tio, kio okazadis interne de la junularhejmo – kaj tie ni kompreneble nenion tuŝis. Kio okazadis ekster la hejmo, tio tute ilin ne interesis.

Post nelonge Verk-Irmen tute apartenis al ni. Se iu el damaĝitoj aŭdigis sin, rapide kaj celkonscie ni intervenis. Plej ofte ni elbatis fenestrojn, rompis barilon kaj stamfis legombedojn. Dumvintre ni ofte minacis per frakaso de fenestroj. Mi rememoras, kiam al ni Ivan Ĉernega diris: „Frakasu al ili fenestrojn! Kiam ili frostiĝos, frostiĝos ankaŭ iliaj buŝaĉoj kaj ili ne plendos pro ni!“ De tempo al tempo ni ankaŭ atakis homojn kaj iuj el ili estis grave vunditaj. Baldaŭ la grupanoj interkonsiliĝis, ke ili ne vizitos lernejon kaj foje vespere ili elbatis ĉiujn fenestrojn de la lernejo, por ke dumvintre ne okazu instruado. Ĉiuvespere ni tiel timtenis la loĝantojn de la vilaĝo. Fine en ekstrema malespero ili sin sekrete turnis al la registaro per skriba petego, en kiu ili ĝin informis pri niaj eksceso. Somere en la jaro 1961 estis nia junularhejmo instige de la polico kaj de la lokaj oficejoj fermita kaj la junuloj transloĝigitaj al aliaj lokoj.

Ivan Ĉernega kaj mi devance eksciis pri nuligo de la junularhejmo, ni prenis niajn aĵojn kaj ni forkuris. Ni forveturis al Novosibirsko kaj tie ni interkonsentiĝis, ke plej bone estos, se ni disiros, ĉar certe oni serĉos nin. Ni do adiaŭis kaj ĉiu iris sian vojon. Mi ankrigiĝis denove en malnova konata fervojstacio. Ĉio tie estis tute la sama, nur pli multaj homoj tie estis. La fervojstacio disponigis veran rifuĝejon. Mi povis min pli longan tempon tie senriske kaŝiĝadi esperante, ke ili ne trovos min. Mi trovis malhelan, forlasitan angulon por tranoktado. Se mi restos movlerta kaj ne kaŭzos atenton, mi tie povos restadi kelkajn monatojn.

Pri la manĝo mi faris neniujn zorgojn – mi ŝtelos kukojn kaj fruktojn. Kaj tiel mi iutage decidis iri al antaŭrigardita budo por tie ŝteli kelkajn pomojn. Mi eluzis mian ŝatatan ruzaĵon. Kun konsternita mieno mi ekrigardis ien malantaŭ la vendistinion, kvazaŭ mi tie vidus ion teruran. La vendistino kompreneble turniĝis, mi ekprenis pomojn kaj forkuris!

Bona ĉaso, mi ekpensis. Mi ne antaŭsentis, ke dum la tuta tempo observis min iu virino. Ŝi neokulfrape postsekvis min, kaj kiam mi ekmanĝis la pomon, ŝi venis al mi demandante:

„Knabo, ĉu vi vere tiel malsatas?“

„Kia malsata?“

„Nu tia malsata, ĉar mi vin vidis fari tion, kion vi faris antaŭ la momento?“

Mi sciis, ke ŝi min vidis, kiam mi prenis la pomojn. Ŝi estis eble sesdek kvin-jaraĝa, havanta karan, amikeman vizaĝon.

„Ĉu vi havas dormlokon?“

„Kompreneble,“ mi respondis heziteme.

„Kaj kie?“

„Ĉi tie ne malproksime.“

„Ĉu vi scias?“ ŝi diris. „Mi ne kredas al vi. Certe vi tranoktadas ĉi tie en la stacidomo kaj manĝas tion, kion vi ŝtelas. Iru kun mi. Ĉe mi oni trovos kaj manĝon kaj dormlokon.“ Ŝi estis tiel agrabla kaj amikema, tial mi konsentis. Ŝi alkondukis min en malgrandan lignan dometon en malriĉa periferia kvartalo. Interno estis pura kaj agrabla. Dum mi manĝis – post longa tempo denove varman manĝon – ni interparolis. Ŝi proponis, ke mi restu ĉe ŝi, kiel longe mi volos. Ŝi vere estis kompleza min helpi. Sed ŝi estis tre malriĉa kaj kun mia manĝema gorĝo tio ne estis ebla. Kaj tial mi iun matenon skribis al ŝi kelkajn dankvortojn kaj mi foriris. Pasis tri semajnoj post mia forkuro el junularhejmo. Sed jam tri tagojn post foriro de tiu ĉi bona virino min arestis polico pro ŝtelado en surstrataj budoj. Post kelkaj tagoj ili veturigiĝis min al junularhejmo en Bariŝevo, kiun mi ĝisvive ne forgesos.

VI.

Bariŝevo estas malgranda urbeto situanta en distanco de proksimume 27 kilometrojn for de Novosibirsko. La junularhejmo troviĝis en iama ortodoksa preĝejo kaj en lernejo, kiu estis longtempe ferma. La preĝejo iĝis klubejo, kie estis projekciitaj filmoj kaj la propra infandomo rezidis rekte en la ĉesigita lernejo. La paroĥa domo funkciis kiel tolajlavejo. En la junularhejmo vivis ĉirkaŭ 120 junuloj.

Eĉ se mi ĉe mia alveno nenion antaŭsentis, Bariŝevo iĝis decidema turnopunkto en mia vivo. Mi pasigis tie sep jarojn, ĝis mi finfrekventis pli altan lernejon antaŭ mia rekrutiĝo.

Tuj post alveno ĉi tien atendis min ĝoja surprizo. Kiam mi eniris dormoĉambron, mi ekvidis Ivanon Ĉernegan.

„Ivan, kie oni vin kaptis? Ĉu vi jam longe estas ĉi tie?“

„Sergej! Mi vidas, ke vi travivis pli da feliĉo!“

Kaj poste li informis min ankaŭ pri tio, kiel li estis kaptita kaj loĝigita en Bariŝevo. Kaj poste mi al li rakontis.

„Kia estas la vivo ĉi tie, Ivan? Vi ja scias, kion mi pensas.“

„Hm. Simila kiel en Verk-Irmen. Sed mi devas vin averti pri kelkaj personoj. Bone atentu, ke vi ne enplektiĝu en iliajn vojojn. Antaŭ ĉio temas pri onklo Aleksandr Niĉman, ni nomas lin Niĉi. Kaj poste direktorino de la hejmo Irina Dobrovlanskaja aŭ dika Irina. Tiuj du estas plej malbonaj. Evidu ilin de malproksime! Sed ĉio cetera estas ĉi tie la sama. Se vi lasos ilin en kvieto, ankaŭ ili donos al vi kvieton.“

Mi rimarkis, ke Ivan tre ŝanĝiĝis. Mi ne kapablis diveni, kio tion kaŭzis, sed simple li estis ŝanĝita. Poste li konatigis min kun kelkaj siaj amikoj.

Baldaŭ mi havis okazon persone konatiĝi kun dika Irina. Ŝi alvokis min en sian laboroĉambron. Avertu de Ivan validis. Ŝi estis korpulenta virino, vekanta timon kaj respekton. Sufiĉis nur rigardi ŝin kaj oni tuj sciis, ke ne estas bone konflikti kun ŝi. Sur ŝia blanka antaŭkuko brilis ordeno de Lenin, la alta honorsigno, kiun la ŝtato donis nur al partianoj pro eksterordinaraj meritoj. Neniam kaj nenie ŝi sen ĝi aperis. Per tio ŝi al ĉiu volis sciigi, ke ŝi estas grava persono. Sed tio jam estis pasinteco. Mi ne scias, mi ne scias, kial ŝi estis sendita al Bariŝevo, sed estas klare, ke degrado per sendo al tia sensignifa loko ŝin plenisgis per amara disreviĝo.

Alia, same timiga persono estis Aleksandr Niĉman.

Neniam en la vivo mi renkontis homon kun tiel minaca kaj malamika mieno. Li estis altstatura, eksterordinare forta ĥolerikulo, kiu eksplodis jam ĉe la plej bagatela provoko. Se li iun punis, tio devis esti terura. Mi imagis al mi eviti renkonton kun li. Li kaj dika Irina memoris pli bonajn tempojn en la komunista partio. Li estis armea aviadisto, sed pro nekornataj kaŭzoj li estis degradita kaj eksigita el armeo. Neniu pri tio ion precizan sciis. Oni nur flustris, ke li estante ebria kaŭzis iun aviadilan katastrofon. La onklo Niĉi opiniis finon de la kariero per funkcio en la junularhejmo kiel sian totalan malvenkon. Li estis rigora homo, kiu sian koleron elverŝis sur ĉiun, kiun li renkontis. Plejmulto de la onkloj kaj onkloj estis en Bariŝevo dudek ĝis tridek jarojn. Ili estis apatiaj, koleregaj homoj, sen fajrero de amo kaj sen kia ajn kompreno.

En la junularhejmo regis etoso de timo. Ni timis edukistojn. Ili timis dikan Irinan kaj

Niĉman kaj tiuj du timis la partian gvidantaron.. Bariŝevo estis loko de la malamo kaj timo.

Kaj tiel ankaŭ ni, novalvenintoj, baldaŭ ekposedis la saman malamecan sintenon kiel pli aĝaj junuloj. Kaj spite de tio en ĉi tiu malamikeca medio ekestis amikecoj, kiuj daŭris jarojn. Ni junuloj sentis, ke sur la mondo ni havas nur nin, kaj tial ni formis firman ligon por fronti la mondon de la plenkreskuloj. En nia frunto staris kelkaj gvidistoj. Ili estis la plej grandaj batemuloj, la plej fortaj kaj saĝaj el ni.

Mi deziris aparteni al ili! Sed ĉar mi havis nur dek jarojn kaj la ceteraj dek du aŭ dek tri, mi do havis neniun ŝancon. Foje min alvokis Nikolaj Povalejev kaj diris: „Sergej, ni volas, ke vi helpu nin.“

Mi iris kun li. Unu el la gvidistoj tenis permane skatolon kun elektrolampoj. Nikolaj diris: „Sergej, ni bezonas en la konstruaĵo ŝanĝi kelkajn elektrolampojn kaj ni volas, ke vi helpu nin.“

„Bone,“ mi sentis min flatita, „kion mi faru?“

„Iru, ni montros al vi.“

Ni eniris en estintan preĝejon, en kiu nun estis kinejo kaj socia ĉambro. Nikolaj montris al alta plafono.

„Ĉu vi tie vidas tiun elektrolampon?“

„Jes.“

„Estas necese ŝanĝi ĝin.“

„Bone. Kie estas ŝtuparo?“

„Tio ĝuste estas problemo. Nenian ni havas.“

„Sed kiel mi atingu tion tie supre?“

„Iel ni tion faros,“ diris Nikolaj.

Knaboj forkuris al angulo kaj alportis ses seĝojn, kiujn ili starigis unu sur alian, tiel ili atingis preskaŭ plafonon. Tio elpuŝis mian spiron.

„Eble vi ne volas, ke mi per tio suprengrimpu?“

Tio ŝajnis al mi esti nekredibla, sed mi vidis, ke ili tion opinias tute serioze. Nikolaj sin turnis al la aliuloj dirante:

„Tenu tiujn seĝojn plej forte. Kaj vi, Sergej, grimpu supren kaj ŝanĝu la elektrolampon. Tio ja estas nenio. Al ni vi povas kredi.“

Mi havis neniun eblon. Se mi tion ne farus, ili min opinius kiel malkuraĝulon kaj neniam ili min inter sin akceptus. Kun la elektrolampo en la mano mi puŝis min supren. Kiam mi estis tute supre, kaj mi ekrigardis malsupren, mi vidis, kiel knaboj per ĉiuj fortoj tenas la seĝojn. Ja mi estas en bonaj manoj, mi ekpensis kaj mi movis la manon por ŝanĝi la lampon.

Tiumomente Nikolaj ekkriis: „Nun!“ kaj li renversis la suban seĝon.

Kun grandega bruo mi falis malsupren. Kelkajn momentojn mi kuŝis malaktivigita kaj senmova. La ceteraj ĉirkaŭstaris ridegante. Dum la momento ĉiuj forkuris kaj lasis min solan. Mi provis ekstari. Estis miraklo, ke mi ne rompis nukon. Malgraŭ tio, ke mi estis tre batdifektita, mi post momento lamvenis al la ĉambro.

„Sergej, kio okazis al vi? Vi aspektas kvazaŭ vi kunpuŝiĝus kun lokomotivo!“ Miaj suferigantoj denove ekridis. Tiam mi ankoraŭ ne antaŭsentis, ke mi subiĝis al „lernanta testo“. La tuta mia korpo neelteneble doloris. Pro miaj amikoj mi estis tute disrevigita.

La trian tagon venis al mi Boris kaj diris:

„Sergej, vi tion sukcesis, vi estas akceptita!“

„Akceptita? Kien? Pri kio vi parolas?“

„Vi estas akceptita, Sergej. Ak - cep - ti - ta! Ĉu vi ne komprenas?“

„Ne,“ mi ekmurmuris. „Mi nur scias, ke vi preskaŭ senigis min je vivo.“

„Vi bovo, ĉu vi ne divenis, ke tio estis nura testo? Neniamaniere ni povis vin akcepti. Ni devis al ni verigi, ke vi ĉion ne tuj elparolaĉos al dika Irina. Sed nun ni jam scias, ke vi ne estas akuzanto. Sed ni devis pri tio nin certigi. Vi sukcesis. Iru kun mi.“

Ni eniris societatan ĉambron. Tie jam estis ceteraj knaboj. Ili bonvenigis min inter sin kaj mi estis tre feliĉa: mi pruvis tion kaj nun mi apartenas al ili! Nur pli poste mi eksciis, ke tio estis unu el multaj testoj, al kiuj la knaboj devis submetiĝi, antaŭ ol ili akiris plenan konfidon de la gvidistoj.

Bariŝevo estis senkompromise dividita je du tendaroj: la junuloj kontraŭ enloĝantoj. Ĉiu devis decidi por unu el ili kaj poste ĉiapreze kunteniĝi.

Sinsekve mi interkonatiĝis kun kelkaj knaboj. La unua estis Boris Lobanov. Eblis tute fidi al li. Malgraŭ tio, ke li estis samaĝa kiel mi, li estis multe pli ruzlerta. Plua estis Miĥail Kirilin. Li estis rigora viro, energi plena. Mi eksciis, ke li havas vastajn kontaktojn kun Taŝkento. Pli poste ni tion eluzis por niaj specialaj negocoj. Nikolaj Povalejev estis unu el la plej rigoraj knaboj, kiujn mi ĝis nun renkontis. Tiu, kiu kun li amikiĝis, tiu estis tute sekura. Sed ho ve al tiu, kiu konfliktis kun li! En Bariŝevo oni diradis, ke tiu, kiu amikiĝas kun Niki, tiu povas havi multajn malamikojn. Li estis klara gvidisto.

Ankoraŭ ĉi tie estis Aleksandr Popov, unu el la plej kapablaj poŝtelistoj en la mondo. Dum duminuta interparolo li kapablis al sia kunulo forŝteli preskaŭ ĉion. Se iu nepre bezonis monon, Aleksandr vizitis Novosibirsko, kelkfoje li veturpromenis per tramo kaj eltramiĝis kun monplenaj poŝoj. Plua rimarkinda knabo estis Nikolaj Zauŝkin, kun kiu mi renkontiĝis pli poste.

La junularhejmoj en Rusio estas nenio alia ol fabrikoj por produktado de estontaj komunistoj. Antaŭ propagado ekzistis nenia evito. Grandegaj afiŝoj kaj ruĝaj sloganrubandoj kun flavaj literoj frapis la okulojn el ĉiuj direktoj.

„Ni venkos kontraŭ usona imperialismo!“

„Ni helpas al vjetnama popolo!“

„Vivu paco, libero kaj amikeco!“

„Proletaroj de ĉiuj landoj, kuniĝu!“

Tiaj kaj aliaj sloganoj estis en ĉiuj junularhejmoj, en kiuj mi loĝis. Ili pendis super litoj, en sociaj ejoj, en manĝejoj, banejoj, sur bariloj, super pordoj, mallonge tute ĉie. Kaj kiam oni tion ĉiutage vidis, tiuj ĉi ekkrioj fine fariĝis integra konsistaĵo de ĉies persono. Kiel pioniro mi frekventis multe pli intensivan instruadon ol havis fajreroj. Lenin nin rigardis el ĉiuj muroj. Liaj eldiraĵoj kaj la komunisma ideologio tute saturigis medion, en kiu ni vivis, tial aliaj gravaj lernobjektoj kiel ekzemple matematiko, devis tute cedi malantaŭen. La komunisman ideologion ili en nin pumpis ekde la unua klaso kaj konstante tio pligrandiĝis. Ĉiutage nin instruisto en la lernejo bonvenigis per la vortoj:

„Bonan matenon, junuloj. Memorfiksu, ke Dio ne ekzistas!“

Ili devas ege timegi, por ke ni nenion eksciigu pri Dio, li do estu kia ajn li volas esti, mi pensis. Mi lernis kun entuziasmo, kaj mi estis tiel fervora pioniro, ke mi en la sesa klaso iĝis gvidanto de la grupo. Ni ekzercis marŝadon kaj dum tio konstante ni skandis: „Vivu

komunismo! Vivu Lenin!“ Kaj kiam ni marŝis tra la stratoj de Bariŝevo, ni estis tre fieraj pri ruĝaj pioniraj tuketoj. La loĝantoj de Bariŝevo tuj komencis fermi fenestrojn, kiam ni en la stratoj aperis. Sed por mi estis egale, ĉar la unuan fojon en la vivo mi sentis, ke mi ien „apartenas“.

La vivo en la junularhejmo funkciis konstante laŭ neŝanĝebla ordo. La doma regularo al ni ordonis ĉiutage post la tagmanĝo dormi. Tion mi ne observis. Mi estis dek du-jaraĝa, granda kaj energiplena. Kaj ĉar mi tre ŝatis legi, mi post la tagmanĝo ĉiam prenis lampeton kaj mi legis sub la kovrilo. Ĉiutage mi tion faris kaj neniam iu min ĉe tio kaptis.

Sed foje Niĉi havis tre malbonan humoron. Li estis ebria kaj serĉis iun viktimon. Mi antaŭsentis nenion malbonan, mi kuŝis leganta subkovrile. Subite mi eksentis grandegan baton al kokso kaj mi falis el la lito. Super mi staris onklo Niĉi. Li ekkriis: „Tamen mi vin kaptis! Vi fetorulaĉo! Vi ricevos lecionon, kiun vi ĝis morto ne forgesos!“

Ekkaptis min teruro. Kio min atendas? Sed Niĉi plu kriegis: „Vi ricevos iom da vitamino P, Dakov. Vitaminon P! Ĉu vi scias, kion tio signifas?“ li ebrিয়েle ekgrakis. Mi skuiĝis. Mi ja sciis. Rimeno! Ruslingve prjaŝka, tio estis vitamino P de onklo Niĉi. Mi rigardis, kiel li deprenis firman ledzonon kun granda zombuko. „Do Dakov, preparu vin por vitamino P. Tio eble estos efika leciono!“

La aliuloj nin kun teruro observis. Neniam mi malaltiĝus al peto pri punpardonon. Malgraŭ tio, ke mi timegis, mi tion ne evidentigis. Tio lin ankoraŭ pli furiozigis. Li komencis min furiozege bategi. La peza fera buko batadis mian korpon. Mi sentis, kvazaŭ li rompus miajn ostojn. Eble li tiel longe batos, ĝis mi mortos. Sango fluis el granda vundo sub ripoj, kie la akra eĝo de la buko profunde enpenetris en la karnon. Kiam mi jam estis tute senpova, li forpuŝis min ekkriante: „Malaperu, ci pedikulo. Kaj bone atentu, ke mi denove ne kaptu vin!“

Survoje al la lito mi kolapsis. La tutan korpon mi havis en la fajro. Mi estis konvinkita, ke li rompis kelkajn miajn ostojn. Tian batregalon mi ankoraŭ neniam ricevis. Mi enrampis sub kovrilon, sed mi ne ploris. Tiu bestio vidos eĉ ne unu mian larmeton! Tiun ĝojon mi al li ne kaŭzos!

De tiu momento mi tage nokte cerbumis, kiel al li venĝi. Mi malamegis lin ankoraŭ pli multe ol antaŭe.

Post kelkaj tagoj venis al mi Nikolaj Povalejev dirante:

„Sergej, la horo de la venĝo batis!“

„Kion vi proponas fari?“

„Lasu tion al mi, mi jam ion elpensos.“

„Bone. Ĉe ĉio mi helpos. Sed tio devas esti granda!“

Tuj sekvan tagon li venis al mi: „Sergej, mi havas planon!“ kaj ĉion li konfidis al mi. Tio ŝajnis al mi perfekta kaj mi ne povis ĝisatendi, kiam tio eksplodos.

Ĉiuvespere, iom antaŭ la deknua, alvenadis onklo Niĉi en nian dormejon por eltrovi iun viktimon. Sed nun atendis lin surprizo. En la dormejo estis tuta kvieto kaj mallumo. Ni malpacience atendis, kiam aŭdigos sin liaj pezaj paŝoj. Post nelonge ni ekaŭdis konatan sonon. Niĉi alvenis. La dormoĉambra pordo malfermiĝis kaj Niĉi, nenion antaŭsentante, alvenis. Ekestis nia momento! Povalejev kaj pliaj aliaj sur lin dedorse saltis kaj ĵetis super lian kapon kovrilon, por ke li ne vidu, kio okazas kaj ke li neniu ekkonu. Aliaj du knaboj malŝraŭbis elektrolampetojn, por ke li ne povu lumigi dormejon. Kelkaj pluaj sin ĵetis al li

kaj pugnobatis kaj piedfrapis lin tiel longe, ĝis li kuŝis surplanke. Estis por mi nepriskribebbla kontentiĝo direkti al lia nazo kelkajn batojn – esperante, ke mi al li ĝin rompos. Ni ĉiuj lin batis kaj piedfrapis, dum li sub la kovrilo, kiu sufokis lian voĉon, vokis helpon. Knaboj, kiuj ne partoprenis nian okazon, kaŝis indiferecie siajn kapojn sub la kovrilojn. Subite ensaltis litojn ankaŭ tiuj tri. Niĉi, bategita, kun sanganta nazo, demetis el la kapo kovrilon kaj kun furiozanta malbenado li forlasis dormejon. Ni atendis eksplodon de furiozo, sed nenio okazis – nek tiuvespere, nek duan tagon, eĉ ne venontan semajnon. Niĉi eĉ ne per unu vorto menciis pri tiu ĉi okazo. Kompreneble, ke li suspekteme observadis, kiu estis iniciatinto. Sed ni al ni ĵuris, ke tiuafero ni ĉiuj restos kune, okazu kio ajn. Kaj se onklo Niĉi provus al iu el ni denove doni vitaminon P, denove ni komune lin venĝus. Ŝajnas, ke la timo ambaŭflanke estis same granda kaj – mi devas konfesi – ke ni sentis nin fortaj.

En la jaro 1965 la situacio en Bariŝevo esence malboniĝis. Ĝis tiu tempo la manĝoj por la junuloj estis malbonaj, sed almenaŭ sufiĉaj. Subite tio komencis rapide malboniĝi. De tago al tago ni estis ĉiam pli malsataj. Kion ni ricevis por matenmanĝo, tio tute ne sufiĉis ĝis tagmanĝo. Kiam ni protestis, ni ricevis malmildan respondon, ke pli multe da manĝo simple ne estas. La manĝovara krizo evidentiĝis ne nur en la junularhejmo, sed en la tuta Bariŝevo.

Baldaŭ ni eksciis, ke la manko de la manĝovaroj disvastiĝis en la tuta lando. Oni tion eksplikis al ni, ke malforteco de Ĥruŝĉov estis maizo kaj li opiniis, ke ĝin oni povas kulturi ĉie, eĉ sur la luno. Klopodante akiri pli altan rikolton, li ordonis kulturi maizon ankaŭ en la grundo, kie oni kulturadis nur tritikon aŭ tute aliajn terproduktojn. Kompreneble baldaŭ evidentiĝis, ke la maizon oni tie ne povas kulturi, sed la malsato jam disvastiĝadis.

Ni sciis, kie en la junularhejmo estas provizejo de la terproduktaĵoj kaj ni planis ĝin ataki. La provizejoj estis sekurigitaĵoj per seruroj kaj la ŝlosiloj estis bone garditaj kontraŭ ŝtelo. Malgraŭ tio, ke niaj planoj estis perfektaj, mi simple ne povis realigi ilin.

Longajn monatojn ni por la tuta tago ricevadis nur unusolan maizan flanon, plej ofte sekan kaj malmolan, sed tamen manĝeblan. Ĉiam mi ĝin disrompis, unu duonon mi formanĝis matene, unu kvaronon tagmeze kaj la duan kvaronon vespere. Ĉar la malsato negative influadis ankaŭ nian menson, neniu el ni sin laŭdece preparadis por instruo. Ni iĝis bando de sovaĝaj, malsatantaj junuloj, kiuj interbatiĝis pro terpomaj ŝeloj aŭ aliaj forĵetaĵoj. Post kelkaj monatoj mi sur mia korpo observis signojn de skorbuto.

Komenciĝis moviĝi miaj dentoj kaj sinsekve malaperadis forto. Sed multaj estis ankoraŭ pli multe trafitaĵoj ol mi, ekzemple mia bona kamarado Saŝa Ognev. En sia aĝo li estis malalta, sed ĉiam gaja kaj bonhumora. Li kadukiĝis pli rapide ol aliuloj, eĉ se li ricevadis la samajn porciojn. Tagon post tago li estis pli kaj pli maldika, lia haŭto blankiĝis kaj la vizaĝo diafaniĝis. Ĉiam pli longe li restadis en la lito, ĉar li ne plu povis stari sur piedoj.

Post kelkaj semajnoj al li komencis ŝveli lia ventro kaj poste la tuta korpo. Neniam en la vivo mi vidis de proksime, kiel iu mortas pro malsato. Kiam mi tiujn simptomojn observis, mi ne sciis, kion pri tio pensi. Kompatinda Saŝa klopodis senĉese rideti, sed ĉiu vidis, ke malrapide proksimiĝas lia fino. Ni volis iel al li helpi, sed neniel ni povis. Ĉar la ununura helpo por li estus bona manĝo.

Foje venis en nian ĉambron la dika Irina mem – dikega kiel ĉiam. Por ŝi, por direktorino kaj „granda besto“ tiu ĉi vizito estis tre humiligema. Sed ĉu ŝin venigis ĉi tien kio ajn, ŝi ĉi tie staris. Mi ne scias, de kie la manĝon ŝi prenis, sed videble ŝi maldikiĝis eĉ ne unu

kilogramon. Unue ŝi haltiĝis ĉe la pordo, poste ŝi devigis sin ekrideti kaj kun peza ordeno de Lenin surbruste ŝi venis al la lito de Saŝa. Ŝi formovis kovrilon kaj ekrigardis lian ŝvelantan korpon, per malsato malfortigitan. Ŝi sin kliniĝis, plaŭdetis lian blankiĝantan vizaĝon dirante. „Mi vidas, ke vi iome dikiĝis, Saŝa! Vi aspektas bone nutrata. Sciu, ankaŭ mi havas problemon kun korptraĵto“, kaj denove sur ŝiaj lipoj aperis nenatureca, devigita ekrideto. Flugrigarde ŝi superrigardis la ĉambron kaj foriris.

Plenigis min forta ondo de malamo. Kiel ŝi povis siajn grasajn tavolojn kiel kusenetoj kompari al subnutrigitaj kaj fare de malsato ŝveliĝinta korpo de Saŝa? Mi sentis, ke ankaŭ la ceterajn knabojn en la ĉambro ekposedis furiozo. La ĉambrospaco estis rekte plenŝtopita per suspenso.

Kiam mi post du tagoj je la kvara horo posttagmeze revenis el la lernejo, enŝovinte mansakon en la ŝranketon apud la lito, mi aliris al la lito de Saŝa por rigardi, kiel li fartas. „Saŝa,“ mi ekflustris. Li ne respondis. Singardeme mi formovis kovrilon. La vizaĝon li havis blankan kaj malvarman. Li mortis. Li mortis sola kaj neniuj rimarkis.

La morto de Saŝa min tre ĉagrenigis. Tiu ĉi travivaĵo min plej multe influis el ĉio, kio en Bariŝevo okazis. Ĝi ŝanĝis la tutan mian vivteniĝon. La morto de Saŝa min antaŭ ĉio certigis en tio, ke transvivos nur tiuj plej fortaj – kiel en ĝangalo. Nur forta sin tratabos. Malforta malvenkos kaj mortos.

Mi eliris el la ĉambro retenante larmojn. En menso mi ĵuris, ke se la vivo estas tia, do mi devas iĝi la plej rigora kaj ruzlerta.

Ankoraŭ pluaj du junuloj mortis dum malsato en Bariŝevo. Unu knabino relative trankvile adiaŭis sin kun siaj amikinoj, foriris al lago kaj droniĝis sin. Alian knabinon, dek-unu-jaraĝan oni trovis pendmortigitan en subtegmentejo.

VII.

Kiel unuopuloj ni estis flanke de la hejmgvidantoj tute indiferentaj. Sian profesion ili malŝategis, tial ili ne zorgis pri ni.

Tial ni povis libere organizi nian propran vivon. Ni nin dividis je tri precize konturiĝintaj kategorioj: sklavo, leŭtenantoj kaj reĝoj.

Sklavoj estis pli junaj junuloj, pli malgrandaj kaj malpli fortaj ol ceteruloj. Ili devis al siaj „estroj“ servi kiel subuloj. Ĉi tien apartenis plejmulto da junuloj.

Leŭtenantoj ordonadis laboron al sklavo kaj ilin kontrolis. Ili formis pli malgrandan grupon de elektitoj. Ili inspektis ĉiutagan vivon en la hejmo kaj ilia plej granda konsolo estis komandi aliulojn. Super la leŭtenantoj regis reĝo, la suverena reganto de la junuloj en la hejmo. Li estis elektita surbaze de du testoj: fizika kaj psikologia. Li devis esti alta kaj forta. Sian korpan superecon li devis pruvi per tio, ke li venkis ĉiun aspiranton pri la „reĝa rango“.

Kio koncernas psikologian flankon – la junuloj ne nur devis timi, sed ankaŭ lin respekti. Krom tio li devis esti eksterordinare ruzlerta por superruzi malamantajn reprezentantojn de la hejmo.

Mi ne plu memoras, kiu estis reĝo de Bariŝevo, kiam mi venis tien. Estis certe, ke post li ekregis Nikolaj Povalejev kaj mi estis simpla sklavo. Mia unuavica devo estis purigi botojn de la reĝo. Post plenumo de tiu ĉi servo mi dum atenta pozo atendis aŭ signon de lia kontento aŭ indigno. Kiam la „reĝo“ kontrolis siajn purigitajn botojn, mi tremis pro timo,

ĉu ĉio estas en ordo. Laŭkutime li havis neniujn objektojn, ĉar purigi botojn mi kapablis majstramaniere.

Iam la „reĝo“ restis kuŝanta en la lito kaj vokis sklavon, por ke li kombu lin. Kiam li ellitiĝis, la haroj devis esti en la perfekta ordo. La samo koncernis vestojn kaj botojn. Poste la sklavoj al li surtabligis matenmanĝon. Kiam li estis finmanĝinta, li alvokis leŭtenantojn doninte al ili ordonojn, sed tiujn devis plenumi sklavoj. Ĉiun bagatelan konflikton inter la sklavoj solvadis reĝo. Unue li aŭskultis ĉiujn partoprenantajn flankojn kaj ankaŭ ĉiujn argumentojn kaj eldiris verdikton, kiu validis kiel definitiva kaj plej supera leĝo.

Sed la reĝo estis en senĉesa minaco. Ĉiu el leŭtenantoj lin senĉese zorgeme observis strebante aperigi ĉiun malfortecan momenton por lin detronigi kaj transpreni la potencon.

Kiam mi mirigite konstatis, ke io tia en la hejmo ekzistas, mi ekpensis, kion pri tio opinius onklo Niĉi aŭ dika Irina. Por mia grandega miro mi iun tagon trovis onklon Niĉi interparoli kun la reĝo. Ili diskutis pri reguloj, kiujn Niĉman volis validigi. Tiam mi ekkomprenis! Tute neniun tion sekretigis antaŭ la tendara gvidantaro. Ili tre bone sciis pri tio kaj la reĝa aŭtoritato al ili helpadis en gvidado de la hejmo.

Mi ne tro longe restis sklavo. Nur kiam mi estis iom pli alta kaj pli forta, mi alvokis al duelo iun leŭtenanton, mi venkis kaj okupis lian postenon. Post nelonge mi apartenis al elito. Sed mi ekintencis fariĝi la plej forta knabo en la hejmo por poste iĝi reĝo. Atingi tiun ĉi celon neniun al mi malhelpos, eĉ ne Nikolaj!

Aŭtune 1965, tiam mi estis dek kvar-jaraĝa, Nikolaj min alvokis dirinte:

„Sergej, mi devos transloĝiĝi en alian junularhejmon. Vi devus esti reĝo en Bariŝevo. Tiucele vi posedas ĉiujn premisojn. Kaj ne timu, mi ne estos malproksime!“

„Bonege. Ni do povos de tempo al tempo en la urbo renkontiĝi.“

„Kompreneble. Mi interkonatigos vin kun iuj homoj.“

En Bariŝevo oni diradis, ke Nikolaj persone konis eĉ kelkajn murdintojn. Kaj ni krimulojn kun respekto admiris.

Nikolaj do foriris. Sed mi sciis, ke mia nova pozicio ne estos facila. Mi ne estis ununura, kiu pri la vakanta trono aspiris. Sed sinsekve mi ĉiujn kandidatojn venkis.

Kaj post la venko mi estis kronita al rango de la nova reĝo de Bariŝevo. Por dek kvar-jaraĝa knabo tio estis bona atingo. Miajn amikojn mi kompreneble tuj nomumis ĉefleŭtenantoj. Kaj kun ili mi poste direktis ĉiun vivon en la junularhejmo.

La plej malagrabra mia tasko de la reĝo estis traktadoj kun Niĉi kaj dika Irina. Mi ilin malestimis kaj ili tion sciis. Kaj tial mi tiun ĉi funkcion transdonis al Boris. Boris mian ordonon respektis, eĉ se li rilate al ili sentis la samon, kiel mi.

La vivo en la junularhejmo pasadis relative sufiĉe agrable. En la lernejo mi estis membro de Komsomolo kaj en la domo reĝo. Tio estis simple bonega.

Kiam junuloj atingis dek ses, dek sep aŭ dek ok jarojn, ili iris for kaj anstataŭ ili venadis al ni novaj loĝantoj. Kompreneble ni ne sciis, kiaj ili estas, kaj tial ni ilin laŭeble plej baldaŭ submetis al „elektrolampa testo“. Se iu plendis, tiu fariĝis perfidulo. Se li ne plendis, ĉiuj lin agnoskis esti fidinda.

Ĉiu, kiu plendis aŭ alimaniere perfidis, devis pro tio penti. Por evitigi malagrabraĵojn, kiujn la perfiduloj povis al ni kaŭzi, ni uzis specifan metodon, se ni iun kaptis plendi, denunci aŭ spioni. Foje iu knabo koleriĝis kontraŭ la aliulo kaj plendis kontraŭ li al Niĉi, kiu lin bategis. La perfidulon ni baldaŭ trovis. Mi sendis Boris kaj Miĥal por lin alkonduki. Kiam

li dormis, ni per larĝa plastro glufermis lian buŝon kaj eltenis lin eksteren, ĉar li ĉirkaŭ si furioze batis. Pluaj du knaboj ĉion forĵetis el lia ŝranko, kiu staris apud lia lito. Knabon kaj ankaŭ lian ŝrankon ni alportis al kruta deklivo proksime de la hejmo.

„Enŝtopu lin internen!“ mi ordonis. Miĥal kaj Boris knabon enŝtopis, ŝlosis la ŝrankon kaj starigis ĝin rande de la deklivo. Sur unu flanko ni ĝin iom suprigis kaj mi ordonis: „Atentu! Nun!“ kaj la ŝranko kun perfidulo ruliĝis malsupren ĝis la fundo de la krutvalo.

„En ordo. Nun iu el vi malsupreniros kaj ellasos lin eksteren. Ni esperu, ke tiu ĉi leciono sufiĉos al li.“

Estas certa, ke tia sperto porĉiame fermis buŝon de la perfidulo. La kompatinda knabo estis sur la tuta korpo prisemita per kontuzmakuloj kaj dum du semajnoj li preskaŭ ne povis iradi. Sed li tion meritis. En nia mondo ne estis loko por perfidulo.

Mi regis tre severe. Sed al ĉiu mi donis senton, ke li ne devas maltrankviliĝi, se li adaptiĝos kaj honeste kondutos. Neniam mi provis misuzi la potencon malprofite por aliuloj.

Kiel reĝo mi opiniis kiel mian devon ekscii plej multe pri ĉiuj en la hejmo. Preskaŭ triono de ili estis perforte forprenitaj de siaj gepatroj. Rekte mi brulis per scivolemo ekscii la kaŭzon. Jam longe tio interesis min. Iuj junuloj ĉi tie vivis pro tio, ke iliaj patrinoj estis prostitutinoj aŭ iliaj patroj estis ebruloj. Aliaj estis ĉi tie tial, ĉar iliaj gepatroj kredis je Dio kaj la ŝtato ilin deklaris „nekapablaj edukadi“ kaj senigis ilin de iliaj gepatraj rajtoj.

Inter tiujn junulojn apartenis ankaŭ la dek tri-jaraĝa knabo... Por mi li estis vera enigmo. Li tute diferencigis de la ceteraj junuloj. Por sia aĝo li estis iom malgranda, sed rapidmensa, inteligenta kaj senĉese leginta iujn librojn. La laborojn de la sklavo li plenumis sen grumbado, kaj li preferis sin teni en retiriteco. Sed kiam li tamen komencis kun iu interparoli, li ĉiam parolis pri Dio. Tiu ĉi knabo min simple fascinis. Ĝis nun neniu en Bariŝevo – eĉ ne en aliaj junularhejmoj, en kiuj mi loĝis, parolis pri Dio. Iu pentris tiun knabon sur la muron kiel pastron kun barbo kaj gloriolo. Iu alia sub tion skribis „Diakono“. Ekde tiu tempo tiu ĉi kromnomo restis al li.

„He, diakono,“ mi lin vokis, kiam li foje preteriris. „Iru ĉi tien.“ Se iun vokis la reĝo mem, tio estis io escepta. Tial li rapide alkuris.

„Ĉu estas vero, ke vi parolas pri Dio?“

„Jes. Jes.“ li eldiris.

„Ĉu vi estas kredanto?“ mi plu demandis lin. Mi fakte estis scivolema. Ĝis nun neniam mi vidis kredanton. Por mi tio estis io simila, kvazaŭ iu falus el Luno aŭ el Marso. Pri tiuj homoj mi jam diversaĵojn aŭdis, mi eĉ ja aŭdis, ke al ili apartenis ankaŭ mia patrino. Mi metis brakon sur liajn ŝultrojn kaj dum la promeno mi volis, ke li rakontu al mi pri Dio. Tuj mi eksentis, ke diakono estas vera „misiisto“. Malgraŭ tio, ke li plej ofte estis malserenigita kaj malkomunikema, kiam li parolis pri Dio, li tute disradiiĝis. Lia vizaĝo heliĝis kaj ne estis eble lin halti. Li komencis ekde la kreo de la mondo, li parolis pri Dio kaj homoj, la bibliaj okazintaĵoj. Tio min multe konfuzis. La diakono estis en miaj okuloj certa kuriozaĵo. Mi lin prenis sub miajn ŝirmajn flugilojn kaj ofte mi interparolis kun li.

Foje vintre ni post abunda neĝofalo skiis sur krutaĵoj de krutvalo. La diakono observis nin. Mi ekvokis al li:

„Diakono, ĉu via Dio aŭdas niajn preĝojn?“

„Tutcerte,“ li respondis. Lia vizaĝo heliĝis kaj mi jam sciis, kio sekvos.

„Atendu! Mi volas aŭdi neniajn predikojn. Mi volas nur scii, ĉu via Dio elaŭdos ankaŭ

preĝojn.“

„Jes.“

„Bone,“ mi diris. „Ĉu tio signifas, ke Dio helpos min, se mi petos lin, ke mi pli bone skidescendu ol antaŭe?“

„Kompreneble.“

„Ĉu eĉ el tiu ĉi supro?“ kaj mi montris al la plej kruta kaj la plej danĝera deklivo el la ĉirkaŭaĵo.

„Ĉu de tie, de kie ankoraŭ neniu skiis?“

„Jes, Dio elaŭdos vin, Sergej!“

„Mi do donos al li ŝancon,“ mi diris. Ĉiuj streĉe observis, kiel mi grimpis al la danĝera supro, kiu krute dekliviĝis en la valon. Mi estis decidinta tion skidescendi. Mi englutis. Tio estis la plej freza skidescendo, pri kiu mi decidis. Verdire mi tre timis.

„Komencu preĝi!“ mi ekvokis al la diakono kaj ekpuŝis min.

Mi moviĝis malsupren kvazaŭ rakedo kaj je mia propra surprizo mi senprobleme descendis ĝis malsupro. Mi rigardis direkte al diakono: „Jes, tio funkcias! Funkcias tio!“

Mi elportis skiojn supren, kaj kun rekonio mi frapetis dorson de la diakono dirante: „Knabo, tio ne estas malbona. Ni du devas esti kunuloj. Vi zorgos pri la preĝo kaj mi iĝos mondĉampiono de skiado.“

Ankoraŭfoje mi memfide ekskidescendis, sed jam en la unua vojkurbiĝo mi falis kaj ŝusis peraze malsupren. Ĉiuj ridis, ĝis mi levis okulojn. Tiumomente ekestis silento. Diakono min rigardis iom timeme.

„Hej, diakono! Kio okazis? Ĉu tiu via Dio preterdormis? Nu, mi opinias, ke ankaŭ Dio ne povas senĉese obei, ĉu jes, diakono?“ Li facilige elspiris.

Iuj knaboj diakonon malamamis, ĉar li tre bone lernis, kaj per tio li ilin ombrumis. Bonŝance li ne vizitadis la saman klason kiel mi, kiu scias, eble li ankaŭ miajn nervojn incitus. Sed kiam mi eksciis, kiel iuj knaboj mokas lin kaj ke lin eĉ kelkfoje batregalis, severe mi tion al ili malpermesis. Spite de tio ili plu lin provokis kaj ĉikanadis.

Foje mi demandis lin: „Diakono, kio vi volas esti?“

„Hmm, ĉiam mi deziras vizitadi biblian lernejon kaj studi Bibliion. Mi kredas, ke iufoje tio plenumiĝos al mi. Ĉiutage mi intence de tio preĝas!“

Neniam li parolis pri sia familio. Iufoje mi ekaŭdis, kiel lin iu demandis: „Kie do estas viaj gepatroj? Kial vi estas ĉi tie?“ La diakono malĝojiĝis. Ankoraŭ neniam dum la vivo mi vidis tiel malĝojajn okulojn. Lia rigardo ekprenis reveman mienon, la gorĝo kuntiriĝis kaj li foriris el la ĉambro, ĉar li estis kapabla eldiri eĉ ne sonon. Mi iris al li. Li kuŝis surlite kun kapo kaŝita subkusene kaj ploris.

Nur pli poste mi eksciis, ke liaj gepatroj estis kredantaj kaj vivis en Orgutsov, nur 25 kilometrojn for de Bariŝevo. Ĉar ili sian filon kristanece edukadis, ili estis vokitaj antaŭ juĝtribunalon, kiu ilin deklaris kiel nekapablajn lin eduki kaj senigis ilin de la gepatraj rajtoj por la tuta vivo. La malgrandan diakonon oni oficiale traktis kiel orfon apartenantan al la ŝtato ĝis lia plenaĝeco. Siajn gepatrojn li ne rajtis vidi. Por tiel malgranda kaj delikatsenta knabo tio estis vivtragedio. Kaj ĉar li estis kredanto, ĉikanadis lin ĉiuj onkloj kaj onkloj en la junularhejmo. Pro la plej eta kulpeto li estis forte punata kaj mallaŭdata. La onklo Niĉi lin escepte malamamis. Ofte li alvenis ĉambron kun furiozanta kriado: „Kie estas diakono? Kie estas tiu malgranda friponulo? Mi donos al li iom da vitamino P!“ Diakono ĉiam tute

skuiĝis, elglitis el la lito kaj iris al Niĉi, kiu lin tiris eksteren kaj tie lin tre bategis.

Neniam mi eksciis, kio al li fine okazis. Sed certe mi scias tion, ke por homoj, kiel estis li, ne estis loko en Rusio.

Pli poste mi eksciis, ke en la junularhejmoj en Rusio estis centoj da tiaj „diakonoj“, kiuj estis simple brutale forprenitaj de la gepatroj. Danke al diakono mi la unuan fojon en la vivo havis eblon kontakti kredantojn je Dio. Neniam mi lin forgesos.

VIII

Kiam mi dek-kvin-jariĝis, komencis pri mi interesiĝi kamarado Skripko, kiu estis direktoro de la lernejo nomiĝanta Granda Komunisto. Li verdire estis la unua homo, kiu interesiĝis pri mi. Sub lia gvido mi komencis ĉiam pli interesiĝi pri la komsomola organizaĵo en nia lernejo. Mi klopodis direktigi mian abundantan energion kaj mi kun granda entuziasmo eklaboris.

Tun tagon venis al mi direktoro dirinte:

„Dakov, mi observas vian aktivadon en Komsomolo kaj mi opinias, ke vi estus bona gvidanto. Mi proponas al vi, ke dum la venonta lernoĵaro vi vere diligente laboru, por ke vi povu provi tiun funkcion transpreni. Kion vi opinias? Se vi klopodegos, vi povos altenkreski, ja eĉ ĝis la gvidanto de Komsomolo!“ Tio estus grandioza, mi ekpensis. Kial ne? Mi estis reĝo de Bariŝevo kaj certe ankaŭ tion mi lerte sukcesos. Kaj tial mi kun granda fervoro komencis studi marks-leninismen, komunismen kaj iliajn celojn.

Mi ne rememoras, ke io en la vivo povus pli multe influi min ol principoj de komunismo kaj marks-leninismo kun siaj devizoj: „Unuecon kaj fratecon por ĉiuj homoj! Al ĉiuj laŭ iliaj kapabloj, al ĉiuj laŭbezone!“

Tiuj ĉi idealoj vekis en mi fortan resonon. Antaŭe mi havis nenion, je kio mi povus kredi. Sed nun mi trovis kredon – je komunismo. Sed ne je tia, kiun prezentis dika Irina kaj onklo Niĉi. Tio, kion ili praktikadis, tio estis nenia komunismo. Ilia malamema, brutaleca sinteno havis nenion komunan kun ĝiaj idealoj. Kiaj ili devus esti? Komunismo ja heroldis fratecon kaj egalecon por ĉiuj homoj, dume Niĉman kaj la dika Irina disvastigis en la junularhejmo etoson de malamo. Tiu, kiu estis potenca, tiu havis ĉiujn rajtojn – la preciza malo de la egaleco de ĉiuj homoj.

La ceteraj amikoj en Bariŝevo ne samopiniis. La medio plena de ĉikanado kaj malameco iujn tre negative influis. Mia bona amiko Aleksandr Lobuznov forkuris kun sia frato al Novosibirsko. Se iu en la junularhejmo ne mankis pli ol unu semajnon, do ties malĉeesto en la hejmo ne vekis atenton. Kaj tiel Aleksej kun Vladimir vagadis tra la parkoj en la urbocentro kaj vivtenis sin per tio, kion ili ŝtelis. Iufoje ili forŝtelis kelkajn botelojn da vodko, ili ebriiĝis, ekatakis junan viron en la parko kaj batpunis lin. Verdire ili nenion malbonan planis. Sed pere de la ebriiĝo eble ili ne sciis, kion ili faras. Aleksej al la viro ligis ĉirkaŭ kolon sian ledzonon kaj tiris lin eble 300 metrojn malantaŭ si. Poste li deprenis la zonan ekkriante al li: „Nun malaperu!“ Sed la viro eĉ ne moviĝis. La ekteruriĝinta Aleksej sin klinis al li. La junulo estis morta. Aleksej lin mortstrangolis. Aleksej estis kondamnita je mortpuno kaj Vladimir ĝis nun estas prizonulo.

Multaj junuloj forkuris jam dek kvin aŭ dek ses-jaraĝaj el la junularhejmo kaj ili vivis vivon de krimuloj, narkotuloj aŭ prostituitinoj. La krimularo en Novosibirsko estis vasta kaj al ĉiu alirebla.

Nia pli mallarĝa rondeto restis relative netuŝita ĝis la tempo, kiam malaperis Ivan Ĉernega. Mi ne zorgis pri li, ĉar mi sciis, ke li estas tre singarda. Mi opiniis, ke li simple volis en Novosibirsko ĝui kelkajn belajn tagojn. Sed li kunigis sin kun profesia krimulo kaj kune ili ŝteladis en la trajnoj. Dum ia tempo ili fartis bonege.

Foje venis al mi Boris kaj incitite li demandis:

„Sergej, ĉu vi aŭdis, kio okazis al Ivan?“

„Kio?“

„Ili estis kaptitaj.“

„Kiu ilin kaptis?“

„Polico. Li kuniĝis kun bando, kiu ŝteladis en trajnoj.“

„Ĉu Ivan, la ŝtelisto en trajnoj? Muŝo zumas en via kapo, Boris!“ mi diris.

„Ne, Sergej, tio estas vero. Li estas arestita en polica gardoĉambro en Novosibirsko. Li atendas kondamnon.“

„Ĉu ekzistas ia eblo lin viziti?“

„Tio estas tute neebla. Neniu povas iri al li.“

Kompatindulo Ivan, mi ekpensis. Mia bona amiko! Multon ni kune travivis kaj ekde nia unua renkontiĝo – mi estis tiam ok-jaraĝa – ni akiris multajn komunajn spertojn. Tiam li estis malfermita, gaja knabo, kiu konstante ridis. La jaroj pasigitaj en Bariŝevo lin devis tre ŝanĝi. Li estis kondamnita al multjaraj punlaboroj kaj ankoraŭ hodiaŭ li tie estas.

Dume mi iĝis la plej sukcesa lernanto en la klaso, kaj ne nur en marks-leninismo, sed ankaŭ en fiziko, matematiko, fremdaj lingvoj, geografio kaj politiko. Mi estis talentita je lingvoj kaj sufiĉe bone mi jam parolis la germanan lingvon. Komence mi havis tiun avantaĝon, ke la lerneja direktoro min protektis. Sed post la tragika morto de mia bonanima amiko Saŝa en mi vekigis grandega forto, kiu pelis min antaŭen. Mi lernis kiel obsedita. Preskaŭ en ĉiuj lernobjektoj mi havas bonegajn notojn.

Iun tagon diris al mi direktoro: „Dakov, mi volas, ke vi al la lernantoj de la pli malsupraj klasoj parolu pri la komunismo.“

„Tre volonte,“ mi respondis kaj mi konsciiĝis pri granda honoro, per kiu mi estis honorigita.

Li min liberigis de lernado, ke mi povu instrui pli malgrandajn junulojn. Mia instruskemo havis jenajn punktojn: la okcidenta imperialismo, milito en Vjetnamio, kiu tiutempe estis preferata temo de la rusa komunista literaturo, kaj pluaj politikaj temoj, kaj kompreneble – la marksisma ideologio.

La direktoro estis tre kontenta. „Nur tiel daŭrigu kaj atendas vin granda kariero. La lernejo donos al vi bonegan prijuĝon!“

Tiu ĉi momento por mi signifis preskaŭ ĉion, ĉar la direktoro estis samtempe grava komunista funkciulo en la distrikto. Mi tre bone sciis, ke se iu volas en Sovetunio ion atingi, li devas havi bonegan prijuĝon de la loka komunista funkciulo. Ŝajnis, ke en mia kazo ĉio progresas ideale kaj laŭplane.

Dum la someraj ferioj en la jaro 1966 ni travivis – Boris, Miĥail Kirilin kaj mi – multajn tagojn en Novosibirsko. El la junularhejmo ni povis foriri, kiam ajn ni volis. Fojе mi ilin tre entuziasmajn renkontis en la urbo. Kio eble okazis? mi enmense demandis.

„Sergej,“ diris Miĥail, „en Taŝkento, de kie mi devenas, estas multaj islamanoj.“

„Mi scias, vi jam diris al mi pri tio.“

„Mi tie havas multajn amikojn kaj konatulojn. Multe oni tie fumas haŝiŝon. Mi opinias, ke mi povus eluzi mian ligon kun ili kaj havigi iom da ĝi.“

Ha, mi ekpensis, tio do estas!

„Ni povus ĝin kontrabandi ĉi tien,“ daŭrigis Miĥail ekscitite, „kaj vendi ĝin!“

Eble unu minuton mi pripensis. La propono ŝajnis ne esti la plej malbona.

„Kial ne?“ mi diris. „Ni povus akiri multan monon.“

„Jes, estus tio nenio malfacila.“

„Sed kie ni tion deponos?“ mi demandis.

„Kie? Ja en la junularhejmo!“

„Ĉu vi frenezigiĝis, Miĥail?“

„Ne. Laŭ mi tio estas ununura ideo. Kiu ekpensas serĉi drogojn en la junularhejmo?“

„Nu, tio vere ne estas malbona ideo!“

„Klare! Kaj poste ni en Novosibirsko ĝin sinsekve vendados. En la urbo estas sufiĉe da gejunuloj, kiuj pri ĝi interesiĝos.“

„Bone,“ mi diris. „Kiam ni komencos?“

„Ni pridiskutis la tutan aferon kun Niki kaj post tri tagoj ni vizitos Turkestanon.“

Helpe de nia „kasisto“ ni akiris tiom da mono, kiom estis eble akiri. Kaj Miĥail kun Niki forvojaĝis en la sudan parton de la azia Ruslando por ekligi tie bezonatajn kontaktojn. Eble post tri semajnoj ili denove aperis en Bariŝevo kaj kiam ili ekvidis min, ili plenuŝe ekridis. Tuj mi ekkomprenis, ke la ekspedicio estis sukcesa. Ni por haŝiŝo trovis konvenan kaŝlokon. La junularhejmo iĝis ideala maskita loko por nia nova negoco.

Miĥail komencis vendi jam dum elpakado. La unuaj klientoj estis iuj pli aĝaj junuloj, kiuj ĝin sekrete fumis. Ni tute ne devis zorgi pri onklo Niĉi aŭ dika Irina, ĉar dumsomere ili lasis al la vivo en la junularhejmo tute liberan pason. Kaj krom tio ni jam estis tiel ruzlertaj, ke ni ilin tutcerte superruzus.

Poste ni iris al Novosibirsko, ekligis kelkajn kontaktojn kun junaj homoj kaj tre rapide ni liberigis nin de haŝiŝo. Iun tagon dum nia „negoca ekskurso“ ni hazarde renkontiĝis kun Nikolaj Povalejev. Ni ĉirkaŭbrakis nin – ni revidis nin la unuan fojon ekde la tempo, kiam li estis forsendita en alian junularhejmon. Li rakontis al mi pri siaj kontaktoj kun krimula organizaĵo en Novosibirsko, kiu estis konsista parto de la nacia organizaĵo. Pli poste mi eksciis, ke ĉiu respubliko de Sovetunio estas dividita je regionoj kaj ĉiu regiono apartenas al unu krimula organizaĵo. Povalejev ankaŭ al mi rakontis pri unu konferenco proksime de Moskvo, dum kiu renkontiĝis gvidistoj de la krimularoj el la tuta Sovetunio por dividi inter si teritoriojn. Li ankaŭ diris al mi, ke li amikiĝis kun iuj ĉefuloj.

„Ne tro surprizis min tio, Nikolaj,“ mi diris. „Vi devas estis ĉie sur supro.“

„Kaj kion faras vi, Sergej?“ li demandis.

„Miĥail, Boris kaj mi komencis bone prosperantan negocadon!“

„Mi aŭdis, ke vi estas gvidanto de Komsomolo en Bariŝevo. Ĉu tio estas vero?“

„Jes!“

„Kaj mi vin petas, kio do vi volas esti – komunisto aŭ komercisto?“

Mi ekridis. „Ĉiuj ni devas vivi. Eĉ komunistoj,“ mi ekmemoris Saŝa-n.

„He, Sergej, mi ŝatus denove kun vi renkontiĝi. Mi havas ion, kio povus interesi vin. Ĉu ni povas renkontiĝi post du semajnoj ĝuste sur ĉi tiu loko?“

„Bone,“ mi promesis kaj ni adiaŭis nin.

Kiam ni renkontiĝis post du semajnoj, Nikolaj transiris rekte al la afero. „Sergej, per tiu ĉi iometado vi senutile eluzas la tempon. Multe ĉe tio vi riskas kaj kion vi akiras?“

Mi opiniis, ke per tio mi kontentige perlaboros. Sed kompare kun Nikolaj tio estis nenio. Kiam li vidis, kian impreson kaŭzis je mi liaj argumentoj, li plu insistis: „Sergej, homoj, kun kiuj mi laboras, bezonas tian bravulon, kiel estas vi. Vi estas en tiu ĉi komercado juna kaj nova. Ekzistas pri vi neniuj policaj enskriboj koncerne drogojn. Vi apartenas al homoj, kiujn polico ne suspektas!“

Tio ĉio sonis bele kaj tre alloge, kaj tial mi diris: „Do bone. Kion mi faru?“

„Ĉi-momente ni bezonas kurieron. Via tasko estos elpreni varon kaj ĝin transdoni al la difinita loko. Nenion pli.“

„Tio ŝajnas esti tre simpla!“

„Jes, tio estas simpla. Tio estas via tuta laboro.“

„Bone. Mi konsentas.“

„Bravo!“ respondis Nikolaj kaj li manplaŭdis mian dorson.

Sed antaŭ ĉio mi devis fini mian entreprenadon. Ni havis ankoraŭ relative multe da haŝiŝo kaj estis necese senigi nin de ĝi. Tial mi kun Boris kaj Miĥail decidis forveturi al Uljanovsk, naskiĝurbo de Lenin, kien somere alvenas multaj turistoj. Tio estos konvena loko por nia komercado. Kaj ni ne eraris. Ne daŭris longe kaj ni ĉion disvendis. Krom tio mi ankaŭ vidis naskiĝdomon de Lenin. Tio estis mia granda tago. La granda tago kiel por komsomolano, tiel ankaŭ por komercisto.

Post kelkaj tagoj mi komencis praktiki mian novan laboron de kuriero. Mi devis iri en Novosibirsko al foirplaco kaj min anonci en difinita budo al iu persono. El sub la vendotablo mi ricevis paperan saketon, kiun mi devis fordoni je destinita adreso. La polico ne suspektis min – mi ja estis dek ses-jaraĝa.

La laboro estis tre facila kaj bone pagita. Mi persone elprovis nek haŝiŝon, nek narkotaĵojn. Mi estis rekte fanatike orientita al hardado kaj fizika korpstato kaj tre bone mi sciis, ke drogoj ruinigus min. Forte mi trejniis. Kaj mia idealo restis – esti kaj resti forta. Kaj tial mi nur perlaboradis monon, kiuj devis al mi helpi pli bone vivi. Nenion pli.

Kaj poste okazis io, kio signifis finon de mia komforta vivo. Estis varma somera tago kaj mi surhavis nur maldikan someran vestaĵon. En la ĉemiza poŝo mi kaŝportis iom da haŝiŝo, kiun mi volis doni al amikoj en Bariŝevo. La tramo en Novosibirsko estis tre plenŝtopita kaj en tiu homtumulto la paketo kun haŝiŝo krevis kaj ĝia enhavo elŝutiĝis en mian poŝon. Haŝiŝo havas specifan odoron kaj estas eble ĝin facile distingi.

Mi eltramiĝis kaj en la gazetara kiosko mi aĉetis gazeton. Subite min alparolis alta, forta viro: „Iru ĉi tien, knabo, mi volas ion demandi.“

Tuj mi eksentis, ke io ne estas en ordo, sed tamen mi postiris lin en la malhelan strateton. Mi ne timis. Mi estis trejnita kaj mi mastris ĵudon. Unu homon mi facile superus. Tute ne maltrankviligis min, ke li estis pli alta kaj pli forta ol mi.

Kiam ni aperis en la strateto, li subite diris: „Vi havas drogon!“

„Mi ne havas,“ mi ekmensogis.

Li kaptis mian ĉemizon kaj levis manon por doni al mi karatean baton, post kiu devus sekvi kapto el ĵudo. Mi ne vidis, kio okazas malantaŭ mi. En la momento, kiam mi lin volis sendanĝerigi, subite mi eksentis fortan doloron en la dorso – kvazaŭ oni surverŝus min per varmega akvo. Unu el liaj kolegoj min demalantaŭe pikvundis per tranĉilo. Svenante mi

terenfalas.

Mi rekonsciiĝis nur en hospitalo. Al la demando, kio al mi okazis, la flegistino respondis: „Ili vin trovis en iu strateto, vi perdis multan sangon. Se oni vin tiel baldaŭ ne trovus, vi ne estus ĉi tie, vi mortus pro sangoperdo. La tranĉilo trapikis unu el ĉefaj arterioj!“

Mi skribis kelkajn vortojn al Boris kaj Nikolaj pri tio, kie mi troviĝas. Ili vizitis min. Nikolaj venis tuŝapuden al mia lito kaj diris: „Sergej, provu precize priskribi tiujn du!“

„Mi vidis nur unu.“

„Kiel li aspektis?“

Bone mi lin memoris kaj detale mi priskribis lin.

„Neniel zorgu. Ni jam lin prilumos!“

Post kelkaj tagoj venis Nikolaj denove.

„Do, Sergej, kun viaj du amikoj ni jam adekvate interkvitiĝis. Mi ne diros al vi, kio al ili okazis, sed tiuj du neniam plu iun rabatakos. Neniun plu ili ĝenos.“

„Kion vi al ili kaŭzis?“

„Mi transdonis ilian priskribon al amikoj kaj tiuj ilin tre baldaŭ trovis. Mi ne diros al vi, kio al ili okazis, nur tion, ke ili neniun kaj neniam rabatakos.“

Kiel mi konis Povalejev, verŝajne ambaŭ kuŝis sur fundo de la rivero Ob. Post du kaj duono de semajnoj oni liberlasis min el la hospitalo. Boris kaj Nikolaj min alkondukis en la junularhejmon, kie mi devis refortiĝi. Nur mallonga momento min dividis de la morto. La kuracistoj diris, ke se la tranĉilo min trafus nur iom pli maldekstren, mi ne plu vivus.

Kiam mi kuŝis en la hejmo kaj miaj leŭtenantoj kaj sklavoj min ĉirkaŭdancis, mi havis sufiĉe da tempo pripensi mian estontecon. Mi konsciiĝis, ke mi devas decidi. Aŭ mi iros en postsignoj de Nikolaj Povalejev kaj ĉiam pli mi enplektiĝos en krimojn, aŭ mi serioze komencos labori por mia kariero en Komsomolo. Mi jam elprovis ambaŭ kaj ankoraŭ mi precize ne sciis, kio pli konvenas al mi. Tio ne estis por mi demando de moralo. Ja nur kelkajn metrojn de la junularhejmo kuŝis sur la tombejto korpo de Saŝa, korpo de la bona knabo, kiu ne estis sufiĉe forta kaj rezistema por transvivi. Se mi ne kapablos prizorgi min mem, la sama sorto min trafos.

En mia kapo estis granda ĥaoso. Poste en mia menso aperis la dika Irina, kiu por admiro eksponadis sian ordenon de Lenin. La komunista partio ĝin al ŝi pruntedonis kaj ŝi strebis nenion maltrafi. Sed aliflanke ŝi havis pli malmultajn barojn ol ceteraj, kiujn mi renkontis ĉe krimularo.

Post longa pripensado mi konvinkiĝis, ke mia reala intereso estas politiko kaj studado. Kamarado Skripko, la lernejdirektoro, diris, ke mi havas ĉiujn bezonatajn kapablojn. Mia ekzaltiĝo kaj inklino al la instruo de Lenin kaj al celoj de komunistoj konstante kreskis. Mi esperis foje fari grandan karieron en la partio aŭ en politiko.

Kaj tiel dum rekonvalesko mi decidis, ke mi komencos kun helpo de direktoro partian karieron. Mi planis kun li laŭeble plej baldaŭ tion preparoli kaj aŭdi liajn konsilojn. Ĉion – krom funkcio en Komsomolo – mi planis flankenmeti kaj ekstudi. Ŝajnis al mi, ke la senpripensa kaj malhonesto periodo de mia vivo estas superita. Ekde tiu ĉi tempo devus ekkomenci disciplino kaj studado.

IX

Ĉiam pli ofte mi perdadis kontaktojn kun Nikolaj Povalejev, Boris kaj Miĥail Kirilin,

kiuj daŭrigis negocadon de drogoj. Mi ilin vidadis ĉeokaze fine de la semajno, kiam mi vojaĝis al Novosibirsko. La studado kaj okupoj de la gvidanto de Komsomolo konsumis ĉiam pli multe da tempo. Ankaŭ de la membroj mi multon postulis por realigi ĉiujn niajn planojn kaj celojn. Sinsekve mi akiris famon, ke nia grupo plej bone aktivis. Mi decidis, ke nia grupo devas akiri la unuan lokon en la tuta regiono. Celon mi starigis vere alten, ĉar al la regiono apartenis tuta Novosibirsko eĉ kun grandega ĉirkaŭaĵo. Sed por mia kariero estas grave, ke ni estu la plej bonaj.

La monatoj rapide pasis. Mi studis tre diligente kaj mia komsomola grupo staris frunte de la regiono. En junio 1967 mi finis lernejon kiel la plej sukcesa en la klaso. Tri plej sukcesaj lernantoj de la lernejo estis premiitaj per medalo. Iu knabino ricevis oran kaj mi arĝentan medalon.

Kaj poste okazis grava tago, kiam estis prijuĝitaj ĉiuj grupoj en Novosibirsko. Al la renkontiĝo venis ankaŭ altaj armeaj altranguloj. Nervoze mi sidis kun membroj de nia grupo atendente anoncon de la venkintoj. „La plej bona komsomola grupo en Novosibirsko estas . . . , la parolanto faris mallongan paŭzon kaj mi atendis senspire „. . . el Bariŝevo!“

Mi ne kredis al miaj oreloj. Ni gajnis! Ĉiuj okuloj dumire al podio fiksitis rigardon al mi kaj multaj rekoneme frapetis mian dorson. Estis tio por mi granda tago. Mi ricevis tondran aplaŭdon. Altaj komunistaj funkciuloj el nia regiono min gratulis. Kiam mi ricevis diplomon, la parolanto diris: „Tiu ĉi knabo realigos altan karieron!“

Puŝi min ĉiam antaŭen – tio estis mia vivkredo. Ĉiuj tiuj jaroj en Bariŝevo kaj precipe en junularhejmo n-ro 1, la rigora traktado kaj tio, ke mi estis dependa de mi mem, igis min nesubmetiĝema kaj rigora. Mi havis avantaĝon antaŭ ĉiuj, kiuj elkreskis ĉirkaŭitaj per la gepatra amo, zorgo kaj protekto! La vivo kaj kariero kuŝis antaŭ mi kaj mi estis bone preparita. Mi komprenis tiun ĉi sistemon – mi ja estis per ĝi edukita – kaj mi sciis, ke mi tion atingos ĝis supro.

Ekestis momento, kiam mi devis decidi pri la decidiga direkto. La plej proksima estis armea servo. Ĉu mi iĝu armeano? Mi parolis kun iuj, kiuj tie estis, kaj tiuj diris al mi: „Sergej, tio estas la lasta, pri kio vi konsideru. De malproksime evitu iĝi armeano: tio estas malfacila vivo nedonanta ŝancon progresadi. Post la fino de la armea servo vi iĝos simpla laboristo en fabriko. Ĉu tio estas ia estonteco?“

Mi jam konstatis, ke la vivo de la laboristo eĉ ne iom estas facila. Nu, por ĝuste ĉi tie entombigi miajn esperojn, pro tio mi ja ne klopodegis. Mi serĉis ion, de kie mi povus atingi pli alten. Kaj poste mi parolis kun kelkaj amikoj, kiuj estis maristoj – kaj mi decidis por tiu ĉi profesio. Sed mi ne volis esti nur simpla maristo, sed la armea. En ĉiu junularhejmo – krom la unua – mi estis ĉefulo, kaj en Komsomolo kaj en lernejo. Nun mi volis estis eminentulo ankaŭ ĉe maristaro.

La kamarado Skripko promesis min helpi. „Mi skribos al vi bonegan prijuĝon kaj rekomendon. Ambaŭ forportu al oficejo por mararmea rekrutigo en Novosibirsko kaj petu ilin, ke ili kontaktu min.“

Kaj tiel li skribis raporton pri mia laboro en Komsomolo ekde la momento, kiam mi estis fajrero ĝis la fino de la lernejo. Unu kopiaĵon li sendis kun la aliĝilo al mararmea akademio en Leningrad. Komence de aŭgusto 1967 de tie mi ricevis dokumenton, ke mi estas akceptita kiel armea kandidato. Tio estis io: pro tio mi povis danki al kamarado Skripkov. Malfacile mi adiaŭis kun miaj plej proksimaj amikoj, sed – mia spirito rigardis estontecon

nerigardante returnen.

Kiam mi en Novosibirsk en la stacidomo aĉetis vojaĝbileton al Leningrad, per okuloj mi ĉirkaŭflugis la konatan ĉirkaŭaĵon, kiu antaŭ dek jaroj estis mia hejmo. Kiel malproksima jam tio estas! Fine mi aŭdis lastan anoncon: „La vojaĝantoj al Moskvo enrajniĝu!“ Rapide mi envagioniĝis, fermis la pordon kaj post kelkaj momentoj la trajno ekmoviĝis. Subite mi konsciiĝis, kiel longan vivecon mi ĉi tie restigas. Per la rigardo mi adiaŭis kun la masiva konstruaĵo de la fervojstacio. En mia kapo svarmis diversaj pensoj. Antaŭ mi estis longa vojaĝo al Leningrado. La trajno forlasis fervojstacion traveturante periferion. Kiam malantaŭ la urbo ĝi ekrapidis, ŝajnis al mi, kvazaŭ ĝiaj radoj kantis: „Vi tion sukcesis! Vi tion kapablis! Vi tion sukcesis!“ „Jes,“ mi diris al mi mem, „vi sukcesis tion! Sed kio okazis kun viaj amikoj?“ Miaj rememoroj envagis en pasintecon. Antaŭ miaj okuloj aperis vizaĝoj de ĉiuj konataj knaboj. En la junularhejmon n-ro 1 samtempe ni estis alvenintaj sep. Komune ni elkreskis. Nur mi ununura el ili frekventis pli altan lernejon kun espero, ke en la vivo mi ion atingos.

Kiam mi neĉeesteme rigardis siberian ebenaĵon, aperadis en mia menso pluaj vizaĝoj: Ivan Ĉernega, Aleksej kaj Vladimir Lobuznov, Nikolaj Zauŝkin, Nikolaj Povalejev, Boris Lobanov, Miĥail Kirilin, Aleksej Popov, nia „kasisto“ kaj ĉiuj ceteraj bonaj amikoj. Iuj el ili fariĝis ŝtelistoj, narkotikuloj, eĉ murdistoj. Preskaŭ ĉiuj travivis gravajn malfacilaĵojn. Ivan Ĉernega devas ankoraŭ du jarojn pasi en malliberejo. Aleksandr Lobuznov estis mortpafita. Mi estis ege skuita, kiam mi konsciiĝis, kiom da junuloj en Bariŝevo iĝis krimuloj, gangsteroj aŭ prostituitinoj. Kaj malfortuloj, kiel Saŝa Ognov, mortis aŭ mortigis sin. Mi rememoris diakonon. Kio li fariĝos? Kien li iros? Ĉu li povos vizitadi biblian lernejon? Kompreneble, ke ne. Por tiaj homoj mankas loko. En la pensoj mi flugis al la ceteraj „oficialaj orfoj“, de kiuj ŝtato forprenis gepatrojn. Kio ili iĝos!

La trajno sur la larĝa ebenaĵo proksimiĝis al Moskvo al la nova vivo. Subite ŝajnis al mi, ke la radoj ŝanĝis sian kanton: „Estu firma! Estu firma!“ Mi devas ilian alvokon ekmemori dum ĉiuj cirkonstancoj.

Post longa kaj laciganta vojaĝo ni alveturis en la fervojstacion de Moskvo-Kazan. En la ĉefurbo mi restis du tagojn. La unua loko, kiun mi serĉis, estis maŭzoleo de Lenin. Sep horojn mi pacience atendis en la vico, antaŭ ol mi lin povis ekvidi. Kiel fajrero mi estis nepo de Lenin, kaj kiel gvidanto de Komsomolo lia filo. Iam kiel membro de la komunista partio, mi estos lia kamarado.

Kiam mi eniris silentantan ejon kaj proksimiĝis al la korprelikvoj de patro Lenin, surverŝis min ondo de pieco kaj estimo. Mi haltis tuŝapude de la ĉerko kaj rigardis la korpon de la viro, kies instruon mi tiel intense studis kaj kiu estis mia dio, fondinto de mia „religio“. La unuan fojon en la vivo mi povis je io kredi. Li instruis egalecon, fratecon kaj helpon al malfortuloj. Mi klinis kapon preĝante al li. Jes, tio estis preĝo, mi ne povas tion nomi alie. „Helpu al mi, patro Lenin, dum plua vivo. Gvidu min kaj montru al mi direkton, laŭ kiu mi iru. Helpu al mi kompreni vian instruon kaj ĝin sekvi. Forigu el mia vivo ĉiujn obstaklojn kaj danĝerojn. Protektu kaj gvidu min. Helpu al mi, patro Lenin.“

Mi levis la kapon kaj mi fiksas mian ekrigardon dum kelkaj momentoj sur liajn korpres-taĵojn. Mi foriris. Mi eksentis iun fortigon kaj kuraĝon fronti la estontecon.

La sekvan tagon mi aĉetis vojaĝbileton al Leningrado, atendis min sescent-kilometra veturo nordokcidenten de Moskvo. Ĉi tie devis komenciĝi plua parto de mia vivo, la esperi-

ga kariero de la estonta armea maristo, studento de la Marakademio de Aleksandr Popov. En Bariŝevo mi nian Aleksej Popov incitadis per tio, ke la akademio ricevis nomon laŭ li.

Ĉe la unua ekrigardo al la urbo Leningrado mi ekkomprenis, kial ĝi estas nomata reĝino de la sovetaj urboj kaj kial Voltaire en la 18-a jarcento diris: „Juveloj de ĉiuj eŭropaj urboj ne egalas tiujn de Peterburgo.“

Leningrado proponas miksaĵon de larĝhorizonta grandeco de Rusio kaj lia moderna kulturo. Ofte oni pri ĝi diras kiel pri la ĉefurbo de caroj kaj samtempe pri la lulilo de komunismo. Fondis ĝin antaŭ jarcentoj Petro la Granda, laŭ kiu ĝi estis nomita. En la jaro 1942 ĝi estis nomita Leningrado – honore al V. I. Lenin, ĉefulo de la oktobra revolucio, kiu transformis sanktan Rusion je Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj. Lenin konstituigis unuan komunistan regadon en la historio kaj flamigis ideologian eksplodon, kiu devus skuiĝi la tutan mondon ŝanĝinte ĝin. Lia grandega portreto, 30 metrojn alta, pendis super stratoj kaj dominis la malnovan Palacan Placon. Leningrado estas la urbo de multmultaj pontoj, volbiĝintaj super multaj kanaloj kaj riveroj – ĝuste kiel mi iam legis en libroj aŭ vidis sur bildetoj.

Unuavide okulfrapa estas malalta silueto de la urbo, nekutima malalta kompare al kvar milionoj da loĝantoj. Sed mi legis pri certa malnova leĝo, laŭ kiu oni ĉi tie ne rajtis konstrui konstruaĵojn – krom preĝejoj turoj – pli altaj ol tridek metrojn, por ke ili ne superu altecon de la Vintra Palaco.

Ĉe la rigardo al Neva Prospekto, la ĉefstrato de Leningrado, longa 4,5 kilometrojn kaj bordumita per multaj vendejoj, restoracioj kaj kafejoj, mi ekmemoris poeton Aleksandr Blok, laŭ kiu tio estas la „plej lirika strato de la mondo“.

Leningrado estas ankaŭ la urbo de muzeoj, la plej konata estas Ermitejo en iama Vintra Palaco de Katarina la Granda. La ĉiĉeronoj tie eksplikas al la vizitantoj, ke por vidi tie ĉion oni bezonus dek du jarojn, se ili haltus antaŭ ĉiu eksponaĵo nur unu minuton. Ĉiujare la Ermitejon vizitas tri milionoj da homoj.

La loĝantoj de Leningrado ŝatas al la urbo doni atributon heroa. Ĝi meritis tion pro sia tragika sperto kun armeo de Hitler dum la dua mondmilito. Mortis tie pli ol unu miliono de enloĝantoj. Tion ĉion mi sciis pli frue, antaŭ ol mi venis ĉi tien.

Al la estonteco mi kompreneble rigardis plena de atendadoj. Mi estis tre scivolema pri Marista Akademio de Aleksandr Popov. Fine mi bonŝance ĝin trovis.

Tuj la sekvan tagon ĉiuj rekrutoj estis alvokitaj partopreni defilon. En ĉeesto de pli aĝaj kadetoj estis ni, novuloj, nervemaj. Sed la etoso rapide malstreĉiĝis, kiam ili ekstaris kaj ekvokis: „Kiu estas el Moskvo!“ aŭ: „Kiu estas el Ĥarkov?“ kaj ĉiam, kiam iu sin anoncis, alvenis al li pli aĝaj kadetoj devenantaj el la sama urbo aŭ regiono. Kaj tiamaniere rapide ligiĝadis amikecoj.

Fine iu ekkriis: „Kiu estas el Novosibirsko?“ „Mi,“ mi ekvokis emociite, turnante kaj retrorigardante ĉirkaŭ mi. Unu pli aĝa kadeto amikeme ekridetis je mi, ni donis al ni manon kaj ni nin prezentis. Li nomiĝis Vasil, je du jaroj li estis pli aĝa ol mi kaj li ŝajnis esti amikema. Mi estis tre kontenta, ke ni renkontiĝis, ĉar li helpis al mi pli rapide penetri en spiriton de la ĉiutaga cirkulado de la akademio, kaj tiel eviti multajn problemojn. Kun Vasil mi tuj dekomence bone interkompreniĝis kaj ofte ni kelkajn horojn vive interbabiladis. Baldaŭ inter ni evoluiĝis profunda amikeco, kiu devus daŭri multajn jarojn.

Mi povis elekti el du lernobjektoj: meĥaniko aŭ radiatorakada tekniko. Post profunda

pripensu mi elektis la duan fakon. Ĉiam mi ŝatis matematikon kaj fizikon kaj radiosendiloj kaj elektronikaj aparatoj min fascinadis.

Tri tagojn post la alveno al la akademio ĉiuj kadetoj el radiofako kolektiĝis por elektri grupan gvidanton de Komsomolo. Ili proponis diversajn nomojn. Ĝis iu diris: „Mi voĉdonas por Sergej Dakov.“ Tio aperis tute neatendite, mi ja estis novulo. Mi sentis min pli ol flatita, kiam la propono estis akceptita. Pli poste mi eksciis, ke ankaŭ por tio mi povas danki al prijuĝo el Bariŝevo kaj ke mian nomon antaŭe proponis partia prezidanto de la akademio. „La elekto“ estis nura formalajo. Kaj tiel mi gvidis nian komsomolan grupon dum la tuta tempo, dum mi estis en la akademio. Mi organizis instruhorojn kaj prelegis komunisman ideologion. Krom tio mi proprainiciate ĉeestadis prelegojn el politiko kaj samtempaj okazaĵoj.

La laboro kaj disciplino en akademio estis rigoraj kaj severaj, sed por mi – post ĉiuj spertoj el la junularhejmtoj – ili estis preskaŭ refreŝiĝo. Kiam la ceteraj kadetoj, kiuj travivis junecon en sekurigataj familiaj kondiĉoj, devis rezigni, mi estis kapabla konservi bonajn rezultojn, precipe pro mia laboro en Komsomolo.

Tuj la unuan tagon mi interkonatiĝis kun Paŭlo Sigorski, kiu pli poste iĝis mia bonega amiko. Devenanta el Pollando – el la teritorio, kiu postmilite apartenis al Rusio – li estis tie jam pli longe. Ĉar li estis nacionalisto, li paroladis en mia ĉeesto nur pollingve. Ni priridis tion kaj Paŭlo diradis: „Se vi volas interbabili kun mi, vi devas lerni la polan lingvon.“ Mi tion opiniis kiel bonan proponon kaj mi lin petis, ke li donu al mi lecionojn de la pola lingvo. Baldaŭ ni povis interkompreniĝi en ambaŭ lingvoj.

Ofte mi devis estis gardisto de la akademia enirejo. Iun dimanĉan matenon mi vidis homamason trairadi la proksiman kampon.

„Kiuj estas tiuj ĉi homoj?“ mi demandis la duan kadeton, kiu kun mi servis.

„Kredantoj.“

Mi atenteme ilin observis. La kredantoj min de ĉiam interesis.

„Kaj kien ili iras?“ mi plu demandis.

„Sed tie malantaŭ la arboj estas preĝejo.“

Tio estis vero. Ĉi tie en flanke situanta antaŭurbo de Leningrado la oficejoj permesis malfermi preĝejon. Kaj ĉiuj kristanoj el la tuta urbo, kiuj volis partopreni diservojn, devis veni ĉi tien. Tio impresigis min. En la lernejo mi legis en konstitucio de Sovetunio, ke ĉiu civitano rajtas ĝui religian liberecon, eĉ ja liberecon de la religia kolektiĝado.

Vintro kaj printempo rapide forpasis. Mia laboro en la akademio fariĝis ĉiam pli ampleksa. Sed neniel min tio strenis, ĉar mia studobjekto tre interesis min. Mi gustumis antaŭ ĉio prelegojn pri marks-leninismo. Preskaŭ magie ili min allogadis kaj mi senlace studis. Malgraŭ tio mi ĝojis, kiam aperis monato aprilo kaj kun ĝi la printempa feriado. Mi povis realigi mian planon – vojaĝi al Novosibirsko kaj Bariŝevo. La vizito sukcesis. Mi travivis neforgeseblajn momentojn kun miaj malnovaj amikoj.

Dum mallonga perbusa vojaĝo el Novosibirsko al Bariŝevo mi travivis ion, kio min tre impresis. Kiam ni traveturis antaŭurbon de Inskaj, ni enveturis trafikana ŝtopiĝon. Sciavide kio okazas, ni min elklinis el la fenestro. La straton blokis diversaj aŭtomobiloj, policaj aŭtomobiloj, du fajrobrigadistaj veturiloj kaj kelkcentoj da sin puŝantaj homoj – senesperiga kaoso. Al ĉiu el nia peraŭtobusa vojaĝanto estis klare, ke ni ĉi tie pli longan tempon restos enblokitaj, kaj tiel ni scivoleme kaj nekomprenante plu rigardis. Ni vidis nur tion, ke eks-

tere blokas la trafikon iu amaso da malkontentaj homoj.

Poste kelkaj eniris aŭtobuson. Ni demandis ilin, kio okazis. Ili diris, ke en Novosibirsko estis fermitaj multaj preĝejoj. Post multaj petoj kaj petpostuloj la registaro fine decidis unu el ili malfermi, kaj ĝuste tiun ĉi tagon. La sciigo fulmrapide disvastiĝis inter la kredantoj. Eĉ se oni povis antaŭvidi alvenon de multaj kredantoj, tamen oni ne kalkulis pri tia amaso. La preĝejo havis kapaciton nur por ĉirkaŭ 150 kredantoj. Sed alvenis centoj da centoj blokante la stratojn en espero, ke ili ankoraŭ povus eniri internen. Tio estas interesa, ke tiel multe da ili venis, mi diris al mi. Sed Novosibirsko havis unu milionon kaj duono de enloĝantoj kaj jam multajn jarojn ĉi tie estis neniu protestanta preĝejo. Kaj tial pro malfermo de tiu ĉi venis ĉiuj kredantoj.

Ne daŭris longe kaj aperis tie polico, kiu homamason dispelis. Ni petis kredantojn en nia aŭtobuso, kiel ili imagis, ke ĉiuj povu partopreni la diservon. „Nu, estas tio entute facila. Ni interŝanĝiĝos. Ĉiu grupo restos interne preĝante kaj partoprenante la diservon nur duonhoro. Poste eniros pluaj 150 homoj kaj tiel plu, ĝis ĉiuj alterniĝos.“

Tio elpuŝis mian spiron. En la lernejo oni diradis al ni, ke la kredantoj formas nur etan grupeton, kaj tie ĉi blokas straton centoj da ili! kaj onidire nur maljunuloj kredas je Dio. Sed ĉi tie estas prezentata ĉiu aĝgrupo. Mi vidis multegajn junajn homojn, kiel estis mi. Ili formis duonon de la homamaso.

Post ia tempo la aŭtobuso ekmoviĝis. Tiu ĉi travivaĵo min ege trafis. Ĝi kaŭzis en mi gravan impreson kaj ankoraŭ longe mi devis tion pripensi.

La reston de la ferioj mi travivis kun amikoj en Bariŝevo kaj Novosibirsko. Estis tio feliĉaj kaj senzorgaj tagoj, sed kiuj rapide forpasis kaj mi devis reveni en Leningradon. Denove mi ĵetis min al studado, ankoraŭ pli fervore ol antaŭe.

En julio de la jaro 1968 mi estadis en Leningrado jam unu jaron kaj subite mi ricevis anoncon, ke mi ricevis studlokon en Petropavlovsko en Kamĉatko. Nekredeble! Ĝuste laŭ miaj imagoj! Tiama akademio estis tre signifohava. Ĝi situis sur la ruslanda marbordo de la Pacifika Oceano, norde de Japanio. Kamĉatkon oni kromnomadis „okulo de Rusio“. La plej granda parto de la soveta floto ankradis en tiu ĉi teritorio. Ricevi eblon restadi tie signifis gajnon. Mi estis nepriskribeble feliĉa.

Kaj tiel mi denove adiaŭis miajn amikojn, antaŭ ĉio la polon, pri kiu mi poste longan tempon nenion sciis. Sur la nova agadloko mi devus min anonci nur post unu kaj duono de monatoj, kaj tial mi decidis denove viziti Novosibirsko.

Dum lasta ekrigardo al Leningrado akompanis min diversaj sentoj. Mi sciis, ke mi neniam forgesos la emociplenajn, per laboro plenigitajn tagojn kaj kompreneble grandegan belecon de tiu ĉi grandurbo.

La vojaĝo pasis relative kviete, nur tuŝapude antaŭ la ĉefurbo mi subite ekaŭdis el la najbara vagono grandan bruon. La scivolemo min instigis iri rigardi, kio okazas.

Tri larĝstaturaj knabaĉoj taŭzis malgrandan knabon kun mieno de malgranda lerneĵano kun grandaj okulvitroj kaj pala vizaĝo tien kaj reen. „Se vi ne donos al ni monon, ni rompos vian brakon!“ La knabo skuiĝis kvazaŭ tremolo. Unu el banditoj retenis ceterajn vojaĝantojn, por ke neniu aŭdacu defendi la knabon. Tian agadon mi malŝategis. Mi deprenis soldatan zonrimenon kaj ĝin ĉirkaŭvolvis al la mano tiel, ke la peza buko efikis kiel boksilo. Kiam la „gardanto“ sin turnis al mi, per ĵuda ekprenon mi lin puŝis sur vagonvandon kaj per improvizita boksilo mi lin batis rekte en la vizaĝon. Li terenfalas.

Pluaj du dume elteris monon el la poŝo de la knabo. „Redonu al li la monon, aŭ mi kaŭzos al vi la samon, kiel al tiu ĉi!“ mi ekkriis. Nur nun ili vidis sian kunulon kuŝi senkonscie. Mi faris kelkajn paŝojn al ili. Ili retiriĝis. „Ni ja jam iras.“ En la plej proksima haltejo ili eltrajniĝis ankaŭ kun sia senmova kunulo.

La knabo estis ŝokita. Mi helpis al li kolekti monon, mi metis mian brakon al liaj ŝultroj, mi trankviligis lin kaj poste ni kune sidiĝis. Mi eksciis, ke li nomiĝas Miĥail Koptjelov. Momenton mi ne plu volis demandi. Kaj se li iamaniere rilatas kun persono, kiun mi opiniis, do tio estus eksterordinara ŝanco. Sed fine mi tion ne eltenis. „Ĉu vi eble estas parenco kun tiu granda verkisto Konstantin Koptjelov?“

„Kompreneble. Li estas mia patro.“

„Ĉu via patro?“ mi ekdemandis. Tio min svenigis. Ĉiu rusa ŝatanto de literaturo konas tiun nomon. Koptjelov estas unu el la plej eminentaj kaj plej konataj verkistoj kaj li estas ricevinto de la ordenon de Lenin por literaturo. Liaj libroj estas konataj en la tuta Sovetunio.

Nun la tuta evento fariĝis ankoraŭ pli interesa. Miĥail min demandis, kiu mi estas kaj kien mi vojaĝas.

„Vidu,“ li diris, „nun kiam vi jam estas en Moskvo, ĉu vi povus por kelkaj horoj interrompi vian vojaĝon por interkonatiĝi kun miaj gepatroj?“

Grandioza, mi ekpensis. Mi havas okazon interkonatiĝi kun Konstantin Koptjelov. Rapide mi decidis. „Do bone, mi ja havas en Moskvo kelkajn horojn liberajn.“ La ideo, ke mi renkontiĝos kun tiel eminenta persono, en mi kaŭzis solenan senton.

Per metroo ni transportis nin al familio Koptjelov. Miĥail min prezentis al siaj gepatroj kaj rakontis al ili, kio dumvojaĝe okazis. Lia patro skuis mian manon kaj tre dankis min pro la helpo. Lia patrino nur dankeme ridetis. Poste ŝi demandis: „Sergej, ĉu vi havas tempon manĝi kun ni? Post momento estos ĉio finpretigita. Ĝis forveturo de la trajno ni ankoarŭ povas iom interparoli.“ La inviton mi tre volonte akceptis.

Post momento ni komune bonguste manĝis kaj babilis kiel longe konataj amikoj. Koptjelov min demandis pri mia pasinteco, pri tio, kion mi faras kaj kiel mi prezentas al mi mian estontecon. Kaj tiel mi rakontis al li mian historion. Ĝi ŝajne fascinis lin. Kun intereso li aŭskultis kaj demandis pri pluaj kaj pluaj detaloj. Post la manĝo ni transiris en loĝĉambron, kie ni ĉe pokalo da vodko daŭrigis interparolon, ĝis proksimiĝis la tempo adiaŭi kaj foriri al fervojstacio.

„Sergej,“ diris fine Koptjelov, „kiam mi nun vin aŭskultis, ĉion tion mi pripensis. Mi estas konvinkita, ke pri via vivo kaj pri la vivo de la junuloj en Bariŝevo povus esti verkita interese ga libro.“

Mi mutiĝis. Pri io tia mi eĉ ne ekpensis.

„Mi povus verki libron pri via vivo en la junularhejmo. Estus tio rusa Tom Sawyer,“ li diris.

Tio flatis min, sed mi sincere diris, ke mi ne estas certa, ĉu tio estus bona historieto. Sed tion devis pli bone prijuĝi li, ĉar li estis „fakulo“. Mi certigis lin, ke mi diros al li ĉion, kion mi scias.

„Bone, ni tion faros!“ li diris entuziasmigite. „Laŭeble baldaŭ mi ligiĝos kun vi. Ni aĉetos someran domon apud Novosibirsko. Ni troviĝos sufiĉe proksime de la junularhejmo kaj mi povos vin kaj pluajn knabojn intervjui.“

Poste jam la novaj geamikoj veturigis min al la fervojstacio, kie mi adiaŭis ilin kaj daŭ-

rigis mian vojaĝon al Novosibirsko.

En la stacidomo atendis min Boris Lobanov. Malnova, bona Boris! Li enirigis min en sian unuĉambran loĝejon, kaj post kiam ni iom interbabilis, ni iris eksteren por renkontiĝi kun la ceteraj amikoj. Kiel la unua nian promenon haltigis Nikolaj Povalejev.

„He ni vidu!“ li ekvokis. „Kiu estas tiu eleganta soldato flanke de vi, Boris? Kiam li forire adiaŭis nin, ankoraŭ lakto fluis sur lia mentono kaj li revenis kiel admiralo! Knabo, knabo! Ja oni hodiaŭ eĉ ne scias, al kiu doni tian uniformon!“

Post kiam mi plenpulme ekridis, mi transiris al la afero: „Aŭskultu Nikolaj, mi por vi havas novaĵon!“ kaj mi diris al li pri la interparolo kun K. Koptjelov kaj pri lia propono verki libron pri la junularhejmo kaj ĝiaj loĝantoj, inkluzive de Nikolaj. „Ĉion mi diris al li kaj vian historieton, Nikolaj, li ankaŭ volas priskribi. Ankoraŭ mi vin faros faman!“

La rigardo de Nikolaj estis ĉiam pli konsternita. Fine li ekvokis: „Sergej, vi estas granda kreteno! Kompreneble, ke mi iĝos fama, sed tio estos mia fino – definitiva! Ĉu vi ne komprenas, kion tio signifus por miaj negocoj? Sergej, kiel vi tion povis fari ĝuste al mi, la malnova, bona amiko?“ Komenciĝis al mi heliĝi. Nu vere! Kiel mi povis esti tiel stulta?!

„He, Nikolaj, tio vere ĉagrenas min,“ mi diris. „Mi pri tio tute ne pensis. Vi pravas.“

„Pri mia laboro prefere oni silentu. Boris, mi kaj aliaj pluaj ĉi tie elkonstruis bonan organizaĵon kaj unu scivolema skribistaĉo tion ĉion detruus!“

Mi volis interrompi lin, sed li ne lasis min ekparoli.

„Mi scias, ke vi, Sergej, havas malmulte da mono. Kaj miaj negocoj lastatempe vere bonstatas. Ĉi tie vi havas monon, kiujn vi elspezu, se la ideon pri la libro vi pendigos sur najlon. Ĉu vi konsentas?“

Nun mi vere incitiĝis: „He, Nikolaj! kiam vi por minuto ĉesos oratori, mi ion diros al vi, kion mi jam komence volis al vi diri. Mi ne pensis tion malbone. Ĉu vi aŭdas! Ĉagrenas min tio. Neniun libreton oni verkos kaj finite! Kiajn ekpensojn vi havas, min salajri? Ĉu vi estas normala? Mi ja estas via amiko!“ Sur la vizaĝo de Nikolaj aperis ekrideto. „Nu nun vi denove estas tiu malnova Sergej, kiun mi konas. Dankon!“

Baldaŭ skribis al mi Koptjelov, ke li aĉetis proksime someran dometon kaj ke li baldaŭ alvenos. Kiam li post kelkaj tagoj alvojaĝis, mi eksplikis al li, ke la ideo pri la verko de la libro tamen ne ŝajnas al mi konvena kaj ke mi kun li tiucele ne kunlaboros. Li estis per tio iom elreviĝita. Sed mi al li diris, ke tio ĉagrenigas min, ke mi ne povas alie kaj tio signifis finon de nia amikeco.

Dudek feriaj tagoj, kiuj restis antaŭ mia forveturo al Petropavlovsko, forpasis kvazaŭ akvo, sed tamen ni maksimume eluzadis ĉiun tagon por ĝui la tempon. Iun tagon Nikolaj diris al mi: „Sergej, mi volus vin prezenti al la ĉefo de nia organizaĵo.“ Pri tiu ĉi viro el krimularo mi multon aŭdis, ankoraŭ kiam mi estis kurierknabo. Jam tiam mi sopiris kun li interkonatiĝi, sed konsidere al mi kun malalta posteno mi ne havis ŝancon. Eĉ nun mi opiniis tiun ĉi inviton kiel grandan honorigon. Nikolaj min alkondukis al unu kvartalo de Novosibirsko, kie mi ĝis nun neniam estis. Ni eniris domon, kiu iom flankestaris. Momen-ton ni atendis kaj poste Nikolaj ekflustris: „Tie! Li alvenas!“ La pordo malfermiĝis. Mi staris kvazaŭ salkolono nevolante ekkredi al la propraj okuloj. „Ĉu tiu estas ĉefo? Ja li estas Zauŝkin!“ „Vi pravas, Sergej, Zauŝkin. Mi estas, kiel nur tion al vi diri – numero 1 en tiu ĉi negocaĉo.“

Fine mi eksciis eĉ tion, kio okazis al Zauŝkin! En Bariŝevo oni lin arestis, ĉar li foje pro-

vis per mortiga armilo, kiun ni en la domo sekrete konsistigis, ekstermi la dikan Irina. Neniu el ni eksciis, kien li estis transportita. „Ili enpuŝis min en malliberejon por junuloj,“ Zauŝkin diris. „Tie mi ekligis kontaktojn, kiuj helpis min akiri tiun ĉi profesion.“ Kompreneble per tio li opiniis provizadon de la negoco per drogoj. Li estis la plej granda drogkomercisto en la tuta Novosibirsko.

Jes, antaŭ mi staris knabo el Bariŝevo, kiu atingis vere alten. Nur mi staris kaj nekredoble mi faŭkis kaj aŭskultis, kion li kun Nikolaj interparolis. Sed kiam mi konsciigis, kiel forta kaj persistema li estis en Bariŝevo, mi sciis, ke ĉio tio estas vero. Mi ne pensis, ke li min memorus, ĉar mi estis multe pli juna ol li. Kaj tamen.

„Kompreneble, ke mi vin rekonas, Sergej,“ li diris. „Kiel vi fartis? Mi vidas, ke vi iĝis armeano.“

Ni kune pasigis kelkajn agrablajn horojn interbabilante pri Bariŝevo, pri niaj amikoj, travivaĵoj kaj spertoj. Mi eksciis, ke Boris kaj Nikolaj kune kunlaboris. Zauŝkin proponis al mi: „Sergej, ankoraŭ kelkajn tagojn vi ĉi tie restos. Ĉu vi volas perlabori iom da mono?“

„Nu, mi ne rifuzus ĝin.“

„Kiam vi estas ĉi tie, vi povas kunlabori kun ni. La negoco ekfloras: Ni vendas grandan kvanton da drogoj kaj el Japanio ni ricevas ankaŭ aliajn varojn, kiuj estas postulataj en nigra negocado.“

„Kaj kion vi vendas?“

„Magnetofonajn bendojn, kosmetikon kaj similajn aĵojn,“

„Bone, mi akceptas.“ Denove mi ekmemoris pri tio, kion mi lernis antaŭ jaroj – en tiu ĉi mondo devas ĉiu zorgi pri si mem.

Kelkajn tagojn mi kunlaboris kun Boris, Nikolaj kaj Zauŝkin. Poste okazis malfeliĉo. Zauŝkin estis arestita kaj kondamnita al okjara prizono restado en severa malliberejo ne malproksime de Tomsk. Sed la komercado devis plu funkcii. Povalejev opiniis, ke la lokon de Zauŝkin devus li okupi.

Foje vespere min Boris kaj Nikolaj invitis al kromordinara renkontiĝo de ĉefuloj de krimularo. Post aresto de Zauŝkin ni do havis malfacilaĵojn kun alia organizaĵo, kiu malrapide, sed certe komencis komerci sur nia teritorio. Mi opiniis, ke tio estos interesa vespero, kaj tiam mi inviton akceptis. Dumvoje Boris diris al mi, ke jam okazis kelkaj pafprovoj, dum kiuj unu homo estis mortigita. La pactraktado do estis neevitebla. La aferoj devis ordiĝi, por ke ambaŭ flankoj povu sin tute okupi nur pri la komercado. La renkontiĝo okazis en kaduka domo en la fora kvartalo de Novosibirsko.

Ni supreniris per mallarĝa ŝtuparo, trairis longan, malhelan koridoron. En malforte lumigita ĉambro atendis ĉefulo de la dua grupo. Mi restis malantaŭe dum Nikolaj intertraktis. Post prezento de argumentoj de ambaŭ flankoj subite Nikolaj pugnobatis la tablon kaj ekkriis: „Se vi ne volas libervole retiriĝi el nia teritorio, ankaŭ ni alie parolos. Ni provis ĉion aranĝi paceme, sed evidente tio ne estas ebla. Vi havas vian teritorion kaj en tiu vi restos!!“

Nikolaj ekstaris. La dua ĉefulo kaj liaj homoj ankaŭ elsaltis kaj eliris eksteren. Mi ĵetis rigardon al Nikolaj. Konstante estis li tiu, malmola, nefleksema viro, kiun mi ekkonis en Bariŝevo kaj kiu tiam prizorgis du miajn atakantojn.

Mi supozis, ke la traktado eble finiĝis, kaj mi diris al Nikolaj: „Mi iras eksteren iom spiri la freŝan aeron. Mi tie vin atendos.“ En la momento, kiam mi eliris el la ĉefpordo al

la strato, eksplodo plenigis la aeron. Sub la ripoj mi eksentis fortan, pikan baton kaj fortan doloron, kiu verdire haltis mian spiron. Preskaŭ svenanta mi rigardis min. Forte mi sangis. La ĉemizo kaj eĉ la soldata mantelo estis trasorbigitaj de sango. Ili pafvundis min – estis ununura ekpenso, kiun mi tiumomente konsciiĝis. Mi falis sur genuojn. Tiumomente mi malantaŭ mi ekaŭdis iajn sonojn – iuj malsuprenkuris ŝtuparon. Ili estis Boris kaj Nikolaj, ĉiu armita per du pistoloj kaj preparitaj por ekpafado. Sed atakantoj jam forestis. Nikolaj kaj Boris kaŝis armilojn, helpis min ekstari kaj enirigi internen. En la surtuto mi havis plenan poŝon da dokumentoj, folioj, ordonoj, legitimiloj kaj pluaj aĵoj.

„Sergej, vi havis feliĉon!“ ekkrietis Boris, kiam li malplenigis poŝon. La poŝo estis ĝuste sur la maldekstra flanko kaj kuglo traflugis tra dika adresaro, tra ceteraj dokumentoj kaj haltis sub la haŭto.

Kiam Boris kontrolis la vundon kaj la truon en ĉiuj tiuj paperoj, li nur ekfajfis: „Sen amaso de tiuj ĉi dokumentoj, vi ne plu vivus!“

El poŝtuko kaj el ĉemizo de Boris ni pretigis provizoran bandaĝon por halti fortan sangadon. Poste ili min forkondukis al hospitalo.

Kiam mi estis ellasita el la hospitalo, kelkajn tagojn mi pasigis ĉe Boris por iom reformiĝi. Mi havis nenion por fari, tial mi do drinkis. Neniam mi estis granda drinkulo. En Bariŝevo mi de tempo al tempo iom drinkis – kiel cetera ĉiuj junuloj ĉirkaŭ mi – sed pli poste nur malofte. Kaj ĉiam mi ĉesis pli frue, antaŭ ol mi povus ebriiĝi, mi senĉese pensis, ke mi devas konservi perfektan fizikan kaj psikan korpstaton. Mi sciis, ke pli multe da alkoholo povus al mi damaĝi, tial mi ebriiĝis nur ĉe vere esceptaj okazaĵoj.

Iamatene post grandioza vesperfesteno, kiun aranĝis Boris miahonore, mi vekigis iom antaŭ la naŭa. La ceteraj ankoraŭ ne sukcesis sobriĝi. Iom sensobtuzita mi eliris eksteren por spiri freŝan aeron. Ekstere mi renkontis homon, kiu havis similan intencon. Li estis eble kvindek-jaraĝa, gradiketa, kun protezo. Dezirante senigi nin de ebriiĝo ni kune promenis tra la parko. Post kelkaj minutoj ni sidiĝis kaj ekbabilis. Mi rakontis al li pri mi, pri miaj planoj kaj pri la samo mi demandis lin. Je mia granda surprizo mi eksciis, ke li iam estis polica majoro en Norilsk. Kiam li ekmemoris pri tiu ĉi urbo, mi streĉis miajn orelojn. Norilsk apartenas al la plej konataj urboj en Sovetunio. Ĝi situas en la plej norda landparto prezentanta brilan modelon de la soveta arto konstrui kaj fari loĝeblajn ankaŭ lokojn alte en la nordo. „Tio estas fantazia!“ mi ekvokis. „Multe mi pri Norilsk legis en lernolibroj. Tio estas por nia partio granda sukceso.“

„Granda sukceso de tekniko!“ li eldiris. „Vi flavbekuloj scias nur tion, kion vi ekscias el libroj. Kaj tio estas la problemo! Vi kredas tion, kion oni diras al vi kaj kion vi legas el la papero.“

„Nur ne incitiĝu!“ mi diris kvietige al li.

„Nu do rapide forgesu tion, kion vi legis! Nenio el tio estas vero! Mi tion plej bone scias. Mi tie estis polica majoro!“

„Sed,“ mi ekprotestis, „onidire ili tie evoluigis specialajn teknologiojn kaj maŝinojn por superi tieajn malfacilajn vivkondiĉojn!“

„Maŝinojn!“ li ekridis. „Ĉu vi volas ekscii, kiajn maŝinojn ili evoluigis? Tiuj viaj maŝinoj, tio estis sklavo. Dekmiloj de ili mortis ĉe konstruado de la urbo! Iliaj ostoj ĝis nun tie kuŝas! Tio estis tiu teknologio de la konstruado de Norilsk – sango kaj ostoj de la sklavo.“

Simple mi ne povis tion ekkredi. Multe mi deziris fornei liajn vortojn kiel stultajn pa-

rolaĉojn de ebrulo. Sed kiel? Li estis ekspolicano, eĉ majoro, kaj tio, kion li parolis, estis vero, ĉar li tie vivis kaj ankaŭ helpis konstrui la urbon.

„Mi vidis mortadi milojn da homoj,“ li daŭrigis. „Ili mortis pro malsato aŭ malvarmo aŭ pro ambaŭ.“

Li rakontis al mi, kiel li sanktigis sian vivon al komunismo. Kiam en la jaro 1956 ekestis revolucio en Hungario, li estis tien sendita. Li batalis kiel tanka komandisto en Budapeŝto. Li estis paŭtrafito en la kruron, kiu devis esti amputita. „Poste mi jam estis nura nulo, mi estis por nenio uzbla. Oni sendis min al Norilsk por enpeladi mizerulojn al laboro. Por tio mi ankoraŭ estis bona.“

Tiu ĉi interparolo por mi signifis ion malsanktigitan. Tiu ĉi viro, la fremda homo, atakis sistemon, kiun mi kredis, kaj liaj vortoj tute ne plaĉis al mi. Mi provis lin ne aŭskulti, sed mi ne sukcesis.

„Kaj ĉu vi scias, kion ili por tio donis al mi, knabeto mia? Ho, ili estis rilate al mi malavaraj, vere. Ili donis al mi lignan protezon kaj ĉiumonate manplaton da rubloj por vivtenado, ĝis ili ne forpelis min. Kaj ankoraŭ ion“ – al mi ŝajnis, ke li tion intence lasas ĝis la fino – „Ankoraŭ ion ili donis al mi. Ĉu vi scias kion? Manplenon da medaloj.“

Li elprenis el la poŝo diversajn honorsignojn. „Kiel vi vidas, bone mi al ili en Hunagrio servis. Kaj en Norilsk ankaŭ!“

Li por momento ektenis la medalojn sub mia nazo kaj daŭrigis: „Medaloj! Kiucele mi ilin havas? Ĉu mi eble ilin manĝu? Pagi kontraŭ ili lupagon? Rigardu min, knabeto,“ li eksilentis, kvazaŭ mi devis ekrigardi lin de kapo ĝis kalkano – tiel mi tion faris. Li pravis. Li mem diris, ke li jam estas maljuna kaj senbezona kaj ankoraŭfoje li ripetis, ke li havas protezon kaj 45 rublojn monate. Tio fakte ne respondis miajn imagojn pri la maljuneco de emerita komunista soldato. Ordenoj, tio jes, sed ne malriĉeco, maldolĉeco kaj tiel granda senespero.

Tiumomente lin ekatakis tusatado kaj la medaloj falis en koton. Li kraĉis sangon. Per naztuko li viŝis buŝon kaj surgenuje li serĉis ordenojn sub la benko. Mi ekstaris kaj foriris.

„Eĉ se tio estas vero, kion diris tiu maljunulo,“ mi pripensis, „tiel ĝi estas jam pasinteco. Kaj tiu estas malproksime malantaŭ ni.“ Mi pensis pri mia propra estonteco, tiu nun estis pli grava. Nur frenezuloj okupas sin pri problemoj de pasinteco, tiel oni instruis nin. Tutcerte, la partio havis malfacilaĵojn, ĝis kiam nia lando ankoraŭ paŝadis en infanaj ŝuetoj. Dum la unuaj tagoj de la nova reĝimo estis necese batali kaj suferi. Pri malgrandaj maljustecoj oni devis kalkuli. Cetere, en kiuj landoj ne estas maljusteco?

Kaj tamen – ĉu tiom da mortuloj dum konstruado de unu urbo? Ĉu tion oni povis akcepti nur kiel malgrandan maljustecon? Mi dialogis mem kun mi, sed poste mi decidis, ke pli volonte mi ĉion forgesos. Estis, kiel estis, mi trovis al miaj demandoj neniun ĝustan respondon. La vivo devas pluen pulsi, sen konsidero al tio, kiajn problemojn kaj rememorojn havis tiu ĉi patetika figuro serĉanta en la koto siajn medalojn.

Kiam mi preparadis min por forveturo, nur tre malfacile mi strebis forgesi tiun ĉi eventon. Atendis min vojaĝo al malproksima oriento – kaj emocia kariero en soveta mararmeo.

X.

Mia unua haltiĝo post foriro el Novosibirsko kaj post senfina vojaĝo tra larĝaj siberiaj ebenaĵoj estis magia haveno Vladivostok. En tiea marbazo mi restis du semajnojn. Poste

mi estis forkomandita por tri semajnoj al Blagovjeĵensk, rekte sur ĉinan landlimon, kie jam longan tempon regis granda streĉo, en Amur ja eĉ okazis pafado inter la sovetaĵ kaj rusaj armeoj. Kiel membro de la mararmea trupo mi troviĝis en mitralpafado. Fine mi denove estis forkomandita al Vladivostok, kie mi devis eniri ferdekon de la ŝipo flosanta al Naĥodka, pli granda soveta marhaveno, kaj de tie daŭrigi la vojaĝon al Petropavlovsko. Ĉi tie fine de la septembro 1968 komenciĝis mia du kaj duonjara studado de la armea radioteknikisto.

La marakademion estris Viktor Jelisaĵev, juna soldato, kiu tiun ĉi gravan pozicion akiris tre rapidege. Al la bazo apartenis vastega terspaco kun 1 200 junaj frekventuloj, kiuj ĉi tie studis, trejniĝis kaj sin preparis por estonta profesio. Tio estis „elito“, tre zorgeme elektita el la tuta Sovetunio, la estontaj soldatoj.

La studado en akademio esence konsistis el du fundamentaj partoj: el faka studado kaj aktiva politika agado. Ĝi dividiĝis je diversaj direktoj: navigado, radiotekniko, mekaniko kaj je pluaj direktoj. Al ĉio ni nin dediĉis tre intense, sed prefere ni koncentriĝis al niaj elektitaj studfakoj.

Ĉio en Rusio havas politikan aspekton – la komunista partio enmiksiĝas en ĉiun sferon de la vivo – do estis tute kompreneble, ke la partia aktivado estis emfaze postulata tie, kie oni edukadis estontajn soldatojn. Precize tion mi atendis.

Kelkajn tagojn post alveno vokis min komandanto Jelisaĵev en sian laborejon. Ĉeestis tie pliaj soldatoj kaj unu civilulo. Tiu estis al ni prezentita kiel partia prezidanto de Petropavlovsko. „Dakov,“ li diris kaj ĉe tio li montris miajn dokumentojn, kiujn li tenis en la mano, „ni verigis prijuĝon pri vi kiel la partia aktivulo. Ni verigis ankaŭ ceterajn kadetojn. Unu el vi fariĝos gvidanto de Komsomolo. Estas ĉi tie 1 200 studentoj, kaj ni akiris opinionon, ke vi estas por tiu funkcio la plej kompetenta. La informoj pri vi estas elstaraj. Ekde la unua lernoĵaro vi estis aktivulo, via grupo venkis en la distrikta konkurso en Novosibirsko kaj ankaŭ en Leningrado vi vin bonege konfirmis. Vi do estas gvidanto, Dakov. Vi estas nia homo!“

Tio min svenigis. Mi devis respondeci pri komunisma edukado de 1 200 estontaj soldatoj! Kaj mi estis nur dek ok-jaraĝa!

Dumvoje al la ĉambro mi interne realigis tiun ĉi dialogon: „Sergej, tio ĉi estas via vivŝanco, tia neniam plu ripetigōs. Vi vere ankoraŭ faros truan en la mondon!“

Eble tri kvinonojn de nia tempo en akademio englutis politika studado, la lastaj du restis por la teknika faka prepariĝo. Kiel soldatoj de la soveta floto ni foje ricevos grandan respondecon pri milit-ŝipoj. Kaj ĝuste tial ni devas esti politike stabilaj, absolute fidindaj. Ja por nia politika formigo estis investita multe da tempo kaj klopodo.

Je mia dispono estis ses leŭtenantoj – iu kabineto – al kiuj subiĝis grupoj konsistitaj el 50, 100 aŭ 200 knaboj. Mia devo estis ilin gvidi kaj direktigi en organizado de politikaj ekzercoj kaj ilin kontroli. Mi ricevadis instrukciojn el komsomola centralo en Moskvo kaj mi atendis, ke ili estu realigataj.

Esence mi devis atingi tion, ke ĉiu kadeto, kiu finis studadon kaj transprenis respondecon ĉe maristaro, estis absolute disciplinita kaj senkondiĉe sindona al la ideo de komunismo. Komsomolo atentis pri la politika kredo kaj la totala sindono al la partio ĉe ĉiu el 1 200 kadetoj. Se iu el ili havis malfacilaĵojn kun la lernanto aŭ eĉ kun komandanto de la akademio, tiu povis kun siaj problemoj veni al mi. Mi poste ĉe la komandanto propetis por li, se mi estis konvinkita, ke li pravus. La pli aĝaj soldatoj kompreneble protestis kontraŭ tiu

ĉi duobla aŭtoritato. Ili volis, ke iliaj decidoj validu kiel la plej altaj kaj finaj. Sed la partio donis al Komsomolo la samajn rajtojn de la kundecidado. En iuj okazoj ja eĉ Komsomolo povis voĉdonsuperi la oficirojn. La politika senriproĉeco estis pli grava ol teknikaj scioj. Kiam el konduto de iu frekventanto oni povis diveni, ke li dubas pri la celado de komunismo aŭ se li nesufiĉe fiksas sian ligon kun ĝi, estis mia devo alvoki lin kaj doni al li gravan lecionon. Fine mi lin starigis antaŭ ĝeneralan kunvenon de Komsomolo por lin antaŭ ĉiuj skandaligi. Tiaj metodoj kaj certaj specoj de ŝoko celis atingi, ke li estonte konsciiĝu, kie estas lia loko.

Ununura vorto en prijuĝo de Komsomolo kune kun mia subskribo povus signifi por juna frekventanto finon de kariero – liberlason, degradon je simpla maristo aŭ la plej sensignifa loko en la armeo. La ceteraj punoj estis ankaŭ severaj kaj estis donitaj tuj eĉ pro la plej eta delikto kontraŭ regularo. Ĉiu eta delikto signifis 15-tagan restadon en prizono kun nura pano kaj akvo. La aliuloj anstataŭ prizona restado devis 24 horojn gardi. Se ili estis trovitaj dormantaj, ili estis enkarcerigitaj.

Celo de tiu ĉi sekurigo estis eduki kadetojn, ke ili blinde kaj senpripense respektu ĉiun ordonon de sia estro.

Mi mian aŭtoritaton ne misuzadis kaj mi klopodadis al kadetoj ĉiam plej multe helpi. Mi estis respektoplena, mi komprenis la homajn malfortojn kaj mia devo kaj deziro estis, ke la studadon finu laŭeble plej multo de la kadetoj. Sed ne ĉiam tio sukcesis. La premo estis tro forta: senĉesa marŝado, la faka studado de marks-leninismo, horoj kaj horoj da penigaj brigadoj al multaj kaŭzadis malfacilaĵojn.

Dum mia unua jaro de la restado en Petropavlovsko sin mortigis tri kadetoj. Ili ne eltenis tiun maŝinerion. Mi memoras la knabon, kiu estis kulpigita pro ekdormo dum la servo. Li estis punita per dudek kvar-hora patrolado. Tio jam superis liajn fortojn. Li malaperis. Ni opiniis, ke li dizertis. Sekvan tagon ni trovis lin en subtegmentejo pendumitan.

Eksterordinare malĝoja estis la evento de unu mia kamarado, al kiu mi strebis helpi. Fine li elsaltis el la tria etaĝo kaj sin mortigis. Ni ricevis ordonon disfamigi, ke li estis ebria kaj nescianta, kion li faras. Sed mi tre bone konis lin kaj mi sciis, ke temis pri memmortigo, sed mi devis silenti, simile kiel la ceteruloj.

Iam mi sukcesis – danke al mia posteno – defendi la kadeton, malgraŭ decido de la superuloj eksigi lin el studado. En tiuj okazoj mi emfazadis, ke al la knabo ankoraŭ estu donita ŝanco kaj mi promesis, ke mi persone prizorgos, ke li pli profunde studu instruon de Lenin, kaj tiamaniere li iĝu bona komunista soldato.

„Donu al li, mi petas, ankoraŭ unufojan ŝancon,“ mi insiste apelaciis.

„Nu bone, Dakov,“ sonis plej ofte respondo. „Ni disponigas al vi por tio tri monatojn!“ En plimulto mi sukcesis.

La raporton mi devis transdoni rekte al la loka partia komitato. Tiel mi akiris kontaktojn kun gvidantaj partiaj agantoj en Moskvo, de kiuj mi ricevis instrukciojn, direktivojn por ekzercadoj, lecionojn kaj kopiojn de prelegoj por kadetoj. Mi ekkonis multajn plej superajn armeajn komunistajn funkciulojn en Kamĉatko kaj ankaŭ en la urba komitato – en la petropavlovaska partia centro. Tiuj ĉi kontaktoj ebligis al mi enrigardi internan aktivadon de la partio.

Al la agrablaj devoj apartenis organizado de distraj kaj kulturaj aranĝoj kaj akademioj kadre de tielnomata politika evoluo. Ofte ni invitis artistojn el Moskvo, kiuj estis ĉiam tre

fervorege bonvenigitaj. Ne tiel popularaj estis simplaj prelegoj. Sed mi devis al Moskvo anoncadi altan ĉeestantaron aŭ alikaze...!

Ekde septembro 1968 ĝis majo 1969 min urba komitato kelfoje komisiis prelegi en lokaj lernejoj kaj universitatoj pri komunismo kaj la monda politika agado. Mi parolis pri danĝero de imperialismo, pri enmiksiĝo de Usono en internajn aferojn de Vjetnamio, pri signifo de la armea potenco de Sovetunio, pri marksismo-leninismo kaj pri aliaj sociaj temoj. Mi klopodis kapti atenton de la aŭskultantoj. Baldaŭ mi iĝis ŝatata oratoro kaj miaj prelegoj estis elserĉataj. Krom la politika aktivado mi ankaŭ partoprenadis diversajn sportajn aranĝojn kadre de la akademio: ludbatalon, judon, karateon, kuron de longaj aŭ mallongaj kurvegoj. Mi estis senĉese okupita kaj neniam mi enuis. Tiun ĉi aktivan vivon mi ŝategis.

Iun tagon, kiam mi estis en urba komitato, frapis mian ŝultron iu partia funkciulo dirante: „Nur tiel plu, juna viro! Atendas vin granda estonteco! Ni bezonas homojn kiel estas vi. Daŭrigu vian laboron kaj vi havas antaŭ vi brilegan karieron!“

Dum revena vojo mi sentis min kvazaŭ ŝvebanta rekte en la nuboj. Tio estis mia vivo, miaj homoj. La partio estis mia „familio“. Mi apartenis al io, al kio mi kredis kaj por kio mi vivis. Mi sciis, kio estas disciplino, aŭtoritato kaj persista laboro, kaj la partio tion sciis kaj kapablis tion aprezi kaj premi. Tio estis unu el miaj plej grandaj momentoj de fiero! Mi sentis min en la perfekta harmonio kun la mondo.

XI.

Iun majan tagon iu frapis pordon de mia laborejo. „Eniru“, mi diris kaj mi levis la kapon de la laboro. Eniris nekonata viro civilvestita. Li estis grandketa, altstatura kun nigraj haroj zorgeme kombitaj malantaŭen. Neordinara stakata voĉo memorigis mitralan pafadon. Pro tiu ĉi paroldifekto estis malfacile kompreni lin. Mi devis tre atenteme aŭskulti. Li sin prezentis kiel Ivan Azarov. Tiun nomon mi jam ie aŭdis. Li estis majoro de KGB en Kamĉatko! KGB estas pinta trupo de la soveta sekreta polico, kiu havas ege pli grandan aŭtoritaton ol uniformita polico. Kiam li diris sian nomon, mire mi preskaŭ ekŝvenis. Kion do li de mi volas?

Azarov elprenis el aktujo kelkajn dokumentojn, kaj kiam li ilin dismetis sur la tablo, mi en ili ekvidis mian nomon.

„Dakov, mi sekvis viajn prijuĝojn de la tempo, kiam vi kiel ses-jaraĝa estis lokigita en la junularhejmo n-ro 1. Je via juna aĝo vi havas mirindan pasintecon, tion mi devas diri!“ – Mi levis la ŝultrojn – tio devus esti gesto de modesto.

„Vi devas scii,“ daŭrigis Azarov, „ke ni havas certajn gravajn problemojn, kiujn ni devas solvi per specialaj manieroj. Eble vi scias, ke mi laboras ĉe polico.“ Poste li rakontis al mi pri plano formi specialan trupon, kiu funkcius kiel oficiala filio de la sekreta polico en Petropavlovsko. „Tiu ĉi eksterordinara agadtrupo plenumos specifajn taskojn, pri kiuj la oficiala polico pro diversaj kaŭzoj ne povas okupiĝi,“ li eksplikis al mi. „La similaj trupoj nuntempe estas fondataj en la tuta Sovetunio. El la moskva centralo venis ordono fondi ilin ankaŭ ĉe ni.“

Por momento li eksilentis kaj poste li daŭrigis: „Ni serĉis homon, kiu povus transpreni komandadon de tiu ĉi speciala grupo.“

Do tiel ĝi estas, mi ekpensis. Mi provis al li eldiri ĉiujn motivojn por eviti tiun ĉi grandiozan proponon. Cetere, mi vere estis tre okupita. Sed Azarov plu daŭrigis: „Mi ne scias, ĉu

vi tion ankoraŭ memoras, sed mi partoprenis en la kunveno, kie vi parolis.“ Mi ne memoris tion.

„Vi havis ekzaltan paroladon; unu el la plej bonaj, kiun mi iam je adreso de junaj homoj aŭdis. La aŭskultantoj tre atenteme ĝin aŭskultis.“ Li transiris al la afero. „Tiajn gvidpersonojn ni serĉas, Dakov. La viro, kiun ni elektos, devas kapabli ĉirkaŭigi sin per homoj, organizi ilin kaj direkti ilian agadon. Tre atenteme mi trastudis viajn materialojn.“

Li per la fingroj frapis la tablon por doni al siaj vortoj pli grandan gravecon: „Ni estas konvinkitaj, ke vi estus tiu ĝusta homo por organizado kaj gvidado de la nova polica trupo.“

Jes, li simple povus ordoni al mi, ke mi tuj tiun ĉi taskon transprenu, sed mi klopodis trovi iujn argumentojn por elturniĝi el tio. Kiam mi provis ekspliki al li la kaŭzojn, li interrompis mian parolon: „Kompreneble por tiu ĉi speciala laboro vi ricevos ankaŭ specialan rekompencan el kromordinaraj fondusoj, kiuj estis tiucele en Moskvo fonditaj – 25 rublojn por unu operacio.“

Mi ne kredis al propraj oreloj. Eble mi misaŭdis tion.

„Ĉu vi ankoraŭfoje povus ripeti la lastan frazon?“ mi demandis.

Li ekridetis dirante: „Mi scias, kion vi pensas, sed vi bone aŭdis. Dudek kvin rublojn por unu operacio.“

Kiel kadeto mi ricevadis 7 rublojn monate kaj nun mi devus ricevi 25 rublojn „por unu operacio“. Post fino de studoj mi povus kiel arma maristo perlabori maksimume 70 rublojn monate. Tio signifas, ke por nuraj tri operacioj kun tiu ĉi polica teamo mi povus akiri pli da mono ol ĉe maristoj por la tuta monato! Al Azorov ne eskapis mallonga ekbrilo en miaj okuloj.

„Ĉu vi akceptas?“ li demandis.

„Kompreneble,“ mi respondis. „Sed kial vi elektis ĝuste min?“

„Pro tri kaŭzoj. Unue, vi estas studento de la arma lernejo, tial via tempo apartenas al ŝtato. Tial vi ne devas rezigni pri via laborloko. Mi parolos kun via komandanto, ke li liberlasu vin por kunlaboro kun polico. Due – mi ne povas forgesi vian prelegon pri komunismo kaj pri la politika agado en la urbo, kiun vi prezentis en la universitato. Vi ĉe tio verigis kapablojn de ĉefulo, kiuj por tiu ĉi funkcio estas necesegaj. Trie, kaj tio estas la ĉefa kaŭzo, vi havas bonajn kontaktojn por trovi la plej konvenajn homojn por tiu ĉi laboro.“ En tio li pravus. Kiel gvidanto de Komsomolo mi tenis rilatojn preskaŭ kun ĉiuj subordigitaj partiaj sekretarioj. Kaj tiuj konis ĉiujn armeajn frekventantojn de la arma bazo. Tial sufiĉis al iu el ili diri: „Disponigu al mi tri viajn plej rigorajn virojn,“ kaj mi ilin havis. Surbaze de mia aŭtoritato kaj miaj kontaktoj mi povis elekti la plej konvenajn homojn el ĉiuj 1 200 frekventantoj.

„Kiom da viroj vi opinias kolektigi?“ mi demandis Azarov.

„Almenaŭ dudek. Ne ĉiam mi ilin bezonos, sed ni volas havi tiun bazon, dudek homojn, al kiuj ni povus nin turni, se iuj el ili ne povus veni.“

Kaj mi en la menso komencis elekti kandidatojn.

„Trovu kaj elektu homojn, Dakov, post dek tagoj mi ilin volas havi kunigite. Mi volas ĉiun el ili persone ekkoni antaŭ ol mi vin transdonos al kamarado, kiu la apartajn operaciojn komandos.“

„En ordo,“ mi respondis. La majoro ekstaris kaj foriris. Nu, mi ne naskiĝis hieraŭ, ne

hieraaŭ mi venis en la mondon, mi ekpensis. Mi scias, kien li direktis. Certe ni devas nin direkti al elpelitoj, murdistoj, batemuloj kaj aliaj delikventoj, kontraŭ kiuj la oficiala polico ne kapablas agi. En la haveno estis multegaj diversaj dubaj individuoj kaj estis necese tie fari ordon. Tial mi bezonis brutalajn, netimemajn batemulojn, fortajn kaj movlertajn, kiuj ne timus enflugi interbatadon kaj tumultiĝon.

Mi estis konvinkita, ke ankaŭ mi mem por io tia estas konvena. Dum jaroj mi persisteme min hardis, mi luktis, kaj antaŭ nelonge mi iĝis ĉampiono de Kamĉatko en ĵudo. Mi do devis trovi dudek similajn knabojn. Unuavice mi pensis pri miaj amikoj – sportistoj. Pri iuj mi jam decidis dumrevene al la ĉambro. Mi interkonatiĝis kun ili dum niaj komsomolaj sportaj konkursoj: kun ĉampionoj de bokso, de ĵudo, kun elstaraj atletoj. La unua, al kiu falis mia elekto, estis Viktor Netvejev, centkilograma fortulo, alta du metrojn. Spite de sia ursa staturulo li estis mirinde moviĝema. Li havis amikecan vizaĝon, sed ŝtonan koron. Viktor estis mia fidamiko kaj komsomola funkciulo. Sub lia gvido estis 200 kadetoj el radiofako. Li apartenis al niaj plej bonaj hokeludistoj. Ni interkonfliktiĝis nur dum sportaj matĉoj. Inter amikoj aŭ kunlaborantoj estis Viktor ŝatata, sed dum luktado li estis tute mania, kvazaŭ lin ekposedus bestaj instinktoj. En tiaj momentoj li por aliuloj estis vere danĝera kaj tio ankaŭ evidentiĝis pli poste dum policaj operacioj. Viktor ne povis forgesi siajn planojn, kiujn li ne sukcesis realigi. Li volis iĝi piloto, sed li ne sukcesis ekzamenojn, kaj krom tio li perdis du jarojn. Kaj malgraŭ tio, ke li estis du jarojn pli aĝa ol mi, li havis je unu grado pli malaltan rangon. La sento de malplivaloreco lin tre incitadis. Sed en ĵudo li atingis siajn celojn, li estis eminenta fariĝinte ĉampiono en la tuta orienta Rusio.

Plua elektito estis Anatolij Litovĉenko, flirtulo de Petropavlovsko, alta, forta belkreskulo, ĉarmema kaj amikema. Pli longaj haroj, malhela barbo kaj grandaj nigraj okuloj nur plifortigadis la impreson de „pasia amanto“. Malgraŭ tio, ke li aspektis kiel karulo de virinoj, nur kelkaj proksimaj liaj amikoj kuraĝis lin tiel nomi, kaj nur ŝerce. Anatolij estis unuaranga trejnita boksisto, la tria plej sukcesa en Sovetunio. Laŭ ĝenerala opinio li povus facile iĝi la plej bona, se ne malhelpus tion komplikigita vundigo de lia ŝultro, kiu okazis dum iu matĉo. Ĝis tiu tempo li estis rigardata kiel la plej esperdona por proksimiĝantaj olimpiaj ludoj. Li simple apartenis al la speciala klaso!

La plua, pri kiu mi decidis, estis Aleksandr Guljajev, nervema knabo kun eksplodema temperamento, kio poste kostis lian vivon. Li ne estis profesia sportisto, sed li estis alta, fortstatura, perforteme inklinanta. Li reagadis impulsiĝeme, senpripense. Li devenis el Novosibirsko kiel mi kaj ni bone nin reciproke komprenis. Li verŝajne estis el miaj homoj la plej decidema. Se li ion al si firme enkapigis, ne estis eble deturni lin de tio.

Vladimir Selenov per staturulo apartenis al pli malaltaj, sed li estis eminenta boksisto kaj vera fortulo. Ŝajnis, ke la vivo de tiu ĉi nekomplikema knabo konsistas nur el amuzado. Li ne studis en la marista akademio tial, ke tio interesas lin, sed por eviti soldatservon. Plaĉis al li nek la unua nek la dua, sed fine li opiniis, ke tamen pli malgranda malbono estas maristara profesio. Kaj kiam li jam en la marista akademio estis, li diversmaniere strebis foriri. Iuj kadetoj intence tranĉvundis al si fingrojn aŭ tendenojn, provis al si infektigi tuberkulozon aŭ alian danĝeran malsanon nur por atingi foriron. Vladimir ankoraŭ nenion tian faris, sed konstante li planis, kiam li foriros – li rompos sian brakon, fortranĉos fingron aŭ li ŝajnigos koratakon aŭ simile. Sed ĉiam tio restis nur ĉe la vortoj. La ununura lia vera intereso estis bokso. Li iĝis ĉampiono de Kamĉatko en meza pezo.

La plej alta ano de nia grupo estis Jurij Berestennikov. Lia patrino estis lernejdirektoro de la ŝtatlernejo n-ro 14 en Petropavlovsko havanta inter ŝtatistoj multajn influhavajn amikojn. Jurij estis eksterordinare forta kaj antaŭ ĉio ŝatanta interbataĵojn, kaj precipe en aŭtobusoj. Tiun ĉi transportilon li ne eluzadis por vojaĝo, sed en ĝi li provokis kverelon, kiu regule finiĝis per interbatiĝo. Nij aŭtobusoj estis ĉiam plenŝtopitaj, ofte per nuraj soldatoj, kaj tial Jurij povis kalkuli pri tio, ke iu sin premstarigos apud li aŭ lin iu nevolante puŝtuŝos, kiam la buso ekveturos. Tio estis por li sufiĉa kaŭzo doni al la „kontraŭanto“ fortan baton. Iam en la interbatadon enmiksiĝis pli junaj vojaĝantoj. Kaj subite Jurij sukcesis fari vere husaran agon. Li estigis tian interbatadon, ke ĉiuj homoj civilvestitaj batalis kontraŭ uniformituloj. La ŝoforo ĉe vido de tiu ĉi interbatado direktis la busveturon kun pasaĝeroj rekte al la polica stacio. Tia estis Jurij – interbataĵoj – tio estis lia vivo. Sed malgraŭ tio li estis ŝatata. Li estis klera, saĝa, sprita kaj ĉiam li elpensadis sensencaĵojn. Neniam al la akademio sin enskribiĝis pli malinda homo ol estis Jurij. Laŭ mia opinio tion li sukcesis nur danke al postenoj de siaj gepatroj kaj bonaj kontaktoj. Kiam li dum instruado estis vokita al la tabulo, li tie staris en rektigita soldata pozo kaj kun serioza vizaĝo li respondis al la instruisto nurajn sensencaĵojn. Kiam la instruisto informis lin, ke lia respondo estis ĉio alia, ol ĝusta respondo, Jurij klinis kapon kun ŝajnigita hontiĝo kaj eligis el si komikan, tute nearmean elkrion. La tuta klaso ridegis. Foje li mankarezis kapon de pli aĝa soldato dirante: „Sur bona tegmento la herbo ne kreskas.“

Estas klare, ke Jurij estis ofte invitita „sur tapiŝon“, kie li devis ekspliki sian nedisciplinatan konduton. Sed tio ne estis por li grava. La sencon de sia vivo li vidis en tio: aŭ gajigi la homojn ĉirkaŭ si aŭ iun instigi al interbatado. Fine la superuloj, spite de influo de liaj gepatroj, decidis, ke li tute ne estas konvena por armeo, do li fariĝis maristo. Kiam li laboris sub mi en nia agadtrupo, li montriĝis kiel unu el la plej fortaj, fidindaj kaj timigaj el la homoj.

Plua membro de nia grupo estis Sergej Kanonenko. Ukrainano, unu el miaj komsomolaj asistantoj, persistema, fidinda, brutala homo sen kiu ajn sento. Li apartenis al nia luktista grupo kaj pezanta cent kilogramojn. Dum interbatado li ofte elprenis tranĉilon. Mi devis atentigi lin, ke li ĝin ne uzadu senbezone.

Estis ĉi tie ankoraŭ pluaj du, Vladimir Litovka kaj Viktor Lazarov – ambaŭ fortaj, altaj, energisuperantaj atletoj. Kune kun mi ili faros kernon de la polica grupo. La restantajn membrojn mi varbis tiel, ke mi petis leŭtenantojn, ke ili notu liston de la plej fortaj kaj rigoraj viroj, kiuj frekventis bokstrejnadon, ĵudon aŭ klasikstilan lukton. Mi certigas vin, ke en la tuta Rusio ne estas trovebla pli brutala grupo. Azarov deziris nur tiujn plej bonajn kaj la plej bonajn li ricevos. Kiam la listo jam estis surpaperigita, mi ĉiun el ili persone vizitis. Preskaŭ ĉiuj havis iujn evitpretekstojn.

„Sergej, mi estas tre okupita. Jam nun mi estas superŝarĝita.“ „Vere mi ne povas,“ kelkaj elturniĝis. Sed kiam ili ekaŭdis mension pri la mono, kiujn ili ricevos, mi ne plu devis ilin konvinkadi, ĉiuj estis miaj. „Sergej, kiam ni komencos?“ ili demandis. Dudek kvin rublojn por kelkhora laboro – al tio simple neniu kapablis rezisti. Nur Jurij konsentis eĉ sen mono, kaj pro interbatadoj.

Baldaŭ nia grupo formiĝis. Mi kunvokis ĉiujn dudek kadetojn. Neniam vi vidis tiom da altaj, rigoraj viroj kune. Unue mi permesis al mi iom da sufiĉe grandaj glutoj da brando. Mi anoncis al ili, ke la sekvan tagon ni devas nin anonci en la loka komitato de la partio al Ivan Azarov. En la destinata horo komplete ni ĉiuj vizitis lian laborejon. Kiam li eniris, li ĉiujn

ekrigardis dirinte: „En ordo, Dakov. Mi vidas, ke vi miajn vortojn prenis al la koro kaj la elekton vi ne subtaksis.“

Li verigis ĉiun persone. Estis videble, ke ĉiuj faris al li bonan impreson. Tute li inter tiuj altaj muskoluloj perdiĝis. Kun la aŭtoritato por li tipa, li instigis nin, ke ni sidiĝu kaj li komencis al ni ekspliki, kial li deziris, ke tiu ĉi grupo formiĝu.

„Mi petis Dakov, ke li vin ĉi tien alkonduku pro certaj kaŭzoj. En la tuta lando ni havas problemojn kun malamikoj de la popolo. Por sendanĝerigi ilin ni fondas specialajn operaciajn grupojn, kiuj strikte kunlaboros kun polico. Porekstere vi laboros kvazaŭ por la jena polico, sed fakte vin direktos mia sekcio. Ni estas speciala trupo, kies tasko estas senigi la socion de la eksterordinaraj malamikoj de la popolo. Via trupo estiĝis surbaze de rektaj ordonoj el Moskvo. Ne atendas vin normala laboro de polico. Ĉu iu havas demandon?“ Ĉiuj silentis, tial li daŭrigis: „Tuj post mia mallonga enkonduko vi plej baldaŭ interkonatiĝos kun la ĉefo de polico, al kiu vi estos rekte subigitaj. Sed por ĉiuj viaj agoj respondecas mi, kaj tial mi devas pri ĉio scii. Plejmulto el vi estas el la marakademio. Mi anoncos al viaj komandantoj, ke vi estas eksteraj kunlaborantoj de polico kaj vi ricevos ĉiujn bezonatajn dokumentojn, por ke vi povu kiam ajn la armean bazon forlasi. Kompreneble via unuagrada devo restas studado. Sed tuj post ĝi sekvas devoligoj rilate al polico. Ĉu iu volas ion demandi?“

Neniu ion diris. „Unue atendas vin kelkaj prepartaskoj. Baldaŭ ni denove renkontiĝos kaj vi ricevos pliajn instrukciojn. Nun mi prezentos al vi vian ĉefon kaj li donos al vi precizajn ordonojn.“

Post momento eniris la ejon simple vestita homo kaj flanken li sidiĝis. Unuavide estis evidente, ke li apartenas al armeo aŭ polico kaj civilvestita li ne sentas sin bone. La mantelon li havis butonumitan ĝis mentono – kvankam tio tute ne konvenis – kaj li vekis impreson, ke li pli bone sin sentus en frenezula kamizolo. Azarov diris: „Mi prezentas al vi kapitanon Dimitrij Nikiforov.“

Kaj Nikiforov ekstaris kaj plumpe li respondis „mi dankas“ kaj aldonis kelkajn balbutvortojn. Komence li al mi faris ne tro bonan impreson, sed mi sciis, ke la unua impresado estas ofte erara.

Nikiforov estis dikmalalta, rufhara kaj kun malvarmaj, ŝtalaj okuloj. Malgraŭ tio, ke li ne estis alta, li havis grandan, ruĝan nazon, nenature grandan buŝon, fortajn ostojn. Sed neniam muskolaron. La malhelaj, ŝvelantaj cirkloj sub la okuloj donis al lia vizaĝo lacigan aspekton. Li ne aspektis tiel, ke li el si farus frenezulon, kaj certe estis danĝere lin subtaksadi.

Nikiforov havis bonajn kontaktojn en policaj rondoj ekde la jaro 1947. Post ses jaroj li estis rangaltigita je ĉefo de la polico en Petropavlovsko. La antaŭa ĉefo ebriiĝinta pafvundis el fenestro de policstacio kelkajn piedirantojn, antaŭ ol oni lin sukcesis sendanĝerigi.

Baldaŭ mi eksciis, ke Nikiforov estis ne pli bona ol lia antaŭulo. Ofte li malzorgis proprajn devojn, nur por ke li povu ĉeesti raziojn. Neniam li edziĝis. Li vivis en la loĝejo kun iu prostituitino, en kiu estis nenio krom necesa ekipaĵo – kiel fridujo, litoj, seĝoj kaj tablo. Lia vivo tute apartenis al polico kaj ŝtato. La vorto hejmo por li havis neniun valoron. Pli poste ni lin kromnomis „glacia Niki“. Nikiforov venis al Kamĉatko kiel juna viro kunlaboranta kun komunistaj funkciuloj en Kamĉatko. Kiam mi poste lin observis, mi pensis: estas timeginda ekpenaĵo, ke li kontraŭ mi agas!

Post seneleganta enkonduko Nikiforov daŭrigis malrapide emfazante ĉe tio ĉiun vorton: „Vi formas specifan polican trupon. Vi estos subordigitaj rekte al mia komandado respektante miajn ordonojn. Kune kun kamarado Azarov ni respondecas pri via ekzercado kaj por ĉiuj operacioj. En nia lando ekkreskas problemoj kun malamiko de la ŝtato. Ili aktivadas tute sekrete kaj subfosas aŭtoritaton de la ŝtato. Nia tasko estas ĉiujn malkaŝi kaj sendanĝerigi. Komence vi ricevos kelkajn pli malfacilajn enkondukajn taskojn. Poste mi kun la kamarado Azarov donos pluajn instrukciojn. Vi devas esti preparitaj tuj vin anoncadi al mi! Vi ricevos kaj taskojn, por kiuj polico ne havas tempon, kaj la taskojn, kiuj ekstere ne povas aspekti kiel oficiala polica agado. Tial vi ĉiam restos civilvestitaj kaj antaŭ ceteraj homoj vi estos kvazaŭ simplaj civitanoj, kiuj proprakonvinkite agadas kontraŭ krimuloj. Ĉu tio estas al vi klara?“ Ni kapjesis kiel signon de la kompreno. Nikiforov daŭrigis: „Nun mi volas vidal-vide paroli kun via ĉefulo. Vi povas foriri – ĉiuj krom Dakov: iru ĉi tien, kamarado!“

Kiam ĉiuj foriris, diris Nikiforov, ke la laboron ni komencos tuj kaj ke ni ĉiuj nin anoncu post tri tagoj ĉe polico.

Kaj tie ni eksciis, ke dum la unuaj semajnoj ni ricevos pli facilajn taskojn por akiri spertojn, kaj tial je dispono de polico ni estos tri horojn tage. Baldaŭ ni helpis ĉe arestadoj. Estis nenio escepta, ke dum la semajno okazis du aŭ tri murdoj. Ofte ekestis batalo inter ebriaj maristoj aŭ estis necese likvidi aliajn centrojn de ribeloj. Nia tasko estis renovigi pacon kaj ordon.

Iufoje estis sendita mi, Viktor, Vladimir kaj kelkaj ceteraj, por ke ni en noktoklubejo proksime de marbordo finigu kverelon. Dum tiuj operacioj ni uzadis polican aŭtomobilon kapablan transporti preskaŭ dudek homojn. Nikiforov tiuvespere diris al ni: „Faru nian zorgon pri tio, kiu pravas kaj kiu ne pravas. Likvidu la aferon senrigarde al cirkonstancoj kaj kiamaniere vi tion faros, estas tute egale.“

Al boksistoj kaj luktistoj la alvoko donis similan efikon, kvazaŭ al tigroj sub nazon oni metus freŝan viandon. Viktor tuj likvidis kune kvar kverelantojn, kiuj ne plu moviĝis. Mi ĵus batalis meze de la furiozanta grupo, kiam min subite atakis du viroj. Ili estis pli altaj ol mi, sed malgraŭ tio mi rapide senigis min de ili. Unu de ili mi faligis per precize direktita karatea bato je nuko kaj la duan per ĵuda preno. Verdire – elstara sporto!

Por renovigo de la ordo sufiĉis al ni ĉiam ĉirkaŭ 20 minutoj. La nokta klubejo post tio aspektis kvazaŭ tie transpeliĝus tornado. Mi rigardis ĉirkaŭ min. Viktor, Anatolij kaj pluaj tri kontente ridaĉis. Kaj Juriĵ! Li estis en la sepa ĉielo! Li eĉ ne devis la kverelon estigi. Estis tio grandega amuzo. Kie alie ni povus tiel ĝissate manbatali kaj ankoraŭ por tio monon ricevi?

La interbatado finiĝis. La plejparto de la „kontraŭloj“ kuŝis surplanke. La ebriiĝintaj maristoj estis neniu problemo por nia batalgrupo. Neniun ni arestis, ĉar nuntempe ni ricevis ordonon nur likvidi la kverelon. Nian taskon ni plenumis kaj tial mi ordonis: „Knaboj, ni iru!“ Ni enpuŝiĝis en la polican aŭtomobilon kaj post momento ni jam donis al Nikiforov raporton pri la sukcesa interveno.

„En la ordo,“ li diris. „Vi faras tion bonege.“

La tempo pasis. Trifoje aŭ kvarfoje semajne ni estis alvokitaj por aŭ likvidi eksceson aŭ por helpi al polico serĉi certajn personojn. Iam ni nur sidis en la centrejo atendante ordonon al operacio, trinkante, fumante kaj interbabilante. Kiam eksonoris telefono kaj iu anoncis, ke tie aŭ tie ekestis interbatalado aŭ iu estis murdita, Nikiforov nur diris: „Vi povas veturi.“

Senpacience ni rapidis eksteren, ensaltis la policaŭtomobilon, kiun kutime stiris Viktor, kaj kun funkcia sireno ni hastis al la loko de la ago.

Post ĉiu operacio ĉiu el ni ricevis 25 rublojn. Antaŭ ol ni revenis bazon, ni vizitis koktelejon, kie ni bone manĝis, trinkis, dancis kaj amuziĝis. Tio estis grandioza! Kiam ajn ni povis forlasi la akademion, malgraŭ tio, ke la ceteraj kadetoj tion havis severe malpermesitan kaj post plenumo de tasko ni povis resti ekstere tiel longe, kiel ni volis.

Dum plenumo de tiu ĉi laboro ni intervenis kontraŭ la plej grandaj krimuloj. Ni males-timis ilin, kvazaŭ ili ne estus homoj. Kiam ni jam havis eblon bategi murdiston, do kial lin ne bategi ĝissate? Nikiforov ridis pri tio kaj bondeziris al nia titolo „modelistoj de vizaĝoj“. Se ni eventuale ne agis sufiĉe harde, li deklaris, ke ni estas „fajnuloj“ kaj li priridis nin. Ni ekkomprenis. Ho ve al tiu, kiu baros nian vojon!

XII.

Iun tagon telefonis al mi Nikiforov: „Alvenu morgaŭ posttageze je la kvara al mi ankaŭ kun viaj homoj. Azarov ankaŭ venos. Ni volas kun vi paroli.“

En la destinita horo ni ĉiuj estis en la policejo. Kiel la unua ekparolis Azarov. „Knaboj, mi aŭdis, ke vi bonege vin enkondukis en la laboron. Sed nun ekestis momento, ke ni aliru al la kerno mem de via estonta laboro, al tio la plej grava.“ Enmense mi cerbumis, kien li celas. Nian laboron ni jam faris kelkajn semajnojn. Kio nova nin ankoraŭ atendas?

„Mi volis,“ daŭrigis Azarov, „ke vi akiru iom da spertoj, antaŭ ol vi ricevos vere gravajn taskojn. En Sovetunio disvastiĝis diversaj formoj de kriminaleco. Ĝis nun ni agis kontraŭ murdistoj, ebruloj, prostituitinoj. Sed tiuj tute ne estas tiuj plej danĝeraj malamikoj de nia ŝtato. Ekzistas multe pli embuskemaj kriminalaj elementoj, kiuj senpere minacas sekuron de nia lando kaj ankaŭ nian sintenon al la vivo. Ili estas tre danĝeraj, ĉar ili laboras en plena anonimeco meze de ni ĉiuj subfosante pilierojn de la sistemo. La homoj, pri kiuj mi nun parolas, ekstere aspektas kiel tute senkulpaj kaj diskretaj. Sed ne lasu vin erarigi. Ili sen-ĉese dissemas siajn venenajn ideojn, venenigas niajn junulojn per falsa instruo kaj atakas ideojn de marks-leninismo. La homoj, pri kiuj mi parolas, estas kredantoj.“

Komence mi tute ne komprenis, pri kio li parolas. Li ankoraŭfoje ripetis: „Ili estas kredantoj.“ Mi volis tute certigi min, ke ni ĉiuj komprenis.

„Kredantoj,“ li daŭrigis, „organizas programon, kiu estontece minacas grandan progreson de la soveta popolo. Ili aktive subtenas malamikojn de nia lando. Ili sintenas kaj kunlaboras kun imperialistoj provante limigi kaj neniigi ĉiujn akirojn de komunismo.“

Nun li estis en sia elemento, li estis kvazaŭ obsedita per la malamo kaj malestimo.

„Ili estas danĝeraj ĝuste tial, ĉar ili tute tiel ne aspektas. Murdistoj kaj diable saĝaj. Pli frue ol ni tion konsciiĝus, ili subfosus kaj pereigus ĉion, kion ni ĉi tie malmole akiris, ili konfuzigas homojn kaj mallonge – ili kaŭzas nekredablajn damaĝojn. Tial mi formigis vian polic-trupon, por ke ni rigore intervenu kontraŭ tiuj ĉi malamikoj. Nun vi akiris spertojn kaj alvenis momento de via konkreta laboro. Via trupo estas nur unu el multaj, kiuj aktivas en nia tuta lando. Estas necese likvidi malamikojn de nia ŝtato! Kaj tio estos via tasko! Ordonojn vi ricevos rekte de la partia gvidantaro kaj de la kamarado Breĵnev. Vi estos salajritaj el specialaj fondusoj, kiuj estis fonditaj tial, por ke en Sovetunio estu definitive likvidita religio. Nikiforov daŭre restos via rekta superulo.“

Surprizite mi aŭskultis. De tiu tempo, kiam mi vidis en Insk ĉe Novosibirsko preskaŭ

2000 kredantojn, ofte mi pri tio cerbumis. Kompreneble mi sciis, ke neniu Dio ekzistas, ke la religio estas opio de la homaro kaj ke ĝi ne havas lokon en la moderna vivo de Sovetunio. Tion ĉion mi bone sciis. Sed surprizis min la fakto, ke la religio kaj la kredantoj kaŭzas tian danĝeron por nia lando, ke estis necese kontraŭ ili en la ĝusta senco de la vorto batali. Sed post ĉio, kion mi aŭdis, mi konvinkigis, ke tute ĝusta estos ilia totala likvido el nia socio.

„Rigardu ĉi tien,“ diris Azarov montrante kelkajn mur-afiŝojn kun surskribo: Serĉataj personoj. Krom kelkaj fotografajoj de murdistoj estis tie ankaŭ la fotografajo de iu viro, kiun serĉis polico. La kaŭzo? La agado damaĝanta al la popolo.

„Tiu viro,“ daŭrigis Azarov, „infektigis junulojn per religia eduko kaj kredo. Sekrete li al ili rakontis Bibliion. Kiam ni kaptos lin, li ricevos sep karcerajn jarojn!“

Min ĝojigis mono, kiun mi perlaboris, sed duaflanke – la persekutado de murdistoj, ŝtelistoj kaj pluaj kriminalaj elementoj min ne kontentigis kaj tio ne akordiĝis kun miaj interesoj de la komunista aktivulo. Sed nun? Nun mi havos ion por fari kun veraj malamikoj de la ŝtato, nun temas pri io tute alia, pri io pli alta, pli grava, pri la problemo, pri kiu mi okupiĝis dum miaj prelegoj.

Nun mi povis vere ION efektiviĝi kaj ankoraŭ por tio ricevi monon. „La amanto de virinoj“ Anatolij demandis: „Kamarado Azarov, vi diris, ke tiuj ĉi homoj estas pli malbonaj ol murdistoj. Ĝis kia grado?“

„La kamarado Litovĉenko,“ respondis Azarov, „la murdistoj murdas kelkajn homojn kaj post tio ni ilin kaptas. Sed tiuj ĉi kredantoj mortigas spiriton kaj animojn de la sovetaĵoj homoj kaj inter centmilojn ili disvastigas sian venenigan kredon. Dum lastaj du jaroj atingis problemoj kun kredantoj grandajn dimensiojn. Anstataŭ tio, ke ili formortu aŭ ili rezignu pri la kontraŭŝtata batalo, ili plu silente agadas sukcesinte multajn homojn trompi kaj siaflanken varbi. La partio finfine jam devas interveni. Ĉie, kie ili povas, ili venenigas spiriton de nia junularo. La ĉefa oficejo en Moskvo eldonis eksterordinaran ordonon forigi la kredantojn. Kaj tio estas via tasko. Ĉiuj organizaĵoj, kiuj batalas kontraŭ religio, estas subigitaj al la centra komitato de la partio, kiu fondis kunordigan grupon por direktado de la batalo kontraŭ kredantoj kaj iliaj superstiĉoj.

Niaj plej bonaj cerboj kaj plej inteligentaj profesoroj studas teorion flankon de tiu ĉi problemo. Samtempe fondiĝis laborgrupo, kiu helpe de komputilo kolektas informojn pri kredantoj, tial ni ilin povas facile identigi kaj kontroli. Parto de via laboro konsistos el tio, ke vi kompilos raportojn, denuncanocos nomojn kaj ĉiujn ceterajn detalaĵojn pri la kredantoj. Ĉion ni sendos al Moskvo, kie oni tiujn informojn enkomputiligos. Tiamaniere ni poste povos al tiuj firuzaj kaj danĝeraj kontraŭuloj dum nelonga tempo malebligi ilian aktivadon.

Plua fako en Moskvo okupiĝas pri instruo de la kredantoj, speciale instruitaj homoj ĝin kapablos refuti kaj venkobati eĉ sur spirita nivelo. La plej bonaj kaj plej kapablaj scienculoj studas ilian literaturon, kaj precipe Bibliion. Pri tiu ĉi fako mi povas diri, ke temas pri vera biblia lernejo.“

Ni estis tute fascinitaj. Ĝis tiu ĉi momento mi tute ne sciis, kiel granda danĝero minacas nin el flanko de la kredantoj. Nun ni pri tio eksciis. Kaj ni sciiĝis eĉ pri dinamika agad-programo, kiu estis evoluigita speciale por defendo de nia patrujo. Tiu ĉi fakto atestas pri la granda potenco de la komunista partio. Malantaŭ ĉio tio staras kamaradoj, kiuj scias, kion ili volas. Estas ili, kiuj kondukas la partion antaŭen. Ili ne sidas komforteme kaj malageme

en foteloj kaj ne atendas, ĝis la malamikoj renversos la landon deinterne.

Plenaj de admiro ni aŭskultis, kiaj operacioj estis organizitaj por renovigo de la ordo. Kaj kiam ni imagis al ni, ke ankaŭ ni partoprenos en tiu ĉi grandioza plano, plenigis min ondo de fiero pri la komunista partio. Finfine ni ekbatos! Niaj malamikoj tion troigis. Ni, la soveta popolo, montros tion al ili! La partio posedas grandan paciencon, sed kiam tio progresas tro malproksimen, ĝi scias, kiel interveni. Azarov al ni ankaŭ malsekretigis, ke ekzistas ankoraŭ alia laborgrupo, kiu fokusiĝas je „fermo“ de landlimo, por tute malebligi importon de Biblioj kaj de la religia literaturo el eksterlando. Neniām en la vivo mi pri io tia aŭdis. Azarov daŭrigis: „Knaboj, vi rajtas forpreni kiun ajn religian literaturon, kiun vi trovos. Ni ĝin verigos kaj sendos ĝin al Moskvo. De tie komencos demandesplorado, el kiu lando ĝi estis ĉi tien kontrabandita, kiamaniere kaj kiu tion faris. Kiam ni tion eksciis, tuj ni malebligis pluan importadon.“

„Dehaku kapon“, diris Azarov, „kaj korpo mortos. Ni ĉiukoste devas trovi gvidantojn, ĉefulojn de la sekretaj organizaĵoj de la kredantoj. Poste al tiuj ceteruloj, la trompitaj kredantoj, ni malfermos okulojn. Ili reprudentiĝos kaj revenos sur la ĝustan vojon.“

Kiam li finis, ni eksciis tion: ĉiuj kredantoj estas mizeraj intriguĵoj, embuskemaj malamikoj, kiuj sekrete renkontiĝas en loĝejoj, preparas faligon de la registaro kaj venenigas junularon. Alparolo de Azarov en ni elvokis tian indignon, ke ni estis tuj preparitaj kontraŭ la kredantoj interveni. Similajn prelegojn ni aŭskultis dum tutaj sekvaj du semajnoj. Ni interkonatiĝadis kun metodoj kaj praktikadoj de la kredantoj. Foje mi demandis, kial ili ne estas nomataj „kristanoj“ sed „kredantoj“.

Azarov respondis: „Tio estas bona demando. Ĉu ne instruis nin jam kamarado Lenin, ke ni ne timu religion, sed la kredon? Tiu estas nia plej granda malamiko. La religion ni povas pereigi, la preĝejojn fermi. Nur rigardu tra Kamĉatko! Kion vi vidas? Ĉu preĝejojn? La preĝejo mem prezentas neniun danĝeron, same kiel la religio. La vera danĝero por ni estas la kredantoj mem.“

Por momento li paŭzis por vidi, ĉu liaj vortoj kaŭzis bonan efikon je la aŭskultantaro. Evidente kontenta li daŭrigis: „Jam kamarado Lenin diradis, ke la preĝejojn oni ĉiam povas fermi kaj la pastrojn malliberigi. Sed estas tre, tre malfacile eltiri kredon el la homa koro. Tial, kamarado Dakov, ni ilin nomas kredantoj. Ili kredas – kaj neniigi tiun kredon en iliaj koroj estas tre, tre malfacile.“

Nun jam ĉio al mi estis klara. Ja eĉ la junularhejmon en Bariŝevo oni estigis en la estinta preĝejo. Vere, ne estas malfacile fermi preĝejojn. Mi ekkomprenis. Ni ne povas permesi, ke la kredo enradikiĝu en la koroj de niaj homoj, kaj tute ne en la koroj de la junularo kaj la junuloj.

„Ni dankas, kamarado Azarov,“ mi diris. „Estis tio por ni treege instruaj horoj. Ni tute ne antaŭsentis, kiel grandega danĝero kaŝiĝas en tiuj unuavide senkulpaĵoj.“

Post kelkaj tagoj – ĵus mi okupiĝis pri la faka studado – voĉo ekaŭdiĝis el laŭtparolilo: „Dakov, Dakov, tuj vi anoncu vin en la kontrolo oficejo!“ La instruisto per manmovado al mi permesis foriri, mi prenis la lernolibrojn kaj foriris.

La soldato, kiu plenumadis servon, diris al mi: „Mi havas por vi ĉi tie telefonan sciigon de kapitano Nikiforov. Vi devas hodiaŭ vespere je la 22-a horo kun viaj homoj veni al la policejo. Onidire vi jam sciis kial.“

„Jes, dankon,“ mi respondis.

Je la destinita horo mi staris kune kun dek kvar kolegoj en la policejo.

„Sendu viajn homojn malantaŭen, ke ili ĝuu komforton,“ ordonis Nikiforov. „Ankoraŭ estas tro frue.“ La ceteruloj do foriris al malgranda socia ĉambro kaj mi restis staranta apud la skribotablo. „Mi eksciis,“ li komencis, „ke hodiaŭ ĉirkaŭ la dek-unua vespere en la certa loĝejo renkontiĝos kelkaj kredantoj.“

„Kie?“ mi demandis.

Sur la grandega mapo li montris al mi domon en la 75-a teritorio sur la dua flanko de la urbo. „Ili estos dek du, maksimume dek kvin. Tio por vi devus esti nenia problemo.“

„De kie vi ĉion scias?“ mi demandis mirigite. „La renkontiĝo ja ankoraŭ ne komenciĝis kaj la najbaroj ne povis anonci ion suspektan.“

Sur lia vizaĝo aperis memŝatema ekrideto. „Eta birdeto tion pepis en mian oreton, Dakov. Kaj prefere vi ne tro demandu.“

Mi volis kun li amikeme interparoli, sed tuj mi eksentis, kiel li kapablas esti rezervema. Mi decidis estonte kondukti pli deteniĝeme. Ja ĝuste kun li mi volis bone kunlabori. La ceteruloj dume sidis en la sociejo. „Nur trinku, kamaradoj, ĝuu komforton!“ instigis ilin Nikiforov kaj dume li montris al la botelo da vodko surtable. Li ne devis nin dufoje instigi. Post nelonge ni ĉiuj troviĝis en superigita humoro. Kiam Nikiforov vidis, ke la vodko nin bone malstreĉis, li diris: „Je la dek-unua vi devas ekveturi. Al la kredantoj ni lasos proksimume duonhoran tempon por komenci. Ili estos konvinkitaj, ke ĉio estas en ordo. Mi volas, ke vi arestu antaŭ ĉio iliajn du gvidantojn, sekretajn klerikulojn. Ĉi tie estas nomoj de du homoj, kiujn vi alkondukos.“

Li metis en mian manon slipeton. „Ordonu“, mi respondis. „Kion ni faru al la ceteraj?“

„Ĉu al la ceteraj? Angorigu ilin iom. Preparu al ili »malgrandan karan memoraĵon«, kiun ili rememoros. Sed sendiskute vi alkonduku al mi tiujn du,“ li rigore diris.

„Ordonu,“ mi respondis. Enmense mi miris, kial li donas al ni ĉiujn ĉi tiujn instrukciojn. Ĉu nun temas pri io alia? Kiam li nin sendis en iun drinkejon likvidi interbatadon, estis „Niki“ malfermita, kaj rekte li parolis. Sed hodiaŭ vespere mi vidis, ke li estas nervozema. Enmense mi demandis kial.

„Atentu, ke surstrate vin neniu vidu,“ li daŭrigis. „Sed cetero neniu malfacilaĵoj devus ekesti, ĉar jam estas la 23-a horo. Sed se tamen estos surstrate homoj, atendu ĝis ilia foriro.“

En unu el siaj alparoloj Azarov emfazis, ke ĉiuj operacioj kontraŭ la kredantoj devas okazi en la plej granda sekreteco. La loĝantaro neniapreze povas pri tio ekscii. Tio tre surprizis min kaj plenigis per scivolemo. Kiam ni faris ordon inter homoj, kiuj kriegis, ni simple enmiksiĝis inter ilin kaj post momento la problemo estis finita. Tial mi demandis Azarov pri la kaŭzo.

„Nu, iuj povus malbone tion al si ekspliki, kion ni faras kaj kial ni tion faras. Plimulto de homoj do ne vidas danĝeron, kiun prezentas kredantoj por nia socio. Krom tio ĉie oni povas trovi malamikojn de nia lando, agentojn de imperialismo, kiuj kun granda ĝojo publikigus raportojn, ke ni persekutas kredantojn. Tial estas tute necese, ke ĉio okazu sen iuj ajn atestantoj. Precipe pri unu afero bone atentu – ke vin ĉe la interveno neniu fotu. Ni ne povas allasi, ke la malamikoj distrumpetu en la mondon, ke ni persekutas kredantojn nerespektante la religian liberecon.“ Lia ekspliko sufiĉis al ni. Ni certigis Nikiforov, ke ni atentos, se la strato ne estos senhoma. „Bone, Dakov, iru al la ceteruloj. Kiam okazos bezono, mi

vokos vin.“

Mi englutis ankoraŭ kelkajn pokaletojn da vodko. Ĉiuj jam estis iom ebriiĝintaj. La suspenso malaperis kaj Vladimir ĵus rakontis iun anekdoton. Post nelonge alvenis Nikiforov: „Dakov, estas la 23-a horo, vi povas ekiri!“ Li sin ekskuzis. Ĉe la pordo Nikiforov donis al mi ankoraŭ lastajn instrukciojn: „Dakov, mi volas, ke vi tie faru detalan doman traserĉon serĉante precipe Bibliojn kaj alian literaturon. Ni scias, ke tiuj homoj proprumas la kontraŭsovetan literaturon. Ni bezonas ĝin akiri, por ke ĝin povu la urba komitato sendi al Moskvo. Kontrolu zorgeme la tutan domon kaj alportu ĉion, kion vi trovos.“

Mi kapjesis. Ni eliris korton, kie jam atendis nia aŭtomobilo. Viktor sidiĝis malantaŭ la stirilon, mi apud li kaj la ceteraj okupis lokojn en la malantaŭa parto de la aŭtomobilo. Tiuvespere ni sirenon ne uzis. Estus tio senbezona, ĉar en la urbostratoj ne plu estis trafiko. Krom tio ni ne volis antaŭtempe pri ni atentigi.

Lumigita estis nur la urbocentro, la apudaj stratoj estis senlumaj. Kaj ĝuste en unu el tiaj stratoj staris domo, en kiu la kredantoj devis kolektiĝi. Kiam ni trovis ĝin, Viktor malakcelis, por ke ni bone distingu domnumerojn. Momenton mi rigardis en la straton, ĉu mi eble vidos iun malfruiĝintan ebrulon, sed la strato estis kvazaŭ elbalaita. Viktor rigardis maldekstren, mi dekstren kaj kune ni observis domnumerojn. Fine mi diris: Tio devas esti la sekva domo. Haltu!“

Ni elaŭtiĝis. Mi atentigis ĉiujn, ke ili ne kaŭzu bruon. Ni devis vekigi neniun atenton. Mi iris antaŭe, la ceteraj malantaŭ mi. Estis tio malgranda ligna domo kiel multaj aliaj en Petropavlovsko, preskaŭ tute kaŝita sub alta barilo. La kuntiritajn kurtenojn trapenetris lumeto. Kion nun? Ekposedis min necerteco. Tio estis io tute alia ol likvidi interbatadon en drinkejo. Ĉi tie neniu ian eksceson faris. Ĉi tie anstataŭ kriado, blekegado kaj malbenado kolektiĝis nur kelkaj homoj. Kion fari unue? Nu, eble estos mi, kiu devos fari la unuan paŝon. Mi aliris la pordon kaj frapis, poste ankoraŭfoje kaj pli forte.

Kun multaj embarasoj ni atendis, ĝis malfermiĝos la pordo. Ni sentis nin ridinde. Tio estis rigardo! Dek kvar altaj fortkorpaj knaboj staris sinsekve sur la mallarĝa trotuareto direktanta al la dompordo, meze de nokto, en forlasita ĉirkaŭaĵo kaj la unua ĝentile frapas la pordon!

Post momento ni ekaŭdis paŝojn kaj iu malfermis la pordon. Staris antaŭ ni mezstatura viro kaj ĝentile li demandis: „Kion vi deziras?“

Li pli atenteme rigardis kaj malantaŭ mia dorso li ekvidis ceterulojn. Li ekkomprenis. Sur lia vizaĝo aperis zorgema mieno. Sed li konservis trankvilon. „Iru internen,“ li diris. En la domo estis nur unu pli bone okupita ĉambro. En unu angulo estis provizora kuirejeto. Sur la seĝoj kaj litoj sidis 12 aŭ 13 homoj. Ili mallaŭte kantis iun ĥoralon. Ili ne ĉesis kantadon, eĉ ne kiam ni interparolis kun ilia gvidanto.

La viro, kiu al ni malfermis, mallaŭte demandis: „Ĉu vi estas el polico?“ Li tion sciis. Ja de kie alie ni venus? Mi ankaŭ aŭtomate flustre respondis al li: „Jes, ni estas el polico.“ Kia stultaĵo! – mi ekpensis. Ni estis ĉi tien senditaj por finiĝi kolektiĝon de la kredantoj, kaj mi ĉi tie staras kaj flustras por ne ĝeni ilian kantadon!

La kredantoj dume divenis, ke ilia renkontiĝo por hodiaŭ finiĝis, kaj por nia granda surprizo ili plu kantis. Ni daŭrigis interparolon. Kiam ili finis kantadon, ili rigardis nin.

Preskaŭ en defensivo – mi sentis grandan embarason – mi provis validigi mian aŭtoritaton: „Kion tio signifas?“

La viro, kiu malfermis la pordon, respondis: „Ni havas ĉi tie diservon.“

„Sed ja Dio ne ekzistas,“ mi diris.

„Sed ni kredas je Dio kaj ni liahonore kolektiĝis ĉi tie,“ respondis la viro, certe sekreta pastoro.

„Sed tio estas malpermesita!“ mi diris decideme.

„Kial?“

„Ĉar tio estas kontraŭleĝa. Ni ricevis ordonon malebligigi al vi tion!“ La viro denove ĝentile diris: „Sed ni ja nenion kontraŭleĝan faras. Kamarado Lenin mem diris, ke la civitanoj de nia lando havas rajton honori Dion.“

Vere mi ne sciis, kion je tio al li respondi. Kiam li eksentis mian necertecon, li daŭrigis: „La kamarado Lenin diris, ke ĉiu civitano de ĉi tiu lando havas plenrajton por sia religia libereco, por kredo aŭ ne kredo – laŭ tio, kion li opinias esti ĝusta.“

„Ĉu tio estas vero?“ mi demandis.

„Kompreneble. Se vi volas, mi precize montros al vi, sur kiu loko li tion diris.“ Tiel ni nenien progresos! Mi estis tute konfuzita kaj miaj kunuloj embarasitaj. Mi vidis, ke kontraŭ iliaj argumentoj ni estas malfortaj. Poste pastoro komencis citi konstitucion de Sovetunio, ke „ĉiu havas rajton je la religia libereco“. „Ni eluzas nur nian rajton, kamarado,“ li diris, „kiun al ni aljuĝis fondinto de nia ŝtato kaj konstitucio. Ĉu ni kaŭzas al iu ion malbonan, iun maljustaĵon? Rigardu ĉirkaŭ vin. Ni kredas je Dio kaj ni kolektiĝis lianome. Tio estas ĉio. Estas tio nia rajto kaj neniun ni ĝenas. Kion ni faris?“ Mi estis en kaptilo. Mi sciis, ke nia konstitucio vere garantias la religian liberecon kaj krom tio mi ekmemoris, ke Lenin vere ie parolis pri la libereco de la religio. Mi ekmemoris, kiel mi en Leningrado vidis grandan amason da homoj iri en la preĝejon kaj kiel mi tiam pripensis tion, ke nia lando vere respektas la religian liberecon.

Mi ekprotestis kadukpruve: „Sed vi tamen malrespektas leĝojn. Ĉu vi ne komprenas tion?“

„Ekspliku al mi, mi petas, kiel,“ respondis la pastoro.

„Mi scias nur tion, ke la leĝojn vi malrespektas, kaj mi havas ĉi tie nomojn de du homoj, kiujn mi bedaŭrinde devas peti, ke ili iru kun ni.“

La kredantoj ekrigardis unu la alian. La viro kun kiu mi parolis, estis unu el ili. Dum ili surmetadis mantelojn, svarmis en mia kapo diversaj pensaĵoj. Kiam estis arestitoj preparitaj por foriro, ili ĉiujn manpremis dirante: „Preĝu por ni.“ Poste ili iris kun ni al la pordo. Dum nia eliro, la ceteraj komencis preĝi.

Granda embaraso ne forlasis min eĉ en la polica aŭtomobilo. Plej volonte mi enĵetus min en la plej grandan interbatadon kun dek du buĉantoj ol ankoraŭfoje travivi ion similan! Tio ĉi fakte estis nenia amuzo.

Ni parkigis aŭtomobilon malantaŭ policeja konstruaĵo. Nikiforov jam nin en la pordo atendis kun larĝa ekrido. Sed kiam li nin kun la arestitoj ekvidis, li tuj serioziĝis. Ekposedis lin furiozo. „Forkonduku la arestitojn kaj ŝlosu ilin!“ li parolatakis iun el subordigituloj. „Kiaj idiotoj vi estas!“ li hundblekis. „Dek kvar knaboj revenis el razio kaj kion mi vidas? Nenion, krom du malgrandaj pli aĝaj viroj, kiuj dum aresto tute ne defendis sin!“

Kaj tuj li pritaksis situacion: „Nu, miaj malgrandaj infanetoj,“ li sarkasme diris, „mi havas impreson, kvazaŭ vi revenus el agrabla pikniko!“

La sarkasmo subite malaperis: „Kion vi opinias,“ li ekkriis, „kiucele mi vin tien sen-

dis?‘

Li furiozis kaj tiutage ni ricevis tian lecionon, kiun ni devis longe ne forgesi.

„Sed kamarado Nikiforov,“ mi protestis, „tiuj ĉi homoj kaŭzis al ni tute nenian reziston. Tion oni tute ne povas kompari al niaj ĝisnunaj operacioj. Ili estas tute aliaj homoj. Kaj tial estas necese uzi aliajn metodojn!“

„Ĉu aliajn metodojn!“ li kriegis. „Ĉu aliaj homoj! Tuj mi diros al vi, kiaj homoj ili estas! Ili estas simplaj embuskaj perfiduloj! Mi sendis vin por ilin aresti kaj protekti nian landon kontraŭ ili kaj ili preskaŭ vin konvertis je ilia kredol!“

„Jam la fakto mem, ke vi opiniis ilin nedamaĝaj kaj argumentantaj sian rajton, atestas pri tio, kiel ili estas embuskaj kaj sagacaj,“ li diris. „Ĉu vi ne estas kapablaj tion kompreni?“ Elĉerpita pro furioza eksplodo li enfalis fotelon.

Post momento kvazaŭ al li revenus fortoj. Li elsaltis daŭrigante: „Ĉu iu sukcesos enpuŝi en tiujn viajn stultajn cerbojn, ke ili estas niaj plej grandaj malamikoj, la plej gravaj krimuloj? Ili estas kvazaŭ serpentoj. Ili sin tenas en kaŝejoj, ĝis ili ekatakos, sed poste jam plej ofte estas malfrue! Estas por mi pli agrablaj cent liberaj murdistoj, ol dekduo da tiuj ĉi stultigantoj de homoj! La murdistojn ni povas kiam ajn aresti, sed pri tiuj oni neniam scias, por kio ili sin preparas. Ĉie ili disvastigas pereigan propagandon kaj laboras malantaŭ niaj dorsoj. Kaj vi,“ li furioze ekkriis, „vi por ili ankoraŭ havas komprenon!“ Li plu koloregis. „Ili estas vampiroj de nia popolo, ni devas neniigi ilin! Ĉu ankoraŭ vi kun ili simpatias?“

Ankoraŭ plu furiozanta Nikiforov daŭrigis: „Venontfoje min afable komprenu ĝuste! Kion do por vi signifas la partio?“

Li trafis la vivantan parton, al la partio mi dediĉus ĉion. Mi koleris kontraŭ mi mem kaj kontraŭ homoj, kiuj influigis min. Venontfoje mi ne plu estos naivulo. Venontfoje! Venontfoje!

Nikiforov opiniis, ke mankas al ni ankoraŭ kelkaj policaj operacioj. Kaj kiam li nin pli poste denove alvokis, ni veturis likvidi interbatadon aŭ ion similan.

Nikiforov bone konis homojn. Li estis eminenta psikologo, li sin dediĉis al la studado de la homa pensado, kondukmanieroj kaj lerte li praktike eluzadis siajn sciojn. Sed ankaŭ nin. Li precize sciis, kiel kaj per kio nin influu. Post malsukcesinta operacio li dum semajnoj ne ellasis ununuran okazon por nin premii post eksterordinare brutala interveno. Kiam ni foje alkondukis du ŝtelistojn, li ekkriis: „Ĉu tio estas ia aresto? Ĉu vi neniam lernos, kiel oni transformas iliajn vizaĝojn? Ili ja aspektas kvazaŭ ili ĵus naskiĝis! Kio kun vi okazis, karuloj? Montru, kion vi lernis!“

Vladimir kaj Anatolij, niaj ĉampionoj en bokso elkondukis bedaŭrindulojn eksteren. Tuj post tio mi aŭdis batojn kaj kriojn. La ŝtelistoj servis al ili kvazaŭ trejnpilkoj. Kiam post momento ili estis alkondukitaj, ili estis ege ŝanĝitaj. „Tio jam estas pli bona!“ diris Nikiforov. „Nun vi agas kiel ĝustaj viroj, kiujn mi vin ĉiam tiajn volis havi.“

Ni eltrinkis multan vodkon, ni ridegis travivinte gajan vesperon. Tio estis unu el multaj paŝetoj en brutaliganta procedo de Nikiforov. Sed tamen ne la tutan kulpon mi povas faligi sur lin. Ĉar ni reagis entuziasme kaj baldaŭ ni laŭvorte ĝuis brutalecajn manierojn, kiujn li propagis.

Ni komencis maje kaj nun estos komenco de aŭgusto. Plej multon de intervenoj ni havis kontraŭ batemuloj kaj perfortuloj. Sed Nikiforov komencis sinsekve alternadi interbatadojn kaj brutalajn arestadojn kun malgrandaj surprizatakoj kontraŭ la kredantoj: kaj ni tre baldaŭ

lernis bategi kredantojn simile kiel ebriulojn, batemulojn kaj perfortulojn. Sed niaj razioj estis ankoraŭ malgravaj, ĉar temis pri malgrandaj grupoj de kredantoj, kiuj kolektiĝis en loĝejoj.

XIII.

Iun aŭgustan vendredon de la jaro 1969 Nikiforov vokis min por veni policejon: „Dakov, venu je la kvina posttagmeze al mi!“ El la parolmaniero mi komprenis, ke fine ni ricevos okazon por pruvi niajn kvalitojn kaj venĝi nin pro la unua humiliganta renkontiĝo kun malamataj kredantoj.

Post fino de instruo mi iris al la policejo. Nikiforov min atendis en sia laborejo. Kiam mi eniris, li ĵus staris antaŭ la granda surmura mapo.

„Ha, Dakov! Aliru!“ li diris. Tuj li aliris al la afero, kiel li tion kutimis. „El sekuraj fontoj mi eksciis, ke la kredantoj planas dimanĉe sekretan bapton, kaj do ĉi tie,“ kaj li montris sur la mapo vilaĝeton Elisovo, rande de la montaro, proksimume 50 kilometrojn norden de Petropavlovsko, proksime de la rivero Avaĉa. „Ili do elektis belan anguleton!“ mi diris.

„Jes,“ li respondis. „meze de arbaro. Laŭ ili tio estas ideala loko.“ Mi kapjesis. Avaĉa fontas alte en la montaro kiel malgranda roĵo, kiu survoje malsupren konstante egiĝas. En Elisovo ĝi estas 65 metrojn larĝa, sed ankoraŭ tre malprofunda. Ĝi fluas direkten al Pacifiko enfluante en golfon, ĉe kiu etendiĝas Petropavlovsko. Nikiforov volonte al mi ĉion diris, kion li pri tiu kredanta grupo sciis. „Ili ne uzas tiun ĉi lokon unufoje. Ili iĝas nesingardaj. Jam foje ili tie okazigis sekretan bapton. Bedaŭrinde ni eksciis tion malfrue. Kiam ni tien venis, ili jam forestis. Tiuj homoj estas ĝenerale tre ruzlertaj. Ili neniam renkontiĝas dufoje en la sama loko. Sed laŭ la vortoj de nia observanto ili volas tien denove iri, ĉar tio ŝajnas al ili ideala loko.“ Kun nekaŝita mokemo li rimarkis: „Unuan fojon ni maltrafis okazon, sed nun ili ne eskapas nin!“

Estis al mi klare, ke ni ne povas lin elrevigi. „Kiam ili renkontiĝos?“ mi demandis.

„Dimanĉe je la kvara posttagmeze.“

Volonte mi eksciis, de kie li ricevas tiel precizajn informojn. Mi supozis, ke ili povus deveni de spionoj, kiuj estis enirigitaj inter la kredantojn. „Dakov, iru tien je la naŭa matene eĉ kun viaj homoj. La kredantoj ne povas ekvidi vin alvenintajn, vi devas esti tie pli frue ol ili!“

„Ordonu, kamarado!“ mi gaje eldiris kaj mi pensis pri tio, kiel grandiozan ekskurson ni dimanĉe realigos. Post reveno al la akademio mi diris al la ceteruloj, ke ili estu dimanĉe ĝustatempe en la policejo kaj ke ili kunportu gitarojn. „Ni faros al ni piknikon kaj pasigos belan tagon,“ mi diris. Dimanĉe matene precize je la oka horo ni estis antaŭ la policejo. Ni estis dek du. Nikiforov al ni ordonis ĉiujn aresti. Ni enaŭtigis tri skatolojn da vodko kaj manĝon. Aleksandr alportis ankaŭ mian gitaron. Ni ekveturis. Dumveture mi demandis Viktoron, de kie estas vodko. „Nu, tio estas donaco de Nikiforov. Li ĝin havis por ni preparitan.“ Mi enrigardis mansakojn kun provianto. Mi tie trovis eĉ kaviaron. „Nu, kiel mi vidas, tiu nia malĵuna glacieca Niki ne estas tiel malbona, kiel li sin prezentas!“ mi diris.

Daŭris preskaŭ unu horon, ĝis ni per serpentumaj vojoj alveturis al Elisovo. Ni deflankiĝis al arbara vojo. Estis bela suna tago. Ĉiuj ni zorgeme sekvis vojon sur la mapo kaj post momento ni konstatis, ke ni jam estas proksime al Avaĉa, al kiu kondukas vojo tra densa arbustaro. Ni haltis kaj ĉion ni elŝarĝis. Mi proponis al Viktor, ke li lasu aŭtomobilon en iu

kavo, kie ĝin neniu ekvidos. Iom pli malproksime ni trovis konvenan lokon por pikniko. Ni faris al ni komforton ĝuante belan tagon. Aleksandr gitarludis, iu malfermis kelkajn botelojn da vodko kaj baldaŭ estis grandioza amuzo en plena fluo. Dume revenis Viktor sciigante: „Malebligite, ke iu trovus la aŭtomobilon, ĝi estas funde de abismo, bone kaŝita!“ „Bonege,“ mi diris, „trinku kaj manĝu!“ Ni pasigis tie la tutan tagon, manĝante, trinkante, kantante kaj rakontante okazaĵojn. Ni fartis bonege. Ĉiam pli nin perfortigis ebriiĝo. Ni memorigis la ceterajn kadetojn. Preskaŭ neniam ili rajtis forlasi bazon, sed ni estis liberaj.

Eble mi trinkis pli da vodko, ĉar mia kapo peziĝis kaj mi ekdormis. Mi vekigis kvaronhoron post la tria. La kredantoj jam devis esti survoje. Estis necese rapide agi. Post agrabla ripozo nin atendis laboro. Mi ĉirkaŭrigardis niajn homojn kaj kun teruro mi konstatis, ke plejmulto el ili estas ebriiĝintaj. Kompreneble, ke ne ĝis tia grado, por ke ili ne sciu, kion ili faras, sed ĉiuj estis kuraĝigitaj kaj vivĝojaj, ili kriis kaj interbatiĝis.

„Ho, knaboj,“ mi ekkriis. „Fino de la amuzo! Preparu vin! Alportu gumklabojn!“

„Kaj kie ili estas?“ iu ekdemandis. Iu respondis: „Ni forgesis ilin en aŭtomobilo.“

Gumklabojn ni bezonis. Speciale ili estis proponitaj kaj pretigitaj por la soveta polico en Ĉeĥoslovakio – interne ili estas el ŝtalo kaj surface tegitaj per tavolo de malmola gumo. Eĉ malforta bato povis kaŭzi gravajn sekvojn. Per kunpremo de ŝaltilo sur mantenilo eblis duobligi ilian longon. Dum razioj en malvastaj spacoj ni povis ilin plej efike uzi en origina granda.

Ekstere – kiel hodiaŭ – ni ilin plilongigis. Dumtempe ni akiris bonajn spertojn en ilia uzado.

Iuj alportis gumklabojn kaj ni ilin disdividis. Ni ascendis monteton kaj post kelkaj minutoj ni trovis lokon, pri kiu ni opiniis, ke ĝin la kredantoj elektis por la kristana ceremonio. Ni atenteme komencis observi ĉirkaŭaĵon. „Certe ĝi estas tiu ĉi loko!“ ekkriis Viktor. „Tiu ĉi loko estas kvazaŭ kreita tiucele.“ Vere, unu el la plej belaj kaj la plej kvietaj lokoj, kiun mi iam ajn vidis, malgranda herbejo, iomete dekliviĝinta ĝis plata sableca bordo, de ĉiuj flankoj fermita, kaŝita inter la arboj kaj altaj rokoj kaj malfacile alirebla. Neniu povis ĉi tien kaŝveni sen tio, ke li ne estus rimarkita. Tiuj kredantoj, mi ekpensis, estas sufiĉe malsaĝaj, ĉar ili kredas je Dio, sed malgraŭ tio la bonan lokon por la renkontiĝo ili kapablas elekti!

Kiam mi pli bone ekrigardis, mi ekvidis ion, kio povus minaci niajn planojn. Ĉar ĉi tie la rivero estis sufiĉe malprofunda, la kredantoj povus sin transvadi alian flankon kaj malaperi en la densa arbaro. La armea ekzercado konsilis al mi, ke estas pli certe sendi al la kontraŭa bordo du gardistojn por malebligi forkuron. Mi sendis tien Sergej Kanonenko kaj Jurij Berstenikov. „Se iu provus forkuri, baru al li la vojon!“

„Sed Sergej, tian malproksimon ja neniu el ili atingos, kaj ni pro tio maltrafos la tutan operacion!“

Sed tio ne interesis min. Krom tio Kanonenko tre volonte uzadis sian tranĉilon, kaj mi ne volis iun mortigi. Pli grave estis, ke neniu forkuru. Kaj tiel ili ambaŭ transvadis la riveron al la kontraŭa bordo. Ni ceteraj nin duoncirkle lokigis malantaŭ arbustojn kaj arbojn. Neniu absolute malkaŝadis nian ĉeeston. Tio estos parada surprizo! – mi ekpensis kun kontentiĝo. La kaptilo estis perfekta.

Ni ne devis longe atendi. Eble kvaronhoron post la kvara ni ekaŭdis unuajn voĉojn kaj krakon de la branĉetoj sub la singardemaj paŝoj. Post momento ni ekvidis dek ok aŭ du-dek homojn alvenantaj laŭ mallarĝa vojeto. Gvidis ilin eble tridek ok-jaraĝa viro. Iuj estis

blanke vestitaj. Mi ekpensis, ke ili estas tiuj baptotoj. Miamire venis ĉi tien multe da junaj homoj.

Senbrue ni atendis, ĝis ili kolektiĝis surrande de la riverbordo. Poste komencis unu viro paroli. Mi strebis lin kompreni, sed mi kaptis nur kelkajn vortojn. Nikiforov diris al mi, ke ilia gvidanto estas Vasilij Litovĉenko el Petropavlovsko, kies postsignon jam longe sekvas polico pro ribeligado de homoj. Tio estas malgranda ironio de la sorto, mi ekpensis. Li havas la saman familian nomon kiel Anatolij Litovĉenko, unu el miaj plej kapablaj viroj. La ceteraj kredantoj estis el Petropavlovsko aŭ el proksima ĉirkaŭaĵo de Elisovo kaj kvar el ne malproksima kolĥozo Pograniĉnyj. La parazito Vasilij do trovis pluajn adeptojn ne nur en la urbo, sed ankaŭ en kamparo. Tio estas plua pruvo, kiel rapide tiu ĉi sekto disvastiĝas!

El la kaŝloko mi kalkulis sep homojn blankvestitajn. La partio nin instruis, ke la religio ĉe junaj homoj ne plu sukcesos. Sed tio, kion mi propraokule nun vidis, atestis pri vera malo. Kaj tio maltrankviligadis min.

Post kelkaj bonvenigaj minutoj kaj legado el iu libro ekkantis Vasilij Litovĉenko iun kanton, kiun ĉiuj kantis plu. Tio estis io pri Dio, ĉar tiun vorton mi aŭdis plej ofte. Poste Litovĉenko eniris akvon sekvata de sep homoj blankvestitaj. Kiam la akvo atingis ilian talion, ili haltis. La ceteraj homoj restis surborde kantantaj mallaŭte iun kanton. La suno brilis kaj en la arbaro regis absoluta silento, interrompita nur per birdkantado. En malproksimo ŝaŭmis rivero. Serena vetero kaj majesto de la tuta sceno estis perfekta.

Ekestis momento ekataki. Mi elsaltis ekkriante: „Al ili!“ Tiumomente ni elsaltis el malantaŭ la arbustoj kaj arboj kaj kun batpretaj gumklaboj ni kuris malsupren al la rivero. Ni enpuŝiĝis rekte mezen de la surprizitaj kredantoj kaj pli frue ol ili ekkonsciiĝis, ili kuŝis en la akvo. Eĉ ne unu restis staranta. En ŝoko pro ektimo ili senkonsile moviĝis en la akvo, sed post momento aŭdiĝis la unuaj krioj. La virina voĉo ekvokis: „Ho, Sinjoro, ne. Ne!“ Estu tio kiu ajn, li aŭ ŝi eksilentis, kiam super ili ekregis iu el ni. La belega pacama arbara scenario momente ŝanĝiĝis je detruema retaro de brakoj kaj piedoj, gumklaboj, plaŭdanta akvo kaj dolorigaj krioj. „Kaptu tiujn en la rivero,“ mi ekkriis. Kelkaj knaboj alkuris al la blankvestitaj personoj, ankoraŭ starantaj en la akvo, kvazaŭ ili ŝtoniĝis, kaj ekatakis ilin per gumklaboj. Iu juna homo provis sin eltiri el miaj manoj, sed mia gumklabo estis sufiĉe longa por bati lian kapon. Mi retrorigardis vidante, kiel Aleksej pugnobatis kapon de iu knabino kaj vundekŝiris ŝian oreleon. Ŝi mankaptis la vundon, kiu tre sangis. Kaj mi al aliulo donis baton de judo kaj lin puŝis tiel longe, ĝis li senmove falis teren. Poste mi lin faligis en la akvon. Ĉion akompanis miksaĵo de sakraĵoj, furiozo, krio kaj malesperaj preĝoj. „Dio, helpu nin! Dio, helpu nin!“

La preĝoj incitis min al ankoraŭ pli granda furiozo. „Fermu iliajn buŝojn!“ mi ekkriis, el fundo de la rivero mi prenis manplaton da sablo, kiun mi poste al unu kredanto enpuŝis en la buŝon, por ke li ne povu preĝi. La ceteraj faris la samon. Ni ŝtopis iliajn buŝojn per la sablo kaj koto kaj la preĝoj ĉesis.

Subite mi malantaŭ mi ekaŭdis iun kaoson. Mi retrorigardis en la momento, kiam Anatolij Litovĉenko kuratingis pastoron Vasilij Litovĉenko. La baptota knabino provis forkuri, kiam ŝi ekvidis proksimantan Anatolij. Vladimir Selenov saltis al ŝi kaj per bato de lia gumklabo ŝi senkrie falis akvon. Vladimir ŝin eltiris el la akvo kaj ĵetis sur la sablon.

Anatolij okupiĝis pri la pastoro kaj ni ceteraj puŝis sablon en la buŝojn de la kredantoj, ŝtonetojn, koton, mallonge ĉion, kio aperis en niaj manoj. Unu viro ankoraŭ preĝis. Tutforte

mi bategis lian buŝon. Certe mi elpuŝis al li kelkajn dentojn, ĉar komencis sangi miaj manartroj. Mi ekblasfemis. Lian vizaĝon surverŝis sango.

„Sufiĉas!“ mi ekkriegis. „Eltiru ilin el la akvo!“ kaj ni unun post la alia eltiradis sur la bordon. Mi ekrigardis por akiri supervidon. Ili kuŝis ĉi tie bategitaj, sufokantaj, sangantaj kredantoj. La knabino, al kiu Vladimir ŝirvundis orelon, sangis pli multe ol mi deziris. Ŝajnis al mi, ke ekde la atako pasis jam tuta eterneco, sed la rigardo al la horloĝeto malkaŝis al mi, ke ĉio daŭris nur kvin minutojn. Ni donis al ili tian lecionon, kiun ili ĝis la morto ne forgesos. Kaj tio estas la plej grava.

„Apartigu virojn disde la virinoj!“ mi ordonis. Al viroj ni kunligis manojn malantaŭ la dorsoj. Poste mi ilin kalkulis. Io ne akordiĝis. Unu mankis.

„Kie estas Litovĉenko?“ mi demandis.

„Ĉi tie!“ aŭdigis sin Anatolij.

„Mi ne opinias vin, kreteno,“ mi ekmurmuris. „Kie estas pastoro Litovĉenko?“

„Mi ne scias, lastfoje mi lin vidis, kiam mi lin bategis per gumklabo.“

Ĉi-momente mi devis zorgi pri pli gravaj aferoj kaj pri pastoro mi forgesis. La virojn ni alpelis al la aŭtomobilo. Poste ni koncentriĝis je virinoj. Iuj deŝiris al knabinoj malsekajn kaj sangmakulitajn vestaĵojn. Hontigitaj, strebantaj kaŝi sian nudecon – eĉ ke tio estis tute senbezona – ili rulkaŭriĝis. Ni ilin puŝetis per gumklaboj priridante ilin. „Jes, knaboj, tiel aspektas kredantoj!“ Plua eksplodo de rido. Dum ni primokis timegantajn kaj bategitajn knabinojn, la pli aĝaj virinoj ploris.

Jurij kaj Sergej estis dum la tuta tempo sur la dua riverbordo, nun ili revenante sakris, ke ili ĉion maltrafis.

„Kaj nun ni iru!“ mi ordonis. Kiam ni levadis la knabinojn, kompreneble ni tion eluzis kaj ilin funde pripalpis. Poste ni ekiris. Dum la tuta irado ili ploregis. „Fermu buŝaĉojn!“ ekkriis Vladimir. Tie mi la virojn ankoraŭfoje kalkulis. La grupgvidanto fakte mankis.

„Kie estas Litovĉenko? Kiu lin vidis?“ mi demandis miajn homojn. Sed ĉiuj nur movis ŝultrojn, krom Anatolij.

„Lastfoje mi vidis lin svenantan en la akvo.“

Bone al li! mi ekpensis. Nikiforov tion certe komprenos. Virojn ni enaŭtigis en la antaŭan parton kaj la virinojn kun knabinoj en la malantaŭan. Miaj homoj sidis sur la sidlokoj kaj virinoj kun knabinoj genuflekse inter ili. Kvar pli junaj estis tute nudaj. Ili kaŝis singultante siajn vangojn per la manoj. La viroj en la antaŭa parto deturnis vidon. Mi pensas, ke la pli aĝaj virinoj preĝis, ĉar ili silenteme movis siajn lipojn.

Estis proksimume la kvina horo posttagmeze, kiam ni revenis en civilizacion. Ni traveturis multajn vilaĝojn antaŭ ol ni atingis periferion de Petropavlovsko. Ankoraŭ estis lumo kaj la homoj kompreneble vidis polican aŭtomobilon kun provokanta ŝarĝo. Ni malplenigis lastajn botelojn da vodko. La laboro finiĝis kaj ni estis ege ebriaj. Iuj el ni, kiam ili finfumis, estingis la cigaredan stumpon kontraŭ korpojn de la knabinoj. Amuzeme ni observis, kiel ili kun teruro eksaltis kaj poste en tia malĝojega kaoso ili turniĝis.

Unu el ili, Nina Rudenko, estis nur dek ses-jaraĝa. Ĝuste ŝia juneco kaj pureco nin instigis. Kaŭzis al ni grandan ĝojon ŝin ĝeni. Plua estis dudek ses-jaraĝa kaj ŝi multe plaĉis al Vladimir. Senĉese li ŝin ĝenis. Dumvoje al la policejo tiuj ĉi junaj knabinoj travivadis terurajn momentojn. Ili forlasis domon por akcepti bapton, kaj anstataŭ tio ili fariĝis viktimoj de la teroro. En la policejo denove mian vidon altiris juna Nina. Ŝi havis belegajn blujn

okulojn, longajn brunajn harojn kaj sveltan staturon.

Nikiforov, kiu nin atendis en la pordo, tuj trarigardis situacion kaj ekkriegis: „Dakov, vi kondukis tiel la knabinojn tra la strato!“

„Kompreneble, kial ne?“ mi respondis.

„Vi idioto! Ĉu vi ne scias, ke tio la homojn agitegos kontraŭ polico? Tio nin ĵetos en la malbonan lumon!“ li furioze kriegis. „Se neniu vin vidas, do faru kun tiuj homoj, kion vi volas!!! Sed publike – neniam!“ Li alvokis siajn homojn ordonante al ili: „Forkonduku ilin internen kaj ilin fermu!“ La viroj ilin forkondukis. La knabinoj – inter ili estis ankaŭ Nina – restis la tutan nokton en nia „ĉelo por sobriĝo“, plena de ebriaj viroj, kiuj ilin laŭplaĉe turmentis kaj misuzis. Nina Rudenko neniam el tiu ĉi travivaĵo reaktivigis.

Fine de ĉiu operacio mi devis skribi finraporton pri la apartaj arestitoj. Rilate al tio mi post kelkaj tagoj eksciis, ke Nina estis eksigita el la lernejo. La direktoro diris al mi: „Antaŭ kelkaj tagoj ŝi estis tute en ordo. El neklarigeblaj kaŭzoj ŝi estis subite trafita per emocia kaj anima difektoj. Ŝi ne povis koncentriĝi al laboro, ŝi ĝenadis la klason per senrilata balbutado. Ofte ŝi komencis tremi kaj nekontrolite plori. Multfoje mi pro ŝi devis interrompi instruadon kaj elkonduki ŝin eksteren. La atakoj estis ĉiam pli oftaj kaj fine ni povas fari nenion alian, ol eksigi ŝin el lernejo. Mia opinio ŝi nerve ruiniĝis, sed kial, tion mi ne komprenas!“

Mi tion kapablus ekspliki al la direktoro.

„Mi alvokis ŝian patrinojn,“ li daŭrigis. „Ŝi diris, ke Nina nokte vekigis kaj eksidante sur la liton ŝi penetreme ekkriadas, ke tio estas aŭdebla ne nur en la domo, sed ankaŭ en la tuta strato. Agnosku, kamarado Dakov, ke fakte ne eblas lasi ŝin en la lernejo.“

Mi estis kontenta, ke li ne sciis, kion ni al la knabino kaŭzis.

La viroj, kiujn ni post la razio en Elisovo alkondukis, estis unue fermitaj en la ĉeloj. Nikiforov al ni diris: „Knaboj, nun iom trinku kaj faru al vi komforton. Mi prizorgos atestitojn kaj poste mi aŭskultos vian raporton.“ La raportoj, aŭ buŝaj aŭ skribaj, estis konsistaĵo de niaj taskoj. Ili estis sendataj al urba komitato kaj de tie al Moskvo.

Nikiforov post momento revenis kaj ni kvietigis, por ke li povu ekparoli. „Miaj junuloj,“ li komencis. Ĉu liaj junuloj? mi ekpensis. Tio estas la unuan fojon, kiam li nin tiel alparolis. Neniam antaŭe ni vidis lin tiel brilegantan. Por momento li eksilentis kaj poste li demandis: „Kaj kio okazis al pastoro Vasilij Litovĉenko?“

Mi atendis tiun ĉi demandon kaj por ĝi mi konvene preparis miajn homojn. Al mia mansigno ili kune ekkantis: „Litovĉenko mortigis Litovĉenkon!“

Kompreneble ni opiniis, ke Anatolij Litovĉenko mortigis pastoron Vasilij Litovĉenkon. Sed nia koruso rezultis tiel, kvazaŭ pastoro memmortigus sin. Nikiforov ridegis kun ni. Ĉiuj ni jam estis en edifa humoro. Sed subite li serioziĝis kaj severe li demandis: „Sufiĉas, Dakov! Nun mi volas ekscii, kio fakte okazis al Litovĉenko!“

Kun rido mi respondis: „Kiel ni diris, kamarado kapitano, Litovĉenko mortigis Litovĉenkon.“

Denove eksplodo de rido. Nikiforov, malsevere ridetanta, fine diris: „Mi vidas, ke hodiaŭ vespere mi nenion de vi ekscios. Dakov, irigu ĉiujn eksteren, ankoraŭ ie trinku. Morgaŭ vi denove venu. Vi diros al mi, kio okazis!“ Ĉe nia foriro Nikiforov ankoraŭ diris: „Antaŭ ol vi foriros, ni volas al vi diri, ke mi pri vi fieras. Vi plenumis grandiozan laboron. Vi donis al la kredantoj lecionon, kiun ili tiel facile ne forgesos. Iom-post-iome vi akiras ĝustan

formon, miaj junuloj!“

Dufoje samtage li uzis tiun ĉi titolon. Mi min demandis, kion tio signifas. Eble ni fine troviĝas en la sfero de lia favoro. Eble, ke maljuna, glacieca Niki komencos sinsekve degeli...

Kiam mi venontan tagon venis al li, li min demandis: „Dakov, ĉu ankoraŭ validas versio, ke Litovĉenko mortigis Litovĉenkon? Aŭ ĉu tio estas nura ŝerco?“ Dumnokte mi sobriĝis. Tute serioze mi respondis: „Verdire, kamarado kapitano, mi ne estas certa. Estis tie tia tumultigo, ke mi eĉ ne scias precize, kio okazis.“

„Nu, ankaŭ mi havas por vi novaĵon. Kelkaj vilaĝanoj hodiaŭ matene trovis en la rivero, kelkajn kilometrojn for de Elisovo, korpon de Vasilij Litovĉenko. Lian korpon haltis kandensejo. Ili vokis policon kaj lia kadavro estas transportata al obdukcio!“

Mi movis la ŝultrojn. Nekredeble. Jam la pasintan vesperon mi rimarkis, kiel Nikiforov estas fiera, ke li finfine senigis sin de la sekreta pastoro. Li eĉ aliĝis, kiam ni vespere pri tio ŝercis.

Sed nun kun serioza mieno li daŭrigis: „Dakov, mi volas kun vi ankoraŭfoje paroli pri tiu ĉi operacio. Ni havas nenion kontraŭ tio, kion vi faris, ĝis unu escepto – ke vi veturigis publike nudajn knabinojn enstrate. Faru kun virinoj aŭ kun la ceteraj kredantoj, kion vi volas, sed neniam vi starigu policon en malbonan lumon!“

„Ordone, kamarado“, mi diris. Sed tuŝis min tio, ke Nikiforov havis neniujn objektojn kontraŭ tio, ke ni mortigis homon, sed li nur kritikis misuzon de la knabinoj.

Sekvan tagon mi estis en la policoficejo, kiam venis rezulto de la obdukcio. Pastoro mortis pro grava vundigo de la kapo. La interna sangado kaŭzis rapidan morton. La unuan fojon ni mortigis homon. Mi sentis min tre mizere.

„Aŭskultu“, diris Nikiforov, kiu sciis, kiel mi sentas min mizere.

„En Elisovo vi faris tre bonegan laboron. Pro tio vi devas eĉ ne havi plej etan konscienciproĉon. Nur ekmemoratu, ke temas pri la malamikoj de la ŝtato. Ili estas ekstreme danĝeraj klopodantaj renversigi nian socian sistemon. Tial estas necese ilin likvidi. Krom tio ni Litovĉenkon jam foje arestis. Ni avertis lin, donante al li atentigon, kaj tamen li ne ŝanĝiĝis kaj plu daŭrigis sian laboron inter la kredantoj. Li ne estis senkulpa homo. Tion vi ne devas forgesi!“

Post tiuj vortoj mi iomete trankviliĝis. Nikiforov certe pravas. Sed kiam mi ekvidis kadavron de la pastoro, lian malgrandan, sveltan korpon, li tute ne ŝajnis al mi esti danĝeriga malamiko. Pli poste mi eksciis, ke temis pri la viro de granda formato kaj elstara karaktero, tre kuraĝa kaj per nenio kaj neniu fortimigebla. Pro sia kredo li multe suferis kaj fine pro ĝi oferis sian vivon.

„Dakov“, diris Nikiforov, „ekstere oni diras, ke li estis murdita kaj ankaŭ tion, ke pro tio kulpas via grupo.“

„Ĉu pri tio scias lia edzino?“

„Jes. Kaj vi nun devas ŝin viziti kaj diri al ŝi, kio okazis.“

„Ĉu mi tion al ŝi diru?“

„Kompreneble nian version“, li ekrimarkis kun malica ekrido. Pri tio mi ne kalkulis. Sed obeeme mi respondis: „Ordone, kamarado. Kie mi ŝin trovos?“

„En hospitalo.“

„Ĉu en hospitalo? Ŝi ja ne ĉeestis tion.“

„Ne, sed ŝi eble estas forta lirikulino kaj la ŝoko pro la morto de la edzo estis por ŝi tro forta. Ŝi nervoŝokiĝis. Ŝi kuŝas en leza sekcio de la hospitalo en Kempo. Tie vi trovos ŝin.“

„Sed kion mi al ŝi diru?“

„Elpensu iun konvenan okazaĵon por klarigo, kio kaŭzis la vundon sur lia kapo.“

Kaj kial mi cetere ion diru? mi demandis min enmense. Mi ne povis ekkompreni, ke tio koncernis ankoraŭ iun alian. Tio estis afero de polico, kaj ĉar li mortis, estis tio lia kulpo. Li ja estis avertita, sed li ne respektis tion.

Kiam mi en la hospitalo demandis pri la sinjorino Litovĉeva, mi estis alkondukita en grandan ĉambron. Ŝi kuŝis tie sur la kvara lito dekstre, apud fenestro. Ŝi aspektis kompatinde. La flegistino informis min, ke ŝi estas duonkorpe paralizita, ankoraŭ plu sub influo de ŝoko kaj ricevanta narkotaĵojn. Pli atenteme mi ekrigardis ŝin. Iam ŝi certe estis belulino. Ŝi eble havis tridek kvin jarojn. Nun do ŝi estis paralizita kaj oni ne povis supozi, ke ŝi ankoraŭ iam povos iradi. La morto de ŝia edzo ruinigis ŝian vivon. Sed mi eksentis eĉ ne etan kompaton, nur tion, ke ŝi simple havas misfortunon. Tio estis certa speco de la kompatato, kiu min ekregas ĉe ekvido de la homo en la simila stato. Sed ŝian edzon mi tute ne bedaŭris. La malamikoj de la ŝtato ja ne povas supozi, ke ili ne estu punitaj pro la familianoj!

La flegistino vekis ŝin. Malĉeestece ŝi ekrigardis min. Ankoraŭ ŝi ne tute vekiginta nekomprenante okulumis min. Trapenetris min subita doloro, sed nur por la momento. Mi ekaktiviĝis, aliris al ŝi kaj rapide, formale mi diris al ŝi. „Sinjorino Litovĉeva, mi venas el la polico de Petropavlovsko. Mi estas gvidanto de la grupo, kiu arestis en Elisovo vian edzon kun la ceteruloj.“ Mi atendis ŝian reagon, almenaŭ eksplodon de furiozo, ke mi respondecas pri la morto de ŝia edzo. Sed ŝi restis senmove kuŝanta. Eble ŝi ne komprenis sencion de miaj vortoj. Sed Nikiforov ne donis al mi taskon, ke mi kompreneble ekspliku al ŝi la aferon. Mi estis devinta nur ŝin informi. Se ŝi ne ekkomprenos, do tio estas ŝia eraro. Mi do daŭrigis: „Mi estis ĉi tien oficiale sendita, ke mi ekspliku al vi kaŭzon de la morto de via edzo.“ Denove mi atendis ŝian reagon, sed vane. Ĉu eble ŝi ankaŭ perdis menson? Ununura signo de ŝia vivo estis trista ekĝemo ekeliranta el ŝia animo. Mi plu diris, ke lia edzo strebis forkuri, kiam ni lin volis aresti, kaj dum salto en malprofundan akvon li frapis sian kapon kontraŭ rokon. En ŝia rigardo, direktita al malpleno, videbliĝis nur senlima ĉagreno.

Ankoraŭfoje mi eksplikis al ŝi, ke ŝia edzo ne mortintus, se li respektus niajn ordonojn ne strebante forkuri. La bedaŭrinda virino nun provis ion diri, sed vane. Laŭte ŝi ekĝemis kaj senanime ŝi falis sur sian kapkusenon.

Ne valoras perdi tempon, mi ekpensis, mian devon mi plenumis. Kiam mi min turnis por foriro, ni renkontiĝis okulvide. Mian dorson trairis teruro. Ŝian lastan ekrigardon mi neniam forgesos. Estis tio muta elkrio de la doloro, eliganta el profundo de ŝia animo. Ŝiaj suferantaj okuloj min ankoraŭ longe persekutis.

Mi eliris al la sunbriligantaj stratoj de Petropavlovsko kaj malrapide mi revenis al la policejo. Nikiforov diris al mi: „Forgesu tion! Kompreneble iuj homoj suferos, sed ili estas krimuloj kaj niaj plej grandaj malamikoj. Tion vi konstante memoru!“

Sed tamen mi ne povis forgesi ŝian vizaĝon. Pli poste mi eksciis, ke Litovĉenko havis du junulojn – filinon, kiu mortis pro ia malsano, kaj dek ok-jaraĝan filon, kiu ĵus plenumas soldatservon. Ni devis skribi al li informante lin pri la morto de lia patro.

Post tri tagoj ni estis senditaj al la domo de Litovĉenko por serĉi ilegalan literaturon!

En la pastoran domon ni eniris kvarope. Ĝi estis malriĉa, fendeta lignodomo meze de la urbo. Jam unuavide estis evidente, ke Litovĉenko ne praktikadis imponan vivon. La ekipaĵo estis same mizera. Ni traserĉis tutan domon de la tegmento ĝis la kelo. Nia peno estis riĉe premiita. Ni trovis permane skribitajn kantaretojn, novan Biblion, kiu devis esti kontra-bandita el okcidento, kaj ankoraŭ unu, tre malnovan kaj foruzitan, multe ŝirdifektitan pro ofta uzado. Kiam ni al Nikiforov transdonis ĉiujn tiujn trezorojn, li brilis per diabla ĝojo. „Bonege! Bonege! Ĉion ni sendos al Moskvo. Tie ili vidu, kiel ni klopodegas!“

Vespere ankoraŭfoje mi devis pensi pri la domo de Litovĉenko. Li ne plu tien revenos kaj la edzino ne plu atendos lin. Sed tuj mi rekonsciiĝis. „Sergej, vi sentimentaliga. Memoru, ke ili estas malamikoj!“

Kvin tagojn post Elisovo ni estis senditaj likvidi alian renkontiĝon de la kredantoj. Ankaŭ nun ni ilin bategis kaj la gvidanton arestis. Nikiforov kondukis al ni tre amikeme. Superece ni plenumadis liajn atendojn.

Apud laboro por la polico mi klopodis ne neglekti la ceterajn devojn – la funkcion de la gvidanto de Komsomolo, kunigitan kun organizadoj, prelegoj, realigoj de laborbrigadoj kaj por esti atentema pri senriproĉeco de la estontaj 1 200 soldatoj kaj pri mia faka studado. Krom tio mi aktive sportadis akirinte titolon de majstro de Kamĉatko.

Plua problemo estis drinkado. Vodka estas malbeno de Ruslando. Ĝi estas ĉieĉeestanta. Ni, kadetoj, fine de la monato ricevadis sep rublojn. La botelo kaŝita submantele estis centprocenta ilo por elflati kiujn ajn putinojn.

Ankaŭ en la akademio ni konstante kontraŭbatalis alkoholon. La ironio kaŝiĝis en tio, ke ni, respondeculoj, tiun ordonon respektis plej malmulte.

Post unu „tago de la malfermitaj pordoj“, finita per dancamuzo kun la knabinoj el la urbo, ni faris rondiron, ĉu iu senpermesite restis en la armea bazo. Kiam ni malfermis pardon de la virina necesejo, aperis antaŭ niaj okuloj nekutima vidaĵo: la planko estis kovrita per malplenaj boteloj da vodka. Sekvan tagon mi postulis ŝarĝaŭtomobilon por forveturigi la „malpermesitajn varojn“.

La partio vidas en vodka la ĉefan kaŭzon de la malalta industria produktado. Estis nenia kuriozaĵo precipe fine de la semajno vidi en Petropavlovsko aŭ en aliaj grandurboj ebrulojn, balanciĝantajn en la stratoj aŭ kuŝantajn en vojfosajoj. Dum plimulto de superpafoj, interbataĵoj kaj bataloj kun tranĉiloj ludis gravan rolon alkoholo. Kaj tamen ankaŭ ni permesis al ni nian parton, precipe antaŭ razioj kontraŭ kredantoj. Nura pli granda bremsilo estis intereso pri sporto. Se ni volis konservi bonan korpostaton, ni devis limigi drinkadon.

Inundo da direktivoj el Moskvo pri tiu ĉi temo atentigis pri granda danĝero, kiun alkoholo signifas por nia junularo. Tio estis problemo numero unu.

XIV.

Foje posttagmeze mi ricevis ordonon veni vespere je la naŭa horo kun malgranda grupo al la policejo. Mi elektis sep kolegojn kaj post alveno al la policejo ni iris rekte al la socia lejo, kie nin atendis nemankanta vodka. Tiuvespere Nikiforov nin gastigis ankaŭ per kaviaro. Tre volonte mi eksciis, de kie li prenadis tiujn multekostajn varojn. Mi intencis iufoje lin pri tio demandi.

En la laborejo al mi Nikiforov tre serioze komprenigis taskon, kies plenumo nin atendis: „Tiu ĉi interveno estas por ni ege grava. Ni eksciis, ke hodiaŭ vespere je la deka horo ko-

lektiĝos grupo de kredantoj. Laŭdire ili havas novan Bibliion kaj kelkajn permane skribitajn librojn. Ni ilin bezonas por Moskvo kiel pruvan materialon kontraŭ ili.“

„Ĉu oni ĉiun literaturon sendas al Moskvo?“ mi demandis.

„Ne, nur presitan. Aliajn fuŝfaraĵojn ili ne volas.“

„Kaj kion ni faras kun ili?“

„Iru, mi tion montros al vi. Ankaŭ tio apartenas al niaj devoj.“ Post malbone lumigita ŝtuparo li alkondukis min en tielnomatan ejon por malvarmigado, malvarma bierejo, glacieca ankaŭ somere. Ĉi tien ni kutime enfermas ebrulojn, por sobriĝo. En la angulo staris malgranda forno, por ke la gardistoj povu sin varmigi. Alie regis en la ejo kruda malvarmego. Nikiforov montris al la skatolo plena da gazetoj kaj ligno. „Kiam vi revenos, do tiun aĉaĵaron ĵetu ĉi tien. Almenaŭ ni per ĝi varmigis nin!“ li ekridetis pro propra spritaĵo.

Ĉar ni estis alvokitaj jam antaŭ la komenco de la renkontiĝo, ne ekzistis duboj, ke la informoj devenis de la denuncanto el tiu kaŝa komunumo. La reto de la denuncantoj de Nikiforov sin atestis kiel maksimume efikanta. Ofte mi metis al mi demandon, kial ili tion faras. Certe ne pro ideologiaj kaŭzoj aŭ tial, ke ili estas centprocentaj komunistoj. Ili tion simple faras pro mono – kiel ni. Laŭdire rublo povas ŝanĝi koron. Kaj por tiuj intervenoj estis elspezataj fabelaj monsumoj. La denuncantoj, kiuj agadis inter kredantoj, estis eĉ pli bone salajritaj ol ni. Kaj prave. Ĉar por nemalsekretigi sin, ili vizitadis diversajn sekretajn renkontiĝojn kaj lasis sin bategi kune kun ceteraj kredantoj. Neniam ni eksciis, kiuj ili estas. Kaj sen iliaj servoj ni tute nenion povus fari. Pere de ili ni ĉiam eksciis, kie okazadas renkontiĝoj kaj kiom da homoj ilin partoprenos.

Ĉirkaŭ la naŭa vespere alvokis min Nikiforov en sian laborejon por doni al mi lastajn instrukciojn kaj informojn. „Kie ili renkontiĝos?“ mi ekdemandis. La lokon, kiun li montris sur la mapo, vi facile atingos dum 20 minutoj. „Kiom da ili estos?“ – „Laŭ niaj informoj proksimume dek ĝis dek kvin.“ Atenteme mi rigardis mapon por decidi pri vojlinio. Estis kvaronhoro post la naŭa. Ni ankoraŭ havis sufiĉe da tempo. Principe ni ĉiam ekatakis post dudek ĝis tridek minutoj post la komenco de la renkontiĝo. Ni ebligis al la kredantoj, ke ili malstreĉiĝu akirante senton de sekuro. Tial mi diris: „Ni ekveturos kvaronhoron antaŭ la deka.“ Uj knaboj metis la piedojn sur la tablon kaj drinkis vodkon. Kaviaro rapide malaperis. Nur tre malofte mi manĝis tiun ĉi bongustaĵon. Viktor legis libron pri ĵudo. Li mem povus la similan verki, li ja estis majstro de la orienta Rusio. Subite li demetis la libron sur la tablon, li eksaltis provante preojn kaj batojn de karato: „Hodiaŭ vespere mi provos tiun ĉi novan baton, kiu ŝajnas esti la plej bonefika!“ – „Nu, kaj ĉu tiun ĉi vi jam elprovis?“ mi montris sur mi la baton per manplato en adampomon. „Tre konvena por rapida likvido de malamiko!“ La ceteruloj tion distre rigardis.

Vladimir Selenov kaj Anatolij Litovĉenko, niaj ĉampionoj en bokso – la unua majstro de Kamĉatko, la dua de la tuta Siberio – ankaŭ ekbatetis. „He, malgrandulo,“ diris Vladimir, „atentu. Hodiaŭ vespere mi lernigos vin fajfi. Mi montros al vi baton, pro kiu mi ricevis titolon de la majstro de Siberio!“ Ambaŭ ridis kaj la ceteraj kun ili. Malrapide ĉiuj ekhavis furiozan humoron. Vodko torente fluis kaj ni senzorgeme disputis, kion ĉion ni hodiaŭ elprovos.

Mi ekrigardis horloĝeton. „Knaboj, ni iru. Estis sufiĉe da fanfaronado kaj fortegulaj paroloj. Nun ni ekvidos, kion ni kapablos.“

Post kelkaj minutoj ni forveturis. „Malrapidigu, Viktor,“ mi diris, „jam tio devas esti su-

fîĉe proksime.“ „Ĉi tie,“ mi montris al la tabuleto kun nomo de la strato. Viktor malrapidigis aŭtomobilon kaj mi observis domnumerojn.

„Ĉi tie tio estas,“ mi diris flustre. Ĝi estis ligna dometo, tipa por tiu ĉi regiono. „Haltu!“ mi ordonis, la reston de la vojo ni piediros por esti neokulfrapaj.“ Ni proksimiĝis al la domo. „Vi du,“ mi montris al Aleksej kaj Jurij, „vi gardos pordon kaj fenestrojn. Atentu, ke neniu forkuru!“

Aleksej protestis. „Aŭskultu, ne eblas alimaniere decidi. Vi devas gardi. Sed kiam komenciĝos tiu tumulto, venu al ni por alviciĝi,“ mi diris al ili. Jurij ankaŭ ne estis entuziasmigita, sed ili obeis. La enirpordo estis ŝlosita. Kaj en la malantaŭa parto de la domo ne estis lumo. Estis malhela, senluma nokto. Rapide kaj senbrue ni ĉirkaŭiris domon kun alkonstruaĵo. La kuntiritajn kurtenojn tralumis malforta lumo. Do tie ĉi ili estas, en la alkonstruaĵo! Kiel ni kaŝiris, iu nesingardeme renversis sitelon. Ĝi kaŭzanta bruon ruliĝis sur ŝtonpavimo. Tiumomente ni deinterne aŭdis voĉojn kaj rapidajn paŝojn. Ni malsekretigis nin. Ili jam sciis, ke ni estas ĉi tie. „Ek! Rapide!“ mi ekkriis. Ni kuris al la pordo, sed ĝi estis ŝlosita. Ili ne aspektis masivaj, tial mi kelkajn metrojn retroiris, elkure enpuŝante ĝin. En la ŝultro mi eksentis akran doloron. La kontraŭfrapo min dejetis en la koton. Ekposedis min granda kolero. „Ĉi tie,“ iu montris al malgranda trabeto.

„Rompmalfermu per ĝi la pordon!“ mi ordonis.

Post kelkaj kontraŭpuŝoj la pordo malfermiĝis. Ĉiuj ni jam estis furiozantaj, precipe mi. Interne en la lumo de oleolampoj ĥaose moviĝis dek aŭ dek unu homoj. Ni enflugis inter ilin, faligante ilin kun malbenadoj planken. En la angulo de la ĉambro mi ekvidis proksimume sesdek kvin-jaraĝan viron. Per la manoj li tenis Biblion kaj kun timegantaj okuloj li serĉis lokon, en kiu li povus ĝin kaŝi. Mi alsaltis al li kaj krude mi ĝin kaptis. Li ĝin firme tenis. Fine mi ĝin eltiris el liaj manoj. Duoble furiozanta – mia ŝultro ankoraŭ doloris – mi komencis elŝiri ĝiajn foliojn ĵetante ilin teren: La viro petegis: „Ne, mi petas vin, ne!“ Mi turnis min kaj tutforte batis lian vizaĝon. La pugno trafis nazon kaj buŝon. Tuj li eksangis. Kun penego li ekstaris kaj ankoraŭfoje li provis ekposedi la Biblion. Kia frenezulo li estas, mi ekpensis. Ĉu li pli taksas tiun ĉi libron ol sian vizaĝon? Denove mi ĝin deprenis de li kaj lin bategis.

Senkonscia li falis teren. Ankaŭ la ceteruloj samagis. Viktor kaptis mezaĝan viron kaj turnis lin en la ĉambro kiel kun pupo. Per lia kapo li kontraŭpuŝis ŝrankon. El malfermita vundo fluis sango. En la ĉambro regis sanga kaoso. Ni ricevis ordonon alporti ĉiun literaturon. Tial mi strebis ĉiukoste akiri librojn de sub la tablo. La viro, kiu ilin tien kaŝis, jam kuŝis sanganta sur la planko kun frakasita makzelo. Eĉ ne unu kredanto restis staranta. Tri pli aĝaj virinoj kaŭrante en la angulo ploris. „Prenu ĉiujn Bibliojn kaj la ceteran literaturon,“ mi ordonis al miaj homoj. Poste mi volis ekrigardi, kio ankoraŭ restis sub la tablo. Ĝuste en la momento, kiam mi sub ĝin enrampis, eniris en la ĉambron Aleksej kaj Jurij. Jurij kolerigita, ke ili ne povis ĉeesti, ekvidis min. Opiniante, ke tio estas kredanto, kiu volas sin kaŝi, li alsaltis al mi, kaj antaŭ ol iu malhelpis lin, li tutforte – ŝajnis, ke li volas elverŝi sian tutan koleregon – batis min per gumklabo! Tio estis, kvazaŭ sur mi ruiniĝus domo. Mi ekkriegis. Tiun doloron mi ĝis la morto ne forgesos. Tio estas simple nepriskribebbla. Antaŭ miaj okuloj ekfajreris kaj mi etendis min surplanke. La ceteruloj ekkriis, sed jam malfrue. La furiozanta Jurij renversis tablon. Nur nun li ekvidis, kiun li batis. „Sergej!“ li konsternite ekkriis. „Pardonu!“ Mi opiniis, ke tio estas kredanto, kiu volas sin kaŝi!“ Pro dolorego mi

eĉ ne povis ekparoli. Mi kuŝis surplanke ĝemanta kaj blasfemanta. Post pli longa momento Aleksej kun Juris helpis al mi ekstari. La suba parto de la spino tiel doloregis min, ke mi ne povis movi la krurojn. Ĝis nun neniam mi spertis tian doloregon! Jurij senĉese senkulpigadis sin, ĝis mi lin admone silentigis: „Fermu buŝon! Kvietiĝu!“ Du kredantoj, kiujn ni laŭordone devis forveturigi, plu troviĝis senkonsciaj. Ni forportis ilin tra la kotkovrita strato kaj ĵetis ilin en aŭtomobilon. Ili aspektis priplorinde. Mi dorskurbita kvazaŭ maljunulo apenaŭ iraciis, ĝis du kamaradoj helpis min. „Ĉu vi prenis librojn?“ mi demandis Viktoron. „Ne zorgu, ni havas ĉion.“ Li permane montris al la plena skatolo da paperoj en la aŭtomobilo.

Dum revena veturo ĉiu skuo kaŭzis al mi nepriskribeblan doloregon. Kiam ni alveturis la policejon kaj alkondukis arestitojn internen, momenton mi iradis por reviviĝi. Mia dorso doloregis. Mi ne devis serĉi tiujn librojn. Eĉ al Jurij mi povis nenion riproĉi. Verŝajne mi fakte aspektis kiel kredanto volanta forkuri. Kiam mi iom reviviĝis, mi eniris internen. La ceteruloj ĵus alportis skatolon kun Biblijo kaj ceteraj libroj kaj stakigis ilin antaŭ Nikiforov. Tiu rigardis kreskantan amason kaj fervorege ekvokis: „Bonege! Bonege! Tio estos grandiozaj donacetoj por Moskvo!“ Li bonhumore ekgrimacis.

La gvidanto de la grupo, kiun mi dufoje bategis, sidis sur benko tenanta kapon per la manoj. Mankis al li antaŭaj dentoj kaj la ĉemizon li havis tute sangmakulitan. „Miaopinie li bezonas duŝon,“ diris Nikiforov trarigardante la ceteran literaturon.

„Ĵetu tiun literaturaĉon malsupre en la skatolon!“ li alvokis kelkajn knabojn.

„Kaj vi,“ li sin turnis al la ceteraj, „vi iom promenu kaj ĝuu agrablan vesperon!“ Kaj tion mi ankaŭ faris. La dorso min ankoraŭ terure doloris, sed mi klopodis elteni tion. Dummanĝe mi observis, ke sur la mano mi ankoraŭ havas sangon de la kredanto. „Ba, ne gravas,“ mi ekpensis, „pli poste mi tion lavos.“

Niaj razioj plimultiĝis. Iam ni estis vokitaj eĉ dufoje aŭ trifoje en la semajno. Ŝajnis, ke la kredantoj estas ĉiam pli aktivantaj. Post kelkaj monatoj mi devis plenigi la tutan monton da paperoj. Por ke mi povu laŭeble plej detale skribi raportojn, mi devis iun sendi al laborlokoj de la kredantoj por de iliaj kunlaborantoj ekscii gravajn informojn. Ĉion ni sendis al la kontraŭreligia centro en Moskvo, kie la informoj estis enkomputiligitaj. Kopiaĵoj poste estis resenditaj al nia centro. Tiel ĉiuj ĉie havis supervidon. Aldone estis sendita por persona registro 7 x 12 cm granda slipo kun fotografiaĵo de kredanto kun personaj datenoj kaj ceteraj datumoj. Laŭ tiuj ĉi kondiĉoj la partio povis kiam ajn ekataki, koncentrigi kredantojn kaj likvidi ilin el la socio.

XV.

Por iom ripozi mi praktikadis kun la amikoj de tempo al tempo turismajn marŝojn kaj montgrimpadojn en la montaro de Kamĉatko. Kiel estontaj soldatoj ni havis alirpermeson al la lokoj, kien por la normalaj civituloj ne estis permesite eniri. Dum ekskursoj ni baldaŭ malkovris strangajn objektojn: ni trovis tridek koncentrejojn, bone kaŝitajn en forlasitaj valoj de landinterno. Multe tio surprizis nin, precipe tial, ke ili estis novkonstruitaj kaj – senhomaj. Ofte ni post iu vojkruciĝo aŭ monteto subite trovis novan prizonan komplekson, sekurigitan de ĉiuj flankoj per pikdratoj, komplete establitan eĉ kun loĝejoj por gardistoj. Domservistoj zorgis pri la loĝejoj kaj gardis ilin. Tiuj ĉi malliberejoj havis ĉion, nur malliberuloj mankis.

Mi ne kapablis tion ekspliki al mi. Iun tagon mi pri tio demandis Nikiforov. Li respondis

al mi: „Vi ja mem scias, ke nia lando havas multajn malamikojn. Ni devas esti por ĉio pre-
paritaj. Kiam ili iun tagon komencos al ni kaŭzi malfacilaĵojn, tiuj koncentrejoj tuj ricevos
siajn loĝantojn.“

Kune ni priridis tion kiel bonan spritaĵon, sed tio estis nenia ŝerco. Ekzistis longaj listoj
de la nomoj – inter ili estis ankaŭ kredantoj – kaj tiuj personoj devis esti rapide arestitaj
ĉe la unua indico de ribelo. Mankis nur la ordono el Moskvo. La malliberejoj, kaŝitaj en
nealireblaj montoj, atendis siajn loĝantojn. Tio plenigadis min per fiero. Nia partio estas
singardema kaj antaŭenplananta! Nikiforov elprenis sekretan dokumenton, kiun li ricevis el
la kontraŭreligia centro de Moskvo. Ĝi enhavis precizajn ordonojn, kiel trakti kredantojn,
la instrukciojn por ampleksa kontraŭreligia kampanjo en ĉiu urbo, en ĉiu vilaĝo kaj civito
de Sovetunio. Speciale instruitaj homoj devis pere de filmoj, propagandiloj, broŝuroj, prele-
goj, ekspozicioj, mallonge helpe de ĉiuj eblaj rimedoj disvastigi ateismon kaj kontraŭbatali
kredon je Dio.

Nur kiam mi vidis ĉiujn tiujn ĉi dokumentojn kaj parolante pri ili kun Nikiforov, mi
konsciis pri freneza klopodo de la partio venki minacantan danĝeron de la religio. Verdire
mi estis ŝokita. „Sed tio devas kosti fantazian monon!“ mi ekvokis. „Tion sciu, ke jes,“
respondis Nikiforov. „Vi ja bone scias, kiom nin kostas nur via grupo. Kiel mi diris al vi, ni
havas du malamikojn: la usonajn imperialistojn kaj kredantojn, kiuj ĉion subfosas. Ĉiukoste
ni devas ilin teni sub kontrolo. Ili estas danĝeraj precipe tial, ke rapide kreskas ilia nombro.
Nur en Kamĉatko estas 30 mil da ili el la entuta nombro da 250 mil enloĝantoj!“ – „Tio
signifas,“ mi kalkulis, „ke verŝajne la tutaj milionoj de la kredantoj kontaĝas nian nacion.“

„Vi pravas. Kaj komunismo neniam povos triumfi, ĝis kiam ne ŝanĝiĝos ilia opinio, aŭ
se ni ilin ne sendanĝerigos. Malfermite mi diras al vi, mi preferas tion duan.“

„Sed kion kun kredantoj, kiuj asertas, ke ili rajtas praktikadi religian liberecon?“ mi
demandis.

„Tio estas en nia konstitucio nur tiel, ŝajnage. Sed vi kaj mi estas maturaj homoj. Ni
konas realecon.“

Mi ekmemoris pri unu interparolo kun kredanto, kies mi estis arestanto.

„Kial ni estis arestitaj?“ demandis la kredanto.

„Ĉar ĉe vi estis trovita kontraŭsoveta literaturo.“

„Ja tio estas nura Biblio!“

Nikiforov eksiblis: „Mi ja pri tio parolas, vi frenezulo!“

„Kiel povas la Biblio esti kontraŭsoveta literaturo?“ respondis kredanto, kiu antaŭe estis
bategita. „Ja nia registaro mem parolas pri tio, ke estas eldonataj Biblio. Kiel do ili povas
esti kontraŭsovetaj?“

Mi estis scivolema, kion Nikiforov respondos.

„Tio ne estas vero!“ li ekkriegis. „Nia registaro neniam permesus presi Bibliojn.“

„Sed jes. Ili jam estis presitaj. Almenaŭ tion ili diras.“

„Fermu buŝon,“ respondis Nikiforov por ĉesigi demandojn.

Pli poste mi eksciis, ke la registaro fakte permesis presigi dek mil Bibliojn, sed nur por
eksterlando kiel pruvo de tio, ke en Sovetunio regas la religia libereco. Kvin mil estis ven-
ditaj al rusparolantoj en eksterlando, pluajn tri mil ricevis komunistaj landoj en Eŭropo kaj
proksimume du mil estis senditaj al kontraŭreligiaj organizaĵoj en Moskvo – por studo kaj
ateisma propagando. Eĉ ne unu atingis manojn de la simpla kredanto en Sovetunio. Kaj tio

estis kaŭzo, kial ili posedis nur kontabanditajn aŭ permane skribitajn Bibliojn.

Kiel komsomola gvidanto en la akademio mi ofte aŭdis pri kamarado Orlov, prezidanto de la komunista partio de Kamĉatko. Li venis ĉi tien kiel partia sekretario dum regado de Stalin kaj baldaŭ li estis konata sub la kromnomo „malgranda Stalin“, ne nur pro tio, ke li dum lia regado trabatalis sin ĝis kaploko, sed li similis al li eĉ per siaj praktikadoj kaj metodoj. La kamarado Orlov apartenis al 200 plej altaj funkciuloj de Sovetunio. Mi tre respektis kaj admiris lin. La unuan fojon mi renkontis lin la 22-an de aprilo 1970, kiam okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de nia patro kaj fondinto Lenin okazis kongreso. Partoprenis ĝin ĉefaj funkciuloj el la tuta Kamĉatko inkluzive de junulargvidantoj, kiuj devis esti por la ĉefaj pli aĝaj kamaradoj prezentitaj kiel estontaj komunistaj gvidantoj. Eĉ mi estis invitita kiel honora gasto. Mia grupo estis elektita kiel la plej bona en Kamĉatko kaj mi kiel ĝia gvidanto devus ricevi la plej altan personan ordenon, kiun povas ricevi junulara funkciulo. Mi ja eĉ sidis sur la tribuno kun la kamarado Orlov kaj aliaj partiaj gravuloj, kiun mi jam ofte aŭdis, sed ankoraŭ neniam vidis. Super la tribuno pendis grandega portreto de Lenin. Mi estis nervozema kaj emociita. Tian solenaĵon ne travivis Kamĉatko jam longajn jarojn! La televido rekte elsendis la kongreson.

Mi estis prezentita kiel la plej bona gvidanto de la junulara organizaĵo. Antaŭ tio mi estis petita, ke mi preparu mallongan alparolon. Kaj tiel mi havis kvaronhoran ekzaltan alparolon pri la venko de komunismo. Mi prezentis detalan raporton pri mia laboro kaj informis pri miaj planoj. Ni plu servos al nia partio, eĉ pli bone ol ĝis nun. Mi finis per promeso, ke nia grupo devoligas sin al ankoraŭ pli altaj atingoj. „Mi promesas al vi ĉe la sankta memoro pri Lenin, ke la ĝisnuna aktivado estis nura komenco.“ Ĉiun vorton mi opiniis tute serioze.

Sekvis tondra aplaŭdo. Kamarado Orlov elsaltis por brakumi min. Li ordonis alporti ruĝan standardon, kiu estis tiuokaze sendita el Moskvo, kaj li solene ĝin transdonis al mi. Mi kisis ĝin kaj dum aplaŭdo de la delegitoj mi per ĝi ĉirkaŭvolvis mian korpon. Tio estis forta momento de mia vivo. Ĉion elsendis televido. Kiam silentiĝis aplaŭdo, la kamarado Orlov diris: „Junaj viroj, kiel estas Dakov, estas brilegaj ekzemploj por la komunista junularo de Sovetunio. Ni devas ilin subtenadi, helpi ilin, ĉar, kamaradoj, tiu ĉi knabo kaj miloj al li similaj signifas estontecon de nia partio kaj patrujo!“ Mia kapo komencis turniĝi. Mi esperis, ke la televidkameraoj ne registris mian nervozemon. Mi estis fiera, kiel neniam antaŭe.

Post oficiala parto, paroladoj kaj honorigoj ni ĉiuj kolektiĝis en granda bankeda salono, kie la tabloj fleksiĝis sub pezo de manĝoj kaj trinkaĵoj. Multaj el la ĉeestantoj gratulis min. La plej gravaj funkciuloj – inter ili ankaŭ Orlov – ne estis kun ni. Ili foriris al la aparta manĝejo. Kiam mi finmanĝis, mi iom promenis en la konstruaĵo. Mi ne multe trinkis, atendis min ĉampionado de ĵudo. Kiam mi iris en la koridoro, subite malfermiĝis pordo kaj antaŭ mi staris kamarado Orlov! Tute hazarde mi troviĝis antaŭ la manĝejo, en kiu estis la plej superaj partiaj funkciuloj. Orlov, malgraŭ tio, ke li jam estis sufiĉe ebria, min ekkonis. Li prezentis al mi manon dirinte: „Kamarado Dakov, bonvolu eniri!“

Nedecideme mi haltis. Tie ĉi ne estas mia loko. Sed Orlov kaptis mian ŝultron kaj enirigis min internen. Estis tie ĉirkaŭ dudek pli aĝaj partiaj funkciuloj. Ŝajnis, ke la tabloj ne estas kapablaj teni tiom da manĝoj kaj trinkaĵoj. Estas bone, ke ili havas apartan manĝejon, mi pensis ĉe ekvido de salamoj, kaviaroj, greka vino kaj aliaj bongustaĵoj. Estis tie ĉio. Mi centrigis okulojn al tiu ĉi malŝparado. Por ili oni ne surtabligis la samon, kiel por ni.

Orlov senkulpigis sin kaj ŝanĝeliĝinte li eliris por serĉi necesejon. Dum li forestis, mi

ĉirkaŭrigardis. Mi vidis la komunistajn ĉefulojn tute ebriiĝintajn. La kapojn ili havis metitajn sur la tablo, tri havis ilin metitajn sur la teleroj kun restaĵoj de la manĝoj. Elsub longa tablo elstaris du paroj de piedoj. La aliuloj ankoraŭ drinkis, unu viro kuŝis surtable kun manoj kaj piedoj en grandaj pladoj kun manĝaĵoj. Mi rigardis ĉion malestime. Mi iniciatis devis kadetoj pro multe pli malgrandaj deliktoj forlasi la akademion. Kun teruro mi ekpensis – tiuj ĉi homoj havas la tutan vivon de Kamĉatko subigitan kaj kontrolantan. Kaj nun ili estas ebriaj, ke ili eĉ ne scias, kiel ili nomiĝas. Mi vidis „eliton“ de la komunistaj funkciuloj, kiuj tute ne plu aspektis kiel homoj. Unu el ili privomis mian veston. Kaj rigardo al li vekis en mi abomenon kaj naŭzon.

Orlov revenis. Li sidigis min apud si. Senĉese li drinkis. Li estis ĉiam pli ebria, la kapon li ne plu kapablis rekte teni. Fine li kliniĝis per la kapo rekte sur la plenan teleron. Li levis la kapon dirante: „Donu al mi buŝtukon!“ Li viŝis sian vizaĝon, sed sur la mentono kaj la nazo restis dispremitaj terpomoj. Li sakris ĝis montoj verdiĝis. Tio estis nepriskribebla vido! La manĝestaĵoj el la vizaĝo faladis sur lian veston kaj ordenojn.

Poste li suprenfaldis pantalonubon montrante al mi longan cikatron el milito. Kun balanciĝanta kapo li diris al mi: „Ĉu vi vidas, kamarado Dakov? Por tio mi povas danki al tiu bastardo Stalin! Li min sendis en militon. Li uzadis niajn korpojn kiel armilojn. Al Stalin mi povas pro tio danki kaj kiam la cikatro doloras, mi malbenas lin!“

Ebriiĝinta li unue malbenis Stalinon, poste li rememorigis ankaŭ aliulojn. „Ne nur Stalin, tute ne! Kio do estas Breĵnev? Flatservemulo, sentaŭgulo, troestimulo, kiu ĉirkaŭŝvebis Stalinon kiel vespo ĉirkaŭ mielo. Nur tiel li transvivis iĝinte ĉefo de la partio! Mi aŭdis lin paroli dum la kongreso en Moskvo. Li ŝafblekas, bé, bé, bé! Unu vorton kiel alian, kiel ŝafo!“

Mi ne kredis al miaj propraj oreloj! Sed Orlov daŭrigis per la strata ĵargono en la priskribo de sia „kolego“ Breĵnev. Mi konsternite retrorigardis, ĉu eble tion ne aŭdis ankaŭ la ceteruloj? Se jes, tio estas mia fino! Sed ŝajnis, ke tio neniun interesas. Iliaj okuloj vidis nur drinkaĵon. Kaj la kamarado Orlov, jam ankaŭ en la alia mondo, perdiĝis kun blekado en vorttumulto. Mi ne nur timis la ceterulojn! Se Orlov rememoros, kion li diris al mi, mia vivo estis perdita. Li ne povus permesi al si, ke mi vivu. Sufiĉus nur unu lia vorto kaj mi malaperus porĉiame el la sceno – tian potencon li havas. Mi ekrigardis lin. Lia kapo falis sur la tablon. Mi supozis, ke li ekdormis. Subite li rektigis sin, disĵetante la brakojn li diris: „Komunismo estas la plej malbona malbenaĵo, kiu iam trafis la homaron!“ Li kapbalancis balbutante. „Komunismo estas... „ Ŝanceliĝanta li ekvokis: „Komunistoj estas hordo da vampiroj!“ Mi elkuris el la ĉambro kiel pafita kaj kurante surkoridore, nur for, for, plej rapide hejmen! Kelkajn tagojn mi vivis en nepriskribebla timo.

Ĝis tiu tago mi estis sincera kaj firma adepto de komunismo. Neskueble mi kredis je ĝia instruo kaj celado. Ofte la kadetoj demandis min, kial la vivo en Rusio estas tiel malfacila. Ĉiam mi respondis al ili: „Nun ĝi ankoraŭ estas malfacila, sed ni konstruas pli bonan morgaŭon!“ kaj fakte mi tion kredis. Mi vidis multajn kontrastojn inter la instruo de la komunismo kaj realo, sed mi estis certa, ke temas pri eraro aŭ pri persona malforteco kaj ke vere ni direktas al pli bona estonto.

Sed la renkontiĝo kun Orlov kaj la ceteruloj montris al mi la veran paĝon de tio, je kio mi kredis. Do tiaj estas vere niaj gvidistoj, senkoraj, rigoraj, cinismemaj kaj nekredantaj tion, kion ili heroldas. Ili nur kredas je tio, pro kio ili povas profiti.

Mi konsciiĝis, ke por ili nenio mankis, dum la vivo de simplaj homoj estas mizera kaj malfacila! Mi vidis grandegan abismon inter promesoj de komunistoj kaj realeco. Ĉion mi pravigis per la vortoj: „Hodiaŭ ni devas alportadi oferojn, por ke ni morgaŭ fartu pli bone!“ Sed nun mi iĝis atestanto de io por mi nekredbla. Kaj mi decidis, ke se tiuj homoj ne kredas al sistemo, sed nur ĝin eluzas por sia kariero, mi tion same praktikados. Se tiu Orlov eĉ ne iomete kredas je komunismo, kial mi je ĝi kredu. Kiam li estis sufiĉe ruzlerta kaj rafinema por akiri tiel altan postenon, kial mi ne povus ĝin ankaŭ atingi. Mi kreskis en tiu ĉi sistemo kaj mi trovas en ĝi vojon kiel la ceteruloj. Mia idealismo – malgraŭ erarigita – tiuvespere – okaze de centjara datreveno de la naskiĝo de Lenin – mortis.

Ekde tiu momento mi havis antaŭ miaj okuloj ununuran celon: atingi gvidlokon! Kiam la ludo postulis cinismon kaj senskrupulecon, do mi agos laŭ tiuj reguloj. Kaj mi ludos mian taskon pli bone ol Orlov aŭ kiu ajn alia. Mi servos al komunismo, ĉar nur tiel eblas atingi karieron.

XVI.

Post la dua eksonoro mi levis aŭdilon. Aŭdigis sin Nikiforov: „Mi havas por vi grandan aferon, Dakov. Venu kun vi almenaŭ dekope. Estu ĉe mi precize je la oka kaj duono vespere.“ Li ne atendis respondon pendiginte la aŭdilon.

Ĝenerale estis sufiĉe malfacile kolekti pli ol dek knabojn, sed tiutage povis disponigi sin eĉ dek kvar. Kiam mi venis kvaronhoron post la oka al la policejo, iuj jam tie atendis. „Kio okazas?“ ili demandis. „Kien ni hodiaŭ iros?“

Mi foriris al Nikiforov por ekscii tion.

„Okejanskaja-strato 66,“ li diris. Ni aliris al la mapo. Li montris vojkruciĝon malantaŭ tri domblokoj de ĉi tie. „Plej bone estos, se vi tie parkigos la aŭtomobilon kaj restantan vojparton vi piediros.“

Tiun ĉi kvartalon mi bone konis.

„Estas tie ĉiam movplene,“ mi diris. „Lastatempe ni jam tie estis kelkfoje. Certe ili nin tie tuj ekkonos.“

„Vi ja havas soldatan ekzercadon! Aŭ ĉu mi eraras?“ respondis energie Nikiforov. Tio signifis: apliki armean taktikon!

„Bone,“ mi diris rigardante la mapon.

„Du virojn mi starigos ĉi tien kaj la trian malantaŭ tiun ĉi domangulon. Tie ni blokos kaj povos haltigi irantojn.“

„Bonege!“

„Kiom da kredantoj vi atendas?“

„Dek kvin.“

„Ĉu vi havas ankoraŭ pluajn ordonojn?“

„Kiel ĉiam,“ li diris. Li donis al mi paperon kun nomoj de du viroj, kiujn ni estis devintaj alkonduki.

„Tiujn mi bezonas.“

„Kaj kion kun la ceteruloj?“

„Ĉu kun la ceteruloj?“ li ektondris. „Ĉu mi tion al vi speciale priskribu? Donu al ili batregalon! Por ke ili konsciiĝu, ke tiuspecajn aktivadojn ne valoras organizi!“

„Kiam ili komencos?“

„Je la deka. Klopodegu tie esti je la deka tridek!“

Mi foriris en la socian ejon. La ceteruloj drinkis kaj spritaĵoj sekvis unu post la alia.

Maturiĝis tempo por foriro. Kiam ni estis foririnta, mi ekkriis al Jurij: „Bone atentu, kion vi faras, antaŭ ol vi uzos la gumklabon!“ Jurij ekridis: „Bone, Sergej!“

Ni kunprenis gumklabojn kaj katenojn. Ankaŭ tiuj ĉi estis speciale pretigitaj. Ju pli la viktimo post ilia surmeto kontraŭ ĝi baraktis, des pli ĝi kuntiriĝis kaj la akraj feraj dentoj profunden dolorige sin enpikis en la pojninojn. Foje mi ĝin nur tiel prove por amuzo elprovis, sed tuj mi petis, ke ĝi estu deprenita. Dum razioj kontraŭ kredantoj ni ilin ofte uzadis.

Kun sirensono kaj eklipsa lumsignalado ni traveturis urbon kiel frenezuloj, ĉiu trafiko devis haltiĝi. Antaŭ la celo ni malrapidigis veturon kaj ĉesigis sirensnadon. Komence de Okejanskaja-strato ni parkigis aŭtomobilon. Mi difinis gardistojn. „Vi du fermos straton ĉi tie kaj vi du sur la kontraŭa fino. Neniu povas trairi. Ĉu vi komprenas?“

Nikiforov ordonis al ni aresti ĉiujn irantojn. Lastatempe do kelkfoje okazis, ke la krio de la kredantoj allogis multajn scivolemulojn. Ni dispelis ilin, sed jam estis malfrue. Kiam tion Nikiforov eksciis, li uragane furiozis. Li ordonis, ke tio neniam dum kiaj ajn cirkonstancoj povas ripetiĝi.

Post momento ni staris antaŭ domo numero 66, en kiu estis nenion antaŭsentantaj, preĝantaj kredantoj. La domo estis neokulfrapa, malgranda, kiel plimulto de la domoj ĉi tie. Elsub la pezaj kurtenoj trapenetradis malintensa lumo. Mi destinis gardistojn antaŭ la fenestrojn kaj la enirejon. Post longa kontraŭdirado, ke „ili nenion ĉeestos“, ili foriris al la difinitaj lokoj. Mi diris al ili, ke ili povos eniri, kiam la „amuzo“ estos en plena fluo. Ni ceteraj singardeme alŝteliĝis al la pordo. Post lasta certigo, ke ĉiu okupis sian lokon, mi ekkriis: „Nun!“ kaj mi puŝbatis la pordon, kiu tuj malfermiĝis. Interne surgenuie preĝis dek kvin kredantoj, ili silente preĝis kaj kantis. Ili pro teruro ŝtoniĝis koncentrinde konsternitajn rigardojn al ni nekredantoj. Ili sciis, kio sekvos. Sed kelkaj daŭrigis preĝadon kaj tri aŭ kvar eĉ mallaŭte kantis. Tiuj homoj estas vere eksterordinaraj, mi ekpensis. Mi devis vole-nevole admiri ilian kuraĝon, duaflanke ili vekis en mi furiozon.

„Kion vi faras ĉi tie?“ mi ekkriis.

„Ni preĝas,“ iu respondis.

„Al kiu?“

„Al Dio.“

„Neniu ekzistas, vi stultuloj,“ mi ekkriis. „Ĉu vi ankoraŭ konstante tion ne scias? Vi preĝas al nudaj muroj. Kie estas NUN via Dio? Alvoku lin por helpo!“ Ni puŝis ilin preparante nin tiel al la atako. Poste unu el ni svingis per gumklabo kaj tio jam komenciĝis. Vladimir kaptis iun maljunan viron kaj tiel forte batis lian vizaĝon, ke li forflugis ĝis la angulo de la ĉambro kaj tie li restis kuŝanta en sangoflako. Anatolij, kiu volis same agi, kaptis la duan viron batante lin kruele kiel vangofrapatan pajacon. Poste li finbategis lin per bato sur buŝon. La kredantoj, kiujn ni ankoraŭ ne kaptis, kuradis en la ĉambro strebante kaŝi la Bibliojn kaj la ceterajn librojn. Mi ekrimarkis ilian intencon kaj mi ekkriis. „Forprenu de ili la Bibliojn!“ Sergej Kanonenko sovaĝe svingis tranĉilon en la aero. La timkonsternitaj kredantoj strebis eviti ĝian klingon. Jurij kaptis harojn de iu majuna virino, renversis ŝian kapon malantaŭen kaj batis ŝian kolon. Tute silente ŝi falis teren.

Subite mi ekvidis maljunan viron, kiu provis forkuri. Mi kaptis lin volante bategi lian kapon. Sed li sukcesis turni sin flanken. Tio furiozigis min ankoraŭ pli multe kaj denove mi

eksvingis manon. Tiumomente iu de malantaŭe ekkaptis mian manon kaj petegante ekkriis: „Ne batu lin, mi petas, li ja estas maljuna homo!“ Ekscitite mi turniĝis. Malantaŭ mi staris du junaj kredantoj, eble dek ok kaj dudek unu-jaraĝaj. „Ĉu vi volas al mi ordoni, kion mi faru?“ mi ekkriis. „Tuj vi vidus!“ mi ekkriis al Boris kaj Jurij: „Prenu tiujn ĉi du kaj montru al ili, ke ili ne rajtas ion ordoni al ni!“ La vizaĝoj de la junuloj post batoj ŝanĝiĝis je sanga kaĉo.

Sergej intertempe elprovis sian tranĉilon kontraŭ iuj virinoj. Ili kriis tenante siajn koksojn. Unu bategita kaj sanganta maljuna viro provis ekstari. Juris alsaltis al li kaj per peza ŝuo ankoraŭ foje piedbatis liajn ripojn. Aŭdiĝis krako, la maljunulo faligis sin sur la kokson tordiĝante pro doloro. Nenio – nek homoj nek meblaro – eskapis nian detruemon. Ni disbatis ĉion, kio aperis antaŭ niaj manoj. Tiu, kiu disponigis sian domon por tia renkontiĝo, tiu devis kalkuli pri tio, ke li ĉion perdos. La domo post kelkaj minutoj ŝanĝiĝis je budo. Sub meblaj ruinoj kuŝis kredantoj, unuj senkonsciaj, aliaj en neeldireblaj doloroj.

Viktor Matvejejev kaptis unu knabinon en la momento, kiam ŝi provis eskapi en la duan ĉambron. Ŝi estis belulino. Kia vaneco, mi pensis. Li kaptis ŝin, levis super la kapon kaj momenton ŝin tenis en la aero. „Mi petegas, ne, mi petegas! Dio helpu nin!“ ŝi ĝemkriis.

Viktor ŝin batis kontraŭ muron. Ĝemeganta kaj duone svenanta ŝi falis teren. „Mi vetas, ke la kredo je Dio elflugis el ŝia kapo!“ li elvokis ridetante. Sed mi pensis pri tio, kiel bela ŝi estas. Domaĝe, ke ni ne renkontiĝis dum aliaj cirkonstancoj... „Prenu librojn!“ mi ordonis. Ni serĉis la Bibliojn kaj la ceteran literaturon. Al unu maljuna virino mi el la manoj eltiris lernejan kajeron, en kiu estis skribitaj kelkaj versikloj el la Skribo. Ŝi estis svenanta kaj konstante plendanta: „Kial? Kial?“ Tio ne estis demando, sed pli prefere doloriga ĝemado, elfontanta el ŝia animo. „Kial?“

„Prenu tiujn du!“ mi montris al iliaj gvidantoj, kiujn mi ekkonis laŭ la priskribo de Nikiforov. „Alkonduki ilin al aŭtomobilo!“ Ni ceteraj dume kopiigis datumojn el personaj legitimiloj de la kredantoj. Mi prenis legitimilon de tiu ĉi belega knabino. Ŝi nomiĝis Nataŝa Zdanova. Eksterordinare ŝi interesis min. Kaj kiam mi nun konis ŝian nomon, ne estis problemo ŝin trovi.

Nian servon ni plenumis, estis necese malaperi. Ĉe la pordo mi ankoraŭfoje rigardis returnen por ekvidi nian laborrezulton: kaoson de bategitaj korpoj, disbategitajn tablojn kaj seĝojn, disbategitan kuirvazaron kaj sangajn makulojn surmure. Ni plenumis bone la laboron.

Dumvoje al la policejo mi komencis al la arestitoj meti demandojn. Sed unue demandis ili: „De kie vi pri ni eksciis?“

„Kion vi pensas, vi idiotuloj? Ni havas niajn informantojn. Trovi vin, tio estas por ili tia plej facila afero en la mondo!“ Estis videble, ke tio evidente ilin ne surprizis.

„Vi ja invitas homojn al via komunumo aŭ ĉu ne?“ mi daŭrigis. „Se vi ne volas esti malkaŝitaj, kial vi tion faras?“

„Tion vi ne komprenas,“ respondis la sekreta pastoro. „Ni scias pri la denuncantoj, tiel malsaĝaj ni ne estas. Sed nia devo estas inviti aliajn homojn al Dio. Tial ni ne povas resti nur inter ni. Ni scias, ke inter ni estas ankaŭ denuncantoj, ni scias, ke niaj renkontiĝoj estas riskaj.“ Por momento li eksilentis. Mi opiniis, ke li finis, sed li daŭrigis: „Ni kredas, ke alkonduki al Dio aliajn homojn estas pli grava ol nia propra sekuro.“

Kiaj frenezuloj ili estas, mi ekpensis. Ĉu do tiuj minacas nian landon?!?!

Dum en la policejo arestitoj estis esplordemanditaj, ni sidis kaj drinkis. Anatolij kaj Vladimir bone amuziĝis. „Domaĝe, ke tio ĉiam daŭras nur tiel mallonge, „ kun bedaŭro diris Vladimir. „Eĉ ne forte ni bategas kaj ili jam falas!“ Tiu, kiu liajn batojn vidis, tiun tio ne mirigis. „Tio estas tre nekomplika,“ li daŭrigis. Se ili almenaŭ unufoje rezistus kaj kontraŭbatalus.“ Sed la kredantoj neniam defendis sin. Ili nur provadis kaŝi sin, sed neniam redonis baton.

„Bonege, miaj junuloj!“ ekvokis Nikiforov, kiam mi al li priskribis pason de la razio.

Post tri tagoj ni denove sidis en la laborejo de Nikiforov atendante eventualajn anoncojn pri la sekretaj renkontoj. Tiam ni estis ok. Proksimume je la sepa vespere eksonoris telefono kaj tuj poste ekaperis ekzaltita Nikiforov.

„Tuj ekveturu!“

„Kien?“ mi ekdemandis kaj dum tio mi antaŭsentis novan aventuron.

„Nagornaja-strato.“

Li diris al ni domnumeron. Aŭ iu konstatis ion suspektindan aŭ la denunco devenis de la denuncanto – la renkontiĝo jam iun tempon estis daŭranta. „Elŝaltu sirenon,“ mi ekkriis, kiam ni proksimiĝis al la celo. En Nagorna-strato ni elsaltis el la aŭtomobilo pli frue ol ĝi haltis, kuris al la domo kaj elpuŝis pordon. Surprizis nin, ke ni tie trovis nur junajn homojn. Tuj ni eklaboris – bati, bategi, disrompadi, kripligi kredantojn.

„Tiu estas li! Kaptu lin!“ mi tondre ekkriis kaj mi montris al dudek tri-jaraĝa gvidanto. Iuj al li tuj alsaltis komencante lin bategi. La ceteruloj prizorgis restantojn. Mi trarigardis ĉambron – nekredante al propraj okuloj! Denove ĉi tie estis ŝi! Tio ne eblas! Ja eĉ ne antaŭ tri tagoj ŝi estis forte batita kontraŭ la muron. Sed jes, estis ŝi! La unuan fojon mi povis ŝin bone rigardi. Ŝi estis ankoraŭ pli bela ol mi ŝin memoris. Ŝi havis longan, helan hararon, grandajn blujajn okulojn kaj subtilan haŭton – unu el la plej belaj knabinoj, kiun mi iam vidis.

Ankaŭ Viktor ŝin ekkonis elkriante: „Denove ŝi estas ĉi tie! Knaboj rigardu, ŝi denove venis!“

„Verŝajne pasintfoje vi en ŝi ne vekis bonan impreson!“ mi diris. „Nun estas mia vico!“

Mi ĵetis ŝin vizaĝe sur la tablon kaj deŝiris el ŝi vestaĵon. Unu el ni ŝin forte tenis kaj mi komencis ŝin bati, kiel forte mi nur povis. Post momento min jam komencis dolori manplatoj, sed mi daŭrigis batadon. Nataŝa dolorĝemis, strebante malĝojege superi ploron. Por subpremi elkriojn ŝi tramordis sian lipon, ĝis sur ĝia mentono elfluis la sango. Fine ŝi tion ne eltenis kaj komencis plori. Kiam mi pro laciĝo eĉ ne povis levi manon, mi puŝis ŝin el la tablo. Senkonscie ŝi falegis planken. Ŝia dorso estis ununura malfermita sanganta vundo.

Ankaŭ ceteraj kuŝis surplanke en terure detruita ĉambro. Miaj homoj denove faris bonegan laboron. Ne estis kaŭzo pli longe ĉi tie restadi. „Rapidu! mi ekvokis. „Notu iliajn nomojn kaj ni forveturu!“

Nikiforov nin bonvenigis staranta en la pordo kun malica kaj samtempe bonvolema rideto: „Nu, miaj junuloj, mi vidas, ke vi rapide laboris!“

„Ĉi tie estas tiu, kiun vi volis,“ mi diris puŝinte al li la gvidanton de la renkontiĝo. Nikiforov tuj lin prenis malsupren por „konversacio“. Mi trarigardis la liston de la ceteraj nomoj. Simplajn kaj maljunajn homojn, kiuj estis per religio infektitaj ankoraŭ dum antaŭkomunisma erao, mi komprenis, sed ke ankaŭ la junaj homoj kredas je Dio, tio estis por mi tro! Tio min perpleksigis. Sed al tiu knabino mi donis multon por ekmemoro: „Kamarado,

multon vi en via papavkapeto ne havas,“ mi mokincitis Viktoron, „sed ekmemoru, la Dormantan Belulinon ni ne plu ekvidos!“

La sekvan tagon mi venis al Nikiforov en la momento, kiam li demandisploris junan homon, kiun ni pasinttage arestis. Mi estis fascinata per lia esplordemandanta metodo. Li alternigis brutalan timigadon kun subita bonkoreco kaj amikeco por elirigi la kredantojn el ekvilibro.

„Ĉu vi kredas je Dio?“

„Jes.“

„Ĉu vi estas tiel stulta kaj limigita aŭ simple nenormala?“

La juna viro al li respondis: „Sinjoro kapitano, vi neniam ekkomprenas, kial mi kredas kaj je kio mi kredas. Tio ne estas io, kion oni povas detale ekspliki. Mi kredas je Dio, ĉar li ĉeestadas en mia koro.“

Furiozo ekposedis Nikiforov. „Kial mi devus tion kompreni? Ĉu vi volas diri, ke mi estas stulta! Ankaŭ mi legis tiun tie kuŝantan libron,“ kaj li montris al forprenita Biblio. „Aŭ vi eble opinias, ke mi ne scipovas legi?“

La juna homo respondis firme: „Vi scipovas legi. Sed por tiu ĉi libro vi bezonas okulojn, kiuj vidas, orelojn, kiuj aŭdas kaj koron, kiu komprenas, kion diras Dia Spirito.“

Mi aŭskultis kun granda intereso, sed liajn vortojn mi simple ne komprenis. Estis tio por mi tro komplika.

„Se vi legas la Biblion tial, ke vi ĝin ataku, neniam vi ĝin komprenas. Nur Dio povas al vi malfermi okulojn, por ke vi ekkonu, je kio ni kredas kaj kial ni estas volemaj por la kredo pagi kian ajn prezon.“

Nikiforov interrompis lian parolon: „Mi devas rekonii, ke ĉion mi ne komprenas.“

„Sinjoro kapitano, vi mem respondas vian demandon. Vi ne komprenas tial, ĉar vi fermis okulojn antaŭ la vero. Se vi malfermus vian koron al Dio kaj per viaj okuloj sincere serĉus en la Skribo veron, vi komprenus ankaŭ lian vorton kaj ĝi fariĝus por vi realeco kiel por mi kaj por multaj ceteruloj. Kial vi ne volas malfermi vian koron al la vorto de Dio? Dio ŝanĝos vian vivon kaj...“

„Fermu buŝaĉon!“ eksplodis Nikiforov. „Fermu busaĉon, stultulo, aŭ mi ŝanĝos vian vivon, kaj porĉiame!“

La juna viro estis sendita por kelkaj jaroj en laborlagon. Mi estis atestanto de multaj similaj esplordemandadoj, sed mi ne alskribis al ili iun signifon. Tiuj kredantoj simple ne ŝanĝiĝos, tio estas senespera, ili ja eĉ provas policanojn konvertigi! Mi konsentis kun Nikiforov, ke ili estas frenezuloj.

Sed mi volis ion scii pri Nataŝa Zdanova. Tio estis nenia problemo. Nia komsomola organizaĵo posedis detalajn informojn pri ĉiuj junaj homoj de la ĉirkaŭaĵo. Nataŝa naskiĝis en Ukrainio, en la vilaĝo Baĥnaja, ne malproksime de Donecko. Ŝiaj gepatroj laboris en kolĥozo estante tre malriĉaj. La filinon Nataŝa ili sendis al onklo en Petropavlovsko, kie ŝi frekventis lernejon de Maksim Gorkij n-ro 4. Kiel dek-ok-jara ŝi iĝis korektistino en redakcio de „Petropavlovsko Vero“. El registraĵo mi eksciis – por mia mirego – ke kiel lernantino ŝi estis membrino de Komsomolo, kaj kun alta noto. Post la fino de la lerneja studado ŝi konatiĝis kun kredantoj kaj baldaŭ ŝi fariĝis unu el ili – bona ekzemplo, kiel allogadi homojn en siajn venenitajn retojn.

Mi vizitis redakcion de „Petropavlovsko Vero“ por demandi pri Nataŝa. „Ŝi estas elstara

laborantino,“ diris al mi ŝia superulo. „Neniam kun ŝi estis iaj problemoj. Ŝi estas amikema, fidinda kaj ĉiam ŝi redonas senmankan laboron.“ Tiaj prijuĝoj ĉiam elpuŝis mian spiron. Kun la aliaj homoj estis ĉiam problemoj pro la alkoholo, ŝteloj, mallaboremo aŭ nekapableco. Sed pri la kredantoj mi ĉiam eksciis nur solan laŭdon. Tio tre mirigadis min.

„Kial vi tion volas scii?“ mi estis demandita.

„Dufoje ni ŝin kaptis dum sekreta renkontiĝo de la kredantoj!“

Ili ektimis ekrigardante terurigitaj unu la alian. Kvazaŭ mi al ili dirus, ke ŝi estas lepromalsana.

„Nu, kiam vi tuŝis tion,“ diris unu el ili – kaj plendoj komencis elŝutiĝi unu post la alia. Subite ili havis por ŝi neniun bonan vorton. Al Nataŝa mi en ŝia laborejo lasis sciigon, ke ŝi min vizitu en la policejo. Mi sciis, ke tia vizito timigos ŝin, kaj tion mi volis.

Ŝi eniris heziteme sidiĝinte kontraŭ mi. Mi vidis, ke ŝi timas. Tia belulino, mi ekpensis. Kaj ĉi tie ŝi sidas kun klinita kapo, kun rigardo fiksita teren. Mi demandis ŝin, kial ŝi estas kredantino.

„Kaj kion mi devus esti? Ĉu alkoholulino? Prostituitino?“

Kaj poste ŝi metis al mi demandon: „Ĉu vi ricevis pri mi en mia laborejo iujn malbonajn informojn?“

„Tion ne,“ mi konfesis.

„Kial vi do havas objektojn kontraŭ la kredo? Ĉu mi per tio al iu damaĝas?“

„Ne,“ mi respondis. „Sed vi faris eraran paŝon kaj vi alviciĝis al la homoj, kiuj estas por nia lando tre danĝeraj.“

Emfaze mi admonis kaj avertis ŝin pri grandaj malfacilaĵoj, se ŝi ne obeos.

Tio ne timigis ŝin. Mi memorigis al ŝi, ke ĉiuj ĉi tiuj deliktoj estas notitaj en ŝia persona prijuĝo kaj ke ŝi pro propra intereso ne plu venadu inter la kredantojn.

Spite al okulfrapa timego ŝi kun mi interparolis pri tio, kial ŝi kredas je Dio. Mi opiniis, ke la bategoj kaj alvoko al la polico ŝin deturnos de tio kaj ŝi ne plu kaŭzos al ni malfacilaĵojn. Sed Nataŝa estis maksimume rimarkinda knabino.

Mi rimarkis sur ŝia suba lipo profundan cikatron – la rememoron pri la vespero, kiam mi bategis ŝin. Domaĝe, mi ekpensis, ne plu tio estas tia tute sendifekta vizaĝo. Kial ni nur ne renkontiĝis dum aliaj cirkonstancoj! Ŝi tre plaĉis al mi.

Strikte mi ŝin delasis. Tio apartenis al mia timiga metodo. Mi gratulis al mi pro bone farita laboro.

Proksimume post la semajno ni devis likvidi renkontiĝon de la kredantoj en Pograŝno. Estis ni nur ses, krom gardantoj, kiuj fermis la straton.

Ok ŝokitaj kaj timigitaj kredantoj kurmoviĝis en la malgranda ĉambro strebante eviti duŝbatojn. Tio estas bagatelo, mi ekpensis. Kiam tiumomente – disinjoro – mia rigardo trafis la konatan vizaĝon! Nekredeble – Nataŝa! Mi ne estis sola, kiu ekrimarkis ŝin. Aleksej al ŝi proksimiĝis kun malamikeca rigardo kaj preparita gumklabo.

Tiumomente okazis io nekredibla! Viktor saltis inter ilin kaj arogeme li rigardis Aleksejon.

„Foriru el mia vojo!“ ekgrumblis Aleksej. Viktor eĉ ne moviĝis. Li levis gumklabon dirante: „Ne provu ŝin tuŝi! Neniu povas kontraŭ ŝi levi manon! Neniu!“ Mi opiniis, ke min iluzias mia aŭdpovo. Ĉu ĝuste Viktor, kiu apartenis al la plej gravaj brutuloj en nia grupo, ŝirmas kredantojn?!?!

„Reen!“ li ekkriis al Aleksej. „Aŭ mi kvietigos vin!“ Nataŝa kaŭris surtere.

Aleksej furiozante elkriis: „Vi volas ŝin havi nur por vi, ĉu?“

„Ne! El ŝi elradias io, kion ni ne havas! Neniu ŝin tuŝu! Neniu!“ kriis Viktor.

Mi devis tion finigi. Ardanta kaj temperamenta Aleksej estis preparita al interbatado kun Viktor.

„Tie, sur la alia flanko, Aleksej,“ mi ekvokis montrante al kredanto volanta forkuri. Li ekkuris al li kaj mi faciliĝinte elspiris.

Viktor ankoraŭ momenton ŝirmis Nataŝa-n kun disetenditaj brakoj – li estis korpigita averto al ĉiuj, kiu volus alproksimiĝi al ŝi. Nataŝa ne komprenis, kio okazas. Ion tian ŝi ne atendis. Mi signis al ŝi, ke ŝi malaperu. Kiam ŝi kuris eksteren, mi donis signon al la ceteruloj, ke ili vidu, ke mi konsentas kun ŝia foriro kaj ne malhelpu ŝin.

Tio estis unu el malmultaj momentoj en mia vivo, kiu min tiel profunde tuŝis. Nataŝa en si vere havis ION, kio al ni tute mankis. Plej volonte mi ŝin postkurus por ŝin demandi: „Kio estas tio?“ Mi volonte kun ŝi pri tio parolus, sed ŝi senespere forestis. Tiu ĉi heroa kristana knabino, kiu tiel multe suferis pro ni, min kortuŝis kaj samtempe profunde maltrankviligis.

Nataŝa baldaŭ revenis al Ukrainio, ĉar la vivo en ŝia laborejo iĝis por ŝi netolerebla. Ŝian personan prijuĝon mi sendis al Komsomolo en Bacana kune kun detala raporto pri ŝia kristana mondkoncepto.

Ŝia foriro min ĉagrenigis. La unuan fojon mi havis opinion kaj konvinkon, ke tiuj homoj tamen ne estas perpleksuloj kaj malamikoj de la ŝtato, je kiuj mi ĉiam ilin opiniis esti. Nataŝa enportis en miajn imagojn dubojn pri ili.

XVII.

La 1-a majo en Sovetunio estas ne nur la tago de la solenoj kaj armeaj defiladoj, sed ankaŭ la tago, kiam homoj vizitadas tombejojn por meti la florkronon kaj florojn sur la tombojn de parencoj kaj amikoj.

La 1-an de majo 1970 aŭdigis sin pertelefone ekscitita voĉo de Nikiforov: „Dakov, prenu akademian muzikbandon kaj iru al la suda tombejo!“ Ŝajnis al mi, ke li troigas. Ĉu kun muzikbando al la tombejo? Ĉu li freneziĝis?

„Kio okazas?“ mi demandis, esperante, ke el mia paroltono li ne elsentos dubojn.

„En la tombejo amasiĝis multaj kredantoj eĉ kun orkestro kaj ili tie ludas kantojn!“

„Kaj ĉu ni helpu al ili?“

„Ne estas tempo por ŝercoj!“ li incitite respondis. „Iru tien plej rapide, starigu vin apud ili kaj ludu tiel laŭte, kiel vi tion kapablos!“ Do tion ĉi li volas, ke ni superbruu ilian kanton! Estis tio ja freneza ideo, sed same amuza. Mi devis tiujn rafinitajn kredantojn admiri. Kolektiĝi en la tombejo en tia eventoriĉa tago estis vere bonega ideo. Ili kredis, ke tien venos centoj da homoj kaj ke ni ilin ne kuraĝos aresti. Ili estas bando ruzega!

En la tombejo ni trovis proksimume 200 kredantojn. Multaj ĉirkaŭirantoj haltis sin aŭskultante ilin. Malrapide ni al ili irebligis la vojon. Se la vizitantoj de la tombejo volas aŭskulti muzikon, do ili ĝin havos! Ni starigis nin tuŝapude de la kredantoj kaj je mia ordono ni plenlaŭte ekludis armeajn kantojn. Baldaŭ ni ilin superbruis.

„Pli laŭte!“ mi kriis. „Pli laŭte! Ni devas ilin superbruegi!“

Ni ludis naciajn himnojn, Internacionalon kaj pluajn komunistajn kantojn. Superbruegi „konkurencon“, tio por ni estis ludo. La ceteruloj fotografis kredantojn, por ke ni povu ilin

pli poste identigi. La tutan tempon mi interne furiozis. Ni estis senpotencaj, antaŭ tiom da atestantoj ni povis nenion fari. „Ne afliktigu vin tio, Sergej,“ diris Viktor. „La kalkulon ni finkvitigos pli poste. Grave estas, ke ni scias, pri kiuj temas.“

Kiam ni ĉiujn fotografis, mi ordonis paki muzikilojn kaj foriri. Mi firme enkapigis al mi, ke la venĝo ne evitos ilin. La okazo prezentiĝis tre baldaŭ kaj unu razio postsekvus la duan. Dum multaj ne tiel temis pri arestadoj, kiel pri forpreno de literaturo eldonita eksterlande aŭ pri Bibliojoj permane skribitaj. Ofte mi metis al mi demandon, kiel tiuj sensignifaj skribaĉoj povas prezenti la danĝeron por la soveta ŝtato. Mi vidis en tio nenian danĝeron, sed Nikiforov tion senĉese gurdis. Do, mi opiniis, se li volas havi literaturon, li ĝin havu! Kaj ni trovadis ĝin multe. Ofte ni enmanigis al ni iun broŝuron, multobligitan en Ukrainio, kelkmil kilometrojn for de ĉi tie. Kiam mi la unuan fojon ĝin ekvidis, mi ekpensis: do finfine ili komenciĝas organizadi!“

Ankaŭ Nikiforov permane prenis unu tian kajeron kaj furioze per ĝi tremis: „Ĉi tie! Ĉu vi vidas? Ili kontaktiĝas kun kredantoj en Baku, en Ukrainio, en Kievo, Leningrado, ĉie! Estas tio sekreta societo por subfosado de nia sistemo!“ La neleĝa literaturo estas nemalhavebla konsistaĵo de la vivo en Sovetunio. Ne nur kristana literaturo, sed eĉ verkoj de konataj verkistoj, kiun oni ne rajtas publike eldonadi, ekzemple la libroj de Aleksander Solĵenicin. Ĉar la registaro plej severe kontrolas ĉion, kio devas esti presita, en la tuta Sovetunio granda kaj bone funkcia organizaĵo disvastigas manskribaĵojn de la malpermesitaj libroj, noveloj kaj rakontaĵoj.

Spite de severaj malpermesoj tiuj ĉi libroj ankaŭ estis popularaj inter soldatoj kaj kadetoj de nia bazo. Mi sciis pri tio kaj multajn el ili mi legis. Ekzemple libroj de Solĵenicin iris el mano al mano. Nun mi eksciis, ke la kredantoj komenciĝis tiel same sin organizi. Ili disvastigis bibliajn versiklojn permane aŭ per skribmaŝino skribitajn. Ni eĉ trovis kelkajn novajn Bibliojojn de la poŝformato el eksterlando. Mi sciis, ke en Moskvo ekzistas speciala sekcio, kiu okupiĝas pri inspektado de la kontrabandado de la Bibliojoj al Sovetunio kaj ĝi serĉas eblojn tion malebligigi. Mi ne sciis, el kio konsistas ĝia laboro, sed sukcesa ĝi ne estis.

Mi vidis en la kristana literaturo nuran sensencaĵon, iujn partojn mi provis legi, sed mi ne komprenis, kio en tio povas esti tiel grandioza. Kial al ili tiuj kredantoj tiel adheras? En miaj okuloj tio havis neniun valoron.

Iun tagon en la jaro 1970 denove min vokis Nikiforov por veni al la policejo: „Ĉi tie! Rigardu, kion ni ĉi tie havas!“ li diris, kiam mi eniris lian laborejon. Li montris al mi primitivan gazeton, kiun la kredantoj eldonadis helpe de sekreta multobligilo.

„De kie vi tion havas?“ mi demandis lin.

„De nia denuncanto,“ li diris ekscitiĝe. „Kaj li ankaŭ donis al ni informojn, kie ni povas trovi pli da tiaj aĵoj!“

Por Nikiforov, ĉasisto de homoj, estis la plej bela momento de lia vivo esti sur paŝosignoj de la kredantoj. Tiun ĉi entuziasmon mi ne dividis kun li. Mi volis fari karieron en la partio, bone perlabori – kaj ĉe tio ĉiam pli multe labori por la polico. Do fine tiu ĉi profesio ŝajnis al mi pli alloga ol ĉe maristaro.

„Iru ĉi tien, Dakov,“ diris Nikiforov. „Mi ion al vi montrós.“

Ni proksimiĝis al la mapo. Ĉi tie ĝi estas, Partizana strato 64.“

„Kiu tie loĝas?“ mi demandis.

„La kredantino Anenĉenkova, vidvino kun pli juna filino. Pli aĝa Marija eble dudek

du-jara, loĝas aliloke. Mi pensas, ke la vidvino la aĵojn kaŝis ĉi tie,“ li frapetis mapon, „aŭ ĉe Marija.“

„Kiam ni tien iru?“

„Morgaŭ posttagmeze.“

„Kiom da homoj?“

„Kvar sufiĉas. Ni ne povas elspezi tiom da mono,“ li diris ekridinte al tio kiel al bona ŝercaĵo.

La ĉasoj de literaturo okazadis iom diference ol surprizatakoj de la sekretaj renkontiĝoj de la kredantoj. Por ŝajnigi leĝecon uniformita policano iris al la domo, kie devis okazi traserĉo de la domo. Surstrate li haltigis tri aŭ kvar „kamaradojn“ petante ilin, ke ili iru kun li kiel atestantoj. „Hazardaj irantoj“ kvazaŭ rigardante lian laboron, sed poste neniu povis diri, ke la polico ion ŝtelis. Por ni tio kompreneble estis granda ŝercaĵo. Sed formon ni devis observi!

Kaj tiel mi elserĉis uniformitan policanon, kiu devus gvidi la domtraserĉon. Ni lin bezonis nur ŝajnige, ĉar mi respondecis pri la tuta agado antaŭ Nikiforov. Ĉiuj kvin ni enaŭtiĝis kaj veturis al la angulo de la stratoj Limregiona kaj Partizana, alte sur la altaĵo. Ĉi tie ni el-aŭtiĝis kaj ni kvar „nenion konjektantaj irantoj“ iun parton de la strato piediris. La policano parkigis aŭtomobilon antaŭ la domo kaj frapis la pordon. Malfermis por li ĉirkaŭ kvardek kvin-jara virino.

„Mi ricevis ordonon traserĉi vian domon,“ li diris. „Ni ricevis atentigon, ke vi posedas neleĝan literaturon.“ Poste li mansignis al ni. „Tiujn ĉi stratirantojn mi petis, ke ili surbaze de leĝo ĉeestu kiel atestantoj.“

Kion alian povus la virino fari ol nin lasi eniri en la domon? La domo estis malgranda, la ekipaĵo malriĉa, tipa por kredantoj. Estis klare, kial ili vivis tiel malriĉe. Kiam evidentiĝis, ke iu kredas je Dio, li plej ofte estis forigita el laborloko kaj fine li povis praktikadi nur tiujn plej malbonajn laborojn, tre mizere salajritajn.

„Ĉirkaŭrigardu ĉi tie, diris al ni policano. Ni flankenmetis taskon de „neinteresiĝintaj vojirantoj“ kaj ni komencis serĉadon.

„Ĉu vi estas kredantino?“ mi demandis virinon.

„Jes,“ ŝi diris. „Mi kredas je Dio. Sed neniu literaturon mi havas.“

„Tion ni esploros,“ mi akre respondis.

„Mi estas kredantino. Se vi volas, do arestu min.“

Mi ekrigardis ŝin. Kiajn parolojn ŝi eldiras?! mi ekpensis. Ni malfermis ŝrankon, kofron kaj ĉion ni elĵetis planken. Ni malkudris kusenojn, distranĉis matracojn kaj la tutan domon ni renversigis, disbatante ĉe tio la tutan meblaron. „Ĉi tie estas nenio!“ mi ekkriis. Poste mi ekpensis, ke la literaturo povus esti kaŝita sub la planko, kiel mi iam en Bariŝevo kaŝis pafilon. La policano havis hakilon kaj levumilon. Ni komencis el la planko elŝiradi unu plankotabulon post la alia. Unu el ni saltis en la kavon kaj ĉion traserĉis helpe de poŝlampeto. Sed li ankaŭ nenion trovis. „Iru supren!“ mi diris, „ŝajnas, ke ĉi tie vere estas nenio. Ni iru!“

Koleriĝintaj ni foriris postlasante malordon. Ŝi tion ordigu, kiel ŝi tion kapablas! Ni pro tio tute ne sentis konscienciproĉojn. Plendi pro tio ĉe polico? Polico ja estis ni. Turni sin al pli alta instanco? Ni ja ricevadis ordonojn de ili. Ili povis fari tute nenion, ni tion bone sciis, kaj tial ni tiel misagis kaj detruis.

Kiam ni al Nikiforov raportis pri nia malsukceso, li diris enpensiginte: „Pri tiu afero

io fiodoras. Mi scias, ke la vidvino havas ion komunan kun disdonado de la libroj al kredantoj.“

„Eble ili estas ĉe ŝia filino, ĉe tiu, kiu kun ŝi ne loĝas.“

„Sed tiun la patrino certe jam avertis,“ mi diris.

„Kompreneble,“ kapjesis Nikiforov, „kaj ŝi estos atentema. Mi jam tion scias!“ li ekkriis post momento.

„Vi du,“ li montris al Viktoro kaj al mi, „vi ŝin allogos en kaptilon. Vi vizitos ŝin prezentante sin kiel libertempantaj maristoj. Vi komencos interparoli kun ŝi, kaj poste nur tiel hazarde vi rimarkos, ke vi dezirus ion ekscii pri Dio. Tiuj ĉi limigitaj kredantoj tion rakontas volonte al ĉiuj, se ili volas ilin konvertigi.“

„Bonega ideo!“ Entuziasmigita per tiu ĉi ŝanĝo en nia laboro mi ĝojatendis, kiel ni ŝin kaptos. Nikiforov rigardis sian sliparon kaj post kelkaj sekundoj li diris: „Ŝi nomiĝas Marija Anenĉenskaja.“ Li diris al ni ŝian adreson kaj pluajn detalojn. „Ŝi laboras en la vendejo de legomoj, kiu estas fermata je la sesa vespere. Atendu ŝin, de tiu ĉi momento tiu ĉi afero estas en viaj manoj!“

Mi foriris kun Viktor el la polico iom antaŭ la kvara. Ni havis nur du horojn liberajn por fari planon, kiel ŝin allogi en kaptilon. Ĉirkaŭ la duonhoron antaŭ la sesa ni iris al la bushaltejo, kie ŝi eble post duonhoro devus elaŭtobusiĝi.

„Aŭskultu,“ mi diris al Viktor, „ni estas fiŝistoj, kiuj antaŭ nelonge revenis sur kontinenton. Surmare ni travivis akcidenton, preskaŭ ni droniĝis kaj sub influo de tiu ĉi travivaĵo ni komencis pensi pri Dio. Kaj nun ni estas ĉi tie por ŝin demandi, ĉu ŝi povas al ni per iu literaturo helpi trovi la vojon al li. Certe tion ŝi ekkredos. Post kiam ŝi literaturon elprenos, ni arestos ŝin. Estas tio simpla, kial ni maltrankviliĝu?“

„Grandioza,“ diris mirante Matvejejev. Niaj taskoj tre plaĉis al li. „Sed ne komencu la aferon tro rapide por ne vekti malfidon en ŝi.“ Ankoraŭ momenton ni staris ĉe kiosko apud la bushaltejo. Post kelkaj minutoj haltis aŭtobuso, el kiu eliris Marija. Facile ni ekkonis ŝin laŭ fotografajo, kiun donis al ni Nikiforov. Ni iris al ŝi. Por ke ni povu ĉion konvinke aktori, ni antaŭe fortrinkis kelkaj pokaletojn da vodko.

„Hej, belulino! Ĉu ni povas vin dum parto de via irvojo akompani?“ mi diris gaje.

„Ne, mi dankas,“ respondis Marija malvarme.

Mi ekrigardis ŝin. Malgraŭ simpla aspekto ŝi estis alloga. Iu digneco ĉirkaŭis ŝin.

Viktor metis sian manon sur ŝian dorson dirante: „Iru, malgranda. Ĉu ni povus ĉe vi iomete trinki kaj poste iri danci? Iru, ni faros al ni belan vesperon!“ Kiam ni ne ĉesis entruĝi, ŝi embarase diris: „Ne, mi dankas. Mi ne trinkas kaj mi ne volas ien iri.“ Ĉiurimede ŝi strebis liberigi sin de ni, sed ni ne cedis. „Ni vere volas nur iomete interparoli, eltrinki kelkajn glasetojn kaj iomete amuziĝi. Ni ja estis sep monatojn sur vasta maro!“

Ŝajnis, ke ŝi vere ne scias, kion fari.

„Vi ja jam trinkis,“ ŝi fine diris.

Esperante, ke mi fine disrompos glacieron, mi respondis: „Jes, ni havas tian malgrandan problemon, sed tute ni ne scias, kiel solvi ĝin. Kial ni do ĉesu trinki? Kio poste ankoraŭ restos el nia vivo?“

Tiamaniere mi donis al ŝi la unuan instigon komenci parolon pri Dio, sed ŝi tute ne reagis. Kaj tial ni daŭrigis: „La tutan vivon ni pasigis surmare. Niaj gepatroj kaj pragepatroj estis kredantoj. Ankaŭ ni jam kelkfoje pensis pri Dio, sed vodko restas la plej bona amiko

de la maristoj.“ Ŝi sin turnis exploreme, kvazaŭ ŝi volus ekscii, ĉu ni vere estas tiuj, pri kiuj ni nin prezentas. Intertempe ni alproksimiĝis al fendeta dometo. „Ĉi tie mi loĝas,“ ŝi diris. „Kaj mi devas jam iri.“ Por momento ŝi restis staranta en pordo. Ni ne rezignis. „Kaj kiel vi do nomiĝas!“

„Marija,“ ŝi respondis. Marija malfermis pordon kaj ni sekvis ŝin sen ŝia invito. Interne estis du malgrandaj, sed puraj ĉambretoj. Ni sidiĝis. „Kiu fine povas doni respondon pri la senco de la vivo?“ mi diris post momento, opiniante min pli ebria, ol ni fakte estis. „Al la demando pri Dio kaj similaj aferoj? Tio superas mian fiŝistan racion!“

Nenio. Mi ĵetis rigardon al Viktor por duondiri: Tio estos malmola nukseto! Viktor elprenis botelon da vodko, kiun ni havis kaŝitan kaj starigis ĝin sur la tablon. „Alportu trinkglasetojn, Marija,“ mi diris. Kiam ŝi por momento eliris el la ĉambro, Viktor sin klinis al mi dirante: „Ŝi tute ne estas malsaĝa, ĝuste male. Se ni volas ŝin trompi, ni multe kaj multe devos klopodi pri tio. Kion vi opinias, ĉu ŝi scias, ke ni estas el la polico?“

Antaŭ ol mi povis respondi, ŝi revenis. Mi diris al ŝi: „Marija, vodkon ni jam fortrinkis. Estu tiel afabla kaj alportu al ni el la vendejo botelon da ĝi. Mi petas!“ mi ekridetis al ŝi. Ŝajnis al mi, ke ŝi iom-post-iome komencas kredi al nia elpensita historieto.

Tuj, kiam ŝi foriris, ni elsaltis komencante serĉi. Ni traserĉis ĉion eblan, ŝrankon, liton, sed nenie io. Se ŝi iujn librojn posedas, ŝi ilin havas bone kaŝitajn. Ĉion ni zorgeme redonis sur sian lokon por ne vekti ian ajn suspekton. Ni trovis eĉ ne unu suspektan papereton. Viktor gardis fenestron. „Sidiĝu, Sergej, ŝi jam revenas!“

Post kelkaj minutoj ŝi antaŭ nin starigis botelon da vodko. Mi vidis, ke ŝi intertempe iom trankviliĝis kaj mi estis certa, ke ŝi ekkredis nian mirrakontaĵon. Nerimarkinte mi ĵetis rigardon al Viktor. Ni trinkis rekte el la botelo kaj mi tre detale kaj pleniĉe rakontis, kiel ni ŝipveturis al Japanio, de tie al Vjetnamio, laŭ kalifornia marbordo ĝis Kanado kaj Havajaj Insuloj. Viktor plenforte retenadis ridon. Poste mi ĵetis rigardon al Viktor, ke li anstataŭu min kaj li parolu. Li parolis ne malbone, sed mia rakontaĵo ŝajnis al mi esti pli bona.

Nikiforov al ni en sia kutima antaŭvidemo donis multan monon, kiun ni nun fiere montradis, kvazaŭ ni forlasus ferdekon kun kelkmonata salajro en la poŝoj. „Iru kun ni,“ mi diris, „ni havas multe da mono. Ni bezonas iom amuziĝi. Iru, ie ni manĝos kaj trinkos.“

Kaj mi rakontis, kiel mi falis el ferdeko kaj preskaŭ mi droniĝis. Kaj kiel mi vid-al-vide eksciis, ke en la vivo devas ekzisti io pli. Mi komencis pensi pri Dio. Sed kiel lin trovi? Kaj tiu ĉi demando ekde tiam ne lasas min trankvila. Viktor dume per ĉiuj fortoj strebis ne ekridi. „Kiam nia ŝipo ankrigis en haveno, mi akiris decidon, ke tiu ĉi travivaĵo estis avert-signaloj kaj ke Dion mi devas trovi.“

Mi turnis min al ŝi kaj plej serioze ekrigardis ŝin. „Sciu, ni jam demandis pliajn homojn, sed neniuj kapablis al ni ion diri pri Dio. Ĉu vi ion scias pri li? Ĉu vi havas iun libron aŭ gazeton, kiuj helpus al ni trovi Dion?“ Nun tio estis ekstere. Kiel ŝi reagos? Malsaĝa ŝi certe ne estis. Ŝi respondis tiel: „Se vi tiel serioze serĉas Dion, kial vi drinkas, kial vi detruas vian vivon per alkoholo?“

La demando estis bone celita. Do mensforta knabino! Sed ja unu virino ne superos min. „Vodko estas bona akompananto, se la homo estas sola,“ mi diris. „Sed se mi trovas Dion, certe mi ĝin ne plu bezonus. Sed kiel lin trovi? Ŝajnas, ke tion neniuj scias.“

Momenton mi ankoraŭ daŭrigis en similaj aludoj donante al ŝi eblon, por ke ŝi interrompu min kaj diru, ke ŝi estas kredanta aŭ ke ŝi pruntedonos al mi iun literaturon. Mian

sentimentalan paroladon mi finis per vortoj: „Ho, ke mi trovu iun, kiu al mi montrus vojon al Dio aŭ almenaŭ al mi pruntedonus iun literaturon pri li! Kion mi por tio al li donus!“

Mia rigardo renkontiĝis kun tiu de Viktor. Ĉu ŝi sidiĝos sur nian gluon? Nun ni jam ŝin havas! Nur kiam ŝi elprenos literaturon, ni arestos ŝin kaj alkondukos al Nikiforov.

„Mi havas neniun literaturon,“ ŝi fine diris. „Sed mi opinias, se vi vere sincere serĉos Dion, foje vi lin trovos.“

Mi kun Viktor ekrigardis nin. Estis klare, ke ni malvenkis. Jam tie ni havas nenion por fari. Kaj tiel ni ekstaris, ekdeziris al Marija per iom ebria voĉo „bonan nokton“, kaj dankinte pro ŝia afableco ni foriris. Unue ni pri la tuta tiu ĉi komedio ridis, sed poste mi eksakris: „Kion ni diros al Nikiforov?“ Antaŭ ol ni de li foriris, li diris, ke por ŝi kaj ŝia patrino atendas du prizonaj ĉeloj. „Nur alportu al mi pruvojn kaj ni ilin ambaŭ arestos. Tiel nia tasko plenumiĝos.“ La ĉeloj de Nikiforov restos malplenaj. Ni sciis, ke li furiozos! Ni ne eraris. „Unu idiota stultulino superruzis vin!“ li kriegis. Li ne kapablis tion kompreni. La vidvino Anenĉenkova kun la filino Marija tiuvespere elglitiĝis el liaj manoj. Sed liberaj ili certe longe ne restos.

„Dakov,“ diris iun tagon al mi Nikiforov, „via trupo apartenas al la plej bonaj en la lando. Laŭ informoj el centro vi plenumas vian laboron pli bone ol plimulto de la ceteraj trupoj.“

Liaj vortoj ĝojigis min. Tiu ĉi laŭdo kaj ankaŭ mia sukcesa aktivado en Komsomolo havis gravan signifon por mia kariero. Tiu, kiu en Sovetunio volas atingi superan pozicion, tiu devas esti eminenta, devas havi fidindan kaj politike sendifektan prijuĝon. La instigado de Nikiforov min irigis al la unuaklasaj atingoj. Kaj miaj homoj volonte alkonformiĝis al la eskalanta brutaleco.

Iufoje ni surprize atakis grupon da kredantoj en iu domo en periferio de Petropavlovsko. Kelkajn minutojn antaŭ nia alveno iu devis ilin averti, ĉar kiam mi svingante la gumklabojn enpuŝis la pordon, tri el ili jam estis forkurantaj kaj la ceteraj sin preparis por forkuro. Senskrupule ni ilin faligis teren kaj bategis. Estis tie ankaŭ unu blankhara maljunulo, kiu ne povis rapide moviĝi. Aleksandr Guljajev kaptis lin, turnis lin kriante: „Atentu, grandaĝulo!“ La maljuna viro nur silente movis lipojn. Certe li preĝis. „Ĉu vi do volas paroli kun Dio?“ ekkriis Aleksandr. „Mi do tion al vi instruos, sed eble vi pli volonte volos al li iri!“ Forte mi skuigis lin, bategis lian talion kaj nukon. La maljunulo post tri tagoj mortis sekve de vundoj.

Sinsekve ni ellaboris por ni certajn ekstrapajn manierojn por traktado kun kristanoj. Kiam ni volis razion rapide realigi kaj la arestitojn plej rapide venigi al la polico, ni uzis tiel nomatan „rapidan metodon“. Kiam ni deziris ekzerci bokson kaj ĵudon, ni elektis „malrapidan agmanieron.“

„La rapida metodo“ konsistas antaŭ ĉio el karato-batoj kaj ĵudo-manipulado. Viktor kaj Vladimir, niaj majstroj de bokso, precize scias, kiel kaj kien bategi por la kredantojn paralizati per la unua batego. Kiam ĉiuj kuŝas surtere, ni fortrenas gvidanton en la aŭtomobilon, el personaj dokumentoj de la ceteruloj ni kopiigas ĉiujn bezonatajn datumojn kaj revene forveturas. En la policoficejon ni forportas konfiskajon kaj transdonas arestitojn, kaj poste plej rapide ni vizitas iun drinkejon aŭ klubon. Ĝuste la „rapida metodo“ kaŭzas al la kredantoj la plej gravajn vundojn. Post unu razio mortis du virinoj. Mi eksciis tion, kiam mi dum iu juĝagado kontraŭ unu patrino devis atesti, kiu ne volis permesi, ke ŝia filino portadu

insignon de Komsomolo. Ŝi estis akuzita, ke ŝi estas kontraŭrevoluciulino kaj malamikino de la ŝtato. La juĝisto alvokis ŝin, ke ŝi ekskuzu sian sintenon. Ĉe tio ŝi rakontis, kiel ŝia onklino mortis kaŭze de bategoj, kiujn ŝi ricevis fare de „brutalaj policistoj“ – tiel ŝi nin nomis. „Kaj mi decidis, ke ĉar mia onklino mortis pro la kredo, mi ŝiahonore ankaŭ praktikados tiun konvinkon. Kaj mi ne permesos, ke mia filino portadu insignon de tiuj, kiuj senigis la onklinon de la vivo!“

La juĝtribunalo la aferon sekretigis, sed ekzistis pluaj pruvoj, ke pere de niaj kruelaj kontraŭkredantaj razioj mortis pli multaj personoj. Ofte ni la kredantojn pli grave vundis, ol ni intencis, kaj tiuj aŭ mortis aŭ ĝisvive restis kripluloj. Ofte sian fiverkon faris tranĉilo de Sergej Kanonjenko. Sed nin tio tute ne ĉagrenigis. Ju pli sanga epizodo okazis, des pli el-kore al ni Nikiforov gratulis. La raportoj pri vundigoj aŭ mortigoj estis sendataj al Moskvo, sed eĉ ne unufoje ni de tie ricevis ian riproĉon.

Niaj razioj iĝis ĉiam pli kaj pli brutalaj. Eksterordinare ili trafadis pli aĝajn homojn, kiujn ni bategis kruele, kvazaŭ oni disrompas malnovan meblaron. Ni faris neniun diferencon inter viroj kaj virinoj. Nikiforov ofte diradis: „Ĉu eble la murdistino estas pli malmulte danĝera ol la murdisto?“ Per tio li al ni duondiris, ke ni agu kontraŭ ĉiuj egale.

Nia moralo dekadencis ĉiam pli kaj pli. Malrapide mi komencis observi, ke nia perfortemo ne limigis sin nur je certaj sferoj de mia vivo. Ĉiam pliforte ĝi enpremis sigelon al ĉiu mia penso kaj faro. Mi komencis observi ankaŭ ŝanĝojn en la maniero de la gvidado de Komsomolo kaj en interrilatoj kun soldatoj kaj kadetoj. Tion ekobservis ja eĉ kelkaj el miaj homoj. Unu el ili al mi iun tagon diris: „Sergej, vi fariĝas brutala. Kio al vi okazis?“ Tiu ĉi demando min elreligis. Sergej, kio al vi okazas? Senskrupuleco kaj brutaleco, kiuj priregis min dum razioj, iĝis neapartigebla konsistaĵo de la tuta mia vivo. Fakte plej okulfrape tio evidentiĝis en mia laboro de la gvidanto de Komsomolo. Pli antaŭe mi al kadetoj helpadis forstreki iliajn deliktetojn kaj erarojn, por ke li povu daŭrigi studadon. Nun estis por mi tute egale, ĉu estas iu eksigita aŭ ne kaj lia kariero porĉiame perdita. Komence la ŝanĝon de mia karaktero mi ne konsciiĝadis, sed pli poste mi ĉiam pli kaj pli eksentadis iun nedefinitan korporemon, kies kaŭzon mi ne konis. Sed mi ne havis tempon ĉion tion ĉi bone pripensi, la policagadoj sekvis unu post la alia.

Kun proksimiĝanta somero de la jaro 1970 kredantoj evoluigis novan defendan metodon. Ili dividiĝis je pli malgrandaj grupoj, renkontiĝante maksimume sep aŭ dek homojn. Se ni volis kapti tiom da kredantoj kiel antaŭe, ni devis pligrandigi nombron de razioj. La kredantoj iĝis pli singardemaj ankaŭ aliflanke. Ili komencis ekstere starigi gardantojn, ofte junulojn, kiuj ilin avertis ĉe kiu ajn eĉ malgranda danĝero. Per interkonsentita signo ili fulmrapide kaŝis ĉiun literaturon kaj magnetofonajn sonbendojn, sur kiujn ili surbendigadis eksterlandajn religiajn programojn. Iam la gardantoj ilin avertis tiel frue, ke ili disiris pli frue, ol ni venis.

La raporto pri nia kampanjo disvastiĝis tra la urbo, eĉ tra la tuta Kamĉatko. Inter loĝantoj oni komencis pri la razioj paroli. Tio ege furiozigis Nikiforov, ĉar li konstante nin avertis, ke neniun iĝu atestanto de niaj razioj por evitigi parolojn, ke en Sovetunio ne ekzistas religia libereco. Eĉ el Moskvo ni ricevis ordonojn, ke la razioj kontraŭ la kristanoj nepre devas resti kaŝitaj.

La plua malplezuriga aspekto de nia laboro estis impresoj, ke ju pli furiozece ni la kredantojn atakadis, des pli ili multiĝis. Nikiforov supozis, ke en Kamĉatko estas 30 mil kre-

dantoj kaj ni povis tion konfirmi. Ĉe pli ol 150 razioj, kiujn mi gvidis, malofte mi vidis iun dufoje. Nuraj novaj vizaĝoj, novaj kaj novaj kredantoj.

La kreskanta nombro da razioj iĝis ĉiam pli problemaj. Ni simple ne povis tion tempe plenumi. Ĉiam pli ofte oni aŭdis: „Hodiaŭ vespere mi ne povas partopreni du raziojn. Unun ni devas prokrastigi al venonta semajno.“ Sed finance tio estis tre avantaĝa. Se ni tie estis ok aŭ dudek, ĉiam ni ĉiuj ricevis po 25 rubloj.

Ekde la jaro 1970 inter la kredantoj ĉiam pli multiĝis junaj homoj. Ie ni eĉ trovis malgrandajn junulojn. En Moskvo tiun fakton oni opiniis kiel danĝeran „fenomenon“, kiun oni devas senkondiĉe likvidi. La granda intereso de la junaj homoj pri religio min maltrankviligadis. Mi estis konvinkita, ke mi bone konas sovetan junularon. Sed kial do sekrete renkontiĝadis ĉiam pli da gejunuloj, tion mi ne komprenis. Ili ja sciis, ke se ili vidigos sin, do tio signifas finon de ilia kariero. Ili naskiĝis en komunista ŝtato kaj ĉiam pli granda nombro da ili sin turnis al religio! Mi cerbumis pri tio, kio estas religio kaj kio la junajn homojn al la religio tiel allogas. Tre ofte mi pensadis pri Nataŝa. Kion ŝi en la religio vidis? Kion ŝi trovis en Dio, ke ŝi estis decidita sin lasi kripligi aŭ eĉ mortigi?

La ĉefaj agantoj el kontraŭreligia organizaĵo en Moskvo venis al Kamĉatko por okazigi ĉi tie specialajn seminariojn celantaj subigi tiun ĉi kulminan danĝeran evoluon. El interparoloj kun ili ni eksciis, ke la similaj problemoj aperas ankaŭ en la ceteraj partoj de Sovetunio. Mi ne povis ne kompari junajn kredantojn kun komsomolanoj, kiuj elkreskis kiel mi – de la infana aĝo akceptantaj komunistan instruon, kredante ĝin kaj pretante servi ĝin kun la tuta sindono. Sed nun ili komencis ekkonadi la vivrealecon, grandegajn kontrastojn inter komunistaj devizoj kaj realeco. Multaj el ili fariĝis cinikemaj kaj hardaj, aliaj serĉis elirpunkton en alkoholo.

Mi komparis tiun ĉi malplenan, obtuzantan vivon, plenigitan de perversa cinismo, al la vivo de junaj homoj, kredantaj je Dio. Estis tio akrega kontrasto. Kaj tiu en mi estigis rodantajn dubojn kaj demandojn.

XVIII.

En julio 1970 mi sidis en la policejo kune kun Anatolij, Vladimir, Viktor kaj pliaj. Ni atendis ĝis ni estos forkomanditaj. Nia laboro nur konsistis el planitaj razioj kaj preteca servo. Ofte ni pasigis en la policejo tutajn horojn kaj kompreneble ni por tio ricevadis altan salajron.

Tiutage al mi Nikiforov diris: „Dakov, iru ankoraŭ kun iu malsupren kaj bruligu konfiskitan literaturon, kiu tie amasiĝis.“ Konsekvence de oftaj razioj tie kolektiĝis tre baldaŭ amaso da religia literaturo. Ĝi estis tute senvalora, patetika, permane skribita aŭ presita sur la plej malmultekosta papero. Sed manuskripto estis la plej preciza, kiun mi iam vidis. Kiam mi havis antaŭ okuloj la tutan tiun ĉi amason, mi demandis enmense, se la kredantoj havas tempon ankaŭ por aliaj aferoj, se ilia ĉefa celo estas kopiigado de tiaj sensencaĵoj.

„Mi vetus, ke ilin ekposedis skribspasmo,“ ekvokis Viktor kaj volonte ni priridis tion.

Kune kun Vladimir ni iris malsupren. En la angulo apud fera forno staris tri grandaj lignaj skatoloj, du ĝisrande plenplenaj de la konfiskita literaturo. Ni eklaboris. Spite de fajro tie estis malagrabla malvarmo. Mi sendis Vladimir por alporti vodkon. Mi dume daŭrigis laboron bruligante plenmane la skribaĵojn kaj paperojn kaj mi observis, kiel tion ĉion konsumas flamoj. Tiu ĉi aĉaĵaro estis fakte uzebla por nenio alia. Kion nur vidis la junaj homoj

en tiuj ĉi sensencaĵoj? Subite mi ĵus ekmemoris pri Nataŝa. Kaj ekregis min granda scivolemo. Mi prenis el amaso iun malgrandan libreton eklegante ĝin. Estis tio permane skribita fragmento el la evangelio de Luko, plejparte la dek unua ĉapitro. Kelkaj versikloj mankis. Miaopinie ili tion skribis elmemore intermetante interspacetojn por pli posta kompletigo de la teksto.

Ofte mi en tiuj libroj foliumis, kiam ni revenis post razio al la policejo. Parte pro scivolemo kaj parte, ĉar mi ilin ne komprenis. Mi eĉ provis ilin legi, sed nenion mi kapablis trovi, kio havus sencon.

Mian rigardon altiris iu preĝo aŭ kio tio estis. Ĵus mi volis al ĝi pli bone koncentriĝi, kiam mi el la koridoro ekaŭdis paŝojn. Rapide mi elŝiris kelkajn paĝojn kaj enmetis ilin en la poŝon.

„Mi estas ĉi tie,“ diris Vladimir, montrante botelon da vodko. Sufiĉe multe ni trinkis daŭrigante en likvido de la kristana literaturo.

Vespere en la lito mi komencis legi. Jesuo interparolis kun iu instruante lin preĝi. Mia scivolemo kreskis, tial mi daŭrigis legadon. Al mia miro mi konstatis, ke tio enhavis nenion kontraŭŝtatan. Estis tie priskribite, kiel la homo povas iĝi pli bona kaj kiel estas necese pardoni al tiuj, kiuj al iu agis maljuste. Tiuj vortoj kaptis mian koron. Mi legis, legis, enprofundigita en la amikecajn vortojn de Jesuo. Liaj vortoj estis preciza malo de tio, kion mi atendis. Nekapableco ekkompreni, kiu nigrumis ne nur okulojn, sed ankaŭ racion – min subite forlasis kaj la legataj vortoj enskribiĝadis en mian animon. Kvazaŭ iu starus en la ĉambro kaj eksplikus al mi ilian sencon. Mi legis ilin denove kaj denove pripensante ilin. Do je tio kredis Nataŝa.

Tiuj vortoj kortuŝis min. Mi sentis kaoson kaj korpremon kiel iu, kiu erarvagas en nekonata konstruaĵo. Post kelkfoja tralego mi la tekston demetis, sed la vortoj, kiujn mi legis, senĉese kuŝis en mia kapo. Do tiuj vortoj faris Nataŝa-n pli bona, ili instigis ŝin helpadi al la proksimumoj. Ili verdire persekutis min. Tiun ĉi senton mi ĝis nun neniam ekkonis kaj ne travivis.

La vortoj de Jesuo min akompanis ankaŭ dum la sekvaj tagoj kaj semajnoj. Mi ne povis min senigi de ili, eĉ se mi diversmaniere pri tio klopodegis. Preskaŭ mi deziris, ke mi ilin neniam legu. Ili trafis en mian vivon kaj en ĝian stabiligitan ordon kaj komencis forpreni mian firman teron sub la piedoj. Subite ekregis min nekonataj sentoj, kiujn mi ne komprenis kaj tute mi ne kapablis ilin ekspliki al mi. Spite de ĉio – kvazaŭ altirata – mi dum sekvaj semajnoj senĉese revenadis al la evangelio. Mi komprenis ĝin nur parte, kvazaŭ mi provus vidi tra densa nebulo. Mi klare sciis, ke malantaŭ ĝi estas lumo, helo, sed mi ne povis trovi vojon, neniun apogbazon. Mi sentis min perdita.

Profunde en mia animo flagris flameto de humanismo. Mi sciis, ke mia ĝisnuna vivo ne akordiĝis kun miaj imagoj. Certe ne estis mia idealo bategi maljunajn virinojn. Al mia unua religio, komunismo, mi dediĉis min tute kaj senkondiĉe. En Bariŝevo estis tio ununura, je kio mi povis kredi. Sed mian infanan kredon ruinigis rigora realeco kaj anstataŭaĵon mi ne trovis. En tiu ĉi anima etoso nin trovis libertempo. Fine de julio mi forflugis al Novosibirsko. Dumvoje mi definitive decidis, ke mi ĉesos praktikadi la ĝisnunan manieron de la vivo. Mi simple ne plu povis tiel vivi. Malgraŭ tio, ke mi dume tute ne sciis, kion mi faru, mi precipe sciis, kion mi ne plu povas fari. Mi decidis forlasi Ruslandon. Io min senĉese al tio devigadis. En Novosibirsko mi aliĝis en la policoficejo kaj lasis tie mian adreson, por ke mi

estu dum la 24 horoj trovebla en la kazo de la arma alarmpreteco. Poste mi – sen la antaŭa permeso – forflugis al Moskvo. Tuj post la alflugo mi vizitis Maŭzoleon de V. I. Lenin, la sanktan lokon, kiun mi jam antaŭe vizitis.

Ankoraŭ konstante mi respektis kaj agnoskadis Lenin. Li estis eminenta viro – fondinto de la justa instruo – de egaleco de la homoj, la reciproka frateco, helpo kaj subteno al malriĉuloj. Pro tiuj ĉi celoj mi min plene iniciis al komunismo. Internigita en miajn pensojn mi eĉ ne rimarkis, ke min de la korprestaĵoj de Lenin dividas nur kelkaj metroj. Kio restis el tiuj intencoj pri „egaleco kaj frateco“? Ĉu estis tio egaleco de ĉiuj homoj, kiam mi tiel bategis la maljunan virinon, kiu post kelkaj tagoj mortis? Ĉu estis tio frateco, se mi tiel difektigis belulinon per batoj? Kio okazis pri idealoj promesantaj pli bonan vivon? Kelkajn minutojn mi silentante staris antaŭ la ĉerko de Lenin kaj en mia animo furiozis batalo. Kamarado Lenin, kial homoj tiel ege malproksimiĝis de via instruo? Kie okazis eraro? Mian animon plenigis grandega doloro. Kion ni faris el estonteco, pro kiu ni devus vivi? Kiel homoj povis tiel terure torddifektigi la instruon de Lenin? Mi opiniis, ke en lia ĉeesto kvietigis tiu terura ŝtormo en mia koro. Sed mi ne eksentis malpeziĝon. „Iru pluen,“ iu ekflustris. Mi eliris eksteren. Tio estis mia definitiva adiaŭo.

Forlasita, disreviĝinta kaj emociita mi travagadis stratojn de Moskvo. Mi estis totale konfuzita, sed unu aferon mi konsciis ĉiam pli klare: mi ne povas ĉi tie resti. Mi foriros tiel malproksimen, kiel tio nur eblos. Mi forvojaĝis al Lvovo kaj tie mi restis ĉe mia amiko, kiun mi ekkonis en Petropavlovsko. En la nigra merkato mi aĉetis subakvigistan ekipaĵon. Mi planis transnaĝi riveron Tison al Hungario kaj de tie trans iu ĉelima rivero en Aŭstrion. Tio estis tute freneza plano, sed mi estis definitive decidita fuĝi. Mi forveturis per taksio al iu urbeto apud la hungara landlimo. Al la ŝoforo mi diris, ke mi vidis orientan angulon de Ruslando en Siberio kaj nun mi deziras ankaŭ ekvidi ĝian okcidentan angulon. Ŝajne mia klarigo al li sufiĉis. Li forveturigis min al landlimo. Mi diris al li, ke mi mem revenos.

Sur la kontraŭa flanko mi vidis Hungarion. Ĉar tio ankaŭ estis komunista ŝtato, la landlimo ne estis tro severe gardata. Kiam mi detale observis senĉesajn patrolojn kaj gardturojn, estis klare, ke mia plano estas nerealigebla. Iu interna voĉo flustris al mi „Ne iru!“ kaj tial mi revenis en Lvovon. Tie mi elpensis novan planon. Mi forveturis al Jerevan, en la ĉefurbon de Armenio, kaj de tie perbuse al kamparo ĉe turkia limregiono. Mi iris nur nokte, dumtage mi kaŝis min. Sur la kontraŭa flanko staris armitaj patroloj. La tutan nokton mi atendis, sed la landlimo estis ĉiusekunde zorgeme gardata. Ankaŭ ĉi tie la forkuro estis tute nerealigebla. Ambaŭ provoj pri la nova vivo fiaskis. Kaj ĉar mia libertempo proksimiĝis al la fino, mi revenis al Petropavlovsko. En la animo mi havis grandegan kaoson.

XIX.

„Estu bonvenata hejme,“ ekkriis Nikiforov, kiam mi tuj post mia reveno venis anonci min al la polico. Se vi sciis, kion mi dum tiu tuta tempo planis, certe vi min tiel kore ne bonvenigus, mi ekpensis.

„Mi estas kontenta, ke vi denove estas ĉi tie. Atendas vin multe da laboro. Post nelonge vi denove streĉos viajn fortojn. Mi vetas, ke la monon vi bezonas, ĉu?“

Post nelonge sekvis unu razio post la alia. Malgrandaj grupoj de la kredantoj ĉiam pli ofte konsistis el junaj homoj. Dum demandesploradoj ili asertis, ke vere konvinkitaj kristanoj ili fariĝis antaŭ nelonge.

Nikiforov estis per zorgoj superŝarĝita kaj instrukcioj el Moskvo efikis alarmece. Spite de mia animstato mi evidentigis rilate al la kredantoj nek kompaton, nek grandanimecon, male – la malkontenteco kaj necerteco elvokadis en mi ankoraŭ pli grandan incitemon. Mi agis nediveneble kaj krude eĉ rilate al miaj homoj. La lastaj razioj, kiujn mi komandis, estis pli brutalecaj. Io – mi ne sciis, kio – devigis min al tio. Turmentantajn, neklarigeblajn sentojn kaj malamom mi elverŝis sur ĉiun, kiu baris mian vojon.

Iun oktobran vendredon de la jaro 1970 al mi Nikiforov sciigis: „Venu dimanĉe duonhoron antaŭ la dek unua kun la plej granda nombro!“

Mi ordonis al miaj kamaradoj, ke ili dimanĉe nepre estu hejme. Mi mem iris antaŭtag-meze al Nikiforov por ricevi de li informojn.

„Kiom da ili renkontiĝos?“ mi demandis.

„Dek kvin aŭ dek ses.“

Tio min surprizis. Jam longe ni ilin en tioma nombro ne surprizis. Sed mi havis je dispono dek homojn, tial ne devus ekesti iuj problemoj.

„Mi volas, ke vi ĉi-foje procedu iom alie. La kredantoj onidire kolektiĝos por preĝado jam duonhoron antaŭ la noktomezo, kiu povos daŭri ĝis la dua horo. Nur poste komenciĝos la propra renkontiĝo. Sendu tien iun kun magnetofono por surbendigi iliajn preĝojn. Mi volas ekscii, kiaintence ili preĝas!“

Mi diris al Jurij, ke li estu surloke duonhoron antaŭ la unua, do duonhoron post la komenco de la preĝado.

Per malgranda magnetofono li devas veni al ili plej proksimen kaj ĉion surbendigi. Kiam Jurij foriris, mi kunvokis la ceterulojn. Mi ne supozis, ke tio estos mia lasta razio.

Iom antaŭ la dua horo ni parkigis aŭtomobilon en certa distanco de la ĝardeno, kiu tute ne similis al la aŭtomobilo de la polico. De malantaŭe ni kaŝiris al la domo. Du el ni restis gardantaj surstrate por forpeli eventualajn scivolemulojn, kiujn povus allogi kriadado de la kredantoj.

Kompatindulo Jurij surgenue surbendigis mallaŭtajn voĉojn de la kredantoj. Certe tio estis la unuaj preĝoj, kiujn li en sia vivo ĉeestis – kaj tion preskaŭ du horojn! En Moskvo ili ĉion aŭskultis.

Antaŭ la pordo ni por momento haltiĝis.

„Nun!“ mi ekkriis. Ni enfalis internen. La pordo ne estis ŝlosita – ili evidente ne kalkulis pri nia alveno. Precize laŭ la raporto de spiono ni trovis dek kvin aŭ dek ses kredantojn sidantaj kuntuŝe apud si. Ni surprizis ilin en la duono de la preĝo. Vladimir Selenov tuj eltiris la Biblion el unu el ili komencante ĝin disŝiri. Unu virino ekkriis: „Kial vi tion faras?“ Estis tio vekrio, eliranta el la profundo de la interno. Vladimir ekfurioziĝis ankoraŭ pli multe kaj plenforte li bategis ŝian vizaĝon. Tiu ĉi profesuala, bone direktita batego, devus paralizigi ĉiun viron, des pli la subtilan, malgrandan virinon. Kun sanganta vizaĝo ŝi falis teren. Gumklaboj kaj pugnoj ŝanceliĝis, kaj fare de elkriegoj de la kredantoj preskaŭ kreviĝis timpanoj. Unuj kriegis pro timo, la aliaj pro dolorego. Apud la muro mi subite ekrimarkis maljunulinon kun timigita vizaĝo. Ŝiaj lipoj preĝante tremiĝis. Pro la bruoj mi aŭdis nenion. Mi alpaŝis al ŝi kun levita gumklabo por bategi ŝin. Mi tiel staris antaŭ ŝi kaj ŝi laŭte preĝis. Scivoleme mi kelkajn momentojn aŭskultis: „Dio, pardonu al tiu ĉi juna viro. Montru al li ĝustan vojon. Malfermu liajn okulojn kaj helpu lin. Pardonu al li, Dio!“

Mi perdis kuraĝon. Kial ŝi ne preĝas por si, sed por mi!?! Mi ja venas ŝin likvidi! Mi

furiozis. Tia nulo kaj ŝi preĝas por mi, Sergej Dakov, la gvidanto de Komsomolo! Mi volis doni al ŝi mortigan baton sur ŝian kapon. Mi etendis manon – kaj tiumomente okazis io neatendita. Iu forte ekŝiris mian manradikon. Mi ektimis, ĉar tio doloris. Unuamomente mi opiniis, ke tion faris iu el la kredantoj. Mi turnis min por lin bategi. Sed – neniu malantaŭ mi staris, neniu povis mian manon ekkapti. Kaj tamen – la manradiko forte doloris. Mi staris tute ŝokita. La sango puŝis sin en mian kapon, surverŝis min varmego kaj plenigis min teruro. Mi ne komprenis tion. Estis tio io neimagebla, kio konfuzis min. Mi ĉion forgesis. Mi forĵetis la gumklabon elkurinte eksteren. La sango frapegis en mia kapo kaj la vizaĝon surverŝis larmoj. Kiel mi memoris, ekde mia kvara jaraĝo mi ploris nur la unuan fojon. Eĉ dum brutala batego de Niĉi mi verŝis nek unu larmon. Mi ĵuris al mi mem, ke neniam mi ploros. La ploro estis por mi signo de malforteco. Kaj nun, forkuranta antaŭ io nekomprenebla, la larmoj ruliĝis sur mia vizaĝo. Embarasita kaj venkita mi kuris, poste mi malrapidigis min, denove mi kuris memorante tute nenion. Pasis horoj. Mi nur scias, ke mi kuris plorante ĉiam pli malproksimen. Kiam mi rekonsciiĝis, jam estis malhele.

Malrapide mi foriris al la policejo. Estis la naŭa horo vespere. Nur kiam mi enpaŝis pordon, Nikiforov eksplodis: „Dakov, kie vi retenatas?“ tio estis prefere alvoko ol demando.

„Mi devis pripensadi iujn aferojn,“ mi respondis. „Kaj mi maturiĝis al decido ĉesigi tiun ĉi laboron.“

La koleron de Nikiforov anstataŭis zorgemo. Kelkajn sekundojn li observeme min rigardis, kaj poste li diris: „Sergej, vi estas elĉerpita. Iru dormi!“ Lia voĉo ne plu estis tiel dura.

„Mi ne estas elĉerpita, mi havas...“

„Vi estas elĉerpita!“ li interrompis mian parolon. „Iru kaj ripozu. Pli poste ni tion priparolos.“

Post kelkaj tagoj li telefonis al mi al la akademio, ke mi gvidu pluan razion kontraŭ kredantoj. Mi balbutis, trovante elturniĝojn, sed fine mi diris: „Mi havas multon por lerni, mi devas min prepari por ekzamenoj. Hodiaŭ mi ne povas iri.“

Nikiforov ekhezitis. La unuan fojon mi rifuzis. Malgraŭ tio li senvorte ĉesigis pertelefonan interparolon. Post nelonge li denove telefonis al mi, ke mi al li vespere venu kun kelkaj homoj.

„Mi ne havas tempon, mi devas min prepari por la komsomola kunveno.“

Kaj kiam li pli poste telefonis, mi diris al li: „Mi estas tre okupita per studado kaj krom tio mi havas gravajn devojn rilate al la gvidado de Komsomolo. Mia opinio mi ne plu povos labori por la polico.“

„Ni priparolos tion pli poste,“ li diris ĉesinte parolon.

Tio malŝarĝigis min. Mi esperis, ke mi eligis min el tiu tuta afero. Dum lastaj du jaroj mi gvidis pli ol 150 raziojn kontraŭ kredantoj. Ĉi-momente mi estis anime surfunde. Mi ne kapablis tion klarigi al mi. Kvazaŭ mi havus anstataŭ koro pezan ŝtonegon, kiu min premis. Io en mia vivo ne estis en ordo. Sed al neniu mi tion konfidis.

Ĉirkaŭ la 1-a de novembro okazis partia kunveno, dum kiu mi al komunistaj funkciuloj disponigis raporton pri mia aktivado. Mi povis mencii nur la pozitivajn aferojn, ĉar mi laboradis verve kaj mia organizaĵo estis la plej bona en la tuta Kamĉatko. Sed anstataŭ granda laŭdo, kiun mi atendis, atendis min surprizo. Unu kamarado ekstaris demandante min: „Sergej, kial vi ĉesigis laboron en la polico?“

Kaj iu el la ĉeestantoj ekvokis: „Kion, ĉu li tie ne plu laboras? Kie vi tion aŭdis?“ Mi

sciis, ke ĉion reĝisoris Nikiforov por min denove varbi en siajn servojn. La prezidanto klinis la kapon al mi kun ŝajnigita surprizo: „Tio ja ne estas ebla! Tiel malmulte da laboro kaj tiel bone pagita! Ĉu estas tio vero, kamarado Dakov?“

„Jes, tio estas vero,“ mi respondis.

„Kaj ni eĉ ne scias pri tio, ke vi rifuzis bategi kredantojn!“ diris denove la unua.

„Ĉu ankaŭ tio estas vero?“ demandis la prezidanto.

„Jes.“

„Nu,“ li respondis, „mi opinias, ke ĉiu, kiu sin defendas kontraŭ tia superanta propono, devas esti perpleksa. Kial?“ li volis ekscii. Tiu ĉi senpera atako, tute neatendita, kuntuŝe kun mia elstaranta raporto, skuigis mian ekvilibron. Mi forgesis singardemon kaj estis influita per emocio – per tio, kion mi laŭ miaj spertoj neniam devis fari.

„Kamaradoj,“ mi diris, „mi estas aktivulo kaj komunista gvidanto ekde mia oka jaraĝo. Ankaŭ mi studis la konstitucion de Sovetunio kaj la partiajn direktivojn, laŭ kiuj ni ĉiuj devas esti fratoj. Kaj tial mi ne povas kredantojn bati. Ne, lastan fojon mi ilin ne batis. Laŭ nia instruo ili estas niaj kaj miaj fratoj. Kaj kiel mi povas bati fratojn? Kiel mi povas daŭrigi tiun ĉi laboron? Kompreneble, ili kaŭzas al ni problemojn, sed nenie estas skribite, ke ni ilin devas kripligi kaj neniigi.“

La prezidanto min akre interrompis. „Kamarado Dakov,“ li diris, „vi estis tiel bona junulara gvidanto, kiun ni en la akademio multajn jarojn ne havis. Vi estas ankoraŭ tro juna devanta ankoraŭ multon lerni. Kredantoj ne estas niaj fratoj! Ili estas murdistoj! Ili mortigas spiriton de niaj junuloj. Ili neniigas aliulojn per sia kredo. Ni devas liberigi nian landon de ili. Via kompato estas nenio ol infekto! La kredantoj ja ribeligas popolon elvokante ribelojn. Ili devigas registaron, por ke ĝi je ilia likvido elspezu grandegajn monsumojn, kiuj alikaze povus esti elspezataj por konstruado. Tiuj homoj laboras sekrete, ili damaĝas al ni, ĉar ili subfosadas kredon je komunismo anstataŭigante ĝin per kredo je iu imaginara Jesuo Kristo!“

Li plu parolis kaj poste li subite trankviliĝis. „Vi estas komunista gvidanto de junularo. Kiam ni la kredantojn neniigos kaj forigos, estos tiu ĉi maniero de la batalo ne plu necesa.“

En la tempo, dum kiu la kredantoj multobliĝos, mi jam de longa tempo estos sub gazonpeco, mi ekpensis.

„La centra komitato kaj la politburoo nin per tiu ĉi tasko komisiis kaj ni ĝin devas plenumi,“ diris la prezidanto.

„Do serĉu iun alian, min ne,“ mi respondis.

En la streĉitan silenton, kiu sekvis, iu ekvokis: „Lasu lin, li ankoraŭ estas juna kaj nesperta, sed lia konduto alie estas senerara. Donu al li tempon. Li ja denove trovos prudenton!“

Poste ili interkonsentiĝis dumtempe liberigi min de la polic servo, sed mi plu povos plenumadi gvidantan funkcion de Komsomolo en la akademio. Dum normalaj cirkonstancoj mia konduto vekus suspekton kaj ili min devus observi. Sed dume mi nenion tian konstatis. Eble ili mem agnoskis, ke mi simple estas tro okupata. Kaj krome estis mia konduto kaj ankaŭ ĝenerala prijuĝo sen iu ajn difekto.

Mi koncentriĝis al studado, kiu proksimiĝis al la fino. Baldaŭ mi iĝos la dua kadeto – leŭtenanto de la soveta maristaro.

Sed mia interna maltrankvilo senĉese kreskis.

Ĉirkaŭ la unua decembro mi ricevis ordonon viziti Nikiforov. Kiam mi eniris en lian laborejon, estis tie ankaŭ Azarov, majoro de KGB, kiu min por polica servo elektis. Nun mi povas atendi dancon, mi diris al mi enmense. Sed mi restis trankvila.

„Sidiĝu,“ diris al mi Nikiforov strebante krei malstreĉitan etoson. „Sergej, vi fakte frenezigiĝis! En la polico vin atendas grandioza kariero kaj vi forneas ĝin volante iri sur la maron. Ĉu vi konsciiĝas, ke duonon de la vivo vi pasigos inter fiŝoj? Kia perspektivo tio estas?!? Se vi estus pli prudenta,“ li daŭrigis per amikema tono, „vi atingus grandan karieron. Vi pruvigiĝis per eminenta maniero. Vi havas ĉiujn kapablojn, kiujn ni bezonas!“ Mi ekrigardis Azarov. Mi estis konvinkita, ke tiun ĉi interparolon ordonis li.

„La polico vin bezonas pli ol maristaro. Ni havas por vi eksterordinaran perspektivon,“ li kapsignis al Azarov. „Mi vin tuj rangaltigos al la rango de la unua leŭtenanto kaj vi iros al la partia politika akademio en Tomsk.“

Nikiforov plu daŭrigis, laŭdante miajn eksterordinarajn spertojn kontraŭ kredantoj kaj li emfazis, ke la akademio en Tomsk mi abiturientigus kiel spertulo pri „manipulado kun kredantoj.“

Tre bone mi sciis, kion tio signifus. Mia kapo turniĝis. La akademio en Tomsk! Nur rusoj scias, kia kariero tie malfermiĝas! Akademio de KGB-elitoj! Ĉiuj, kiuj tie studis, estis destinitaj por la plej superaj policaj funkcioj! Ekzemple tiu Azarov – li estis ĉirkaŭ tridek-jara kaj li jam estis majoro de KGB. Mi atingus ankoraŭ pli supren. Post unu jaro en Tomsk mi ricevus la rangon de kapitano, poste de majoro. Se mi tion sukcesus kiel dudek kvin-jara, do post kvar jaroj, mi do facile povus fariĝi majoro respondeca pri „problemo de kredantoj“. Poste ne plu por mi ekzistus limoj al pli supra direkto. Tiuj, kiuj blinde servas al la sistemo, povas komforte vivi – tion mi jam sciis. Mi povus posedi aŭtomobilon, domon kaj kompreneble multe da mono. Tiuj ĉi ideoj svarmis en mia kapo. Nikiforov ankoraŭ unufoje diris, ke la ŝtato bezonas homojn kiel estas mi kaj ke ili estas ankaŭ adekvate premiaj. Poste ekparolis Azarov: „Mi konas viajn personajn aktojn, kamarado Dakov, ili estas perfektaj. Vi havas eminentajn spertojn en traktadoj kontraŭ kredantoj. Por tiu ĉi laboro ni bezonas specialistojn. Atendas vin vertiĝodona kariero.“

Miaj prijuĝoj estas seneraraj, mi ekpensis. Sed se vi povus enrigardi mian koron, vi ekvidus grandan malkontenton. Mi atendis, ĝis ili finparolos. Poste mi dankis al ili pro la grandanimaj proponoj petante ilin, ke ili donu al mi kelkajn tagojn por pripensado, ĉar mia estonteco dependas de tiu ĉi decido.

„Mi komprenas,“ diris Nikiforov. „Laŭeble baldaŭ ni denove interparolos.“

„Kamarado Dakov,“ diris Azarov malrapide kaj el lia voĉo sonis averto, „la ŝtato en vin multon investis. Tre multe. Kaj ni de vi multon atendas. Tion ne forgesu!“

Mi komprenis. Ili havas min en kaptilo, el kiu ili neniam min ellasos.

Ankoraŭfoje mi dankis kaj foriris. Multaj soldatoj por tiu ĉi propono oferus eĉ sian dekstran manon. Sed mi dum la tuta ĝisnuna vivo direktiĝis per devizo: „Antaŭen! Antaŭen kaj pli alten!“ Kaj nun, kiam al mi proponiĝis la plej altencela okazo en mia vivo, ĝi ne ŝajnis al mi ambiĉinda. En korprofundo mi jam sciis, ke mi ne povas servi al sistemo, kiu mortigis mian patron kaj min transformis je besto, kiu bategis senkulpajn kredantojn. Se mi konsentus, mi iĝus la ilo de la ŝtato deviganta ilin plu persekutadi. Nikiforov al mi klare aludis, ke mi tiucele estis tre kapabla. Sed mi ne plu povis.

Post kelkaj tagoj mi al li anoncis mian decidon. Li tre ekscitiĝis, sed fine li diris: „Do iru

kaj travivu kelkajn monatojn surmare inter fiŝoj. Kiam vi revenos, ni denove ĉion preparolos. Vi ja ŝanĝos vian vidpunkton.“

Mi konstatis, ke KGB ne donos al mi trankvilon, ĝis mi konsentos. „Ĝis vi revenos.“ Tiuj vortoj senĉese sonis en miaj oreloj. Kaj kun tia decido mi denove engaĝigis min en la studadon kaj al plenumo de devoj de la gvidanto de Komsomolo, plena de senpacienco, ĝis mi finfine iros sur la maron. En januaro 1971 mi post sukcesa fina ekzameno eklaboris kiel radioteknikisto en la rango de leŭtenanto-kadeto por servi en la soveta floto. Tuj mi estis forkomandita al kontraŭtorpeda ŝipo. Post unu kaj duono de monato da navigado mi revenis por du semajnoj sur la bazon. Tuj mi trovis amikon laborantan en la oficejo, kiu atribuis servon al la maristoj. Mi lin petis, ke li min forkomandu al la ŝipo, kiu troviĝis apud la marbordo de Usono. Por klarigo mi al li diris: „Mi havas kleriĝon de radioteknikisto, sed mankas al mi ankoraŭ multe da praktikaj spertoj. Tial mi almenaŭ unufoje volus labori apud la marbordo de Usono, kien konstante alvenadas radiokontaktoj el Ameriko. Tie mi povus rapide pliperfektigi.“ Tio sonis tute fidinde.

„Nu, ne estas tio kutima, Sergej, sed por vi mi tion faros.“

Mi estis sendita kiel radioteknikisto sur la submaran ŝipon, sed ĝi plenumis sian operacion ekster la apudbordaj akvoj de Usono. Kiam mi la 4-an de marto aliris ĝian ferdekon, mi la lastan fojon ekrigardis mian patrolandon. Aŭ mi mortos, aŭ mi sukcesos akiri liberecon, sed neniam mi revenos por servi al la sistemo fariĝinte la dua Nikiforov. Normala homo povis decidi alie: vivi en Sovetunio, ignoradi – se tio eblas – la sistemon kaj laŭeble vivi decan vivon. Sed min ili tenis en kaptito. Mi tro multon sciis. Se mi revenus, mi devus sindone kaj per ĉiuj fortoj servi al la polico. Azarov kaj Nikiforov tion esprimis tute klare. Mi komprenis, kion tiu ĉi sistemo kaŭzas al mia popolo kaj lando, kaj tial mi ne plu volis al ĝi servi. Mi amas mian patrujon, mian nacion, kiu estas bonega, bonkora kaj ĉiam helpopreta.

Per tiuj ĉi pensoj mi adiaŭis mian naskiĝlandon. Ni navigadis ĉirkaŭ korea kaj japana marbordoj kaj poste tra senfinaj akvoj de Pacifiko al Usono. En certa vortsenco estis por mi honorigo labori sur la kontraŭtorpeda ŝipo. Tio certe estas privilegio de armea elito, de la plej zorgeme elektitaj soldatoj el la tuta floto, kun seneraraj politikaj kaj fakaj prijuĝoj, ĉar ili havas aliron al la armeaj sekretoj kaj havas kontaktojn kun nukleaj armiloj. Spite de tio la servo sur la ferdeko de la kontraŭtorpeda ŝipo ne plenumis mian atendon. De tie mi neniam kapablos forkuri. Pasis multaj monatoj de espero kaj atendadoj, plenigitaj de la konsciencia plenumado de la devoj.

En la duono de junio 1971 mi ricevis raporton, ke en nia proksimeco troviĝas soveta grandfiŝista ŝipo de Ivan Sered kaj ili necese bezonas radioteknikiston. Kapitano sciigis al mi, ke mi transiros sur ilian ŝipon. Aŭdante tion mi apenaŭ sukcesis regi mian ĝojon. La aferoj evoluiĝis je mia favoro: la 25-an de junio ni antaŭ Havajaj Insuloj elmergiĝis kaj mi transiris al la ŝipo Ivan Sered. Ĉi tie mi nun estis almenaŭ super marnivelo.

Ni komencis direktiĝi al San Diego, kie ni tuŝapude alproksimiĝis al la tero. Poste ni navigis laŭ kalifornia marbordo norden, ĝis Los Angeles. Ni ĵus troviĝis ne malproksime de dek du-mejla zono. Malfrue vespere mi kolektis kelkajn lignopecojn, el kiuj mi pretigis malgrandan krizokazan flosan por transporto de manĝo kaj akvo, ĝis mi nokte elsaltos el la ŝipa ferdeko. Mi volis ĝisatingi la usonajn ĉebordajn akvojn kaj atentigi pri mi iun jahton aŭ boaton. La floseton mi bone kaŝis.

En malproksimo trembrilis lumoj de Los Angeles. La libero estis tiel proksime! Anko-

raŭ unu laborperiodon mi devas plenumi devojn de radioteknikisto. Tiuvespere mi mian laboron faris tute meĥanike. En pensoj mi senĉese okupiĝis pri libereco, kiu ŝajnis esti proksime. Post momento mi kaptis raporton, ke post momenteto ni ricevos raporton rekte el Moskvo. Tiu ĉi raporto min maksimume timigis kaj neniigis mian planon. Mi eĉ ne estis kapabla ĝin ĝuste noti. Per raporto estis anoncite, ke juna litovo Simas Kurdik la 23-an de novembro 1970 elsaltis antaŭ marbordo de Anglio en ferdeko de la fiŝkaptista ŝipo kaj sur la ferdekon lin akceptis iu usona ŝipo. Per sia forkuro li perfidis patrujon, kaj tial li estis kondamnita por dekjara prizona restado.

Sed mi estas idioto. Forgesi Kurdik-on! Mi aŭdis pri lia forkuro. Sed pro ekscitiĝo mi tion forgesis. La raporto pri lia kondamno al mi vive memorigis tiun okazaĵon, kiu min plenigis per timego kaj teruro. Mi ekmemoris, kion oni al ni tiam diris: „La usona registaro kunlaboras kun soveta floto. Kurdik-on ili tuj al ni transdonis kaj li estas malliberigita.“

Al ĉiuj sovetaj maristaroj estis anoncite, ke eldono de ĉiu estas konsistaĵo de la nova konvencio inter Usono kaj Sovetunio. Tiam mi pripensis, kia tio povas esti demokratia lando, se ĝi eldonas ĉiun, kiu en ĝi serĉas liberecon! Fine mi ekkoleris kontraŭ mi mem, ke mi forgesis pri Kurdik kaj preskaŭ mi faris la saman eraron. Mi ekmemoris pri floseto. Se ĝi estus trovita, tio estus mia fino! La servon mi finis senkuraĝigita kaj timigita. Mi rapidis al la loko, kie mi la floseton kaŝis. Mi malpezigis mian koron, kiam mi ĝin trovis estanta en ordo. Mi malmuntis ĝin kaj la lignon forĵetis el ferdeko. Tiuvespere mi longe rigardis al la lumoj de Los Angeles kaj enmense mi demandis, kiel usonanoj resendis la viron, kiu provis akiri liberecon.

(Pli poste mi eksciis, ke iu usona admiralo transdonis Kurdik-on senpripense proprarepondece kaj ke tio tute ne estis politiko de la usona registaro).

Mi observis maron – ĝi estis varma kaj alloga. Sed kun Usono mia forkuro ne sukcesos. La plej proksima kaj lasta eblo estas Kanado.

XX.

Ni navigis norden, ĝis proksimeco de la aviadila bazo Vandenberg en kalifornia bordregiono. Post nelonge mi ricevis raporton, ke mi devos transiri kiel radioteknikisto sur ŝipon Kolivan, la fiŝista ŝipo de granda soveta floto, sed kiu operacias ekster la usonaj akvoj.

La tagoj pasis, julion anstataŭis aŭgusto. Ofte mi memoris pri Simas Kurdik. Kio lin atendas? En la plej bona kazo dek jaroj de prizona restado. Sovetianoj sciis, ke la mondo post lia kondamno lin forgesos. Poste li povos restadi en la malliberejo ĝis la morto kaj iĝi tie ekzemple ofero de „malfeliĉo“.

Se tio ĉi atendis simplan mariston, kio poste okazus al mi, la soldato kaj komunista gvidanto de la junularo? Se ili min kaptus forkurantan aŭ se mi estus redonita, mi ĉesigus mian vivon pli frue, ol mi estus transportita reen en Sovetunio.

Kun alproksimiĝanta kanada marbordo proksimiĝadis momento, kiu decidus aŭ pri mia vivo, aŭ pri mia morto. La vojo reen por mi ne ekzistis. Kiam ni mallongan tempon ankrumis ekster dek du-mejla zono antaŭ Vancouver, ni ricevis ordonon renkontiĝi kun rusa „trauler“ – la fiŝkaptista ŝipo Blagin, kie mi devis transpreni funkcion de radioteknikisto. Blagin poste direktiĝis al insulo Amchitka antaŭ marbordo de Alasko, kie okazadis subteraj eksperimentoj kun atomarmiloj.

Se mi diras „trauler“, mi uzas nocion de la soveta maristaro. Tiuj ŝipoj tute ne okupiĝis

pri la fiŝkaptado.

Dum navigado mi kun intereso aŭskultis Voĉon de Ameriko por scii, kio fakte okazas en la mondo. Jam hejme mi aŭdis, ke tion faras la plejparto de la sovetia loĝantaro kaj eĉ multaj kadetoj. Kompreneble, tio estis danĝera, kaj tiu, kiu estis dum tio kaptita, tiu estis severe punita. La Voĉo de Ameriko kaj la religiaj elsendoj en la rusa lingvo el misistacioj al mi helpis reakiradi forton por mia fuĝo.

Fine de aŭgusto 1971 Blagin ricevis ordonon reveni al la kanada marbordo. Dum lastaj semajnoj mi kelkajn horojn ĉiutage dediĉis al halterlevado kaj al alia plifortiĝo, por ke mi dum decida momento estu en bona korpstato. Mi bezonos enormajn korpzervojn kaj persistecon. Multaj kamaradoj priridis min dirante: „Ĉu eble vi volas iĝi majstro de la mondo?“ Nur mi sciis, kial mi tion faras.

La ŝipanaro konsistis el 110 maristoj kaj 11 soldatoj. Ĝia kapitano estis brava, sincera homo. Mi tre admiris lin. Ofte ni kune ŝakludis aŭ longe interbabiladis.

Iun tagon mi ricevis raporton, kiu rilatis rekte min! Post kvin tagoj ni renkontiĝos kun ŝipo Marija Uljanova – titolita laŭ fratino de Lenin – por plenigi al ni provizon de la manĝovaroj. Mi ricevis ordonon transiri sur ĝian ferdekon. Ĝi revenis rekte en Sovetunion.

Post konfirmo de la raportakcepto, mi intense pripensis. Mi estis surmare ses monatojn. Ankoraŭ kvin tagojn sur Blagin, kaj poste reveno. Verŝajne neniam plu ekestos okazo por mi esti tiel proksime al la libereco!

Poste venis alia raporto. En Petropavlovsko jam atendis min dokumentoj pri mia rangaltiĝo. Tio estis la lasta aĵo, kio min ĉi-momente interesis.

Ekposedis min malespero. Dum la pensoj freneze svarmis en mia kapo, nin haltigis neantaŭviditaj obstakloj – la inversa vento kaj peza maro. Post nelonge ni troviĝis meze de fulmotondro.

Nur tre malfacile ni antaŭeniĝis, ĉiu viro, ĉiu maŝino laboris lime de siaj fortoj. Multaj niaj ŝipoj dum tiu ĉi tempesto travivis malfacilegojn. Horojn kaj horojn mi pasigis en radiotelegrafia kajuto por akceptadi kaj transdonadi raportojn. Mia rigardo ofte haltis antaŭ surmura kalendaro. La tempo pasis per freneza rapido.

„Sergej,“ diris neatendite kapitano, „kontaktiĝu kun kanadaj oficejoj petante ilin pri permeso resti dum la ŝtormo en iliaj suverenaj akvoj.“

„Ordono!“ mi aŭtomate respondis. Nur poste mi konsciis, kion tio por mi signifas. En kanadaj suverenaj akvoj! Ĝi estis tio, kion mi bezonis!

Ĝis ni alnavigos tuŝapuden al la marbordo, kion ni alikaze ne povus, eble mia plano sukcesos. Origine mi volis ensalti maron malantaŭ la dek du-mejla zono kaj dum la naĝo devus al mi helpi lignopeco. Sed mi sciis, ke antaŭ ol mi atingos la teron, mi mortos verŝajne pro sekvoj de submalvarmiĝo. Sed nun ni estos rekte en kanadaj akvoj! Tiu ĉi fakto min plenigis de novaj espero kaj energio. Fariĝu kio ajn, mi estis firme decidita – ne reveni en Ruslandon, mi ne daŭrigos la ĝisnunan vivmanieron.

Do mi estis definitive decidita kaj nun mi jam povis koncentriĝi nur al la momento de la fuĝo. Tio okazis la 3-an de septembro 1971 dum la plej forta ŝtormo, kiam mi saltis en la nigran, ŝtormantan maron.

Post treegaj malfacilaĵoj dum duona vojo al la domaro sur la kanada bordregiono, mi senkonsciiĝis. Kio plu okazis, tion mi eksciis pli poste de bonaj homoj el vilaĝeto Tasu, kiuj min trovis kaj helpis.

Matene la 4-an de septembro furiozis super bordregiono Queen Charlotte fulmotondro. La plejparto de la loĝantoj laboris en minejo. Iu virino, kiu loĝis en domo sur strando, la duonhoron antaŭ la naŭa telefonis. (Pli poste mi eksciis, ke ĝuste tiun ĉi tagon ŝi escepte ne foriris al sia laborloko). Dum telefonado ŝi rigardis tra fenestro eksteren kaj ŝi ne kredis al siaj okuloj! Sur strando iris zigzage duonnuda, elĉerpita, sanganta juna viro. Tuj ŝi alvokis kuraciston kaj mi estis forveturigita en malsanulejon. La koro pro elĉerpiĝo funkciis neregule kaj multajn tagojn mi pasigis en ia agonio.

Poste mi kvazaŭ de malproksime ekaŭdis ian fremdlingvan flustron. Mi komprenis eĉ ne unu vorton. Kie mi estas? Revene sur la ŝipo! Mi ekpensis kun pligrandiĝanta paniko. Sed ne, ne, estis tio fremdaj voĉoj. Kanado! Tamen do mi sukcesis!

Mi komencis distingadi objektojn, eĉ la okulojn de la flegistino, kiu sin klinadis super mi. Ŝi estis por mi la plej bela virino de la mondo. Do mi vivis! Mi estis en Kanado! Mi sukcesis! Mi estis la plej feliĉa homo en la mondo!

Post kelkaj horoj venis en la ĉambron iu viro dirinte, ke li estos interpretisto. „Kiu vi estas?“ li demandis. „Kial vi venis ĉi tien?“

Pro doloro mi ne povis paroli, nur mi el mi klopode diris: „Mi ne volas reveni sur ŝipon!“ „En ordo,“ li diris, „ni kunligos nin kun la oficejoj en Prince Rupert. De tie ni ricevos informojn, kion ni plu faru.“

Ankoraŭ samtage posttagmeze mi estis per helikoptero transportita en la ĉefurbon Queen Charlotte kaj de tie al Prince Rupert en Brita Kolumbio. Ĉi tie mi pasigis kelkajn tagojn en prizona malsanuleja sekcio. Mi havis bonegan manĝon, ĉambron kaj altnivelan kuracistan zorgon. Ĉiuj rilatis al mi tre bele. Mi iĝis la centro de la ĝenerala intereso kaj kvankam mi ilin ne komprenis, mi divenis, ke per tiel vivriska vojo ne multaj maristoj venis ĉi tien. Iam mi havis senton, ke mi estas imagata kiel estaĵo el alia planedo. Ĉar tie neniu komprenis la rusan lingvon, mi provis uzi la germanan lingvon. Oni trovis homon, kiu por ili tradukis. Tiuj homoj pri mi elstarmaniere zorgis kaj danke al ili la fortoj al mi baldaŭ revenis.

Kun revenanta sano kreskis ankaŭ mia intereso pri la nova medio. Foje min laboristo de la emigracia oficejo kune kun unu tradukinto el malsanulejo prenis por rondveturo en Prince Rupert. La okuloj pro miro preskaŭ elsaltis el miaj okulkavetoj. Ĉie multaj aŭtomobiloj kaj belegaj domoj. Mi devis efiki per tre malsaĝa impresado, ĉar la oficisto diris: „Tie ĉie loĝas homoj.“

„Kiuj? Ĉu kapitalistoj kaj negocistoj? mi demandis.

„Ne, laboristoj,“ li ride respondis.

Kompreneble mi al li ne kredis. Certe tio estas nura propagando. Sergej, nur ne kredu al li, mi pensis.

Pli poste li alportis al mi revuon kun fantastaj bildetoj de diversvaria vararo, kun fotografajoj de belegaj familiaj loĝdomoj kun multekosta meblaro. Tio estas certe presita speciale pro mi por min mistifiki kaj surprizi. Mi elkreskis en la mondo, kie oni en ĉio vidis nur propagandon. De komunismo mi ja forkuris, sed komunismo kun ĉiu suspektado en mi restis. Pli poste, kiam mi konstatis, ke en ĉiuj tiuj ĉi domoj vere vivas laboristoj kaj ke la revuo ne estis eldonita por emigrantoj kiel estas mi, mi sentis min kvazaŭ stultulo. Laŭ sovetia propagando la homoj riĉiĝis nur pere de ekspluatado de malriĉuloj. Sed domoj de la laboristoj – kompare kun la rusaj – aspektis kiel palacoj. Eĉ ne eskapis al miaj okuloj, ke ĉiuj estis bone vestitaj.

Mi tamen vidis unu aŭ du ebrulojn, sed en Rusio ili sternaĉis sin sur ĉiu angulo, se la homo vespere trairas urbon. Nia propagando senĉese gurdis, ke en kapitalismaj landoj estas milionoj da senlaboruloj, kiuj devas demonstracii, kaj ke polico kontraŭ ili ofte tre brutale intervenas.

Eĉ se mi dubis pri la vereco de tiu ĉi argumentado, jam la unua „ekskurso“ en la libera lando montris al mi, kiel grandega kaj tragika mensogego estas la komunista propagando.

Ĉiutage mi pli kaj pli refortiĝis kaj plenspere mi rigardis estontecon. Sed subite – sen antaŭa averto – mi ricevis raporton, kiu min plenigis de timego kaj teruro: ne estas ekskludite, ke oni min transdonos al Sovetunio!

Sekvan tagon mi estis transportita en la centran malliberejon en Vancouver. Minacis al mi, ke mia sonĝo pri libereco kaj nova vivo ruiniĝos kvazaŭ dometo el kartetoj. Kial? Kial?

Mi ne kapablas priskribi mian animan etoson. Mi estis sola en fremda lando, en kiun mi metis ĉiujn miajn esperojn kaj fidon, kaj ĉu subite ĉio devus turniĝi kontraŭ mi? Mi donis preferon al ŝtormanta malvarmega Pacifiko antaŭ varmaj kaj allogaj akvoj de Kalifornio, ĉar al tiu lando mi fidis. Mi enmetis mian vivon en iliajn manojn. Mi ĉi tie ricevis ŝirmon, prizorgon kaj helpon kiel neniam antaŭe. Kaj nun onidire eblas, ke mi estos revenigita! Al certa morto! Tio estis la lasta aĵo, kion mi atendis! Jam tiu ĉi ekpenso kaŭzis al mi turmenton.

Mi estis en la ĉelo sola. Mi povis kun neniu interparoli. Mi sentis min terure. Ĉiam mi ekĝojis, kiam la gardisto, kun kiu mi amikiĝis, ofte lasis min iri al la korto. Mi ankoraŭ havis diversajn fizikajn ĝenojn, sed tiuj neniakaze egalas al la animaj turmentoj. Mi bezonis kun iu interparoli antaŭ ol mi frezeziĝos. Malesperante mi min turnis al Dio. Mi surgenuiĝis, kiel mi tion vidis ĉe kredantoj. Eble tio helpas al mi. Sed mi sciis eĉ ne unu preĝon. Mi estis embarasita, plumpa kaj iel hontigita. Sed mia koro abundis, kaj tiel mi komencis kun Dio simple interparoli. Mi diris al Li, kio aperis en mia menso. Mi ne sciis, ĉu Li aŭdas min, sed mi eksentis malŝarĝon.

Mia jura reprezentanto, kiun atribuis al mi tribunala organo, estis amikema kaj kapabla homo. Li strebis al mi ĉiupove helpi. Li sin dediĉis al mia kazo kun granda intereso kaj persona atento. Ĝis la morto mi tion al li ne forgesos. Mi demandis pri la kaŭzo, pro kiu mi povus estis redonita al Sovetio. Li eksplikis al mi, ke inter Kanado kaj Sovetunio ekzistas viglaj negocaj rilatoj kaj Kanado eksportas en Sovetunion tritikon en valoro de multaj milionoj. Tial onidire la lokaj oficejoj ne volis difektigi amikecan etoson, kiam rusoj klare sin esprimis, ke ili min volas senkondiĉe ricevi. Krom tio post la monato estis preparata vizito de Kosygin en Kanado.

Kiam mia jura reprezenanto foriris, mi ekpensis: se oni min eldonos, tio estas mia fino. Per nekredablaj malfacilaĵoj mi provis trovi novan patrujon ĉu nur pro tio, ke mi min eksponu al la danĝero, ke mi estu resendita? Dum malespero mi tiunokte denove provis paroli kun Dio. Mi enfalis en maltrankvilan kaj malkvietan dormon.

Ĉiujn sekvajn tagojn plenigis min timo kaj malcerteco. Ĉiu paŝo alproksimiĝanta en mallibereja koridoro povis por mi signifi mian finon. En la haveno de Vancouver ankradis sovetaj ŝipoj. Mia transdono estus demando de kelkaj minutoj. Mi suferegis kiel ljobo. En tiuj solecaj, per timego plenigitaj tagoj kaj noktoj mi ofte surgenue preĝis.

Iuvespere mi denove pro interna streĉo ne povis endormiĝi. Je la dua horo nokte mi

estingis lumon kaj mi maldormis en la malhela ĉelo. Ĉirkaŭ duonhoron antaŭ la tria mi ekaŭdis elkoridore iajn voĉojn kaj paŝojn. Ili haltis antaŭ mia pordo. Jam ili venis por min forkonduki, mi ekpensis.

La ŝlosilo eknaris en la seruro kaj la pordo malfermiĝis. Iu ŝaltis la lumon. Mi ekvidis kelkajn civilvestitajn virojn. „Iru“ diris unu el ili. „Prenu la aĵojn. Ni iom veturos en la urbo.“

Ĉu nun je la dua kaj duono? Io ne estis ĉi tie en ordo. Rapide mi estis elirigita tra malantaŭa elirejo, kie atendis aŭtomobilo. Sidis en ĝi tri civilvestitaj viroj. Ni ekveturis mal-lumon. Nur en torento de lumoj mi ekvidis, kiel Vancouver estas granda kaj bela. Unue ni traveturis ĉefajn stratojn, poste la flankajn stratetojn. La ŝoforo alternis neatendite kontraŭ-ajn direktojn, dum infera rapideco li krute deflankiĝis foje dekstren, foje maldekstren.

Tiu ĉi „promeno“ daŭris proksimume du horojn. Fine la ŝoforo ie la aŭtomobilon parki-gis kaj eniris koktelegon, kie li telefonis. „Ĉio en ordo,“ li diris, kiam li revenis, „ni povas eklabori.“

Li veturigis nin sur flughavenon rekte al rulvojo. Ni eniris ferdekon de la granda aviadi-lo. Estis ni nur kelkaj personoj inkluzive de policanoj, kiuj akompanis min.

Frumatene ni surteriĝis en Montrealo. Tie mi rapide estis translokigita en policaŭto-mobilon sen identiga kodo, ĉirkaŭita de policanoj. Mi estis transportita en malliberejon en Quebec City, sur la insulo de la rivero de sankta Laŭrenco, en la fermitan ĉelon. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke kelkajn tagojn pli poste tie en rekta proksimeco ankrumos la soveta ŝipo Aleksander Puŝkin.

La kaŭzon de mia „forkonduko“ el la malliberejo de Vancouver mi neniam ĝuste eksciis. Mi mem por ĝi havis du eksplikojn: aŭ ili volis min defendi antaŭ malamikoj, aŭ – kio estis pli verŝajna – diskrete min transdoni al Sovetoj. Mia kazo vekis inter loĝantoj de Brita Kolumbio grandan maltrankvilegon. Multaj interesiĝis pri mi kaj simpatiis kun mi. Tial – kiel mi opiniis – mia transdono devis okazi en la mala fino de Kanado, kie min neniu konis.

Sed ankaŭ ĉi tie troviĝis homoj strebantaj helpi min. Iu – ĝisnun mi ne scias, kiu – tele-fonis al Patov Burnsov, la aŭtoro de popularaj radiointerparoladoj, informante lin pri mia malapero. Burnsov rakontis pri mia aventuro en radioelsendo kaj li tre interesiĝis pri mi. Li timetis, ke ĉiumomente oni povus min transdoni, kaj kontraŭ tio li multe laboregis. Dum la rekta transmision li telefonis al Otava al kompetenta deputito reprezentanta Vancouver anoncinte al li, kio okazis. Tiu tuj sin turnis al premiero Pierre Trudeau postulinte rektan respondon al la demando, ĉu min la kanada registaro fordonos al Sovetio aŭ ne. Krom tio li postulis senprokraste ekposedi publikan starpunkton por la reprezentantoj de preso.

Kiam tiamaniere mia kazo atingis publikon ekkirlinte la publikan opinion mifavore, mi ne povis esti fordonita. La danĝero estis forbenita. Ĝis nun mi ne scias, kian gradon ĝi vere atingis kaj ĉu ili vere min transdonis. Mi sentis min tiutage kvazaŭ sub fama glavo de Damoklo. Dum nervoza atendado kaj dum preĝoj mi zigzage iradis en la ĉelo. Ankoraŭ mi ne sciis, ke Dio elaŭdis miajn insistajn petegojn.

Kiam poste estis al mi anoncite, ke en Kanado mi povas resti, estis tio por mi granda ŝoko. Ĝojega ŝoko. Mi sentis, kiel el mi falis katenoj, malgraŭ tio, ke mi ankoraŭ troviĝas en malliberejo. Kvazaŭ mi denove naskiĝus. Mi estis libera homo en la libera lando. Malgraŭ tio, ke mi tion sopirege atendis, mi ne povis ankoraŭ tion ekkredi.

Plenkore mi dankis al Dio, ke Li elaŭdis min – spite al mia kruela traktado kun Liaj

junuloj kaj spite al mia iama sinteno rilate al Li.

Kiam en sekvaj semajnoj estis por mi preparataj dokumentoj kaj estis aŭtentigita tuta mia afero, mi restadis en diversaj kanadaj malliberejoj. Sed estis tio jam belaj momentoj, ĉar mi sciis, ke mi ne estos fordonita. Mi ricevadis leterojn de la plej diversaj homoj, kiuj legis pri mia afero. Mi eĉ havis amikojn, kiuj min vizitadis. Mi estis al la kanada registaro pro ĝia decido ege dankema. Neniam mi al ĝi tiun ĉi amikecan geston forgesos!

Sed venis ankaŭ pli malmulte bonvenaj gastoj. Iun tagon venis la dua sekretario de la soveta ambasadejo. Li parolis kun mi en la ĉeesto de kanadaj oficistoj.

„Ni scias, ke vi estas ankoraŭ tre juna, kaj tial vi faris eraron. Se vi revenos, ĉion ni pardonos al vi kaj vi restos en via iama funkcio. Ĉio okazos kiel antaŭe!“

Mi respondis al li, ke mi ne povas reveni. Li donis al mi leteron de mia iama amikino Olga. Ankaŭ ŝi min insiste petis, ke mi revenu certigante min, ke ĉio estos forgesita. Ŝi uzis la samajn vortojn kaj formuladon, kiujn mi aŭdis antaŭ la momento.

Kiam mi tamen restis en rifuzanta sinteno, li diris: „Dakov, iun tagon vi venos al ni kaj vi almozpetos, ke vi povu reveni!“ Baldaŭ post tio mi ricevis dokumentojn de novloĝanto. Mi povis komenci novan vivon. Ankoraŭ kiam mi estis en malliberejo, vizitis min iu registara oficisto kaj diris al mi proksimume tion: „Sinjoro Dakov, vian aferon mi detale verigis. Ĉiujn datumojn ni enkomputiligis por fari analizojn. Ni ĉe tio konsideris varmon de la akvo, direkton kaj forton de la vento, enorman ŝtormon, distancon de la ŝipo al la bordo, altecon de la ondoj – kaj vian fizikan forton. La sciencaj laborantoj helpe de komputilo ĉion prites-tis, sed laŭ analizoj estas neeble, ke vi en tiaj kondiĉoj transvivinte superis tian distancon! Ĉu vi ne forgesis al ni ion diri?“ En lia voĉo estis malkonfido.

Post momenta pripensado mi respondis: „La ununura afero, kiun mi al vi ne diris, estis, ke mi multe preĝis.“

Post kelkaj tagoj li denove venis: „Sinjoro Dakov, certe vin interesos, ke ni viajn datumojn inkluzive de preĝoj ankoraŭ foje metis en la komputilon. Ĉu vi scias, kia estas la rezulto? Pozitiva! Nun ni estas konvinkitaj pri vereco de via afero!“

Tio min surprizis. Kion sciis komputilo pri Dio? Pli poste iu eksplikis al mi, ke miaj preĝoj estis prijuĝitaj kiel „psikologia forto.“ Kaj tio estis tiu motiviga faktoro, kiu al mi – eĉ surbaze de kalkuloj – helpis transvivi. La malliberejon de Kebeko mi forlasis kiel libera homo. En unu malgranda hotelo mi luis ĉambron. Multaj homoj ligis kun mi kontakton proponante al mi helpon, okupon kaj laboron.

Mi ricevis eĉ unu tute nekutiman kaj surprizigan proponon. Iu organizanto de la naĝkonkursoj en Ontario skribis al mi, ke li por la venonta jaro preparas grandan konkurson. Ĉar mi en Kanado „famiĝis kiel naĝanto,“ li pagos al mi 150 dolarojn, se mi kadre de la konkurso naĝos 25 mejlojn. „Ĉiu vin konas kiel eminentan naĝanton,“ li skribis. Homoj el diversaj flankoj alvenos por vin vidi. Ni povus fari bonan negocon.“

Mi respondis al li, ke mi do estas bona naĝanto, sed estis Dio, kiu donis al mi forton elteni tiel longan tempon en oceano, kaj tial mi lian proponon ne povas akcepti.

Nun por mi gravaj estis du aferoj: mi promesis al Dio, ke mi al Li sindone servos, kaj poste: mi devas trovi laboron, enhejmiĝi kaj komenci vivi kiel libera homo. Estis al mi klare, ke la duan intencon mi realigos pli facile ol la unuan. Sed mia plej forta sopiro estis trovo de Dio. Sed kiel? Kie? Ni sciis pri Li nenion kaj mi konis nenion klerikulon, kun kiu mi povus tiujn ĉi aferojn paroli. En la centro de Kebeko mi vidis grandan preĝejon de sankta

Anna. Mi decidis ĝin viziti. Mi supozis, ke se tio estas la domo de Dio, tie mi trovos Dion.

Mi eniris internen. Mi ne sciis bone, kiel mi konduku. Estis tie ankoraŭ kelkaj homoj. Mi decidis fari tion, kion ili faris. Ili iris antaŭen kaj genuiĝis. Mi ankaŭ. Ili komencis preĝi. Ankaŭ mi tion provis, sed mi sentis min mallerta kaj neinda ĉeesti en la domo de Dio. En Rusio mi bategis kaj mortigis kredantojn. Pli ol cent kvindek-foje mi atakis iliajn sekretajn renkontiĝojn. Mi kaŭzis multajn vundigojn al maljunaj virinoj kaj al multaj kredantoj. Mi ne estis inda eniri la domon de Dio. Malgraŭ ĉio mi tamen sentis, kiel trafenetas min kvieto. Mi komencis kun Dio paroli, kiel mi tion faris en oceanaj ondoj kaj en malliberejo.

Post momento de la preĝo mi eksentis malpeziĝon. Mia koro estis plenigita de nekonata kvieto kaj trankvilo. Se tion ĉi Dio donadis al siaj, do ankaŭ tion mi volis, pli ol ĉion ceteran. Tri horojn mi genufleksis antaŭ Dio. Sed mi serĉis ion pli intensan, ion, kion posedis kredantoj. Tion, kion havis Nataŝa.

Mi revenis en mian ĉambretan. Mi trovis sciigon, ke iu volas kun mi paroli pro laborokupo. Estis almetita tie ankaŭ adreso, kie mi min anoncu. Al du junaj bulgaroj, kiuj fuĝis en Kanadon kelkajn monatojn antaŭ mi, mi lasis sciigon, kie ili min povas trovi, kaj mi foriris al la destinita loko. Atendis tie kelkaj homoj. Ili tute ne intencis paroli kun mi pri laboreblecoj. Baldaŭ evidentiĝis, ke tio estas membroj de FLO, la franca separatisma kaj terorisma organizaĵo de Kebeko. Iliaj okupoj estis bombaj atencoj kaj klopodante atingi memstarecon ili murdis ankaŭ kelkajn diplomatojn. Ili havis fortan ligon kun komunistoj kaj ilian planan subtenon. Mi troviĝis en kaptilo.

„Dakov,“ ili avertis min, „se vi multe malfermadus vian buŝon parolante pri la aferoj, kiujn estas pli bone prisilenti, ni jam vin devigos teni langon malantaŭ dentoj!“ Mi provis paroli kun ili por akiri tempon kaj elpensi manieron, kiel eligi min el tiu ĉi situacio. Bonŝance baldaŭ venis miaj bulgaraj amikoj, kiuj trovis sciigon kaj plej rapide min vizitis. Tuj ni malaperis. En oreloj ankoraŭ sonis al mi avertaj vortoj. Eĉ ĉi tie mi ne trovos kvieton! Moskvo senĉese al mi streĉadis brakojn!

En Kebeko iu viro el soveta ambasadejo observis min sur ĉiu paŝo. Polico avertis min, ke en la haveno de Montrealo restas soveta ŝipo, kaj postulis min, ke mi estu singardema. „Tuj nin voku, kiam vi sentos vin endanĝerigita,“ ili diris. Kun minaco de FLO en dorso kaj pro forta komunista organizaĵo en Kebeko mi decidis foriri al Toronto. En Montrealo estis soveta konsulejo, en Otavo ambasadejo kaj de tio mi volis esti plej malproksime.

En Toronto mi loĝis en certa rusa familio, kiu legis mian okazintaĵon kaj proponis al mi helpon. Kanada registaro pagis al mi kurson de la angla lingvo en universitato. Kun elano mi ĝin komencis studi.

Sed unualoke mi serĉis Dion. Mi sentis grandegan spiritan malsaton, kiun mi nur mal-facile povas priskribi. Mi sciis, ke nur tiam mi estos perfekta homo, ĝis mi ĝin kvietigos. Ne estis tio nur grandega bedaŭro, ke mi en la patrujo tiel kruele agis kontraŭ kredantoj. Mi sciis, ke Dio pardonis al mi, ĉar mi tion faris pro nesciemo. Sed tio, kion mi sentis, estis sincera, profunda, spirita mizero. Mi sciis, ke ankaŭ mia spirito devas liberiĝi, ne nur la korpo. Mi ekmemoris, kiel iu kredanto dum demandesplorado diris, ke ili ofte fastis, se ili pri io eksterordinare urĝa preĝis. Eble tion ankaŭ mi povus fari, mi ekpensis.

Mi eniris preĝejon, kiun mi jam unufoje vizitis kun certa familio. Ĝi estis senĉese malfermita. Interne estis neniu. Mi iris antaŭen kaj mi komencis preĝi. Mi pasigis tiam du fastantajn tagojn nur je akvo. Mi ne sciis, kiajn vortojn mi elektu, sed mia koro preĝis

anstataŭ la buŝo. Ĝi esprimis ĉiujn miajn sentojn. Post du tagoj kaj noktoj – mi dormis eble nur tri horojn – mi forlasis preĝejon reveninte en la lernejon. Mi sentis min tre fortigita laŭ spirita flanko, sed ankoraŭ mi plu sentis, ke io al mi mankas.

Kaj tiutempe mi ricevis bildkarton de Valentina Buboviĉova, la rusa knabino, kiu laboris en la universitata biblioteko proksime de Toronto. Ŝi skribis al mi, ke ŝi estas kredantino, kaj invitis min al ilia komunumo. Volonte mi tion akceptis.

Tio, kion mi sekvan dimanĉon travivis en la preĝejo, ŝajnis al mi iel konata. „Ja tio estas kiel en Rusio!“ mi ekvokis surprizite. Mi pensis pri kantoj, spirita etoso kaj pri ĉiuj komunumoj, kiujn mi ekrlatis en la sekretaj komunumoj de la rusaj kredantoj. Patro de Valentina donacis al mi psalmaron, kiu iĝis mia granda helpo.

Kaj tiel mi komencis vizitadi ukrainajn preĝejojn. Mi trovis tie admirindan spiritan refreŝiĝon – precipe inter junaj homoj. Pli poste mi interkonatiĝis kun unu pastro. Foje mi diris al li, ke mia koro iasence estas ankoraŭ malplena kaj ke kvankam fizike mi estas libera, mi ne sentas min ankoraŭ perfekta. Mi eksplikis al li, ke mia plej granda deziro estas aparteni nur al Dio servante al Li. La pastro komprenis min, ni kune longe interparolis, respondante al mi multajn demandojn, eksplikante al mi multajn lokojn en la Biblio kaj li montris al mi la vojon al Dio.

Ĝis la morto mi dankemos lin.

Foje dum diservo li diris al mi: „Sergej, ĉu vi estas preta redoni la tutan vian vivon al Dio?“

„Jes“, mi respondis.

„Do ni kune preĝos.“

Dumpreĝe okazis en mi io definitiva, konkreta kaj admirinda. Mi eksentis perfektan Dian pacon. La serĉado finiĝis. Mi transdonis min en la manojn de Jesuo kaj Li eniris mian vivon. Denove mi naskiĝis kaj Jesuo plenigis mian internan malplenecon. La penso, ke mi apartenas al Nataŝa, al pastoro Litovĉenko kaj al la ceteraj kredantoj, kiujn mi persekutadis, estis belega. Mi estas unu el ili! La menciita pastro iĝis mia spirita gvidanto, ke mi konstante en la kredo kresku. Iutage li diris al mi: „Vi bezonas la Biblion en via gepatra lingvo,“ kaj li donis al mi malgrandan, nigran Biblion.

Kvazaŭ min trafus fulmo. Mi ne kredis al propraj okuloj!

La klerikulo rimarkis mian ŝokon kaj surprizite li demandis: „Kio al vi okazis?“

„Tiu Biblio,“ mi ekvokis, „ĝuste tiun mi jam vidis.“

„Kie?“

„En la subtera komunumo en Rusio!“ Mi malfermis ĝin kaj foliumis en ĝi. Jes, estis ĝi.

„Tio estas ebla,“ diris la pastro, „tiujn Bibliojn eldonas organizaĵo Underground Evangelism kaj sendas ilin en Ruslandon.“

„Kie mi povas trovi homojn, kiuj ĝin eldonadas?“ mi demandis. „Mi volus al ili danki kaj diri al ili, ke iliaj libroj atingas la difinitajn lokojn.“

Li donis al mi adreson kaj mi petis unu amikon, ke li mianome tien telefonu. Poste mi parolis kun ĝia prezidanto L. Loe Basson, kiu pri mi tre interesiĝis volante min ankaŭ persone ekkoni. Baldaŭ proponiĝis al ni okazo, kiam li dumvoje al Eŭropo haltis en Toronto. Ni kune interparolis kelkajn horojn. Mi eksciis pri laboro de tiu ĉi organizaĵo por helpo al persekutataj kristanoj en Sovetunio kaj en aliaj komunistaj landoj kaj mi dankis al li nome de ĉiuj samlandanoj. Post la fino de la lingva kurso mi ricevis de certa elektronika firmao

avantaĝan proponon kiel inĝeniero. Plena de atendadoj mi rigardis estontecon. Mi bone laboros, mi povos aĉeti aŭtomobilon, fondi familion, hejmon. Tio ĉio estis tre alloga. Sed mi ne povis senigi min de la rememoroj pri Rusio, forgesi pri la persekutataj kredantoj, pri la Biblio, kiuj estis plenmane ĵetataj en la fajron, pri la kristanoj, kiuj sekrete renkontiĝadis. Mi devis pensi pri juna viro, kiu okupis mian lokon en speciala polica trupo, pri milionoj de la junaj sovetaj homoj, kiuj – kiel mi – erarigitaj, sen iluzioj kaj elreviĝo malfacile serĉis veron. Mi devis fari ĉion, kio nur estis ebla por helpi ilin. Mi ne povis alie. Kaj tiel mi komencis paroli en preĝejoj, antaŭ ĵurnalistoj, en televido kaj ĉe aliaj okazoj pri la persekutadoj kaj malfacilaĵoj en Sovetunio, pri tio, kion por mi signifis iĝi kristano. Fine mi petis ĉiujn, ke ili preĝu por mia nacio kaj laŭeble helpadu al ĝi.

Iun vesperon mi revenis hejmen el okcidenta toronta stacio Dundas. Mi rimarkis, ke iu min observas. Tial mi subite haltis kaj min turnis. Malantaŭ mi staris tri viroj. Unu el ili per senerara rusa lingvo diris al mi: „Lastfoje ni vin avertas! Tenu la buŝon fermitan! Se vi ankoraŭfoje ĝin malfermos, vi iĝos ofero de malfeliĉo!“ Ili sin turnis kaj malaperis en mallumo.

Mi konis la sovetan policon tiel bone, por ke mi sciu, ke tio ne estis vanta averto. Sed ankaŭ mi sciis tion, ke mi rilate al mia nacio havas grandan respondecon, antaŭ ĉio rilate al tiuj, kiuj estas persekutataj pro kredo. Se mi silentos, kiu parolos iliafavore? Kiu ekscios pri iliaj turmentoj kaj treegaj malfacilaĵoj?

Kaj tiel mi spite de averto decidis agi laŭ mia konscienco. Kompreneble, mi sopiris pri la hejmo kaj normala, bonorda vivo, kiun mi neniam ekkonis. Sed unue mi devis ion fari por tiuj, kiujn mi postlasis en mia patrujo. Mi devis paroli pri iliaj sortoj kaj helpadi ilin.

Mi mem devis montri je mi al homoj – precipe al la junaj – ke Dio ekzistas kaj ke eĉ tute fuŝita vivo estas ŝanĝebla.

La animo de la granda rusa nacio ne mortis. La fremda sendieca kaj sterila ideologio ĝin ne sufokis kaj eĉ ne sufokos, ĝis vivos sur la mondo homoj kiel Aleksandr Solŝenicin, Nataŝa Zdanova kaj milionoj de aliaj, en kiuj brulas flamo de la amo kaj kredo.

Male, en miloj da subteraj komunumoj de la kredantoj brilas fajrero de la kredo pli hele ol antaŭe kaj konekso kun Diaj principoj ilin – verŝajne post kruela persekutado – ankoraŭ pli firmigis. Eble ekestos tago, kiam la lumoj de la amo kaj kredo kunverŝos sin en ununuran flamegon.

Mi turnas min kun mallaŭta mesaĝo al ĉiuj kredantoj en Rusio, kiuj tre kontribuis al la ŝanĝo de mia vivo. Mi priskribis ĝin en la libro esperante, ke tiu mesaĝo ilin iam trovos kaj ili ĝin komprenos.

Mi turnas min al sinjorino Litovĉenkova, paralizita edzino de pastoro, kiun ni mortigis apud Elisov. „Mi volas al vi diri, ke mi tion ege bedaŭras, pli multe, ol vi povas imagi!“

Al Nina Rudenkova, bela knabino, al kiu mia grupo detruis vivon: „Mi petegas vin, pardonu nin!“

Kaj fine al Nataŝa, kiun mi tiel terure bategis kaj kiu pretis pro la kredo eĉ trifoje sin lasi bategi:

„Nataŝa, precipe viamerite mia vivo ŝanĝiĝis! Mi iĝis via frato en Jesuo Kristo. Mi havas antaŭ mi novan vivon. Dio pardonis al mi. Mi esperas, ke ankaŭ vi pardonos al mi.“

„Mi dankas al vi, Nataŝa, estu vi kiu ajn. Neniam mi vin forgesos!“


Postparolo

Mallonge post la finverko de tiu ĉi libro Sergej mortis. Sian „novan vivon“ li dediĉis al la tasko atentigadi la kredantojn en Norda Ameriko pri la malfacila situacio de la kristanoj en Sovetunio kaj peti de ili Bibliojn kaj helpon de ĉiu speco.

Ekde februaro ĝis aprilo 1972 li rakontadis sian aferon en multaj preĝejoj de Kanado. La unuan de majo 1972 li iĝis membro de Underground Evangelism, kiu helpadis al la kredantoj en komunismaj landoj.

Sergej parolis al kolektiĝoj de la kredantoj, en televido, antaŭ reprezentantoj de la registaro, disponigis al ĵurnalistoj intervjuojn. Li parolis pri metodoj de la sekreta polico, pri la persekutadoj de la kredantoj. Krom tio li laboris verkante tiun ĉi libron. Kun ĝojo li atendadis, kiam li povos pere de radioelsendo alparoli la rusan junularon.

Meze de la preparoj al tiu ĉi evento alvenis sciigo pri lia morto. Li ofte menciis tion, ke li sentas sin konstante endanĝerigita. Fine li por sia memdefendo prunteprenis pistolon. La 1-an de februaro 1973 lin el ĝi mortige trafis kuglo. Memmortigo estis ekskludita. La 1-an de marto 1973 estis anoncite, ke li iĝis viktimo de „sortobato“. Ĝuste tiutage Sergej ĝisvivus sian dudek duan jaraĝon.



Sergej K. Dakov